

Konektikuta jankio en
la kortego de reĝo
Arturo

de

Mark Twain

traduko:

Gunnar Gällmo

Origina titolo: *A Connecticut Yankee in King Author's Court*

© originalo: libera (la aŭtoro mortis en 1910)

© traduko: Gunnar Gällmo 2021

Ankaŭ eldonitaj de la sama tradukisto:

Jules Verne: *La ĉaso al la meteoro*

H. G. Wells: *La insulo de doktoro Moreau*

Enhavo:

- Klariga vorto 5
1. Kameloto 15
 2. La kortego de reĝo Arturo 18
 3. La kavaliroj de la Ronda Tablo 26
 4. Sir Dinadan la humoristo 34
 5. Inspiro 39
 6. La eklipso 48
 7. La turo de Merlino 57
 8. La estro 66
 9. La turniro 75
 10. Civilizo komenciĝas 84
 11. La jankio serĉas aventurojn 91
 12. Malrapida torturo 103
 13. Liberaj viroj 109
 14. "Defendu vin, sinjoro!" 121
 15. La rakonto de Alisande 127
 16. Morgan le Fay 138
 17. Reĝa bankedo 147
 18. En la kavernoj de la reĝino 160
 19. Kavalirvagado kiel profesio 175
 20. La kastelo de la trolo 184
 21. La pilgrimoj 190
 22. La sankta fonto 208
 23. La restaŭro de la fonto 223
 24. Rivala magiisto 235
 25. Ekzamenado sub konkurenco 250
 26. La unua gazeto 268

- 27. La jankio kaj la reĝo vojaĝas inkognite 283
- 28. Trejnante la reĝon 295
- 29. La variolo-kabano 301
- 30. La tragedio de la ĉefa biendomo 311
- 31. Marco 326
- 32. La humiligo de Dowley 336
- 33. Politika ekonomio de la sesa jarcento 346
- 34. La jankio kaj la reĝo vendataj kiel sklavo
363
- 35. Bedaŭrinda okazo 380
- 36. Renkonto en la mallumo 391
- 37. Terura situacio 397
- 38. Sir Lanceloto kaj kavaliroj al helpo 408
- 39. La batalo de la jankio al la kavaliroj 412
- 40. Tri jarojn poste 427
- 41. Interdikto 438
- 42. Milito! 444
- 43. La batalo ĉe la Sablobelto 462
- 44. Postskribo de Clarence 483
- Fina PS de MT 486

Klariga vorto 5

En la kastelo de Warwick mi renkontis la strangan fremdulon, pri kiu mi rakontos. Li allogis min per tri aferoj: lia malferma simpleco, liaj mirindaj konoj pri antikvaj armaĵoj, kaj lia trankviliga kunestado – ĉar nur li parolis. Ni ambaŭ finiĝis, kiel faras modestaj homoj, laste en la homamaso gvidata, kaj li tuj komencis paroli pri aferoj kiuj interesis min. Dum li paroladis, milde, agrable, flue, li ŝajnis flosi nepercepteble el ĉi tiu mondo kaj tempo, en iun malproksiman eraon kaj malnovan, forgesitan landon; kaj iom post iom, li sorĉis min tiel, ke mi ŝajnis moviĝi inter la fantomoj kaj ombroj kaj polvo kaj ŝimoj de griza antikveco, parolante kun unu el ili. Ĝuste kiel mi parolus pri miaj plej proksimaj amikoj aŭ malamikoj, aŭ pri miaj plej bone konataj najbaroj, li parolis pri Sir Bedevere, Sir Bors de Ganis, Sir Lanceloto de la Lago, Sir Galaho kaj ĉiuj aliaj grandaj nomoj de la Ronda Tablo – kaj kiel maljuna, nepriskribeble maljuna kaj paliĝinta kaj seka kaj mucida kaj praa li ekŝajnis dum li paroladis! Finfine li turnis sin al mi kaj diris, ĝuste kiel oni povas paroli pri la vetero, aŭ pri iu ajn alia kutima afero:

"Vi konas la transmigran de animoj; ĉu vi konas la transloĝiĝon de epokoj – kaj korpoj!"

Mi diris ke mi ne aŭdis pri tio. Li tiel

malmulte interesiĝis – kiel kiam homoj parolas pri la vetero -- ke li ne rimarkis ĉu mi respondis aŭ ne. Estis duona momento de silento, tuj interrompata de la monotona voĉo de la salajrata cicerono:

"Antikva maŝkiraso, el la sesa jarcento, tempo de reĝo Arturo kaj la Ronda Tablo; laŭdire posedita de la kavaliro Sir Sagramor la Dezirplena; notu la rondan truon tra la kiraso ĉe la maldekstra parto de la brusto; origino nekonata; supozeble farita per kuglo post la invento de pulvo – eble, malice, de la soldatoj de Cromwell."

Mia konatulo ridetis – ne modernan rideton, sed rideton certe eksmodan jam dum multaj, multaj jarcentoj – kaj murmuris, evidente al si mem:

"Sciu bone, _mi vidis kiam okazis_."

Poste, post paŭzo, li aldonis:

"Mi mem faris ĝin."

Kiam mi retrovis mian balancon post la elektra surprizo de tiu rimarko, li estis jam foririnta.

Dum la tuta vespero, mi sidis ĉe mia fajro en Warwick Arms, en profunda sonĝo pri malnovaj tempoj, dum la pluvo batis la fenestrojn, kaj la vento muĝis ĉirkaŭ la tegmento kaj anguloj. De tempo al tempo mi profundiĝis en la fascinan libron de la maljuna Sir Thomas Malory, kaj

nutris min per ĝia riĉa festo de mirakloj kaj aventuroj, enspiris la bonan odoron de ĝiaj antikvaj nomoj, kaj denove sonĝis. Kiam fine estis noktomezo, mi legis plian rakonton, antaŭ enlitiĝi -- nome la sekvontan:

KIEL SIR LANCELOTO MORTIGIS DU GIGANTOJN, KAJ LIBERIGIS KASTELON

Kaj nun venis al li du grandaj gigantoj, bone armitaj, krom la kapoj, kaj kun du teruraj klabo enmane. Sir Lanceloto metis sian ŝildon antaŭ si, deturnis la atakon de unu giganto, kaj per sia glavo fendis lian kapon. Kiam lia kunulo vidis tion, li forkuris kiel frenezulo, timante la terurajn batojn, kaj Sir Lanceloto kuris post li plenforte, kaj batis lian ŝultron, kaj fendis lin ĝis la talio. Poste Sir Lanceloto iris en la halon, kaj antaŭ li venis sesdek sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kaj ĉiuj genuiĝis antaŭ li, kaj dankis Dion kaj lin pro ilia liberigo. Ĉar, sinjoro, ili diris, la plej multaj el ni estis malliberaj ĉi tie dum sep jaroj, kaj ni laboris ĉiumaniere per silko por nia manĝaĵo, kaj ni ĉiuj naskiĝis nobelinoj, kaj benita estu la tempo, ho kavaliro, kiam vi naskiĝis; ĉar vi faris la plej bravan heroaĵon kiun iam faris kavaliro en ĉi tiu mondo, kaj tio estos memorata, kaj ni petas vin diri al ni vian nomon, por ke ni povu vidi al niaj amikoj kiu liberigis nin el la karcero. Belaj

sinjorinoj, li diris, mia nomo estas Sir Lanceloto de la Lago. Kaj tiel li foriris de ili kaj konfidis ilin al Dio. Kaj poste li sidiĝis sur lia ĉevalo, kaj rajdis en multajn strangajn kaj sovaĝajn landojn, kaj tra multaj akvoj kaj valoj, kaj malbone li loĝis. Kaj finfine, bonŝance dum iu noktö hazarde li venis al bela loĝejo, kaj en ĝi li trovis maljunan nobelinon, kiu loĝigis lin bonvole, kaj tie li kaj lia ĉevalo bone fartis. Kaj kiam estis tempo, lia gastiganto venigis lin en belan subtegmentan ĉambron, super la pordo, al lia lito. Tie Sir Lanceloto senvestiĝis, kaj metis sian kirason apud si, kaj enlitiĝis, kaj baldaŭ li ekdormis. Kaj mallonge post tio venis rajdanto, kaj li frapis al la pordo tre rapide. Kaj kiam Sir Lanceloto aŭdis tion, li ekstaris, kaj rigardis tra la fenestro, kaj vidis en la lumluno tri kavalirojn veni rajdante malantantaŭ tiu viro, kaj ĉiuj tri samtempe atakis lin per glavoj, kaj tiu sola kavaliro brave turnis sin al ili kaj defendis sin. Vere, diris Sir Lanceloto, tiun solan kavaliron mi defendu, ĉar estus hontige por mi vidi tri kavalirojn ataki unun, kaj se li estos mortigata, mi kunkulpos. Kaj tiam li prenis sian kirason, kaj eliris tra la fenestro, kaj per litotuko subeniris al la kvar kavaliroj, kaj poste Sir Lanceloto diris laŭte: Turni vi, ho kavaliroj, al mi, kaj ĉesu batali kun tiu kavaliro. Kaj tiam ĉiuj tri forlasis Sir Kay, kaj turnis sin al Sir Lanceloto, kaj tie komenciĝis granda batalo,

ĉar ili ĉiuj tri falis super Sir Lanceloto, kaj donis al li multajn batojn, kaj atakis lin el ĉiuj flankoj. Tiam Sir Kay ekstaris por helpi Sir Lanceloton. Ne, sinjoro, tiu diris, mi ne volas havi vian helpon, do se vi volas havi mian helpon, vi lasu min batali sola kontraŭ ili. Sir Kay, por plaĉi al la kavaliro, lasis lin agi laŭ sia propra volo, kaj mem venis flanken. Kaj tiam baldaŭ, per ses batoj, Sir Lanceloto faligis ilin.

Kaj tiam ili ĉiuj tri kriis: Sir Kavaliro, ni kapitulacas al vi pro via enorma forto. Mi ne akceptas, diris Sir Lanceloto, ke vi kapitulacas al mi, sed se vi kapitulacas al Sir Kay la ĉefkelnero, tiam mi lasos vin vivi; se ne, ne. Bona kavaliro, ili diris, tion ni ne volas fari, ĉar se temas pri Sir Kay, ni ĉasis lin ĉi tien, kaj ni venkus lin, se ne estus vi; tial, ni ne havus kialon kapitulaci al li. Do, pri tio, diris Sir Lanceloto, pripensu bone, ĉar vi povas elekti ĉu vi mortu aŭ vivu; kaj se vi kapitulacos, vi faros tion al Sir Kay. Bona kavaliro, ili tiam diris, por savi niajn vivojn, ni faros kiel vi ordonas. Tiam vi, diris Sir Lanceloto, dum la venonta pentekosto iru al la kortego de reĝo Arturo, kaj tie vi kapitulacu al la reĝino Ginevra, kaj serĉu ĉiuj tri ŝiajn gracon kaj kompaton, kaj diru ke Sir Kay sendis vin tien por esti ŝiaj malliberuloj. Matene Sir Lanceloto ellitiĝis frue, kaj lasis Sir Kay dormi; kaj Sir Lanceloto prenis la armilojn kaj ŝildon de Sir

Kaj kaj vestiĝis, venis al la stalo kaj prenis ankaŭ la ĉevalon de Sir Kay, kaj adiaŭis sian gastiganton, kaj foriris. Kaj baldaŭ poste ellitiĝis Sir Kay, kaj ne vidis Sir Lancelot, kaj poste komprenis ke tiu havis liajn armilojn kaj ĉevalon. Nun mi bone scias ke tio iom dolorigos la kortegon de reĝo Arturo; ĉar por li, kavaliroj estas kuraĝaj, kaj ili kredos ke estas mi, kaj tio trompos ilin; kaj pro liaj armiloj kaj ŝildo, mi certe rajdos pace. Kaj baldaŭ poste foriris Sir Kay, kaj dankis sian gastiganton.

Kiam mi formetis la libron, iu frapis la pordon, kaj mia fremdulo eniris. Mi donis al li pipon kaj seĝon, kaj bonvenigis lin. Mi ankaŭ komfortigis lin per malvarma skota viskio, donis al li plian, kaj ankoraŭ plian – la tutan tempon esperante lian rakonton. Post kvara persvadilo li mem englitis en tion, en tute simpla kaj natura maniero.

LA RAKONTO DE LA FREMDULO

Mi estas usonano. Mi naskiĝis kaj kreskis en Hartford, en la ŝtato Konektikuto -- ĉiuokazo, nur trans la rivero, en la kamparo. Do mi estas jankio de la jankioj – kaj praktikema, jes, kaj preskaŭ sen sentoj, mi supozas – aŭ poezio, alivorte. Mia patro estis forĝisto, mia onklo ĉevalkuracisto, kaj mi estis ambaŭ, almenaŭ komence. Poste mi

transiris al la granda armilfabriko kaj lernis mian veran profesion; lernis ĉion pri ĝi; lernis fari ĉion: pistolojn, revolverojn, kanonojn, vaporkaldronegojn, motorojn, ĉiuspecajn laborŝparantajn maŝinojn. Mi ja povis fari ion ajn deziratan – ion ajn en la mondo, ne gravis kion; kaj se ne estis iu nova, rapida maniero fari ion, mi povis inventi tiun – kaj fari tion tute facile. Mi iĝis ĉefa laborestro, havis kelkmil homojn sub mi.

Nu, tia homo estas homo batalema – memkompreneble. Kun kelkmil brutaluloj sub si, oni havas sufiĉe da tiaj amuzaĵoj. Almenaŭ mi havis. Finfine mi renkontis mian egalulon, kaj ricevis mian dozon. Estis dum miskompreno per ŝraŭbŝlosiloj, kun iu kiun ni kutimis nomi Herkulo. Li faligis min per frakasanta bato al la kapoflanko, kiu eksplodigis ĉion, kaj ŝajnis detrui ĉiun artikon en mia kranio kaj meti ĝin super ĝia najbaro. Tiam la mondo iĝis tute malluma, kaj mi sentis nenion plu, kaj mi sciis tute nenion – almenaŭ dum momento.

Kiam mi denove konsciiĝis, mi sidis sub kverko, sur la herbaro, kun tuta bela kaj larĝa kampara pejzaĝo nur por mi – preskaŭ. Ne tute; ĉar estis ulo sur ĉevalo, rigardanta suben al mi – ulo rekte prenita el bildlibro. Li estis tute vestita en malnovstila fera armaĵo, kun surkape kasko kun la formo de najlobarelo kun fendo; kaj li

havis ŝildon, kaj glavon, kaj imponan lancon; kaj ankaŭ lia ĉevalo havis armaĵon, kaj ŝtalan kornon elstarantan el la frunto, kaj brilajn ruĝajn kaj verdajn silkoŝtofojn pendantajn ĉirkaŭ li kiel litokovrilo, preskaŭ ĝis la tero.

"Bona sinjoro, ĉu vi volas?" diris la ulo.

"Ĉu mi volas kion?"

"Ĉu vi volas perarmile batali por lando aŭ por sinjorino aŭ por..."

"Ĉu vi mokas min?" mi diris. "Reiru al via cirko, aŭ mi raportos vin."

Nun kion faras tiu ulo, krom retroiri kelkcent jardojn, kaj poste kuregi al mi, tiel forte kiel li kapablis, kun sia najlobarilo klinita preskaŭ al la kolo de lia ĉevalo, kaj sia lanco direktita rekte antaŭen. Mi vidis ke li estis serioza, do mi estis en la arbo kiam li venis.

Li asertis ke mi estas lia posedaĵo, kaptita de lia lanco. Li havis certajn argumentojn – kaj la plej fortan pozicion – do mi decidis ke estis pli bone lasi lin kredi tion. Ni faris interkonsenton, ke mi iru kun li kaj li ne damaĝu min. Mi venis suben, kaj ni ekiris. Mi iradis apud lia ĉevalo. Ni promenis komforte, tra densejoj kaj super riveretoj kiujn mi ne memoris esti jam vidinta – kio konfuzis min kaj igis min sciviolema – kaj tamen ni ne venis al iu cirko aŭ spuro de cirko. Do mi rezignis la ideon pri cirko, kaj konkludis ke li venis el mensa malsanulejo. Sed ni neniam

venis al mensa malsanulejo – do mi nenion komprenis. Mi demandis al li je kia distanco ni estis de Hartford. Li diris ke li neniam aŭdis pri tiu loko, kion mi kredis estis mensogo, sed mi ne komentis. Post horo, ni vidis malproksime urbon dormantan en valo ĉe meandra rivero; kaj malantaŭ ĝi sur monteto granda, griza kastelo kun mурdentoj kaj turoj, la unua kiun mi iam vidis krom en bildoj.

"Bridgeport?" mi diris, indikante.

"Kameloto," li diris.

Mia fremdulo montris signojn de dormemo. Nun li notis ke lia kapo balancis, kaj ridetis je lia kortuŝa, malnovstila maniero, kaj diris:

"Evidente, mi ne povas kontinui; sed venu kun mi, mi havas ĉion skribite, kaj vi povas legi, se vi volas."

En sia ĉambro, li diris:

"Unue, mi skribis taglibron; poste, iom post iom, post jaroj, mi prenis la taglibron kaj faris el ĝi libron. Antaŭ tiel longe!"

Li donis al mi sian manuskripton, kaj indikis la lokon kie mi eklegu.

"Komencu ĉi tie – mi jam rakontis kio okazis antaŭ tio."

Nun li estis profunde dormema. Kiam mi eliris tra lia pordo, mi aŭdis lin murmuri:

"Ĝi donu al vi grandan plezuron, nobla

sinjoro."

Mi sidiĝis ĉe mia fajro kaj ekzamenis mian trezoron. Ĝia unua parto – la plej granda – estis el pergameno, kaj flava pro aĝo. Mi precipe rigardis unu paĝon, kaj trovis ke ĝi estis palimpsesto. Sub la malnovaj, malklaraj skribaĵoj de la jankia historiisto videblis spuroj de skribaĵoj eĉ pli malnovaj kaj malklaraj – latinaj vortoj kaj frazoj, fragmentoj de malnovaj monaĥaj legendoj, evidente. Mi venis al la loko indikita de mia fremdulo, kaj komencis legi – tiel:

1. Kameloto

"Kameloto... Kameloto," mi diris al mi mem. "Mi ne memoras ke mi aŭdis pri ĝi antaŭe. Nomo de la mensa malsanulejo, verŝajne."

Estis milda, trankvila, somera pejzaĝo, bela kiel sonĝo, kaj soleca kiel dimanĉo. La aero estis plena de floraodoro, kaj de insekta zumado, kaj pepado de birdoj, kaj ne estis homoj, ne veturiloj, neniu movo de vivo, nenio okazanta. La vojo estis ĉefe meandra pado kun spuroj de bestopiedoj, kaj foje malfortaj de radoj ambaŭflanke en la herbaroj – radoj evidente same larĝaj kiel homa mano.

Baldaŭ aperis eta knabino, ĉirkaŭ dekjara, kun akvofalo de oraj haroj fluanta super ŝiaj ŝultroj. Ĉirkaŭ sia kapo ŝi havis kronon de fajre ruĝaj papavoj. Pli belan ornamon mi neniam vidis. Ŝi piediris trankvile, kun ripozanta menso, kaj ĝian ripozon spegulis ŝia senkulpa vizaĝo. La cirkusulo ne atentis ŝin; ŝajne eĉ ne vidis ŝin. Kaj ŝi – ŝi ne estis pli surprizata de lia fantazia apero, ol se ŝi kutime vidis tiajn fantaziaĵojn ĉiutage. Ŝi pasis lin tiel indifere, kiel ŝi pasus kelkajn bovinojn; sed kiam ŝi hazarde vidis min, *tiam_ okazis ŝanĝo!* Ŝi hisis la manojn kaj iĝis ŝtono; ŝia buŝo malfermiĝis; ŝiaj okuloj fiksrigardis larĝe kaj timplene, ŝi estis la bildo de surprizita scivolemo piprita de timo. Kaj tie ŝi

staris rigardante, kvazaŭ senvorte sorĉita, ĝis ni pasis angulon en la arbaro kaj ŝi ne plu povis vidi nin. Ke ŝi surpriziĝu pro mi kaj ne pro la alia ulo, estis por mi tro; mi nenion komprenis. Kaj ke ŝi rigardu min kiel io sensacia, kaj tute forgesu ŝiajn proprajn meriton pri tio, estis io same surpriza, kaj ankaŭ montranta grandanimecon, ne ofte vidata ĉe iu tiel juna. Jen kaŭzo pripensi. Mi moviĝis kiel en sonĝo.

Kiam ni proksimiĝis al la urbo, vivsignoj komencis aperi. Fojfoje ni pasis kabanaĉon, kun pajlotegmento, kaj ĉirkaŭ ĝi etaj kampoj kaj ĝardenetoj ne bone kultivataj. Ankaŭ homoj estis tie: fortikaj viroj kun longaj, krudaj, nekombitaj haroj, kiuj pendis super iliaj vizaĝoj kaj igis ilin aspekti kiel bestoj. Ili kaj la virinoj ĝenerale vestiĝis en kruda robo kun ŝnurego, ĝis sub la genuoj, kaj primitivaj sandalaloj, kaj multaj portis feran kolumon. La etaj knaboj kaj knabinoj estis ĉiam nudaj, sed neniu ŝajnis scii tion. Ĉiuj tiuj homoj fiksrigardis min, babilis pri mi, kuris en siajn kabanojn kaj eligis siajn familiojn por gapi al mi; sed neniu iam rimarkis la alian ulon, krom por humile saluti lin kaj por tio ricevi neniun respondon.

En la urbo estis kelkaj stabilaj ŝtndomoj sen fenestroj, dise en sovaĝejo de kabanoj kun pajlotegmentoj; la stratoj estis etaj kaj oblikvaj, kaj sen pavimoj; aroj de hundoj kaj nudaj infanoj

ludis en la suno, farante laŭtajn sonojn; porkoj vagis kaj fosis kontente, kaj unu el ili kuŝis en malbonodoranta valo meze en la ĉefa strato kaj suĉigis sian familion. Baldaŭ aŭdiĝis malproksime militista muziko. Ĝi venis proksimen, pli proksimen, kaj baldaŭ nobla kavalkado ekvideblis, pompa kun pluvhavantaj kaskoj kaj brilantaj armaĵoj kaj fieraj flagoj kaj luksaj jakoj kaj ĉevalkovriloj kaj orkovritaj lancpintoj; kaj inter fekaĵoj kaj porkoj, kaj nudaj etuloj, kaj ĝojplenaj hundoj, kaj kadukaj kabanaj, ĝi galante iradis, kaj post ĝi ni sekvis. Sekvis tra unu oblikva strateto kaj poste alia – supren, ĉiam supren – ĝis ni fine atingis la freŝan altecon kie staris la granda kastelo. Kornoj salutis, kornoj respondis; poste interkonsiliĝoj el la muroj, kie armitaj viroj, en kirasoj kaj kaskoj, marŝis tien kaj reen kun halebardoj surŝultre sub flirtantaj flagoj kun kruda bildo de drako; kaj tiam la grandaj pordoj malfermiĝis, la levponto malleviĝis, kaj la pinto de la kavalkado kuris antaŭen sub la minacaj volboj; kaj ni, sekvantaj, baldaŭ staris sur granda, pavimita korto, kun murdentoj kaj turoj streĉantaj en la bluan aeron je ĉiuj kvar flankoj; kaj ĉie ĉirkaŭ ni oni elĉevaliĝis **kaj intersalutis ceremonie, kuris tien kaj reen,** gaje montris moviĝantaj kaj miksitajn kolorojn, fakte tre agrabla konfuzo kaj bruo.

2. La kortego de reĝo Arturo

Tuj kiam mi povis, mi diskrete iris flanken kaj tuŝis la ŝultron de kutimaspekta maljunulo, kaj diris, en orelplaĉa, fidelema maniero:

"Amiko, donu al mi servon. Ĉu vi apartenas al la mansanulejo, aŭ ĉu vi nur estas ĉi tie pro vizito aŭ io simila?"

Li rigardis min stulte, kaj diris:

"Vidu, bona sinjoro, ŝajnas al mi..."

"Tio sufiĉas," mi diris. "Mi supozas ke vi estas paciento."

Mi foriris, cerbumante, kaj samtempe havis okulojn malfermajn se hazarde pasus iu kun funkcia cerbo kiu povus informi min. Baldaŭ mi kredis ke mi trovis tion; do mi prenis lin flanken kaj flustris en lia orelo:

"Se mi povus renkonti la direktoron dum minuto – dum minuto..."

"Bonvolu ne lasi min."

"Lasi vin kion?"

"*Malhelpi* min, do, se tiu vorto plaĉas al vi pli."

Poste li diris ke li estis subkuiristo, kaj ne havis tempon klaĉi, kvankam li ŝatus fari tion je alia okazo; ĉar ĝojigus lian propran hepaton scii kie mi ekhavis miajn vestaĵojn. Kiam li komencis foriri, li indikis kaj diris ke jen iu sufiĉe

nenionfaranta por miaj celoj, kaj cetera min serĉanta, sendube. Estis gaja, svelta knabo en salikokkolora pantalono, pro kiu li aspektis kiel splitita karoto; la cetero de liaj vestaĵoj estis blua silko kaj rafinitaj ŝnuroj kaj plumoj; kaj li havis longajn, flavajn buklojn, kaj portis rozkoloran satenan ĉapon malzorgeme oblikva super la orelo. Li ŝajnis bonhumora; li iris kvazaŭ li estis kontenta pri si mem. Li estis sufiĉe bela por havi kadron. Li venis kaj rigardis min kun ridetanta kaj impertinenta scivolemo; diris ke li venis pro mi, kaj informis min ke li estis paĝio.

"Paĝo?" mi diris. "Stultaĵo; vi ne estas pli ol alineo."

Estis iom severe, sed mi iritiĝis. Tamen, tute ne ĝenis lin; li ne ŝajnis scii ke li estis insultata. Li komencis paroli kaj ridi, en feliĉa, senpena, knabeca maniero, dum ni iradis, kaj tuj ni iĝis malnovaj amikoj; li faris al mi ĉiajn demandojn pri mi mem kaj pri miaj vestaĵoj, sed neniam atendis por aŭdi respondon – nur senbride babiladis, kiel se li ne sciis ke li jam faris demandon kaj ne atendus respondon, ĝis li finfine hazarde menciis ke li naskiĝis komence de la jaro 513.

Tio frostigis min kaj kaj mi haltis kaj diris, kun iom malforta voĉo:

"Eble mi ne aŭdis vin korekte. Diru tion denove – kaj malrapide. Kiu jaro estis?"

"513."

"513. Vi ne aspektas tia. Vidu, knabo mia, mi estas fremdulo kaj sen amikoj; estu honesta kaj honora al mi. Ĉu vi estas tute sana?"

Li diris ke li estis.

"Ĉu ĉi tiuj aliaj estas sanaj?"

Li diris ke ili estis.

"Kaj ĉi tio ne estas mensa malsanulojo? Mi volas diri, ne estas loko kie oni kuracas frenezulojn?"

Li diris ke ne estis.

"Nu bone," mi diris, "aŭ mi estas freneza, aŭ okazis io tute timiga. Nun diru al mi, honeste kaj vere: kie mi estas?"

"En la kortego de reĝo Arturo."

Mi atendis dum minuto, por lasi tiun ideon trovi sian lokon, kaj poste diris:

"Kaj laŭ via opinio, kiu jaro estas nun?"

"528 – la 19a de junio"

Mi havis strangan senton, kaj murmuris:

"Mi neniam denove vidos miajn amikojn – neniam, neniam denove. Ili naskiĝos nur post pli ol mil tricent jaroj."

Ŝajnis ke mi kredis la knabon, mi ne sciis kial. Io en mi ŝajne kredis lin – mia konscio, oni povas diri, sed ne mia racio. Mia racio tuj komencis protesti; tio estis natura afero. Mi ne sciis kiel kontentigi ĝin, ĉar mi sciis ke la atestoj de homoj ne funkcius – mia racio dirus ke ili estas frenezaj,

kaj malakceptus ilian pruvojn. Sed tutsubite, mi stumblis sur la esenca afero, tute hazarde. Mi sciis ke la sola totala suneklipso dum la unua duono de la sesa jarcento okazis la 21an de junio 528 post Kristo, malnova stilo, kaj ke ĝi komenciĝis 3 minutojn post la 12a horo tagmeze. Mi sciis ankaŭ ke neniu totala suneklipso okazos dum kio por *mi* estis la nuna jaro – tio estas 1879. Do, se mi povus malhelpi ke mia maltrankvilo kaj scivolemo voros mian koron dum kvardek ok horoj, poste mi certe scios ĉu ĉi tiu knabo diris la veron aŭ ne.

Do mi, kiel praktikema homo el Konektikuto, nun forigis la tutan problemon el mia menso ĝis venos ĝiaj tago kaj horo, por ke mi povu toni mian tutan atenton al la cirkonstancoj de la nuno, kaj esti vigla kaj preta plejeble profiti de ili. "Po unu afero", jen mia devizo – kaj ludu la tutan valoron de la kartoĵoj, eĉ se estas nur du paroj kaj unu bubo. Mi decidis du aferojn: se ankoraŭ estis la deknaŭa jarcento, kaj mi estis inter frenezuloj kaj ne povis foriri, mi baldaŭ gvidos tiun malsanulejon aŭ scios kial; kaj se, aliflanke, fakte estis la ses jarcento, bone, mi ne kontentigos min per malpli: mi gvidos la tutan landon post malpli ol tri monatoj; ĉar mi opiniis ke mi estis la plej bone edukita homo en la regno per marĝeno de pli ol mil tricent jaroj. Mi ne volas malŝpari mian tempon post decido, kiam io estas farinda, do mi

diris al la paĝio:

"Nun, Clarence, knabo mia – se nun tio hazarde estas via nomo – mi volas ke vi iom informu min, se vi akceptas. Kiel nomiĝas tiu aperaĵo kiu venigis min ĉi tien?"

"Mia mastro kaj via? Tio estas la bona kavaliro kaj granda sinjoro, Sir Kay la ĉefkelnero, nutrofrato de nia sinjoro la reĝo."

"Tre bone; kontinuu, rakontu al mi ĉion."

Li faris el tio longan rakonton; sed la parto kiu havis por mi rektan intereson estis ĉi tio: Li diris ke mi estis malliberulo de Sir Kay, kaj ke ĝustatempe oni ĵetos min en karceron kaj lasos min resti tie kun malmulte da manĝaĵoj ĝis miaj amikoj elaĉetos min – se mi ne hazarde putros antaŭ tio. Mi komprenis ke la dua alternativa estis la plej verŝajna, sed mi ne zorgis pri tio; la tempo estis tro multekosta. La paĝio diris ankaŭ ke ĉirkaŭ nun oni finis la vespermanĝon en la granda halo, kaj ke tuj kiam komenciĝos la kunestado kaj la abunda drinkado, Sir Kay enkondukos min kaj montros min al reĝo Arturo kaj liaj famaj kavaliroj sidantaj ĉirkaŭ la Ronda Tablo, kaj fanfaronos kiel brave li konkeris min, kaj verŝajne iomete troigos; sed ne estus bonaj manieroj se mi korektus lin, kaj ankaŭ ne tre sekure; kaj kiam mi estis finmontrita, tiam hej al la karcerio; sed li, Clarence, trovos manieron veni kaj vidi min fojfoje, kaj kuraĝigi min, kaj helpi

min sendi vortojn al miaj amikoj.

Sendi vortojn al miaj amikoj! Mi dankis lin; mi ne povis fari malpli; kaj ĝuste nun venis lakeo por diri ke oni volis vidi min; do Clarence enkondukis min kaj gvidis min flanken kaj sidiĝis apud mi.

Nu, estis mirinda spektaklo, kaj interesa. Estis grandega loko, kaj sufiĉe nuda – jes, kaj plena de laŭtaj kontrastoj. Estis tre, tre alta; tiel alta ke la flagoj kiuj pendis el la arkaĵaj traboj tie supre ŝvebis en ia krepusko; je ĉiu fino estis balustrado kun ŝtona relo, tre alte, kun muzikistoj en unu, kaj en la alia virinoj, vestitaj en brilaj koloroj. La planko estis el grandaj ŝtonplatoj metitaj en nigraj kaj blankaj kvaranguloj, sufiĉe difektitaj de tempo kaj uzo, kaj riparendaj. Ornamaĵoj tute ne estis, strikte dirite, kvankam sur la muroj pendis grandaj gobelinoj, verŝajne rigardataj kiel artaĵoj; batalbildoj ili estis, kun ĉevaloj formitaj kiel tiuj, kiujn infanoj tranĉas el papero aŭ kreas el spickuketoj; kun homoj sur ili en maŝkiraso, kies maŝojn reprezentis rondaj truoj – do ies jako aspektis kiel farita de kukformujo. Estis fajrujo, tiel granda ke oni povus tendumi en ĝi; kaj ĝiaj elstarantaj flankoj kaj tegmento, el hakita ŝtono, aspektis kiel pordo de katedralo. Laŭ la muroj staris armitaj viroj, en kaskoj kaj brustplatoj, kun halebardoj kiel solaj armiloj – rigidaj kiel statuoj; kaj tiel ili aspektis.

Meze en tiu volbita publika spaco staris kverkligna tablo, kiun oni nomis la Ronda Tablo. Ĝi estis same granda kiel cirko-areno, kaj ĉirkaŭ ĝi sidis granda aro de viroj, vestitaj en tiel variaj kaj brilaj koloroj ke ili dolorigis la okulojn, se oni rigardis ilin. Ili ĉiam portis siajn plumhavajn ĉapelojn, krom kiam iu turnis sin rekte al la reĝo; tiam li levis sian ĉapelon iomete, ĝuste kiam li komencis paroli.

Ĉefe, ili trinkis – el tutaj bov-kornoj; sed kelkaj ankoraŭ maĉis panon aŭ ronĝis ostojn. Estis averaĝe du hundoj por ĉiu homo; kaj tiuj sidis atendante ĝis finronĝita osto estis ĵetita al ili, kaj tiam ili ĵetis sin al ĝi amase, rapide, kaj sekvis batalo kiu plenigis la vidaĵon per tumulta ĥaoso de atakantaj kapoj kaj korpoj kaj svingantaj vostoj, kaj la ŝtormo de blekoj kaj bojoj kaŝis ĉiun parolon dum iom da tempo; sed tio ne gravis, ĉar la hundobatalo ĉiuokaze ĉiam estis pli interesa; la viroj stariĝis, foje, por vidi ĝin pli bone kaj veti, kaj la virinoj kaj muzikistoj streĉis sin super la balustrado samkiale; kaj ĉiuj gaje ekkriis de fojo al fojo. Fine, la gajninta hundo streĉis sin komforte kun la osto inter siaj piedoj, kaj poste gruntis super ĝi, kaj ronĝis ĝin, kaj malpurigis la blankon per ĝi, same kiel jam faris kvindek aliaj; kaj la cetero de la kortego rekomencis siajn antaŭajn agadojn kaj distraĵojn.

Generale, tiuj homoj parolis kaj kondukis

gracie kaj ĝentile; kaj mi notis ke ili bone kaj serioze aŭskultis kiam iu rakontis ion – tio estas, kiam ne okazis hundobatalo. Same klare, ili estis infanecaj kaj senkulpaj; mensogis plej digne, ĝentile kaj naive, kaj estis volonte pretaj aŭskulti la mensogon de iu alia, kaj ankaŭ kredi ĝin. Estis malfacile ligi ilin al io kruela aŭ timiga; kaj tamen ili rakontis pri sango kaj sufero kun malferma ĝuo, pro kio mi preskaŭ forgesis tremi.

Mi ne estis la sola ĉeestanta malliberulo. Estis dudek aŭ pli.. Kompatinduloj, multaj el ili estis kripligitaj, hakitaj, tranĉitaj, terure; kaj iliaj haroj, iliaj vizaĝoj, iliaj vestaĵoj, havis nigrajn kaj malmolajn sangomakulojn. Ili suferis de akra fizika doloro, kompreneble, kaj malsato kaj soifo, sendube; kaj evidente neniu donis al ili la okazon lavi sin, aŭ almenaŭ balzamon por ŝmiri siajn vundojn; tamen oni neniam aŭdis iun el ili plendi aŭ lamenti, aŭ vidis ilin montri iun maltrankvilecon, aŭ iun signon voli protesti. Mi estis devigata ekpensi:

"La kanajloj – _ili_ siatempe servis aliajn homojn same; nun, kiam estas ilia vico, ili ne esperis pli bonan traktadon mem; do ilia filozofia sinteno ne estas la rezulto de mensa ekzercado, intelekta forto, rezonado; pli simila al trejnado de bestoj; ili estas blankaj indianoj."

3. La kavaliroj de la Ronda Tablo

Ĉefe, la parolado ĉirkaŭ la Ronda Tablo estis monologoj – rakontoj pri la aventuroj, dum kiuj tiuj malliberuloj estis kaptitaj, kaj iliaj amikoj kaj apogantoj mortigitaj aŭ perdiĝintaj iliajn ĉevalojn kaj armaĵojn. Ĝenerale – laŭ mia kompreno – tiuj murdigaj aventuroj ne estis rabekskursoj faritaj por venĝi insultojn, aŭ por solvi malnovajn kverelojn aŭ subitajn konfliktojn; ne, ĝenerale ili estis simplaj dueloj inter fremduloj – dueloj inter homoj kiuj neniam eĉ estis prezentitaj unu por la alia, kaj inter kiuj estis absolute neniu kaŭzo de kverelo. Multfoje mi vidis du knabojn, fremdulojn, renkontiĝi tute hazarde, kaj diri samtempe: "Mi povas venki vin!" kaj tuj ataki; sed mi ĉiam imagis, ĝis nun, ke tiel agis nur infanoj, kaj ke tio estis io tipa por la infanaj jaroj; sed jen du grandaj uloj kiuj fiere insistis, kvankam multe pli aĝaj. Tamen estis io tre ĉarma pri tiuj grandaj, simplanimaj estaĵoj, io alloga kaj aminda. Ne ŝajnis esti sufiĉe da cerbo en la tuta aro, por tiel diri, por meti sur fiŝhoko; sed vi ne multe zorgis pri tio, post iom da tempo, ĉar vi baldaŭ komprenis ke cerbo ne estis bezonata en tia socio, sed fakte malpurigus ĝin, barus ĝin, detruus ĝian simetrion – eble malebligus ĝian ekziston.

Fajna vireco estis videbla en preskaŭ ĉiu

vizaĝo; kaj en kelkaj certa alteco kaj gracio, kiu riproĉis vian malgrandigan kritikon kaj silentigis ĝin. Plej nobla bonvolo kaj pureco restis en la mieno de tiu, kiun oni nomis Sir Galaho, kaj same en tiu de la reĝo; kaj estis majesto kaj grandeco en la giganta korpo kaj alta teniĝo de Sir Lanceloto de la Lago.

Baldaŭ okazis io, kio centrigis la ĝeneralan atenton ĉe tiu Sir Lanceloto. Je signo de ia ceremoniestro, ses aŭ ok el la malliberuloj ekstaris, alvenis kune kaj genuiĝis sur la planko kaj levis la manojn al la balustrado de la virinoj kaj petis la rajton iom paroli kun la reĝino. La plej elstare videbla virino en tiu amasa floraro de ina beleco klinis la kapon akceptante, kaj tiam la proparolanto de la malliberuloj metis sin mem kaj siajn kunulojn en ŝiajn manojn por libera pardono, elaĉeto, mallibereco aŭ morto, kion ajn ŝi degnos elekti; kaj tion, li diris, li faris pro ordono de Sir Kay la ĉefkelnero, kies malliberuloj ili estas, post kiam li venkis ilin per sia nura forto kaj povo en fervora duelo en la kampo.

Surprizo kaj mirego fulmis el vizaĝo al vizaĝo en la tuta domo; la gracia rideto de la reĝino malaperis je la mencio de Sir Kay, kaj ŝi aspektis elrevigita; kaj la paĝio flustris en mia orelo kun elparolo kaj konduto, kiu montris ekstreman mokemon:

"Sir *Kay*, vere! Ho, nomu min io ajn, karega, nomu min maristo! Dum dumil jaroj, la malsankta inventemo de la homoj vane penos por krei tiel majestan mensogon!"

Ĉiu okulo fiksiĝis, severe demandemaj, al Sir Kay. Sed li povis regi la situacion. Li stariĝis kaj bone ludis siajn kartojn – kaj venkis ĉiun fojon. Li diris ke li rakontos ekzakte kio okazis, tutsimple kaj rekte, sen aldoni proprajn komentojn; "kaj poste," li diris, "se vi trovos ke iu meritas gloron kaj honoron, vi donos tion al tiu kiu estas la plej forta uzanto de siaj manoj, kiuj iam portis ŝildon aŭ batis per glavo dum kristala batalo -- ĝuste tiu kiu sidas tie!" Kaj li indikis Sir Lanceloton. Ha, li kaptis ilin, kaj tre sperte li faris tion. Kaj poste, li rakontis kiel Sir Lanceloto, serĉante aventurojn, post mallonga tempo mortigis sep gigantojn per unusola glavobato, kaj liberigis cent kvardek du malliberigitajn virgulinojn; kaj poste li pluiris, ankoraŭ serĉante aventurojn, kaj trovis lin (Sir Kay) batalante senespere kontraŭ naŭ fremdaj kavaliroj, kaj tuj mem prenis al si la tutan batalon, kaj venkis la naŭ; kaj tiun nokton Sir Lanceloto stariĝis silente, kaj vestiĝis en la armaĵo de Sir Kay, kaj prenis la ĉevalon de Sir Kay, kaj foriris en malproksimajn landojn, kaj venkis dek ses kavalirojn en unu batalo kaj tridek kvar en alia; kaj ĉiujn tiujn, kaj la naŭ antaŭajn, li devigis ĵuri ke ĝis pentekosto

ili rajdos al la kortego de Arturo kaj metos sin en la manojn de reĝino Ginevra, kiel malliberuloj de Sir Kay la ĉefkelnero, viktimoj de lia kavalira forto; kaj nun tie estis tiuj ses, kaj la ceteraj venos tuj kiam iliaj teruraj vundoj estos kuracataj.

Nu, estis kortuŝe vidi la reĝinon ruĝiĝi kaj rideti, kaj aspekti ĝenata, kaj feliĉa, kaj ĵeti kaŝatajn rigardojn al Sir Lanceloto, kiuj tutcerte mortigus lin en Arkansaso.

Ĉiuj laŭdis la kuraĝon kaj grandanimecon de Sir Lanceloto; kaj se temas pri mi, mi trovis tute nekredinde ke unusola homo povis, tute sola, bati kaj kapti tiel multajn spertajn batalantojn. Mi diris tion al Clarence; sed tiu mokanta stultulo nur diris:

"Se Sir Kay havus tempon trinki plian felsakon de acida vino, vi vidus la duoblan nombron."

Mi rigardis la knabon malgaje; kaj rigardante, mi vidis nubon de profunda malkuraĝo kovri lian mienon. Mi sekvis la direkton de lia rigardo, kaj vidis ke tre maljuna kaj blankbarba viro, vestita en fluanta, nigra robo, stariĝis kaj staris apud la tablo sur malfirmaj kruroj, malforte svingante sian maljunan kapon kaj rigardante la homamason per siaj akvoplenaj kaj vagantaj okuloj. La suferanta mieno en la vizaĝo de la paĝio videblis ankaŭ en ĉiuj ĉirkaŭaj vizaĝoj – la mieno de mutaj bestoj, kiuj scias ke ili devas

elteni kaj ne lamenti.

"Ho, nun denove!" la knabo suspiris. "La sama malnova, laciga rakonto, kiun li ripetis jam mil fojojn per la samaj vortoj, kaj kiun li daŭre ripetos ĝis li mortos, ĉiun fojon kiam li plenigis sian barelon kaj sentas ke lia troigo-muelilo funkcias. Ho, se Dio lasus min morti antaŭ ĉi tiu tago!"

"Kiu estas?"

"Merlino, la granda mensoganto kaj magiisto, la diablo punu lin pro la lacigo kiun li kreas per sia sola rakonto! Se la homoj ne timus lin ĉar li povas regi la ŝtormojn kaj la fulmojn, kaj ĉiujn diablojn en la infero, ili antaŭ multaj jaroj eltirus liajn intestojn por trovi la rakonton kaj sufoki ĝin. Li rakontas ĉiam en tria persono, por kredigi ke li estas tro modesta por voli glorigi sin mem – malbenon al li! Bona amiko, lasu min dormi."

La knabo premis sin al mia ŝultro kaj ŝajnis ekdormi. La maljunulo komencis sian rakonton; kaj baldaŭ, la knabo vere dormis; same faris la hundoj, kaj la kortego, la lakeoj, kaj la vicoj de armitaj homoj. La monotona voĉo monotone recitadis; milda ronkado kreskis je ĉiuj flankoj, kaj apogis ĝin kiel profunda kaj mallaŭta akompano de blovinstrumentoj. Kelkaj kapoj estis klinitaj al falditaj brakoj, kelkaj malantaŭen kun malfermitaj buŝoj, el kiuj venis senkonscia muziko; la muŝoj zumis kaj mordis, neĝenataj, la

ratoj svarmis mole el cent truoj, kaj ĉirkaŭiradis, kaj enhejmiĝis ĉie; kaj unu el ili sidiĝis kiel sciuro sur la kapo de la reĝo kaj tenis pecon de fromaĝo en siaj manoj kaj mordetis ĝin; kaj lasis la eretojn fali en la vizaĝon de la reĝo kun naiva kaj impertinenta senrespekto. Estis trankvila sceno, kaj ripoziga al la laca okulo kaj la dormema animo.

Jen la rakonto de la maljunulo. Li diris:

"Ĝuste tiel la reĝo kaj Merino foriris, al ermito kiu estis bona homo kaj granda kuracisto. Kaj la ermito serĉis ĉiujn liajn vundojn kaj donis al li bonajn unĝventojn; do la reĝo estis tie dum tri tagoj, kaj poste liaj vundoj saniĝis sufiĉe por ke li povu rajdi, kaj li foriris. Kaj kiam ili rajdis, Arturo diris: 'Mi ne havas glavon.' 'Ne gravas,' Merlino diris, 'Jen glavo kiu estu via, bonvolu.' Kaj ili rajdis ĝis ili venis al lago, bela akvo kaj larĝa, kaj en la mezo de la lago, Arturo vidis brakon vestitan en blanka silko, kaj ĝia mano tenis belan glavon. 'Vidu,' diris Merlino, 'jen la glavo pri kiu mi parolis.' Kaj ili vidis sinjorinon irantan sur la lago. 'Kiu sinjorino estas tio?' diris Arturo. 'Tio estas la sinjorino de la lago,' diris Merlino; 'kaj ene de tiu lago estas roko, kaj tie estas loko ne malpli bela ol iu alia sur la tero, kaj riĉe ornamita, kaj tiu sinjorino baldaŭ venos al vi, kaj tiam vi parolu bele al ŝi por ke ŝi donu al vi tiun glavon.' Kaj baldaŭ venis tiu sinjorino al

Arturo kaj salutis lin, kaj li ŝin. 'Sinjorino,' diris Arturo, 'kiu glavo estas tiu, kiun tiu brako tenas super la akvo? Ho se ĝi estus mia, ĉar mi ne havas glavon.' 'Sir Arturo Reĝo,' diris la sinjorino, 'tiu glavo estas mia, kaj se vi donos al mi donacon, kiam mi petas tion, vi havos ĝin.' 'Vere,' diris Arturo, 'mi donos al vi la donacon pri kiu vi petos.' 'Nu,' diris la sinjorino, 'sidigu vin en tiu boato kaj remu al la glavo, kaj prenu ĝin kaj la ingon, kaj mi petos mian donacon kiam mi trovos la tempon bona.' Do Sir Arturo kaj Merlino elĉevaliĝis, kaj ligis la ĉevalojn al du arboj, kaj ili iris al la boato, kaj kiam ili venis al la glavo kiun la mano tenis, kaj Sir Arturo prenis ĝian tenilon, kaj li kunprenis ĝin. Kaj la brako kaj la mano malaperis sub la akvo; kaj ili venis al la seka tero, kaj ekrajdis. Kaj tiam, Sir Arturo vidis riĉan pavilonon. 'Kion signifas tiu pavilono?' 'Ĝi estas la pavilono,' diris Merlino, 'kun kiu vi laste batalis, Sir Pellinore, sed li estas for, li ne estas tie; li kverelis kun kavaliro via, nomita Egglame, kaj ili interbatalis, sed finfine Egglame fuĝis, se ne li mortus, kaj li ĉasis lin la tutan vojon al Caerleon, kaj ni baldaŭ renkontos lin sur la ŝoseo.' 'Tio estas bone dirita,' diris Arturo, 'nun mi havas glavon, nun mi batalos kontraŭ li, kaj venĝos.' 'Sir, vi ne faros tion,' diris Merlino, 'ĉar la kavaliro laciĝis pri batalado kaj ĉasado, do neniu laŭdos vin ĉar vi kverelis kun li; cetere, ne

facile lin venkos iu vivanta kavaliro; kaj tial mi konsilas vin lasi lin pasi, ĉar li post nelonge faros al vi bonan servon, kaj liaj filoj post liaj tagoj. Cetere, post malmultaj tagoj vi vidos ke kun ĝojo vi donos al li vian fratinon por edzinigi.' 'Kiam mi vidos lin, mi sekvos vian konsilon,' diris Arturo. Poste, Sir Arturo rigardis la glavon, kaj ŝatis ĝin sufiĉe bone. 'Kion vi pli bone ŝatas,' diris Merlino, 'la glavon aŭ la ingon?' 'Mi pli ŝatas la glavon,' diris Arturo. 'Vi estas tre malsaĝa,' diris Merlino, 'ĉar la ingo valoras dekfoje la glavon, ĉar dum vi portos la ingon vi neniam perdos eĉ guton de sango, kiel ajn vundita vi estos; tial, ĉiam zorge kunportu la ingon.' Kaj ili rajdis en Caerleon, pro kio liaj viroj sufiĉe ĝojis. Kaj kiam ili aŭdis pri liaj aventuroj, ili miris ke li risku sian vivon tiel sola. Sed ĉiuj nobeluloj diris ke estis ĝojige havi tian gvidanton, kiu riskos sian propran personon kiel faris aliaj povraj kavaliroj."

4. Sir Dinadan la humuristo

Ŝajnis al mi ke tiu amuza mensogo estis tre simple kaj bele rakontita; sed mi ja aŭdis ĝin nur unu fojon, kaj tio faras diferencon; ĝi estis agrabla al la aliaj kiam ĝi estis nova, sendube.

Sir Dinadan la humuristo estis la unua kiu vekigis, kaj li baldaŭ vekis la aliajn per praktika ŝerco sufiĉe malaltkvalita. Li ligis kelkajn metalajn pokalojn al la vosto de hundo kaj liberigis tiun, kiu kuris rondon post rondo ĉirkaŭ la loko en freneza timo, kun ĉiuj aliaj hundoj bojantaj post li kaj frapantaj kaj frakasantaj ĉion kion ili pasis kaj entute farantaj konfuzan ĥaoson kaj tute surdigan bruon; pro kio ĉiu viro kaj virino en la homamaso ridadis ĝis iliaj larmoj fluis, kaj kelkaj falis el siaj seĝoj kaj ekstaze ruladis sin. Ili kondukis ĝuste kiel infanoj. Sir Dinadan estis tiel fiera pri sia heroaĵo ke li ne povis ne rakonti ree kaj ree, ĝis lacigo, kiel la senmorta ideo hazarde venis al li; kaj kiel kutime ĉe humuristo de lia speco, li ankoraŭ ridis pri ĝi kiam ĉiuj aliaj ĉesis. Li estis tiel entuziasma, ke li fine faris paroladon – humuran paroladon, kompreneble. Mi kredas ke mi neniam aŭdis tiel multajn listigitajn ŝercojn, malnovajn kaj foruzitajn, en mia tuta vivo. Li estis pli aĉa ol la arlekenoj, pli aĉa ol la klaŭnoj en la cirko. Ŝajnis aparte malgajige sidi tie, mil tricent jaroj antaŭ

mia naskiĝo, kaj denove aŭdi la malbonajn, platajn, vermomorditajn ŝercojn kiuj turmentos min kiam mi estos knabo post mil tricent jaroj. Tio preskaŭ konvinkis min ke ne eblas io tia kiel nova ŝerco. Ĉiuj ridis al tiuj antikvaĵoj – sed tion ili ĉiam faras; mi notis tion, jarcentojn poste. Tamen, kompreneble la mokanto ne ridis – mi volas diri la knabo. Ne, li mokis; ne ekzistis io kiun li ne mokus. Li diris ke la plej multaj el la ŝercoj de Dinadan estis putraj, kaj la ceteraj estis ŝtonigitaj. Mi diris ke "ŝtonigitaj" estis bone; ĉar mi mem kredis ke la sola ĝusta maniero klasifiki la majestajn aĝojn de kelkaj el tiuj ŝercoj, estis per komparo al geologiaj eraoj. Sed tiu bela ideo tute ne impresis la knabon, ĉar la geologio ne ankoraŭ estis inventita. Tamen, mi notis la rimarkon, kaj intencis eduki la popolon pri tio se mi travivos. Ne estas bona ideo forĵeti ion bonan, nur ĉar la merkato ne ankoraŭ estas preta por ĝi.

Nun Sir Kay stariĝis kaj komencis aktivigi sian rakonto-muelilon, kun mi kiel brulaĵo. Estis tempo por mi senti min serioza, kaj tion mi faris. Sir Kay rakontis kiel li renkontis min en malproksima lando de barbaroj, kiuj ĉiuj vestiĝis same ridinde kiel mi – en vestaĵoj kreitaj per magio, por ke la portanto ne povu esti lezata de homaj manoj. Tamen, li nuligis la forton de la magio per preĝado, kaj mortigis miajn dek tri kavalirojn en trihora batalo, kaj malliberigis min,

ŝparante mian vivon por ke tiu stranga mirindaĵo kiel mi estu montrata por mirigi kaj distri la reĝon kaj la kortegon. Li parolis pri mi la tutan tempon, plej milde, kiel "ĉi tiu miriga giganto" kaj "ĉi tiu terura, ĉielalta monstro" kaj "ĉi tiu denteg- kaj ungeghavanta, homomanĝanta trolo", kaj ĉiuj akceptis liajn stultaĵojn plej naive, kaj neniam ridetis aŭ ŝajnis noti iun malsamecon inter tiu diluita statistiko kaj mi. Li diris ke kiam mi provis fuĝi de li, mi saltis al la pinto de arbo ducent ulnojn alta per nur unu salto, sed li faligis min per ŝtono same granda kiel bovino, kiu "preskaŭ rompis" la plej multajn el miaj ostoj, kaj poste devigis min ĵuri ke mi aperos en la kortego de reĝo Arturo por esti juĝata. Fine, li kondamnis min morti je tagmezo la 21an; kaj tiel malmulte zorgis pri tio, ke li uzis tempon por oscedi, antaŭ diri la daton.

Nun mi estis profunde malgaja; fakte, mi apenaŭ estis sufiĉe sana por sekvi diskuton kiel plej bone mortigos min; kelkaj dubis la eblecon mortigi min pro miaj sorĉitaj vestaĵoj. Kaj tamen estis nur ordinara kompleto por dek kvin dolaroj. Tamen, mi ja estis sufiĉe sana por noti unu detalon, nome: multaj el la vortoj uzitaj plej aferece de tiu granda kunveno de la unuaj sinjorinoj kaj sinjoroj de la lando estus kaŭzo por indiano ruĝiĝi. Sentakteco estas tro milda termino. Tamen, mi estis leginta *Tom Jones*, kaj

— *Roderick Random*, kaj aliajn librojn samspecajn, kaj mi sciis ke la plej altaj kaj unuaj sinjorinoj kaj sinjoroj en Anglio estis malmulte aŭ tute ne pli puraj en sia parolado, kaj en la moralo kaj konduto kiun tia parolado indikas, ĝis antaŭ cent jaroj, fakte en nian propran deknaŭan jarcenton – en kiu jarcento, larĝe dirite, oni povas diri ke la unuaj ekzempleroj de vera sinjorino kaj vera sinjoro troveblaj en angla historio – aŭ en eŭropa historio, ni diru – fine aperas. Supozu de Sir Walter, anstataŭ meti siajn interparolojn en la buŝoj de siaj roluloj, permesus ilin paroli mem? Ni havus vortojn de Rebecca kaj Ivanhoe kaj la dolĉa sinjorino Rowena, kiuj en niaj tagoj ĝenus vagabondon. Tamen, por la nekonscie sentaktaj, ĉio estas takta. La popolo de reĝo Arturo ne konsciis ke ili estis maldecaj, kaj mi pensis sufiĉe klare por ne mencii tion.

Ili tiel zorgis pri miaj sorĉitaj vestaĵoj, ke ili treege kvietiĝis kiam finfine la maljuna Merlino forigis la problemon por ili per racieca aludo. Li demandis al ili kial ili estis tiel tedaj – kial ili ne havis la ideon senvestigi min? Post duona minuto, mi estis nuda kiel tenajlo! Kaj nur imagu: mi estis la sola ĝenata homo tie. Ĉiuj diskutis pri mi; kaj faris tion tiel senĝene kvazaŭ mi estus brasiko. Reĝino Ginevra same naive interesiĝis kiel la aliaj, kaj diris ke ŝi neniam antaŭe vidis iun kun

kruroj kiel miaj. Tio estis la sola komplimento kiun mi ricevis – se estis komplimento.

Fine mi estis portata en unu direkto, kaj miaj danĝeraj vestaĵoj en alia. Mi estis metita en malluman ĉelon en karcero, kun kelkaj malgrandaj restaĵoj por manĝi, iom da ŝima pajlo por kuŝi, kaj granda amaso de ratoj kiel akompano.

5. Inspiro

Mi estis tiel laca, ke eĉ mia timo ne povis longe malhelpi min dormi.

Kiam mi poste vekigis, ŝajnis ke mi estis tre longtempe dorminta. Mia unua penso estis: "Nu, kiel mirigan sonĝon mi havis! Mi supozas ke mi vekigis nur gustatempe por ne estis pendumata aŭ dronigata aŭ bruligata aŭ io... Mi plu dormetos ĝis la fajfilo sonos, kaj poste mi subeniros al la armilfabriko kaj finbatalos kun Herkulo."

Sed ĝuste tiam mi aŭdis la akran muzikon de seruroj kaj ĉenoj, lumo fulmis en miajn okulojn, kaj tiu papilio, Clarence, staris antaŭ mi! Mi anhelis pro surprizo, kaj mi preskaŭ perdis mian spiron.

"Kion?" mi diris. "Ĉu vi ankoraŭ estas ĉi tie? Foriru kun la cetera sonĝo! Disiru!"

Sed li nur ridis, en sia leĝera maniero, kaj eĉ serĉis pri mia mizara situacio.

"Bone," mi diris senproteste, "lasu la sonĝon daŭri; por mi ne urĝas."

"Bonvolu, kiu sonĝo?"

"Kiu sonĝo? Nu, la sonĝo ke mi estas en la kortego de reĝo Arturo – persono kiu neniam ekzistis; kaj ke mi parolas kun vi, kiu estas nur io kiun mi imagas."

"Tre bone! Kaj ĉu estas sonĝo ke oni bruligos vin morgaŭ? Nu – respondu pri tio!"

La ŝoko tra mi estis doloriga. Mi komencis pensi ke mia situacio estis almenaŭ tre serioza, ĉu sonĝo ĉu ne; ĉar mi sciis pro antaŭaj spertoj pri vivsimila intenseco de miaj sonĝoj, ke esti bruligata ĝismorte, eĉ en sonĝo, tute ne estus ŝerco, kaj estis io evitinda, per ĉiuj rimedoj, ĉu bonaj ĉu malbonaj, kiujn mi povus elpensi. Do mi diris petante:

"Ho Clarence, bona knabo, mia sola amiko -- ĉar vi _estas_ mia amiko, ĉu ne? -- ne forlasu min; helpu min elpensi iun manieron fuĝi el ĉi tiu loko!"

"Nun nur aŭdu vin mem! Fuĝi? Ja la koridoroj estas plene gardataj de armitaj viroj!"

"Sendube, sendube. Sed kiom, Clarence? Ne multaj, mi esperas?"

"Almenaŭ dudek. Oni ne povas esperi povi fuĝi."

Post paŭzo -- hezite:

"Kaj estas aliaj kialoj -- kaj pli gravaj."

"Aliaj? Kiuj?"

"Nu, ili diras -- ho, sed mi ne kuraĝas, mi vere ne kuraĝas!"

"Kial, povra knabo, ho kial? Kial vi palas? Kial vi tremas tiel?"

"Ho, ja fakte estas bezono! Mi volas informi vin, sed..."

"Nu nu, estu kuraĝa, estu viro -- elparolu, bonvole!"

Li hezitis, tirata unudirekten de deziro, alidirekten de timo; poste li kaŝiris al la pordo, rigardis eksteren kaj aŭskultis; kaj fine, li venis proksimen al mi, kaj metis sian buŝon al mia orelo, kaj flustris al mi siajn timigajn novaĵojn, kaj kun ĉiu vorto tremando de iu kiu iras al terura tero kaj parolas pri aferoj kiuj, se oni nur mencias ilin, povas doni morton:

"Merlino, la maliculo, metis magian kampon ĉirkaŭ ĉi tiu karcero, kaj en ĉi tiu lando ne estas iu sufiĉe senespera por kuraĝi provi eliri ĝin kun vi! Nun Dio kompatu min, mi informis vin! Ho, estu ĝentila al mi, estu kompata al povra knabo kiu deziras al vi bonon; ĉar se vi perfidos min, mi estos perdita!"

Mi ridis, la sola vere freŝiga rido kiun mi havis dum iom da tempo; kaj mi kriis:

"Merlino metis magian kampon! *Merlino*, vere! Tiu simpla, maljuna blufanto, tiu babilanta stultulo! Stultaĵoj, puraj stultaĵoj, la plej stultaj stultaĵoj en la mondo! Nu, ŝajnas al mi ke el ĉiuj infanecaj, idiotaj, sencerbaj, senkuraĝaj superstiĉoj kiuj – ho, malbenita estu Merlino!"

Sed Clarence falis surgenue antaŭ ol mi havis tempon duone fini, kaj li preskaŭ freneziĝis pro timo.

"Ho, gardu vin! Tio estas teruraj vortoj! Ĉiun momenton, ĉi tiuj muroj povos fali sur ni se vi parolas tiel. Ho, revoku viajn vortojn antaŭ ol

estos tro malfrue!"

Nun, tiu stranga montrado donis al mi bonan ideon kaj ekpensis min. Se ĉiuj ĉi tie estis same honeste kaj senkaŝe timigitaj kiel Clarence pro la imagita magio de Merlino, certe supera homo kiel mi devus esti sufiĉe ruza por trovi iun manieron ekspluati tiun staton. Mi pensis pli, kaj inventis planon. Poste mi diris:

"Stariĝu! Trankviligu vin; rigardu miajn okulojn. Ĉu vi scias kial mi ridis?"

"Ne – sed, pro la graco de nia benita sinjorino, ne faru tion denove!"

"Nu, mi diros al vi kial mi ridis. Ĉar mi mem estas magiisto."

"Vi!"

La knabo faris paŝon malantaŭen, kaj ĉesis spiri, ĉar la informo venos sufiĉe subite; kaj post tio, lia mieno estis tre, tre respektama. Mi rapide notis tion; tio indikis ke ĉarlatano ne devis havi reputacion en ĉi tiu frenezulejo; homoj estis pretaj kredi liajn vortojn, sen tio, mi supozis.

"Mi konis Merlinon dum sepcent jaroj, kaj li..."

"Sepcent..."

"Ne interrompu min. Li mortis kaj revenis al la vivo dek tri fojojn, kaj ĉiufoje vojaĝis sub nova nomo: Smith, Jones, Robinson, Jackson, Peters, Haskins, Merlin – nova alinomo ĉiufoje kiam li montras sin. Mi konis lin en Egiptio antaŭ tricent

jaroj; mi konis lin en Hindio antaŭ kvincent jaroj – li ĉiam babilaĉas ĉirkaŭ mi, kien ajn mi iras; li lacigas min. Li nenion valoras, kiel magiisto; konas kelkajn el la malnovaj, kutimaj artifikoj, sed neniam iris trans la rudimentoj, kaj neniam iros. Li bone taŭgas en la provincoj – agante nur dum unu vespero, vi scias – sed li vere ne provu konkuri kun eksperto – precipe kiam tiu estas vera artisto. Nun vidu, Clarence, mi intencas resti via amiko, kaj kompanse vi devas esti mia. Mi volas ke vi faru al mi servon. Mi volas ke vi informu la reĝon ke mi mem estas magiisto – kaj eĉ la plej granda en la tribo; kaj mi volas ke li komprenu ke mi nur trankvile aranĝos etan katastrofon, kiu detruos la pacon en ĉi tiu lando, se la planoj de Sir Kay estos realigataj kaj se mi ie suferos pro tio. Ĉu vi diros tion al la reĝo por mi?"

La kompatinda knabo estis en tia stato, ke li apenaŭ povis respondi al mi. Estis deprimige vidi estaĵon tiel timplenan, tiel mafortan, tiel senmoraligitan. Sed li promesis ĉion; kaj se temis pri mi, li devigis min promesi fojon post fojo ke mi restos lia amiko, kaj neniam turnos min al li, aŭ uzos iun magion kontraŭ li. Poste li eliris, stumblante kun la mano al la muro, kiel malsanulo.

Baldaŭ mi ekpensis: Kiel senpripensa mi estis! Kiam la knabo trankviliĝos, li scivolos kial

granda magiisto kiel mi devus peti knabon kiel li helpi lin eliri el ĉi tie; li aldonos tion kaj ĉi tion, kaj li komprenos ke mi estis ĉarlatano.

Mi maltrankviliĝis pri tiu senpripensa eraro dum pli ol horo, kaj samtempe donis al mi mem multajn malbelajn nomojn. Sed fine, klariĝis al mi ke ĉi tiuj bestoj ne rezonadas; ke ili *neniam* aldonas tion kaj ĉi tion; ke ilia tuta parolado montris ke ili ne rekonis kontraŭdiron kiam ili vidas ĝin. Tiam mi trankviliĝis.

Sed tuj kiam oni trankviliĝas, en ĉi tiu mondo, oni komencas cerbumi pri io alia. Klariĝis al mi ke mi faris alian eraron; mi forsendis la knabon por timigi siajn superulojn per minaco – kaj mi planis inventi katastrofon sen urĝeco; nun, la homoj kiuj plej volonte kaj entuziasme akceptas miraklojn ankaŭ estas tiuj kiuj plej deziras vidi vin montri ilin; supozu ke ili petos min fari tion? Supozu ke oni petos min nomi mian katastrofon? Jes, mi faris eraron; mi devus unue inventi mian katastrofon.

"Kion mi faru? Kion mi povas diri, por gajni iom da tempo?"

Mi denove havis problemojn; la plej gravajn problemojn.

"Jen piedpaŝo! Ili venas. – Se mi nur havis momenton por pensi... Bone, mi scias. Ĉio en ordo."

Vi komprenu, estis la eklipso. Mi subite

memoris, en la lasta momento, kiel Kolumbo, aŭ Korteso, aŭ iu el tiuj, iam ludis eklipson kiel savantan atuton, al kelkaj sovaĝuloj, kaj mi vidis mian solvon. Nun mi povis ludi ĝin mem; kaj ankaŭ ne estus plagiato, ĉar mi faros tion preskaŭ mil jaroj antaŭ tiuj.

Clarence envenis, mallaŭta, malgaja, kaj diris:

"Mi rapide informis nian sinjoron la reĝon, kaj tuj li venigis min al si. Li estis timigita ĝismedole, kaj volis ordoni vian tujan liberigon, kaj ke vi estu bele vestigota, kaj loĝigota en maniero taŭga por homo tiel granda; sed tiam venis Merlino kaj detruis ĉion; ĉar li konvinkis la reĝon ke vi estas freneza, kaj ke vi ne scias pri kio vi parolas; kaj diris ke via minaco estas nur stultaĵo. Ili disputis longe, sed finfine Merlino moke diris: 'Kial li ne diris pri *kia* granda katastrofo temas? Vere ĉar li ne povas.' Tiu atako tre rapide fermis la buŝon de la reĝo, kaj li ne povis trovi kontraŭantan argumenton; kaj tial, kvankam li ne volas esti malĝentila al vi, sed li petas vin pripensi lian komplikan situacion, kia ĝi nun estas, kaj nomi la katastrofon – se vi jam decidis ĝian naturon kaj kiam ĝi venos. Ho, mi petas: ne prokrastu; prokrasti en tia momento estas duobligi kaj triobligi la danĝerojn kiuj jam estas ĉirkaŭ vi. Ho, estu saĝa – nomu la katastrofon!"

Mi lasis la silenton kreski dum mi kolektis

miajn pensojn, kaj poste diris:

"Kiel longe mi estis enŝlosita en ĉi tiu truo?"

"Vi estis enŝlosita kiam la hieraŭa tago jam estis maljuna. Nun estas la naŭa matene."

"Ne! Do mi certe dormis bone. La naŭa matene nun! Kaj tamen estas preskaŭ same mallume kiel ĉe noktomezo. Ĉi tio do estas la 20a?"

"La 20a – jes."

"Kaj mi estu vive bruligota morgaŭ."

La knabo tremis.

"Je kiu horo?"

"Ĝuste je tagmezo."

"Do, mi diros al vi kion vi diru."

Mi paŭzis, kaj staris super tiu kaŭranta knabo dum tuta minuto en terura silento; poste, kun voĉo profunda, mezurita, plena de minaco, mi komencis, kaj per dramece laŭgradaj paŝoj mi atingis mian grandan klimakson, kiun mi liveris en pli sublima kaj nobla maniero ol mi iam faris en mia vivo:

"Reiru kaj diru al la reĝo ke je tiu horo mi sufokos la tutan mondon per la morta nigreco de noktomezo. Mi estingos la sunon, kaj ĝi neniam denove brilos; la fruktoj de la tero putros pro manko de lumo kaj varmo, kaj la homoj de la tero malsatos kaj mortos, ĝis la lasta persono!"

Mi devis mem elporti la knabon, li tiel profunde kolapsis. Mi donis lin al la soldatoj, kaj

reiris.

6. La eklipso

En la silento kaj mallumo, al la scio venis ankaŭ kompreno. La nura scio pri fakto estas pala; sed kiam vi komencas *kompreni* la fakton, ĝi ekhavas koloron. Estas la diferenco inter aŭdi ke iu homo estis hakata en la koro, kaj vidi kiam tio okazis. En la silento kaj mallumo, la scio ke mi estas en mortiga danĝero havis ĉiam pli profundan signifon; io kio estis kompreno rampis, colon post colo, tra miaj vejnoj kaj frostigis min.

Sed estas benita eco de la naturo ke en tempoj kiel tiu, tuj kiam la korpa temperaturo de homo malaltiĝis al certa punkto, venas ŝanĝo, kaj li ŝanĝiĝas. Espero kreskas, kaj ĝojo kun ĝi, kaj poste li estas en bona formo por fari ion por si mem, se io fareblas. Kiam mi ŝanĝiĝis, mi ŝanĝiĝis emfaze. Mi diris al mi mem ke mia eklipso certe savos min, kaj cetere faros el mi la plej grandan homon en la regno; kaj tuj mia temperaturo altiĝis ĝis la pinto de la tubo, kaj miaj timoj tute malaperis. Mi estis same feliĉa kiel iu kiu vivis antaŭ mi. Mi eĉ estis senpacienca ke la morgaŭo venos, mi tiom volis ĝui tiun grandan triumfon kaj esti la centro de la miro kaj respekto de la tuta nacio. Cetere, en afereca maniero tiu garantios mian sukceson; mi sciis tion.

Dume, estis io kio estis puŝita en la malantaŭo

de mia menso. Tio estis la duona konvinko, ke kiam la naturo de mia proponita katastrofo estos raportata al tiuj superstiĉaj homoj, la efiko estos ke ili estos pretaj kompromisi. Do, kiam mi fojon post fojo aŭdis paŝojn proksimiĝi, tiu penso revenis al mi, kaj mi diris al mi mem:

"Plej certe estas la kompromiso. Nu, se estos bona, mi akceptos ĝin; sed se ne, mi restos kie mi staras, kaj ludos miajn kartojn je ilia plena valoro."

La pordo malfermiĝis, kaj kelkaj armitaj viroj aperis. La estro diris:

"La paliso estas preta. Venu!"

La paliso! La forto lasis min, kaj mi preskaŭ falis. Estas malfacile spiri dum tia tempo, kvazaŭ oni havus blokon en la kolo, kaj mi anhelis; sed tuj kiam mi povis paroli, mi diris:

"Sed tio estas eraro – la ekzekuto estos morgaŭ!"

"Novaj ordonoj; unu tagon pli frue. Rapidu!"

Mi estis perdita. Ne estis helpo por mi. Mi preskaŭ svenis; mi ne povis kontroli min mem; mi nur ĉirkaŭiris sencele, kvazaŭ mi estus tute freneza; do la soldatoj ekprenis min, kaj tiris min kun si, el la ĉelo kaj tra la labirinto de subteraj koridoroj, kaj fine en la blindigan taglumon kaj la superan mondon. Kiam ni eniris la vastan, ĉirkaŭfermitan korton de la kastelo, mi havis ŝokon; ĉar unue, mi vidis la palison, en la centro,

kaj proksime al ĝi stakita ligno kaj monaĥo. Je ĉiuj kvar flankoj de la korto, la homoj sidis en vicoj super vicoj, en klinantaj terasoj kun riĉaj koloroj. La reĝo kaj la reĝino sidis sur iliaj tronoj, la plej videblaj homoj tie, kompreneble.

Por noti ĉion ĉi tion sufiĉis unu sekundo. La venontan sekundon, Clarence venis el iu kaŝita loko kaj verŝis informon en mian orelon, dum liaj okuloj brilis pro triumfo kaj ĝojo. Li diris:

"Pro *mi* okazis la ŝanĝo! Kaj tre streĉe mi laboris por tio. Sed kiam mi malkaŝis al ili la planitan katastrofon, kaj vidis kiel grandan timon tio kaŭzis, tiam mi ankaŭ komprenis ke jen la tempo ataki! Tial mi diligente asertis, al tiu kaj ĉi tiu, ke via forto kontraŭ la suno atingos sian maksimumon nur morgaŭ; do, por povi savi la sunon kaj la mondon, vi devas esti mortigata jam hodiaŭ, kiam viaj magiaĵoj ankoraŭ kreskas kaj ne havas plenan forton. Diable, estis nur stulta mensogo, tute senvalora inventaĵo, sed vi devus vidi ilin preni tion kaj gluti ĝin, en sia freneza timo, kvazaŭ savo estus sendata el la ĉielo; kaj la tutan tempon, mi kaŝe ridis dum unu momento, vidante ilin tiel facile trompitaj, kaj laŭdante Dion dum la venonta, ĉar li estis kontenta lasi la plej etan de siaj kreitaĵoj esti lia ilo por savi vian vivon. Ho, kiel feliĉe ĉio okazis! Vi ne devos vere lezi la sunon – ho, ne forgesu tion, je via animo, ne forgesu tion! Nur faru ioman

mallumon – nur iometan mallumeton, memoru, kaj ne plu. Tio sufiĉos. Ili vidos ke mi parolis malvere – pro nescio, ili imagos – kaj kiam falos la unua ombro de tiu mallumo, vi vidos ilin freneziĝi pro timo; kaj ili liberigos vin kaj grandigos vin! Nun iru al via triumfo! Sed memoru – ho, kara amiko, mi instigas vin memori mian peton, kaj ne lezi la benitan sunon. Pro *mi*, via vera amiko."

Mi elpremis kelkajn vortojn inter miaj malĝojo kaj mizero, por diri ke mi ŝparos la sunon, por kio la okuloj de la knabo repagis min per tiel profunda kaj amanta dankemo ke mi ne povis diri al li ke lia bonkora stulteco detruis min kaj sendis min al mia morto.

Kiam la soldatoj irigis min trans la korto, la trankvileco estis tiel profunda ke se mi havus tukon antaŭ miaj okuloj, mi supozas ke mi estus tute sola anstataŭ inter kvarmil homoj. Neniu movo estis videbla en tiu homamaso; ili estis rigidaj kiel ŝtonaj statuoj, kaj same palaj; kaj ĉiu mieno estis stampita de timo. Tiu silento daŭris dum mi estis ligata al la paliso; ĝi daŭris ankoraŭ kiam la ligno estis zorgeme stakata ĉirkaŭ miaj maleoloj, miaj genuoj, miaj femuroj, mia korpo. Poste estis paŭzo, kaj pli profunda silento, se eble, kaj viro genuiĝis apud miaj piedoj kun brulanta torĉo; la homamaso streĉis sin antauen, rigardis, kaj levis sin iomete el siaj seĝoj, sen rimarki tion;

la monaĥo levis siajn manojn super mia kapo, kaj siajn okulojn al la blua ĉielo, kaj komencis eldiri kelkajn vortojn en la latina; en tiu pozicio li ĉantadis, dum iom da tempo, kaj poste eksilentis. Mi atendis du aŭ tri sekundojn, poste rigardis; li staris tie, ŝtonigita. En la sama movo, la tuta homamaso leviĝis malrapide kaj fiksrigardis la firmamenton. Mi sekvis iliajn rigardojn, kaj tutcerte, jen komenciĝis mia eklipso! La vivo iris bolanta tra miaj vejnoj; mi estis nova homo! La nigra strio malrapide eniris la sunan diskon, mia koro batis ĉiam pli laŭte, kaj ankoraŭ la amaso kaj la monaĥo fiksrigardis la ĉielon, senmove. Mi sciis ke tiu rigardo poste estos direktata al mi. Kiam tio okazis, mi estis preta. Mi staris en unu el la plej grandecaj pozicioj kiujn mi iam havis, kun la brako elstreĉita kaj indikanta la sunon. Estis nobla efiko. Oni povis *vidi* kiel la tremo trapasis la homamason kiel ondo. Du krioj aŭdiĝis, unu tuj post la alia:

"Ekbruligu!"

"Mi malpermesas!"

La unua venis el Merlino, la dua el la reĝo. Merlino ekiris el sia loko – por mem ekbruligi min, mi supozis. Mi diris:

"Restu kie vi estas. Se iu homo moviĝas – eĉ la reĝo – antaŭ ol mi permesos, mi atakos lin per tondro, mi neniigos lin per fulmoj!"

La homamaso humile residiĝis, ĝuste kiel mi

antaŭsupozis. Merlino hezitis dum momento aŭ du, kaj dume mi kvazaŭ staris sur pingloj. Poste li sidiĝis, kaj mi elspiris; ĉar mi sciis ke mi nun regis la situacion. La reĝo diris:

"Havu kompaton, bona sinjoro, kaj ne provu ion plian en ĉi tiu danĝera direkto, aŭ okazos katastrofo. Estis raportite al ni ke viaj fortoj estos plene kreskintaj nur morgaŭ. Sed..."

"Via moŝto pensas ke la raporto eble estis mensoga? Ĝi *estis* mensoga."

Tio havis enorman efikon; ĉie estis levataj petantaj manoj, kaj al la reĝo direktis sin ŝtormo de petegoj ke oni pagu al mi iun ajn prezon, por bari la katastrofon. La reĝo volonte akceptis. Li diris:

"Nomu iujn ajn kondiĉojn, bona sinjoro, eĉ ĝis duono de la regno; sed forigu la katastrofon, savu la sunon!"

Mi plene venkis, mi tuj volus enkasigi mian venkon, sed *mi* ne povis haltigi eklipson; tio ne estis io diskutebla. Do mi petis lin pripensi. La reĝo diris:

"Kiom longe – ho, kiom longe, bona sinjoro? Havu kompaton; vidu, estas pli kaj pli mallume, momenton post momento. Diru al mi, kiel longe?"

"Ne longe. Duonan horon – eble tutan horon."

Estis mil patosaj protestoj, sed mi ne povis malplilongigi ion, ĉar mi ne povis memori kiel

longe daŭras totala suneklipso. Ĉiuokaze, mi estis konfuzata, kaj volis pensi. Estis io malĝusta pri tiu eklipso, kaj tiu fakto estis tre maltrankviliga. Se ĉi tiu eklipso ne estis tiu kiun mi atendis, kiel mi povus scii ĉu ĉi tio estas la sesa jarcento, aŭ eble nur sonĝo? Ho, se mi nur povus prui ke estas sonĝo! Jen ĝoja, nova espero. Se la knabo estis prava pri la dato, kaj ĉi tio fakte estis la 20a, do _ne_ estis la sesa jarcento. Mi prenis la manikon de la monaĥo, tre ekscitita, kaj demandis lin kiu tago de la monato estis.

Diable, li diris ke estis la *dudek-unua*! Kiam mi aŭdis tion, mi frostiĝis. Mi petis lin certigi ke li ne eraris; sed li estis certa, ja estis la 21a. Do, tiu malplenkapa knabo denove fuŝis! La tempo de la tago estis ĝusta por la eklipso, mi mem vidis tion, komence, sur la proksima sunhorloĝo. Jes, mi *estis* en la kortego de reĝo Arturo, kaj preferinde mi faros la plejeble bonan el tio.

La mallumo konstante kreskis, kaj la homoj iĝis ĉiam pli timplenaj. Nun mi diris:

"Mi pripensis, sinjoro reĝo. Por doni instruon, mi lasos ĉi tiun mallumon daŭri, kaj disvastigi nokton en la mondo; sed ĉu mi estingos la sunon por ĉiam, ĉu mi resanigos ĝin, tion decidis vi. Jen la kondiĉoj, nome: Vi restos reĝo de ĉiuj viaj landoj, kaj ricevos ĉiujn glorojn kaj honorojn kiuj apartenas al la reĝeco; sed vi nomumos min via

ĉiama ministro kaj plenumanto, kaj donos al mi unu procenton de tiu fakta kresko de enspezoj super ĝia nuna nivelo, kiun mi eble povos krei por la ŝtato. Se mi ne povos vivteni min per tio, mi ne petos iun pagi al mi pli. Ĉu estas kontentige?"

Estis granda kaj surdiga aplaŭdo, kaj el tiu bruo venis la voĉo de la reĝo, kiu diris:

"Forigu liajn katenojn, kaj liberigu lin! Kaj honoru lin, altaj kaj malaltaj, riĉaj kaj malriĉaj, ĉar li iĝis la dekstra mano de la reĝo, estas vestita de potenco kaj aŭtoreco, kaj lia seĝo estas je la plej supra ŝtupo de la trono! Nun forigu ĉi tiun rampantan nokton, kaj revenigu la lumon kaj ĝojon, por ke la tuta mondo benu vin."

Sed mi diris:

"Ke ordinara homo estas hontigita antaŭ la mondo, tio estas nenio; sed malhonorigus *la reĝon*, se iu kiu vidis lian ministron nuda ne vidus lin ankaŭ liberigita de sia honto. Se mi rajtas peti ke miaj vestaĵoj estos ree ĉi tien portataj..."

"Ili ne taŭgas," la reĝo interrompis. "Venigu alispecajn vestaĵojn; vestigu lin kiel princon!"

Mia ideo funkciis. Mi volis certigi ke nenio ŝanĝiĝos ĝis la eklipso estos totala, por ke ili ne denove provu instigi min dispeli la mallumon, kaj kompreneble mi ne povis fari tion. Atendi la vestaĵojn donis al mi iom da tempo, sed ne sufiĉe.

Do mi bezonis plian ekskuzon. Mi diris ke estus komprenebla afero se la reĝo ŝanĝis sian sintenon kaj iom bedaŭris kion li decidis kiam ekscitita; tial mi lasos la mallumon kreski dum iom da tempo, kaj se post taŭga tempo la reĝo ne ankoraŭ ŝanĝos sian opinion, la mallumo estos forigata. Nek la reĝo nek iu alia estis kontenta pri tiu solvo, sed mi devis insisti.

Iĝis pli kaj pli mallume, pli kaj pli nigre, dum mi luktis kun tiuj malfacilaj vestaĵoj de la sesa jarcento. Finfine estis tute mallume, kaj la homamaso lamentis timigite kiam ĝi sentis la strangan, malvarman venton blovi tra la loko, kaj vidis la stelojn veni kaj trembrili sur la firmamemto. Fine, la eklipso estis totala, kaj mi estis tre ĝoja pro tio, sed ĉiuj aliaj estis mizeraj; kio estis tute nature. Mi diris:

"La reĝo, per sia silento, ankoraŭ akceptas la kondiĉojn."

Poste, mi levis mian manon – staris tiel dum momento – kaj diris, terurege solene:

"La magiaĵo dispeliĝu kaj foriru sen kaŭzi malbonon!"

Ne estis reago, dum momento, en tiu profunda mallumo kaj tombeja silento. Sed kiam la arĝenta rando de la suno denove videblis, mallongan momenton poste, la tuta homamaso laŭte kriis kaj venis kiel diluvo por sufoki min per benoj kaj dankoj; kaj Clarence certe ne estis la lasta.

7. La turo de Merlino

Ĉar mi nun estis la dua persono en la regno, kiam temis pri politika potenco kaj aŭtoritato, oni multon donis al mi. Miaj vestaĵoj estis el silko kaj veluro, kaj do estis tre belaj, kaj ankaŭ malkomfortaj. Sed mi baldaŭ kutimiĝos al la vestaĵoj; mi estis konscia pri tio. Mi ricevis la plej elektitan loĝejon en la palaco, post tiu de la reĝo. Tie pendis la plej brilaj gobelinoj, sed la ŝtonaj floroj ne havis aliajn tapiŝojn ol skirpo, kaj eĉ malpura skirpo, el miksitaj specoj. Komfortaĵoj, propradire, ne ekzistis. Mi parolas pri *etaj*_komfortaĵoj; estas ili kiu vere faras la vivon komforta. La grandaj kverkaj seĝoj, ornamitaj per krudaj tranĉitaĵoj, bone taŭgis; sed tie finiĝis. Ne estis sapo, ne alumetoj, ne spegulo – krom metala, pli-malpli same efika kiel akvo en sitelo. Kaj neniuj kolorbildoj. Mi kutimiĝis al kolorbildoj dum jaroj, kaj nun mi vidis ke, sen ke mi rimarkis tion, pasio pri arto eniris mian personecon kaj iĝis parto de mi. Mi sentis hejmsopiron kiam mi rigardis tiun fieran kaj brilkoloran sed senkoran sterilecon kaj memoris ke en nia domo en East Hartford, kvankam tiel modesta, vi ne povis eniri ĉambron sen trovi koloran afiŝon, aŭ almenaŭ trikoloran "Dio benu nian domon" super la pordo; kaj en la salono, ni havis naŭ. Sed ĉi tie, eĉ en mia plej luksa ĉambro,

ne estis io simila al bildo krom io same granda kiel litokovrilo, kiu estis aŭ trikita aŭ teksita (estis ŝtopitaj lokoj en ĝi), kaj nenio en ĝi havis la ĝustan koloron aŭ la ĝustan formon; kaj se temas pri proporcioj, eĉ Rafaelo mem ne povus fuŝi ilin pli ekstreme, ekzercinte sin per tiuj koŝmaroj kiujn oni nomas liajn famajn "Hampton Court Kartunoj". Rafaelo estis ŝercanto. Ni havis plurajn el liaj kolorbildoj; unu estis lia "La mirakla sekego de fiŝoj", kie li bildigas propran miraklon – metas tri homojn en kanuon, kiu ne povus lokigi hundon sen renversiĝi. Mi ĉiam admiris lian arton, ĝi estis tiel freŝa kaj nekonvencia.

Eĉ ne estis sonorilo aŭ paroltubo en la kastelo. Mi havis multajn servistojn, kaj tiuj kiuj deĵoris iom ripozis en la antaŭĉambro; kaj kiam mi deziris unun el ili, mi devis iri kaj voki lin. Ne estis gaso, ne estis kandeloj; bronza pelvo duone plena de malmultekosta butero kun brulanta ŝtofo flosanta en ĝi kreis kio estis rigardata kiel lumo. Multaj ŝtofoj pendis sur la muroj kaj modifis la mallumon, nur mildigis kaj tristigis ĝin. Se vi eliris dumnokte, viaj servistoj portis torĉojn. Ne estis libroj, skribiloj, papero aŭ inko, nek vitro en la truoj kiujn ili nomis fenestroj. Estas malgrava afero – vitro – ĝis ĝi mankas, kiam ĝi iĝas grava. Sed plej malbone el ĉio eble estis ke ne estis sukero, kafo, teo aŭ tabako. Mi vidis ke mi estis

nur alia Robinsono Kruso, ŝiprompta sur neloĝata insulo, sen alia akompano ol kelkaj pli-malpli malsovaĝaj bestoj, kaj se mi volis fari la vivon eltenebla, mi devis fari kiel li -- inventi, elpensi, krei, reorganizi; laborigi cerbon kaj manojn, kaj daŭre aktivigi ilin. Nu, tio estis mia sinteno.

Unu afero maltrankviligis min unue – la granda intereso kiun homoj havis pri mi. Ŝajnis ke la tuta nacio volis rigardi min. Baldaŭ klariĝis, ke la eklipso timigis la britan mondon preskaŭ ĝismorte; ke dum ĝi okazis la tuta lando, de unu pinto al la alia, estis kompatveke kaptata de paniko, kaj la preĝejoj, ermitejoj kaj monaĥejoj pleniĝis de preĝantaj kaj plorantaj kompatinduloj, kiuj kredis ke la fino de la mondo nun venis. Poste sekvis la novaĵo ke tiun teruran okazon kaŭzis fremdulo, potenca magiisto ĉe la kortego de reĝo Arturo; ke li povus estingi la sunon kiel kandelon, kaj ke li intencis fari tion ĝuste kiam oni sukcesis aĉeti lian kompaton, kaj tiam li nuligis siajn magiaĵojn, kaj nun li estis agnoskata kaj honorigata kiel la homo kiu senhelpe eble savis la planedon el detruo, kaj ĝiajn popolojn el formorto. Nun, se vi pripensas ke ĉiuj kredis tion, kaj ne nur kredis, sed neniam eĉ sonĝis pri duboj, vi facile komprenas ke ne estis iu en la tuta Britio, kiu ne piedirus kvindek mejlojn por vidi min. Kompreneble, oni parolis nur pri mi, lasante

ĉiujn aliajn aferojn; eĉ la reĝo iĝis subite persono malpli grava kaj konata. Ene de dudek kvar horoj, la grupoj komencis veni, kaj ili daŭre faris tion dum du semajnoj. La vilaĝo estis plenplena, kaj la tuta kamparo. Mi devis eliri dek du fojojn ĉiutage, kaj montri min al la respektemaj kaj imponataj homamasoj. Tio iĝis granda ŝarĝo, kiam temas pri tempo kaj problemoj, sed kompreneble estis samtempe agrabla kompenso esti tiel honorata kaj omaĝata. Frato Merlino iĝis verda pro spito kaj envio, kio tre kontentigis min. Sed unu aferon mi ne povis kompreni – neniu petis min pri aŭtografo. Mi parolis kun Clarence pri tio. Diable! Mi devis klarigi al li pri kio temas. Tiam li diris ke neniu en la lando povis legi kaj skribi, krom kelkdek pastroj. Nur imagu!

Estis alia afero kiu iom maltrankviligis min. Tiuj homamasoj baldaŭ komencis postuli novan miraklon. Tio estis natura afero. Povi reporti al iliaj malproksimaj hejmoj la fanfaronadon ke ili vidis la homon kiu povis regi la sunon, kie ĝi ŝvebis en la ĉielo, kaj esti obeata, igus ilin grandaj en la okuloj de iliaj najbaroj, kaj enviata de ĉiuj; sed povi diri ke ili mem vidis lin fari miraklon – ho, se tiel, homoj venus el malproksime por vidi _ilin_. La premado iĝis sufiĉe forta. Estis venonta eklipso de la luno, kaj mi sciis la daton kaj la horon, sed estis tro malproksima. Du jaroj. Mi donus multon por

rapidigi ĝin kaj uzi ĝin nun, kiam estis granda merkato por ĝi. Ŝajnis granda perdo nur forlasi ĝin, kaj vidi ĝin veni longe poste kiam oni ne plu povas uzi ĝin, kiom ajn oni volas. Se ĝi estus okazonta post nur unu monato, mi povus spekulacii; sed kiel nun estis, mi ne povis elpensi iun manieron profiti, do mi ne plu provis. Poste, Clarence eksciis ke maljuna Merlino agis ruze inter tiuj homoj. Li disvastigis onidiron ke mi estis ĉarlatano, kaj ke mi ne prezentis novan miraklon al la popolo pro la simpla kialo ke mi ne povis. Mi komprenis ke mi devis fari ion. Rapide, mi elpensis planon.

Per mia aŭtoritato kiel plenumanto, mi ĵetis Merlinon en malliberejon – en la saman ĉelon kie mi mem sidis. Poste, mi anoncis publike per heroldo kaj trumpeto ke mi estos okupata pri ŝtataj aferoj dum du semajnoj, sed ke post tiu periodo mi havos iom da libertempo por eksplodigi la ŝtonan turon de Merlino per fajro el la ĉielo; dume, ĉiu kiu aŭskultis maliĉajn raportojn pri mi estu singarda. Cetere, mi nun faros nur ĉi tiun miraklon, kaj neniun plian; se ĝi ne kontentigis, kaj se iu grumblis, mi aliigos la grumblantojn en ĉevalojn, kaj faros ilin uzeblaj. Ĉio trankviliĝis.

Mi konfidis min al Clarence, certgrade, kaj ni komencis labori private. Mi diris al li ke ĉi tiu speco de miraklo postulas iom da preparoj, kaj ke

signifas rapidan morton se iu iam parolas pri tiuj aferoj kun iu ajn. Tio sufiĉe certigis lian buŝon. Kaŝe, ni faris kelkajn buŝelojn de altkvalita pulvo, kaj mi kontrolis miajn armilfaristojn dum ili konstruis fulmkonduktilon kaj kelkajn fadenojn. Tiu malnova ŝtonturo estis tre masiva -- kaj sufiĉe ruinigita, ĉar ĝi estis romia, kaj jam staris dum kvarcent jaroj. Jes, kaj bela, en kruda maniero, kaj kovrita de hedero de supre kaj suben, kiel de maŝjupo. Ĝi staris sur soleca monteto, bone videbla el la kastelo, kaj ĉirkaŭ duonan mejlon for.

Ni laboris nokte, kaj metis la pulvon en la turo -- elfosis ŝtonojn, je la interna flanko, kaj metis la pulvon en la muroj mem, kiuj estis dek kvin futojn dikaj je la bazo. Ni enmetis po iomete, en dek du lokoj. Ni povus eksplodigi la Turon de Londono per tiuj ŝargoj. Kiam venis la dektrian nokton ni starigis la fulmkonduktilon, metis en ĝin unu el la ŝargoj de pluvo, kaj tiris fadenojn el ĝi al la aliaj ŝargoj. Ĉiuj evitis tiun lokon ekde la tago de mia anonco, sed la matenon de la dekkvara, mi kredis ke estis plej bone atentigi la homojn, per la heroldoj, ke ili tenu sin malproksime -- almenaŭ kvaronan mejlon. Poste mi aldonis, devige, ke iam dum la venontaj dudek kvar horoj mi prezentos la miraklon, sed ke mallonge antaŭe mi mallonge informos pri tio;

per flagoj sur la kastelaj turoj se estas tago, per torĉkorboj samloke se estas nokto.

Tondropluvoj okazis sufiĉe ofte lastatempe, kaj mi ne tre timis malsukceson; tamen, mi ne deziris prokraston de unu aŭ du tagoj; mi devus klarigi ke mi ankoraŭ estis okupata pri ŝtataj aferoj, kaj la popolo devas atendi.

Kompreneble, ni havis tagon blindige sunbrilan – preskaŭ la unuan sen nubo dum tri semajnoj; ĉiam okazas tiel. Mi restis izolita, kaj rigardis la veteron. Clarence vizitis min de tempo al tempo, kaj diris ke la publika ekscito kreskis kaj kreskis dum la tuta tempo, kaj ke la tuta lando pleniĝis de homamasoj tiel longe kiel oni povis vidi el la muroj. Finfine ekblovis kaj aperis nubo – ankaŭ en la ĝusta direkto, kaj ĝuste ĉe la vesperkrepusko. Dum tempeto mi vidis tiun malproksiman nubon disvastiĝi kaj nigriĝi, poste mi juĝis ke estis ĝusta tempo por mi aperi. Mi ordonis ke la torĉkorboj estu ekbruligataj, kaj Merlino liberigata kaj sendata al mi. Kvaronan horon poste, mi supreniris la parapeton, kaj tie mi trovis la reĝon kaj la kortegon kunirintajn kaj rigardantajn en la mallumon, direkte al la turo de Merlino. Jam la mallumo estis tiel peza, ke oni ne povis vidi malproksimen; tiuj homoj kaj la malnovaj turetoj, parte en profundaj ombroj kaj parte en la ruĝa ardo de la grandaj rotorkorboj supre, similis al bela pentraĵo.

Merlino venis en malbona humoro. Mi diris:

"Vi volis bruligi min viva, kiam mi faris nenion malbonan al vi, kaj poste vi provis detrui mian profesian prestiĝon. Tial mi subenvokos fajron kaj eksplodigos vian turon, sed nur decas doni al vi ŝancon; nun, se vi kredas ke vi povos rompi miajn magiaĵojn, kaj bari la fajrojn, nur provu! Estas via vico."

"Mi povas, bona sinjoro, kaj mi faros. Ne dubu."

Li faris imagitan cirklon sur la ŝtonoj de la tegmento, kaj bruligis iomete da pulvoro sur ĝi, kio elsendis etan nubon de bonodoranta fumo, je kio ĉiuj iris malantaŭen kaj komencis fari krucosignojn kaj iĝi nekomfortaj. Poste li komencis murmuri kaj fari signojn en la aero per la manoj. Li malrapide kaj poiome frenezigis sin mem, kaj komencis svingi siajn brakojn kiel alojn de ventomuelilo. Je tiu tempo, la ŝtormo preskaŭ atingis nin; la ventetoj flagrigis la torĉojn, ondigis la ombrojn, la unuaj pezaj pluvogutoj falis, la tuta mondo estis karbe nigra, la fulmoj komencis trembrili kaprice. Kompreneble, mia fulmkonduktilo nun ŝargiĝis. Fakte, baldaŭ okazos. Do mi diris:

"Vi havis sufiĉe da tempo. Mi donis al vi ĉiujn avantaĝojn, sen ĝeni vin. Evidente, via magio estas malforta. Estas nur ĝuste ke mi komenciĝas nun."

Mi faris ĉirkaŭ tri paŝojn en la aero, kaj poste estis terura krako, kaj tiu malnova turo eksplodis kaj ĵetis siajn partojn en la aeron, kune kun granda vulkana fontano de fajro, kiu faris el la nokto tagmezon, kaj montris mil akreojn de homoj, rampantaj sur la tero en ĝenerala kolapso kaj paniko. Nu, pluvis mortero kaj ŝtonojn dum la cetera semajno. Tia estas la raporto, sed eble la faktoj modifus ĝin.

Estis efika miraklo. La granda kaj ĝena portempa homamaso malaperis. Estis multmil spuroj en la ŝlimo de la posta mateno, sed ili ĉiuj iris eksteren. Se mi anoncus plian miraklon, eĉ kun ŝerifo mi ne povus rekruti aŭdiencon.

La prestiĝo de Merlino estis nula. La reĝo volis nuligi ankaŭ liajn salajrojn. Li eĉ volis forpeli lin, sed mi intervenis. Mi diris ke li estos uzebla por aranĝi la veteron, kaj prizorgi tiajn malgravajn aferojn, kaj ke mi fojfoje helpos lin, kiam lia eta magia talento ne sufiĉos. Ne restis eĉ parteto de lia turo, sed mi igis la registaron rekonstrui ĝin por li, kaj konsilis lin akcepti gastojn, sed li estis tro alta por tio. Kaj se temas pri dankemo, li neniam eĉ diris "dankon". Li estis sufiĉe malmola, kie ajn oni vidis lin; sed vi fakte ne povis postuli ke iu estu agrabla post tia fatalaĵo.

8. La estro

Esti donita vastan aŭtoritaton estas bona afero, sed igi la observantan mondon akcepti tion estas eĉ pli bona. La epizodo kun la turo plifortigis mian pozicion, kaj faris ĝin neatakebla. Se iuj hazarde emis esti enviaj kaj kritikaj antaŭ tio, ili nun ŝanĝis siajn opiniojn. Ne estis eĉ unu persono en la regno, kiu trovis saĝe ĝeni miajn aferojn.

Mi rapide kutimiĝis al miaj situacio kaj cirkonstancoj. Dum certa tempo mi vekiĝis, matene, kaj ridetis al mia "songo", kaj atendis la sonon de la Colt-fabriko; sed tiaj aferoj iom post iom malaperis, kaj finfine mi povis plene kompreni ke mi fakte vivis en la sesa jarcento, kaj en la kortego de Arturo, ne en mensa malsanulejo. Post tio, mi estis same hejma en tiu jarcento kiel mi povus esti en iu alia; kaj se temas pri preferoj, mi ne ŝanĝus ĝin al la dudeka. Vidu la eblecojn ĉi tie por homo kun mia kono, cerbo, kuraco kaj iniciatemo, veni kaj kreski kun la lando. La plej granda kampo kiu iam ekzistis, kaj tute mia; neniuj konkurantoj; neniuj homoj kiu ne estis infano en komparo kun mi kiam temas pri eblo kaj kapablo; aliflanke, kio mi estus en la dudek jarcento? Mi estus laborestro en fabriko, jen ĉio; povus tiri trenreton laŭ la strato iam ajn, kaj kapti cent homojn pli kapablajn ol mi mem.

Kian salton mi faris! Mi ne povis ne pensi pri ĝi, kaj cerbumi; ĝuste kiel iu kiu trovis nafton. Estis neniu kiu estis komparebla al mi, se ne temus pri la kazo de Jozef; kaj tiu nur proksimiĝis al mia, ne tute egaligis al ĝi. Ĉar estas evidente ke la elstaraj financaj ruzaĵoj de Jozef profitigis nur la reĝon, la ordinara loĝantaro certe rigardis lin sufiĉe suspekteme, dum mi agis favore al la tuta popolo kiam mi savis la sunon, kaj estis populara pro tio.

Mi ne estis ombro de reĝo, mi estis la esenco; la reĝo mem estis la ombro. Mia potenco estis enorma; kaj ne estis nur nomo, kiel tiaj aferoj ĝenerale estis, sed la fakto mem. Mi staris ĉi tie, je la fonto kaj vera komenco de la dua granda periodo de la monda historio; kaj mi povis vidi la komencantan fluon de tiu historio kreski kaj profundigi kaj larĝigi, kaj iĝi granda rivero tra la jarcentoj; kaj mi povis noti kiel venis aventurantoj kiel mi mem sub la protekto de ĝia longa vico de tronoj: Montforto, Caveston, Mortimer, Villiers; la militantaj, kampanjantaj nenifarantoj de Francio, kaj la sceptrotenantaj subuloj de Karlo 2; sed nenie en la procesio videblis iu same granda kiel mi. Mi estis unika, kaj mi ĝojis scii ke tiu fakte restos neneeble dum dek tri kaj duona jarcentoj, certe.

Jes, pri potenco mi estis egala al la reĝo. Samtempe estis alia potenco iom pli forta ol ni

ambaŭ kune. Tio estis la Eklezio. Mi ne volas kaŝi tion. Mi ne povus, se mi volus. Sed ne zorgu pri tio nun; tio estos evidente poste, en la ĝusta momento. Ne kaŭzis problemojn al mi komence – almenaŭ ne gravajn.

Nu, estis stranga lando, kaj tre interesa. Kaj la popolo! Ili estis la plej aparta, simpla kaj fidplena gento; fakte, ili estis nur kunikloj. Estis mizere por homo, naskita en sana, libera etoso, aŭdi ilian humilan kaj elkoran elverŝon de lojaleco al ilia reĝo kaj ilia Eklezio kaj al la nobelaro; kvazaŭ ili havus pli grandan kaŭzon ami kaj honoro reĝon kaj Eklezion kaj nobelojn ol sklavo havas ami kaj honori la vipon, aŭ ol hundo havas ami kaj honori la fremdulon kiu piedbatas lin! Nu, ja *ĉiu* reĝaĵo, kiel ajn modifita, *ĉiu* nobelo, kiel ajn ornamita, fakte estas insulto; sed se vi naskiĝis kaj kreskis sub tia sistemo, vi verŝajne neniam komprenos tion mem, kaj ne kredos tion kiam iu alia informos vin. Por honti pro sia homeco, sufiĉas pripensi pri kiaj neniuloj ĉiam sidis sur ĉiuj tronoj sen ajna rajto kaj kialo, kaj pri la separangaj homoj kiuj ĉiam ludis la rolojn de aristokratoj – aro de monarĥoj kaj nobeloj kiuj, ĝenerale, gajnus nur malriĉecon kaj forgeson se ili, same kiel pli bonaj homoj, havus nur sian propran strebadon.

La plej granda parto de la brita nacio de reĝo Arturo estis sklavoj, tutsimple, kaj estis tiel

nomataj, kaj portis la feran kolumon ĉirkaŭ la kolo; la cetero estis sklavoj laŭfakte, sed sen tiu nomo; ili imagis sin esti liberaj homoj, kaj nomis sin tiel. La vero estis ke la nacio kiel komunumo estis en la mondo pro unu kialo, kaj nur unu: por rampi sur la tero antaŭ la reĝo, la Eklezio kaj la nobelaro; sklavi por ili, ŝviti sangon por ili, malsati por ke ili estu sataj, labori por ke ili povu ludi, trinki mizeron ĝisfunde por ke ili povu esti gajaj, iri nudaj por ke ili povu porti silkon kaj juvelojn, pagi impostojn por ke ili ne devu pagi ilin, bone koni dum siaj tutaj vivoj la humiligantajn vortojn kaj sintenojn por ke ili povu iri fiere kaj imagi sin la dioj de ĉi tiu mondo. Kaj por ĉio tio, la tuta danko kiun ili ricevis estis batoj kaj malestimo; kaj tiel malkuraĝaj ili estis, ke ili rigardis eĉ tiaspecan atenton kiel honoron.

Hereditaj ideoj estas stranga afero, kaj interese estas observi kaj ekzameni ilin. Mi havis miajn, la reĝo kaj lia popolo havis siajn. En ambaŭ kazoj ili fluis en kanaloj kiuj iĝis profundaj pro tempo kaj kutimo, kaj kiu provus deturni ilin per rezonado kaj argumentoj, tiu devus longe strebi. Ekzemple, tiuj homoj heredis la ideon ke ĉiu homo sen titolo kaj longa genealogio, ĉu li havis grandajn naturajn talentojn ĉu ne, ne meritis pli grandan atenton ol simpla besto aŭ insekto; dum mi heredis la ideon ke homaj monedoj, kiuj povas konsenti maski sin

per la pavaj vestaĵoj de hereditaj dignoj kaj nemeritataj titoloj, ne servas al alia afero ol rido-objekto. La maniero kiel oni rigardis min estis stranga, sed natura. Vi scias kiel la dresisto kaj la ĉeestantoj rigardas la elefanton en la menaĝerio; nu, tio estas la ideo. Ili plene admiras lian grandan korpon kaj lian enorman forton; ili fiere parolas pri la fakto ke li povas fari cent miraklojn vaste trans iliaj propraj kapabloj; kaj ili same fiere parolas pri la fakto ke, kiam li estas kolera, li povas peli mil homojn antaŭ si. Sed ĉu tio faras unu el *ili*? Ne, la plej ĉifona vagabondo en la truo ridetus al tiu ideo. Li ne povis kompreni ĝin; li ne povis akcepti ĝin; li ne povis iamaniere imagi ĝin. Nu, por la reĝo, la nobeloj, kaj la tuta nacio, eĉ ĝis la sklavoj kaj vagabondoj, mi estis tia elefanto, kaj nenio pli. Mi estis admirata, ankaŭ timata; sed same kiel besto estas admirata kaj timata. La besto ne estas estimata, nek estis mi; mi eĉ ne estis respektata. Mi ne havis genealogion, ne hereditan titolon; do, en la okuloj de la reĝo kaj de la nobeloj, mi estis nur fekaĵo. La popolo rigardis min kun miro kaj impono, sed sen estimo; pro la forto de hereditaj ideoj, ili ne povis imagi ke io meritas tion, sen geneologio kaj nobeleco. Tie vi vidas la manon de tiu terura potenco, la rom-katolika eklezio. Dum du aŭ tri mallongaj jarcentoj, ĝi konvertis nacion de homoj al nacio de vermoj. Antaŭ la

tago de la mondpotenco de la Eklezio viroj estis viroj, kaj iris kun rektaj kapoj, kaj havis la fierecon kaj spiriton kaj sendependecon de viroj; kaj se iu iĝis granda kaj grava, li iĝis tia ĉefe per agado, ne per nasko. Sed poste la Eklezio prenis sian pozicion, kaj akiris sian hakilon; kaj ŝi estis saĝa, subtila, kaj konis pli ol unu manieron senhavigi katon – aŭ nacion; ŝi elpensis "la dian ĝustecon", kaj metis ĝin tute ĉirkaŭe, briko apud briko, kun la feliĉpromesoj – tirata tiujn el ilia bona celo por fari ilin plifortigi malbonan; ŝi predikis (al la ordinarulo) humilecon, obeadon al superuloj, la belecon de sinofero; ŝi predikis (al la ordinarulo) humilecon antaŭ insultoj; predikis (same al la ordinarulo, ĉiam al la ordinarulo) paciencon, malfierecon, ne-kontraŭstaron antaŭ subpremado; kaj ŝi enkondukis heredeblajn rangojn kaj aristokratiojn, kaj instruis ĉiujn kristanajn popolojn de la tero klini sin al ili kaj adori ilin. Eĉ en mia denaska jarcento, tiu veneno estis en la sango de la kristanaro, kaj la plej bona el la anglaj ordinaruloj ankoraŭ estis kontenta vidi malpli bonajn homojn daŭre kaj senhonte havi multajn poziciojn, kiel nobelecojn kaj la tronon, al kiuj la groteskaj leĝoj de lia lando ne permesis al li strebi; fakte, li ne nur estis kontenta pri tiu stranga kondiĉo, li eĉ povis konvinki sin mem ke li estis fiera pri ĝi. Tio ŝajnas montri ke estas nenio kion oni ne povas elteni, se vi nur

naskiĝis kaj kreskis en ĝi. Kompreneble tiu makulo, tiu estimo al rango kaj titolo, estis ankaŭ en nia usona sango – mi scias tion; sed kiam mi forlasis Usonon, ĝi estis malaperinta – almenaŭ praktike. Ĝi restis nur ĉe la snoboj kaj snobinoj. Kiam malsano disvastiĝis suben ĝis tiu nivelo, oni povas honeste diri ke ĝi eliris el la sistemo.

Sed por reveni al mia malnormala pozicio en la regno de reĝo Arturo. Jen mi estis, giganto inter pigmeoj, viro inter infanoj, granda inteligento inter intelektaj talpoj; laŭ ĉiuj raciaj mezuroj la sola vere granda homo en la tuta brita mondo; kaj tamen tie kaj tiam, same kiel en la fora Anglio de mia naskotempo, la stulta grafo kiu povis aserti ke li devenis de reĝa amorantino, nerekte tra la slumo de Londono, estis pli bona homo ol mi. Tian personon oni flatis en la regno de Arturo, kaj ĉiuj ege estimis lin, eĉ se lia moralo estis same malalta kiel lia inteligento aŭ genealogio. Fojfoje *li* povis sidi en la ĉeesto de la reĝo, sed mi ne povis. Mi povus havi titolon sufiĉe facile, kaj tio levus min multe en ĉies okuloj; eĉ en tiuj de la reĝo, kiu donus ĝin. Sed mi ne petis tion, kaj mi rifuzis kiam ĝi estis ofertata. Mi ne povus ĝui ion tian kun miaj ideoj; kaj ĉiukaze ne estus ĝuste, ĉar dum la tuta historio kiun mi konis, nia tribo ĉiam malhavis la maldekstran trabon. Mi ne povus senti min vere kaj kontentige bona kaj fiera kaj rekta pri iu ajn

titolo, krom se ĝi estus donata de la nacio mem, la sola ĝusta fonto; kaj tian mi esperis gajni; kaj post jaroj de honesta kaj honoriga strebado, mi ja gajnis ĝin, kaj portis ĝin kun alta kaj pura fiereco. La titolo falis tutsimple el la lipoj de forĝisto, iun tagon, en iu vilaĝo, estis prenata kiel feliĉa penso kaj ĵetata de buŝo al buŝo kun rido kaj kun jesa voto; en dek tagoj ĝi trairis la regnon, kaj iĝis same bone konata kiel la nomo de la reĝo. Poste, mi neniam estis konata sub alia nomo, ĉu en la interparolado de la nacio, ĉu en grava debato pri ŝtataj aferoj en la konsilistaro de la reganto. Tiu titolo, tradukita en modernan lingvon, estus "la Estro". Elektita de la nacio. Tio konvenis al mi. Kaj estis sufiĉe alta titolo. Estis tre malmultaj la -oj, kaj mi estis unu el ili. Se vi parolis pri la duko, aŭ la grafo, aŭ la episkopo, kiel eblis scii pri kiu el ili temas? Sed se vi parolis pri la reĝo aŭ la reĝino aŭ la estro, estis alia afero.

Nu, mi ŝatis la reĝon, kaj kiel *reĝon* mi respektis lin – respektis la postenon; aŭ almenaŭ respektis ĝin same multe kiel mi povus respekti iun nemeritatan potencon; sed kiel *homojn* mi malrespektis lin kaj liajn nobelojn – private. Kaj li kaj ili ŝatis min, kaj respektis mian postenon; sed kiel beston, sen hereditan aŭ inventitan titolon, ili malrespektis min – kaj ne tre private. Mi ne postulis pagon por mia opinio pri ili, kaj ili

ne postulis pagon por sia opinio pri mi; la kontoj
estis balancitaj, kaj ĉiuj estis kontentaj.

9. La turniro

Ĉiam estis grandaj turniroj tie en Kameloto; kaj tre ekscitaj kaj pitoreskaj kaj ridindaj humaj taŭrobataloj ili estis, sed nur iom lacigaj por praktikaj homoj. Tamen, mi estis ĝenerale tie – pro du kialoj: oni ne devas stari super la aferoj, kiujn oniaj amikoj kaj socio tre ŝatas, se oni mem volas esti ŝatata – precipe kiel homo de ŝtato; cetere, kiel homo kaj de negocoj kaj de ŝtato, mi volis studi la turniron, kaj vidi ĉu mi ne povus elpensi iun plibonigon. Tio memorigas min rimarki, parenteze, ke la unua afero, kiun mi faris en mia administrado – kaj tion mi faris fakte dum ĝia unua tago – estis fondi patentoficejon; ĉar mi sciis ke lando sen patentoficejo kaj bonaj patentleĝoj similas al krabo, kaj povas moviĝi nur flanken aŭ malantaŭen.

La aferoj pasis, turniro preskaŭ ĉiun semajnon; kaj fojfoje la knaboj volis ke mi partoprenu – do Sir Lanceloto kaj la aliaj – sed mi diris ke mi venos poste; ne urĝas ankoraŭ, kaj estas tro da registaraj meĥanismoj por ŝmiri kaj korekti kaj ekmovi.

Ni havis turniron kiu daŭris tagon post tago dum pli ol semajno, kaj eĉ kvincent kavaliroj partoprenis en ĝi, ekde la unua ĝis la lasta. Ili kolektiĝis dum semajnoj. Ili venis surĉevale el ĉie; el la plej foraj partoj de la lando, kaj eĉ el la

alia flanko de la maro; kaj multaj venigis sinjorinojn, kaj ĉiuj venigis armilportistojn kaj servistojn. Ili estis vestitaj tre bunte kaj pompe, kaj tre tipe por tiu lando kaj tempo, kiel altnivelaj bestoj, kun senkulpe maldeca lingvaĵo kaj feliĉe indiferentaj al moralo. Oni batalis aŭ spektis, la tutan tagon kaj ĉiun tagon; kaj kantis, ludis, festis la duonan nokton ĉiun nokton; ili havis la plej bonan tempon. Vi neniam vidis tiajn homojn. Tiuj vicoj de belaj sinjorinoj, brilantaj en sia barbara pompo, vidus kavaliron fali el sia ĉevalo surteren, kun lanco dika kiel maleolo tra la korpo, kaj la sangon ŝpruci, kaj anstataŭ sveni ili aplaŭdus kaj interpremiĝus por pli bone vidi; nur fojfoje unu metis sian vizaĝon en naztukon, kaj fanfarone aspektis dispremita, kaj tiam vi povis kalkuli ke certe estis tie iu skandalo, kaj ŝi timis ke la publiko ne eksciis pri tio. La nokta bruo normale iritus min, sed mi ne estis ĝenata sub la nunaj cirkonstancoj, ĉar pro ĝi mi ne aŭdis la fuŝkuracistojn forigi krurojn kaj brakojn de la kripluloj de tiu tago. Ili detruis eksterordinare bonan dissegilon por mi, kaj ankaŭ rompis la seĝtablon, sed mi ne protestis. Kaj kiam temis pri mia hakilo – nu, mi decidis ke kiam mi venontfoje pruntedonos hakilon al ĥirurgo, mi pli bone elektos la jarcenton.

Mi ne nur spektis tiun turniron de tago al tago, sed elektis inteligentan pastron el mia ministrejo

por publika moralo kaj terkulturado, kaj ordonis lin raporti pri ĝi; ĉar estis mia celo iam, kiam mi estis sufiĉe movinta la popolon, fondi gazeton. La unua afero, kiun vi deziras en nova lando, estas patentoficejo; poste, evoluigi vian lernejan sistemon; kaj post tio, ek la gazeto. Gazeto havas siajn mankojn, kaj multajn, sed ne gravas, ĝi estas voĉo el la tombo por morta nacio, kaj ne forgesu tion. Vi ne povas revivigi mortintan nacion sen ĝi; ne ekzistas maniero fari tion. Do mi volis testi aferojn, kaj trovi kian ĵurnalisman materialon mi devus povi kunigi el la sesa jarcento kiam mi bezonos tion.

Nu, la pastro laboris tre bone, pripensante la kondiĉojn. Li menciis ĉiujn detalojn, kaj tio estas bone, kiam temas pri loka afero; vi sciu, li registris por la entombiga parto de sia eklezio kiam li estis pli juna, kaj tie, vi sciu, la mono estas en la detaloj; ju pli da detaloj, des pli da gajno; portantoj, mutuloj, kandeloj, preĝoj – ĉio gravas; kaj se la funebrantoj ne aĉetas sufiĉe da preĝoj, vi notas viajn kandelojn per splitita skribilo, kaj la ciferoj estos bonaj. Kaj li havis bonan talenton por tie kaj ĉi tie enigi laŭdon pri kavaliro kiu povos anonci – ne, mi volas diri, pri kavaliro kiu havas influon; kaj li ankaŭ havis bonan talenton troigi, ĉar iam li bonvenigis pian ermiton kiu loĝis en porkejo kaj faris miraklojn.

Kompreneble, la raporto de tiu novulo malhavis sensaciajn priskribojn, kaj do la ĝustan sonon; sed ĝiaj arĥaikaj frazoj estis apartaj kaj dolĉaj kaj simplaj, kaj plenaj de la gustoj kaj odoroj de la tempo, kaj tiuj etaj meritoj certagrade kompensis ĝiajn plej gravajn mankojn. Jen ekstrakto:

Tiam Sir Brian de la Insuloj kaj Grummore Grummorsum, kavaliroj de la kastelo, renkontis Sir Aglovale kaj Sir Tor, kaj Sir Tor perbate faligis Sir Grummoree Grummmorsum. Tiam venis Sir Carados de la dolorplena turo, kaj Sir Turquine, kavaliroj de la kasteloj, kaj ilin renkontis Sir Percivale de Galis kaj Sir Lamorak de Galis, kiuj estis du fratoj, kaj tie renkontiĝis Sir Percivale kaj Sir Carados, kaj ambaŭ rompis la lancojn en siaj manoj, kaj poste Sir Turquine kaj Sir Lamorak, kaj ĉiu el ili faligis la alian, kun ĉevalo kaj ĉio, alteren, kaj ambaŭ partioj savis ambaŭ kaj surĉevaligis ilin denove. Kaj Sir Arnold, kaj Sir Gauter, kavaliroj de la kastelo, renkontis Sir Brandiles kaj Sir Kay, kaj tiuj kvar kavaliroj batalis forte, kaj rompis la lancojn en siaj manoj. Poste venis Sir Pertolope el la kastelo, kaj tie li renkontis Sir Lionel, kaj tie Sir Pertolope la verda kavaliro faligis Sir Lionel, frato de Sir Lanceloto. Ĉio estis anoncata de noblaj heroldoj, kiuj venkis, kaj iliajn nomojn. Poste Sir

Bleobaris rompis la lancon sur Sir Gareth, sed pro tiu bato Sir Beobaris falis altere. Kiam Sir Galihodin vidis tion, li lasis Sir Gareth teni lin, kaj Sir Gareth faligis lin altere. Poste Sir Galihud uzis sian lancon por venĝi sian fraton, kaj sammaniere Sir Gareth servis lin, kaj Sir Dinadan kaj lia frato La Cote Male Taile, kaj Sir Sagramor la Dezirplena, kaj Sir Dodinas la Sovaĝulo; ĉiujn tiujn li faligis per unu lanco. Kiam reĝo Agwisance de Irlando vidis Sir Gareth farti tiel, li miris kio li povus esti, kiu je unu okazo ŝajnus verda, kaj je alia, kiam li revenis, tute blua. Kaj tiel, ĉiun fojon kiam li rajdis tien kaj reen, li ŝanĝis koloron, tiel ke nek reĝo nek kavaliro facile rekonis lin. Poste Sir Agwisance, reĝo de Irlando, renkontis Sir Gareth, kaj Sir Gareth faligis lin el lia ĉevalo, kun selo kaj ĉio. Kaj poste venis reĝo Carados de Skotlando, kaj Sir Gareth faligis lin, cevalon kaj homon. Kaj sammaniere li servis reĝon Uriens de la lando Goro. Kaj poste eniris Sir Bagdemagus, kaj Sir Gareth faligis lin altere, ĉevalon kaj homon. Kaj la filo de Bagdemagus, Meliganus, rompis lancon al Sir Gareth, forte kaj kavalire. Kaj poste Sir Galahault, la nobla princo, laŭte kriis: Kavaliro kun la multaj koloroj, brave vi luktis; nun preparu vin, por ke mi povu lukti kun vi. Sir Gareth aŭdis lin, kaj li ricevis grandan lancon, kaj do ili renkontiĝis, kaj tie la princo rompis sian

lancon; sed Sir Gareth batis lin je la maldekstra flanko de la helmo, tiel ke li ŝanceliĝis tien kaj reen, kaj li falus se liaj viroj ne savus lin. Vere, diris reĝo Arturo, tiu kavaliro kun la multaj koloroj estas bona kavaliro. Tial la reĝo vokis al si Sir Lanceloto, kaj petis lin renkonti tiun kavaliiron. Sir, diris Lanceloto, mi pli bone rezignus pri li, ĉar li sufiĉe laboris hodiaŭ, kaj kiam iu kavaliro agas tiel bone unu tagon, li ne plu estas tiel bona kavaliro, nome, kiam vi vidis kavaliiron fari tiel bonan laboron; ĉar eble, diris Sir Lancelot, lia kverelo estas ĉi tie hodiaŭ, kaj eble li estas plej amata kun ĉi tiu sinjorino el ĉiuj kiuj estas ĉi tie, ĉar mi bone vidas ke li streĉas sin kaj por fari bonajn agojn, kaj tial, diris Sir Lanceloto, kiam temas pri mi, ĉi tiun tagon li havos la honoron; eĉ se mi povus malhelpi tion, mi tiel ne farus.

Estis malagrabra epizodo tiun tagon, kiun pro ŝtataj kialoj mi forstrekis el la raporto de mia pastro. Vi certe notis ke Garry bone luktis en la turniro. Kiam mi diras Garry, tio signifas Sir Gareth. Garry estis mia persona karesnomo por li; tio signifas ke mi tre ŝatis lin, kaj tiel estis. Sed estis nur privata karesnomo, kaj neniam laŭte elparolata al iu, certe ne al li; kiel nobelo, li ne tolerus tian intimaĵon de mi. Nu, por kontinui: mi

sidis en la privata loko rezervita por mi kiel la ministro de la reĝo. Dum Sir Dinadan atendis sian vicon eniri la listojn, li venis en ĝin kaj sidiĝis kaj komencis paroli; ĉar li ĉiam aktoris al mi, ĉar mi estis fremdulo, kaj li ŝatis havi novan merkaton por siaj ŝercoj, el kiuj la plej multaj estis tiel eluzitaj ke la rakontanto devis mem ridi, dum la aŭskultanto aspektas vomema. Mi ĉiam reagis al liaj streboj tiel bone kiel mi kapablis, kaj mi sentis tre profundan kaj veran amikecon al li, ĉar se pro malica sorto, li konis ĝuste la apartan anekdoton kiun mi aŭdis plej ofte, kaj kiun mi plej abomenis dum mia tuta vivo, mi almenaŭ ne devis mensogi pri ĝi. Estis iu kiun mi aŭdis atribuita al ĉiu humurema homo kiu iam staris sur amerika tero, ekde Kolumbo ĝis Artemus Ward. Temis pri humurema preleganto, kiu dronigis nesciantan aŭskultantaron per la plej mortigaj ŝercoj dum unu horo, kaj ricevis eĉ ne unu ŝercon; kaj poste, kiam li eliris, kelkaj gajaj simpluloj forte prenis lian manon kaj diris ke estis la plej amuza afero kiun ili iam aŭdis, kaj 'ili vere devis penegi por ne ekridi eĉ en la kunveno'. Tiu anekdoto neniam vidis la tagon kiam valoris rakonti ĝin; kaj tamen mi sidis dum tio okazis centojn kaj milojn kaj milionojn kaj miliardojn da fojoj, kaj kriis kaj blasfemis dum la tuta tempo. Kiu do povas esperi ke li povas scii kiel mi sentis, kiam mi aŭdis tiun metalvestitan stultulon

rakonti ĝin denove, en la malhela krepusko de tradicio, antaŭ la komenco de la historio, kiam eĉ Laktancio povis esti menciata kiel "la ĵus forpasinta Laktancio", kaj la krucmilitoj komenciĝos nur post kvincent jaroj? Ĝuste kiam li finiĝis, la memoriganto venis; do, rideĝante kiel demono, klakante kaj tintante li eliris kiel skatolo de nefiksitaj gisaĵoj, kaj mi ne sciis ion pli. Pasis kelkaj minutoj antaŭ ol mi konsciiĝis, kaj tiam mi malfermis la okulojn nur ĝustatempe por vidi Sir Gareth doni al li teruran baton, kaj senkonscience mi ekpreĝis: "Mi vere esperas ke li estos mortigata!" Sed pro malfortuno, antaŭ ol mi elparolis duonon de la vortoj, Sir Gareth koliziis kun Sir Sagramor la Dezirplena kaj sendis lin falante super la lumbo de lia ĉevalo, kaj Sir Sagramor aŭdis mian rimarkon kaj kredis ke mia deziro temis pri *li*.

Nu, kiam ajn iu el tiuj uloj ekhavis ideon en sia kapo, ne plu eblis eligi ĝin. Mi sciis tion, do mi savis mian spiron kaj ne ofertis iujn klarigojn. Tuj kiam Sir Sagramor saniĝis, li rimarkis al mi ke ni havis etan konflikton por solvi, kaj li nomis certan tagon tri aŭ kvar jarojn en la estonteco, lokon de la solvo, la listojn kiuj menciis la ofendon. Mi diris ke mi estos preta kiam li revenos. Vi sciu ke li iros al la sankta gralo. Ĉiuj knaboj fojfoje faris tion. Temis pri vojaĝo de pluraj jaroj. Ili ĉiam planis longan foreston, tre

zorgeme, kvankam neniu el ili havis la plej etan ideon kie la sankta gralo fakte estis, kaj mi ne kredas ke iu el ili fakte kredis ke li trovos ĝin, aŭ scius kion fari per ĝi se li hazarde trovis ĝin. Vi komprenu, tio estis la Nordokcidenta Pasejo de tiu tempo, vi povas diri. Jen ĉio. Ĉiujare, ekspedicioj eliris gralante, kaj la postan jaron, savekspedicioj eliris por serĉi *ilin*. Oni povis gajni grandan famon, sed neniun monon. Vidu, ili eĉ volis ke *mi* partoprenu! Nu, mi devus rideti.

10. Civilizo komenciĝas

La Ronda Tablo baldaŭ aŭdis pri la defio, kaj kompreneble ĝi estis multe diskutata, ĉar tiaj aferoj interesis la knabojn. La reĝo opiniis ke mi nun devis eliri por serĉi aventurojn, por ke mi ricevu famon kaj estu pli digne renkonti Sir Sagramor, kiam la pluraj jaroj estos pasintaj. Mi portempe ekskuzis min; mi diris ke mi bezonis tri aŭ kvar jarojn pli por ke ĉio estu aranĝita kaj iru glate; poste mi estos preta; estis bonaj ŝancoj ke post tiu tempo, Sir Sagramor ankoraŭ estas ekstere gralante, do neniu valora tempo estos perdata pro la prokrasto. Tiam mi estos havinta la postenon dum ses aŭ sep jaroj, kaj mi kredis ke miaj sistemo kaj maŝinaro estos tiam tiel bone evoluinta, ke mi povos libertempi sen ke tio kaŭzos malbonon.

Mi estis sufiĉe kontenta per tio, kion mi jam faris. En pluraj trankvilaj anguloj jam komenciĝis ĉiaspecaj industrioj – semoj de estontaj grandaj fabrikoj, la feraj kaj ŝtalaj misiistoj de mia estonta civilizo. Tie estis kunigitaj la plej brilaj junaj animoj kiujn mi povis trovi, kaj mi havis agentojn kiuj traserĉis la lando por trovi pliajn, la tutan tempon. Mi instruis aron de nesciemuloj, kaj faris el ili ekspertojn – ekspertoj pri ĉiaj manlaboroj kaj sciencoj. Tiuj lernejoj miaj funkciis glate kaj private en

neĝenataj kaj kaŝataj lokoj en la kamparo, ĉar neniuj estis permesata eniri iliajn areojn sen speciala permeso – ĉar mi timis la Eklezion.

Mi fondis instruisto-fabrikon kaj multajn dimanĉo-lernejojn, unue; sekve, mi nun havis mirindan sistemon de bazaj lernejoj plene aktivaj en tiuj lokoj, kaj ankaŭ plenan sortimenton de protestantaj paroĥoj, ĉiuj florantaj kaj kreskantaj. Ĉiu povis esti tia kristano kia li volis; pri tio estis plena libereco. Sed mi limigis la publikan religian instruadon al la preĝejoj kaj dimanĉo-lernejoj, kaj mi ne permesis ion de ĝi en miaj aliaj edukaj domoj. Mi povus doni apartan prestiĝon al mia propra sekto kaj fari ĉiujn presbiterianojn sen problemoj, sed tio estus lezi leĝon de la homa naturo: spiritaj deziroj kaj instinktoj estas same variaj en la homa familio kiel la korpaj apetitoj, haŭtkoloroj kaj trajtoj, kaj homo estas morale plej bona nur kiam li havas la religian vestaĵon kies koloro kaj formo kaj grandeco plej bone harmonias kun la spiritaj haŭtkoloro, anguloj kaj sinteno de la homo kiu portas ĝin; kaj, cetere, mi timis unuigitan Eklezion; tio estus ege potenca, la plej potenca imagebla, kaj poste, kiam ĝi iom post iom eniras egoismajn manojn, kiel ĉiam devas okazi, tio signifas morton por homa libereco kaj paralizon por homa pensado.

Ĉiuj minejoj estis reĝaj posedaĵoj, kaj ili estis multaj. Antaŭe, oni laboris tie kiel sovaĝuloj ĉiam laboras en minejoj – fosis truojn en la tero, kaj levis mineralon en sakoj de felo permane, unu tunon tage; sed mi komencis meti la minejan laboron sur scienca bazo, tiel frue kiel mi povis.

Jes, mi jam faris sufiĉe bonan progreson kiam la defio de Sir Sagramor trafis min.

Kvar jaroj pasis – kaj poste! Nu, vi neniam imagus tion en la mondo. Senlima potenco estas ideala afero, kiam ĝi estas en la ĝustaj manoj. La diktaturo de la ĉielo estas la sola tute perfekta registaro. Tera diktaturo estus tute perfekta tera registaro, se la kondiĉoj estus la samaj, nome se la diktatoro estus la plej perfekta el ĉiuj homoj, kaj lia tutviva mandato eterna. Sed ĉar finiĝonta, perfekta homo devas morti, kaj lasi sian diktaturon en la manoj de neperfekta sekvanto; tera diktaturo estas ne nur malbona ŝtatsistemo, sed la plej malbona kiu eblas.

Miaj laboroj montris kion diktatoro povus fari se li havus la rimedojn de reĝlando je sia dispono. Sen suspektoj de ĉi tiu malluma mondo, mi havis la civilizon de la deknaŭa jarcento rapide evoluanta ĝuste sub ĝia nazo! Ĝi estis barata de la okuloj de la publiko, sed jen ĝi estis, giganta kaj neatakebla fakto – kaj ankoraŭ aŭdota, se mi vivos kaj estos bonŝanca. Jen ĝi estis, fakto same vera kaj same esenca kiel iu trankvila vulkano,

staranta senkulpa kun sia senfuma pinto en la blua ĉielo, kaj neniel montranta la kreskantan inferon en sia interno. Miaj lernejoj kaj preĝejoj estis infanoj antaŭ kvar jaroj; nun ili estis plenkreskintaj; miaj laborejoj tiam estis grandaj fabrikoj nun; kie mi tiam havis dek du edukitajn homojn, mi nun havis mil; kie mi havis unu brilan eksperton tiam, mi havis kvindek nun. Mi staris kun la mano sur la ĉano, por tiel diri, preta premi ĝin kaj lumigi la noktomezan mondon iam ajn. Sed mi ne faros tion tiel subite. Tio ne estis mia plano. La popolo ne eltenus tion; kaj cetere, la establita Rom-Katolika Eklezio tuj atakus min.

Ne, mi agis singarde la tutan tempon. Mi sendis sekretajn agentojn tra la lando dum certa tempo, kun la tasko subfosi la nobelecon iom post nevideble iom, kaj iom ronĝi tiun kaj ĉi tiun superstiĉon; kaj tiel laŭgrade prepari la vojon al pli bona ordo. Mi lumigis mian kandelon same grade, kaj mi intencis daŭre fari tiel.

Mi distribuis kelkajn branĉlernejojn sekrete tra la regno, kaj ili fartis tre bone. Mi intencis kontinui tiel ĉiam pli, se nenio okazis kaj timigis min. Unu el miaj plej profundaj sekretoj estis mia West Point – mia milita akademio. Mi tenis tion plej ĵaluze ekster videblo; kaj mi faris same kun mia mararmea akademio, kiun mi fondis en malproksima havenurbo. Ambaŭ prosperis kontentige por mi.

Clarence havis nun dudek du jarojn, kaj estis mia ĉefa direktoro, mia dekstra mano. Li estis ĉarma, li povis fari ion ajn; estis nenio kion li ne kapablis. Lastatempe mi edukis lin al ĵurnalismo, ĉar la tempo ŝajnis preskaŭ preta por fondi gazeton; nenion grandan, nur etan semajnan gazeton por eksperimenta disvastigo en miaj civilizo-klinikoj. Li sentis sin hejme kiel anaso en akvo; certe estis redaktisto kaŝita en li. Jam li iel duobligis sin mem: li parolis la lingvon de la sesa jarcento, kaj skribis tiun de la deknaŭa. Lia ĵurnalisma stilo ĉiam pliboniĝis; ĝi jam atingis la nivelon de la kamparo de Alabamo, kaj ne povis esti distingita de io el tiu regiono, nek per enhavo nek per stilo.

Ni ankaŭ havis alian grandan planon. Tio estis telegrafo kaj telefono; nia unua projekto en tiu direkto. Tiuj fadenoj estis nur por privata uzo, ankoraŭ, kaj devis resti privataj ĝis venos pli matura tago. Ni havis aron de homoj survoje, laborantaj ĉefe nokte. Ili enmetis terfadenojn; ni ne kuraĝis fari fostojn, ĉar ili vekus tro da scivolo. Terfadenoj bone taŭgis, en ambaŭ okazoj, ĉar miaj fadenoj estis protektataj de izolaĵo, kiun mi mem elpensis, kaj kiu estis perfekta. Miaj viroj estis ordonitaj iri rekte tra la lando, eviti ŝoseojn, kaj interkonekti kun ĉiuj gravaj urboj, kies lumoj malkaŝis ilian ĉeeston, kaj lokigi tie ekspertojn. Neniu povis diri al vi kie trovi iun ajn lokon en la

regno, ĉar neniu iam iris intence al certa loko, sed nur trovis ĝin hazarde dum sia vagado, kaj poste ĝenerale lasis ĝin sen havi la ideon demandi kiel ĝi nomiĝas. Tiam kaj ĉi tiam, ni elsendis topografiajn ekspediciojn por mezuri kaj mapi la regnon, sed la pastroj ĉiam interrompis kaj kaŭzis problemojn. Do ni rezignis pri tio, portempe. Ne estus saĝe malamiki la Eklezion.

Se temas pri la ĝenerala kondiĉo de la lando, ĝi estis tia kia ĝi estis kiam mi venis, praktike. Mi faris ŝanĝojn, sed ili estis necese malgrandaj, kaj ne rimarkeblaj. Ĝis nun, mi eĉ ne zorgis pri impostoj, krom tiuj kiuj certigis la reĝajn enspezojn. Mi sistemigis tiujn, kaj metis ilin sur efikan kaj ĝustan bazon. Rezulte de tio, tiuj enspezoj jam kvarobliĝis, kaj tamen la ŝarĝo estis dividita multe pli egalece ol antaŭe, kaj do la tuta regno sentis sin malŝarxigita, kaj mia administrado estis laŭdata elkore kaj ĝenerale.

Persone, mi nun estis interrompata, sed mi ne zorgis pri tio, ne povis okazi je pli bona tempo. Pli frue eble iritus min, sed nun ĉio estis en bonaj manoj, kaj progresis glate. La reĝo memorigis min plurfoje, lastatempe, ke la prokrasto, pri kiu mi petis antaŭ kvar jaroj, nun pli-malpli finiĝis. Tio estis atentigo, ke mi devus komenci serĉi aventurojn kaj gajni sufiĉe da famo por esti digna renkonti en lancobatalo Sir Sagramor, kiu ankoraŭ estis ekstere gralante, sed estis serĉata de

pluraj savekspedicioj, kaj povus nun esti trovata
iun ajn jaron. Do komprenu, ke mi estis atendanta
tiun interrompon; ĝi ne surprizus min.

11. La jankio serĉas aventurojn

Neniam estis tia lando por vagantaj mensoguloj; kaj estis tiaj el ambaŭ seksoj. Apenaŭ pasis monato sen ke unu el tiuj vagabondoj venis, kaj plejofte preparita per rakonto pri iu aŭ alia princino, kiu volis havi helpon eliri el iu malproksima kastelo, kie ŝi estis malliberigita de iu senleĝa fripono, plejofte giganto. Nun oni povus kredi ke la unua afero, kiun la reĝo faris, aŭdinte tian fabeleton el la buŝo de kompleta fremdulo, estus peti konfirmojn – jes, kaj unu aŭ du indikojn kie situas la kastelo, kiel plej bone iri tien, kaj tiel plu. Sed neniu iam pensis pri io tiel simpla kaj mem-evidenta. Ne, ĉiuj glutis la mensogojn de tiuj homoj senhezite, kaj neniam demandis ion ajn pri io ajn. Nu, iun tagon kiam mi ne estis tie venis unu el tiuj homoj – ĉifoje estis ino – kaj prezentis rakonton de la kutima modelo. Ŝia mastrino estis malliberigita en granda kaj malgaja kastelo, kune kun kvardek kvar aliaj junaj kaj belaj knabinoj, kaj preskaŭ ĉiuj el ili estis princinoj; ili suferis en tiu kruela mallibereco dum dudek ses jaroj; la mastroj de la kastelo estis tri enormaj fratoj, ĉiu kun kvar brakoj kaj unu okulo – la okulo en la mezo de la frunto, kaj same granda kiel frukto. Kiun frukton ŝi ne diris; ilia fuŝa statistiko kiel kutime.

Ĉu vi kredus tion? La reĝo kaj la tuta Ronda Tablo ĝojegis pro tiu ridinda ŝanco al aventuro. Ĉiu kavaliro de la Tablo volis tuj kapti la okazon, kaj petegis ĝin; sed je ilia granda ĉagreno, la reĝo donis ĝin al mi, kiu tute ne petis ĝin.

Per granda peno, mi bridis mian ĝojon kiam Clarence donis al mi la novaĵon. Sed li – li ne povis bridi sian. El lia buŝo forte fluis ĝojo kaj dankemo – ĝojo pro mia granda bonŝanco, dankemo al la reĝo ĉar li tiel grandanime favoris min. Li povis teni nek siajn krurojn nek sian korpon senmovaj, sed piruetis en feliĉa ekstazo.

Miaflanke, mi povus malbeni la ĝentilecon, kiu donis al mi tiun donacon, sed mi silentis pri tio por esti ĝentila, kaj faris mian eblon por ŝajni gaja. Mi fakte _diris_ ke mi estas gaja. Kaj certameniere, tio estis vere! Mi estis same gaja kiel homo kiam skalpata.

Nu, oni devas uzi la tempon plejeble bone, kaj ne malŝpari ĝin al senprofita ĉagrenado, sed ekagadi kaj vidi kio povas esti farata. Ĉiu mensogo enhavas grajnon da vero. Nun mi devis atingi la grajnon; do mi vokis la knabinon, kaj ŝi venis. Ŝi estis sufiĉe bela, same mola kaj modesta, sed se signoj diras ion ajn, ŝi sciis absolute nenion. Mi diris:

"Kara, ĉu vi estis demandata pri la detaloj?"

Ŝi diris ke ne.

"Nu, mi ne kredis ke vi estis, sed mi pensis ke mi demandos, por esti certa; tiel mi estis edukita. Nun vi ne devas malĝoji se mi memorigas vin ke, ĉar ni ne konas vin, ni devas iri iom malrapide. Eble vi tute pravas, kompreneble, kaj ni esperas ke estas tiel; sed akcepti tion sen pruvoj ne estus serioze. Vi komprenas tion. Mi devas fari al vi kelkajn demandojn; nur tutsimple respondu al ili, kaj ne timu. Kie vi loĝas, kiam vi estas hejme?"

"En la lando de Modero, bona sinjoro."

"La lando de Modero, mi ne povas memori ke mi aŭdis pri ĝi antaŭe. Ĉu viaj gepatroj vivas?"

"Pri tio, mi ne scias ĉu ili ankoraŭ vivas, ĉar dum multaj jaroj mi estis enŝlosita en la kastelo."

"Via nomo, bonvolu?"

"Mi nomiĝas Demoiselle Alisande la Carteloise, se tio plaĉas al vi."

"Ĉu vi konas iun ĉi tie kiu povas identigi vin?"

"Ne verŝajne, bona sinjoro, ĉar mi nun venis ĉi tien la unuan fojon."

"Ĉu vi kunportis iujn leterojn – iujn dokumentojn – iujn pruvojn ke vi estas fidinda kaj verema?"

"Certe ne, kaj kial mi farus? Ĉu mi ne havas langon, kaj ĉu mi ne povas diri ĉion tion mem?"

"Sed se vi mem diras tion, vi scias, tio estas alia afero ol se iu alia faras tion."

"Alia afero? Kiel povus esti? Mi timas ke mi ne komprenas."

"Ne *kompre*nas? Lando de... nu, vi komprenas... vi komprenas... mil diabloj, ĉu vi ne povas kompreni etan aferon kiel tiun? Ĉu vi ne povas kompreni la diferencon inte via – kial_ vi aspektas tiel senkulpa kaj idiota?"

"Mi? Vere mi ne scias, krom se estas la volo de Dio."

"Jes, jes, mi supozas ke tio pli-malpli kovras la tuton. Ne zorgu se mi aspektas ekscitita; mi ne estas. Ni ŝanĝu la temon. Nun pri tiu kastelo kun kvardek kvin princinoj en si, kaj kun tri troloj ĉe sia pinto, diru al mi — kie estas tiu haremo?"

"Haremo?"

"La *kastelo*, komprenu; kie estas la kastelo?"

"Ho, se temas pri tio, ĝi estas granda, kaj forta, kaj bone defendata, kaj staras en malproksima lando. Jes, multajn mejlojn for."

"*Kiel* multajn?"

"Ho, bona sinjoro, estas vere malfacile diri, ili estas tiel multaj, kaj ili tiel kovras unu la alian, kaj ili ĉiuj aspektas same kaj havas la saman koloron, oni eble ne povas distingi unu mejlon de la alia, nek kalkuli ilin sen unue apartigi ilin, kaj vi povas imagi ke nur Dio povus fari tion, kaj neniuj homoj; ĉar vi notu..."

"Sufiĉas, sufiĉas, ne gravas la distanco; _en kiu direkto_ estas la kastelo? Kien oni iru de ĉi tie?"

"Ho, bona sinjoro, ĝi ne havas direkton de ĉi tie; ĉar la vojo ne iras rekte, sed ĉie serpentumas; do la direkto tien ne restas, sed estas foje sub unu ĉielo kaj foje sub alia, do se vi kredas ke ĝi estas en la oriento, kaj iras tien, vi vidos ke la direkto de la vojo denove faras duonan rondon, kaj tiu miraklo okazas denove kaj ankoraŭ denove kaj ankoraŭ, kaj vi ĉagreniĝos ke vi vane provis kontraŭstari la volon de tiu, kiu ne donas al kastelo direkton de iu loko se tio ne plaĉas al li, kaj se al li ne plaĉas, povas malaperi ĉiuj kasteloj kaj ĉiuj direktoj al ili el la tero, lasante la lokojn kie ili staris malplenaj, kiel averto al liaj kreitaĵoj ke kie li volas, tie li volas, kaj kie li ne volas, tie..."

"Ho, tio estas bone, nun sufiĉas, faru paŭzon; ne zorgu pri la direkto, *fajfu* pri la direkto – mi petas pardonon, mi petas milfoje pardonon, mi ne fartas bone hodiaŭ; ne atentu min kiam mi monologas, estas malnova kutimo, malnova, malbona kutimo, kaj malfacile forigebla kiam oni havas malbonan digestadon pro manĝo de io kultivita longe antaŭ onia naskiĝo; bona lando! oni ne povas havi normalajn funkciojn fonditajn sur printempaj kokidoj miltricentjaraj. Sed jen – ne zorgu pri tio; vidu – ĉu vi havas ĉe vi ian mapon de la areo? Nun bona mapo..."

"Ĉu tio hazarde estas tia afero, kiun lastatempe la nekredantoj prenis el la alia flanko

de la grandaj maroj, kiu, kiam boligita en oleo, kun cepo kaj salo aldonita..."

"Kio, mapo? Pri kio vi parolas? Ĉu vi ne scias kio estas mapo? Nu, nu, ne gravas, ne klarigu, mi abomenas klarigojn; ili malklarigas aferojn, kaj vi ne povas diri ion ajn pri ili. Forkuru, kara; ĝis. Montru al ŝi la vojon, Clarence."

Nu ja, nun estis sufiĉe klare, kial tiuj azenoj ne demandis tiujn mensogantojn pri detaloj. Eble ĉi tiu knabino havis iun fakton ene de si, sed mi ne kredas ke oni povus eligi ĝin per hidraŭlika borilo, eĉ ne per la fruaj eksplodiloj; necesus dinamito. Ŝi ja estis perfekta stultulino; kaj tamen la reĝo kaj liaj kavaliroj aŭskultis ŝin, kvazaŭ ŝi estus folio el la evangelio. Tio iel klarigas la tutan aferon. Kaj pensu pri la simplaj kutimoj de tiu kortego; por tiu vaganta knabino ne estis pli komplike atingi la reĝon en lia palaco, ol estus por ŝi eniri la malriĉulejon en mia tempo kaj lando. Fakte li estis ĝoja vidi ŝin, ĝoja aŭdi ŝian rakonton; preta prezenti tiun aventuron, ŝi estis same bonvena kiel kadavro ĉe funebraĵisto.

Ĝuste kiam mi pensis tion, Clarence revenis. Mi rimarkis miajn senrezultajn provojn kun la knabino; eltrovis nenion, kio povus helpi min trovi la kastelon. La junulo aspektis iom surprizita, aŭ mirigita, aŭ io, kaj li konfesis ke li iradis aparte kaj scivolis kial mi volis fari al la knabino ĉiujn tiujn demandojn.

"Sed diable," mi diris, "ĉu mi ne volas trovi la kastelon? Kaj kiel mi farus tion alimaniere?"

"Ho, tiun demandon oni povas facile respondi, mi kredas. Ŝi iros kun vi. Ili ĉiam faras tion. Ŝi rajdos kun vi."

"Rajdos kun mi? Sensencaĵo."

"Vere ŝi faros. Ŝi rajdos kun vi. Vi vidos."

"Kion? Ŝi trairi la montetojn kaj traserĉi la arbarojn kun mi – sola – kaj mi preskaŭ fianĉo? Tio ja estus skandalo. Imagu kiel aspektus!"

Ho, kia dolĉa vizaĝo aperis antaŭ mi! La knabo vere volis scii ĉion pri tiu tikla afero. Mi devigis lin ĵuri silenton, kaj poste flustris al li ŝian nomon – "Puss Flanagan". Li aspektis seniluziigita, kaj diris ke li ne memoris la grafinon. Kiel nature estis por la eta kortegano doni al ŝi rangon. Li demandis al mi kie ŝi loĝas.

"En East Har..."

Mi konsciiĝis kaj eksilentis, iom konfuzita. Poste mi diris:

"Ne zorgu pri tio nun; mi iam diros tion al vi."

Kaj ĉu li povos vidi ŝin? Ĉu mi lasos lin vidi ŝin iun tagon?

Estus malgranda promeso – ĉirkaŭ mil tricent jaroj – kaj li estis tiel fervora; do mi diris jes. Sed mi suspiris; mi ne povis ne fari tion. Kaj tamen mia suspiro signifis nenion, ĉar ŝi ne ankoraŭ naskiĝis. Sed tiel ni estas kreitaj: ni ne pensas, kiam ni sentas; ni nur sentas.

Nur pri mia ekspedicio oni parolis dum tiu tago kaj tiu nokto, kaj la knaboj estis bonaj al mi, kaj honoris min, kaj ŝajne forgesis sian koleron kaj seniluziiĝon; kaj iĝis same urĝaj kiel mi kapti tiujn trolojn kaj liberigi tiujn maturajn, maljunajn virgulinojn, kvazaŭ ili mem havis la kontrakton. Nu, ili *estis* bonaj infanoj – sed nur infanoj, jen ĉio. Kaj ili donis al mi senfinan vicon de sugestoj kiel serĉi gigantojn, kaj kiel kapti ilin; kaj ili diris al mi ĉiajn magiaĵojn kontraŭ sorĉadmonoj, kaj donis al mi ungventojn kaj aliajn stultaĵojn por meti sur miajn vundojn. Sed neniu el ili ekpensis ke se mi estus tiel granda magiisto kiel mi asertis, mi certe ne bezonus ungventojn aŭ instruojn, aŭ magiaĵojn kontraŭ sorĉadmonoj, kaj tute ne armilojn kaj armaĵojn, dum ia ajn atako – eĉ kontraŭ fajroŝprucantaj drakoj, kaj diabloj varmaj rekte el la infero, des malpli tiaj mizeraj kontraŭuloj kiujn mi serĉis, tiuj ordinaraĵoj troloj el la simpla kamparo.

Mi frue matenmanĝu, kaj ekiru en la matenkrepusko, ĉar tio estis la kutima maniero; sed mi havis demonan tempon kun mia armaĵo, kaj tio iom malfruigis min. Estas komplike rakonti pri tio, kaj estas tiom da detaloj. Unue, vi vindas kovrilon unu- aŭ dufoje ĉirkaŭ via korpo, por remburi kontraŭ la malvarma fero; poste vi surmetas viajn manikojn kaj maŝkirason – tiuj konsistas el etaj ŝtalringoj kunmetitaj, kaj kune ili

estas ŝtofo tiel fleksebla, ke se vi ĵetas vian kirason sur la plankon, ĝi similas al malseka fiŝkapta reto; ĝi estas tre peza, kaj preskaŭ la plej malkomforta materialo en la mondo por noktoĉemizo, kaj tamen multaj uzis ĝin kiel tia – impostokolektantoj, kaj reformistoj, kaj unuĉevalaj reĝoj kun mankohavaj titoloj, kaj tiaj homoj; poste vi surmetas viajn ŝuojn – platajn boatojn kun tegmentoj de interligitaj ŝtalbendoj – kaj ŝraŭbas la malgraciajn spronojn al la kalkanoj. Poste vi fiksas viajn krur- kaj femurŝirmilojn, kaj la dorsoplaton kaj la brustoplaton, kaj vi komencas senti vin premata; poste vi ligas al la brustoplato la duonjupon el larĝaj ŝtonbendoj, duone kovrantaŭ unuj la aliajn, kiuj pendas antaŭe, sed falas malantaŭe tiel ke oni povas sidiĝi, kiu fakte nek aspektis nek funkciis pli bone ol renversita karbujo, nek estis pli bona por purigi viajn manojn; poste vi surmetas vian glavon; poste vi metas viajn stovtubartikojn sur viajn brakojn, viajn ferajn gantojn sur viajn manojn, vian feran ratkaptilon sur vian kapon, kun tuko de ŝtalreto pendanta super la maltantaŭa flanko de via kolo – kaj jen vi, same komforta kiel kandelo en kandelingo. Nun ne estas tempo danci. Nu, homo tiel bone pakita estas nukso kiu ne meritas esti rompata, estas tiel malmulte manĝebla, kiam vi atingas tion, kompare al la ŝelo.

La knaboj helpis min – se ne, mi neniam enirus. Ĝuste kiam ni finiĝis, Sir Bedevere eniris, kaj mi komprenis ke, kiom ajn mi volis, mi ne elektis la plej taŭgajn vestaĵojn por longa vojaĝo. Kiel impona li aspektis, kiel alta, larĝa kaj granda! Sur la kapo li havis konusan ŝtalkaskon, kiu venis nur ĝis liaj oreloj, kaj kiel viziero li havis nur mallarĝan ŝtalstangon kiu atingis lian supran lipon, kaj protektis lian nazon; kaj lia tuta cetero, el la kolo al la kalkano, estis fleksebla maŝkiraso, pantalono kaj ĉio. Sed grandan parton de li kaŝis liaj eksteraj vestaĵoj, kiuj kompreneble estis el maŝkiraso, kiel mi diris, kaj pendis rekte el liaj ŝultroj al liaj maleoloj; kaj de la talio al la piedoj, kaj antaŭe kaj malantaŭe, ĝi estis dividita, por ke li povu rajdi kaj lasi la jupon pendi ambaŭflanke. Li iros grali, kaj estis la ĝustaj vestaĵoj por tio. Mi donus multon por tiu ulstro, sed estis tro malfrue nun por ludi. La suno ĵus aperis, la reĝo kaj la kortego ĉeestis por adiaŭi min kaj deziri al mi bonan vojaĝon; do ne estus por mi bona maniero prokrasti. Vi ne surĉevaliĝas mem; ho ne, se vi provus tion, vi estus seniluziigata. Ili elportas vin, ĝuste kiel ili portas sunfrapitan homon al apoteko, kaj metas vin tie, kaj helpas vin sidi ĝuste, kaj metas viajn piedojn en la piedingojn; kaj la tutan tempon, vi sentas vin tiel stranga kaj enŝlosita, kvazaŭ vi estus iu alia – iu kiu subite edziĝus, aŭ estus frapata de la fulmo, aŭ io tia, kaj ne ankoraŭ

tute konsciiĝus, kaj estis iel sensentigita, kaj ne povis tute orientiĝi. Poste ili starigis la maston, kiun ili nomis lanco, en la truo apud mia maldekstra piedo, kaj mi prenis ĝin kun mia mano; fine ili pendigis mian ŝildon ĉirkaŭ mia kolo; kaj mi estis tute preta ekvojaĝi. Ĉiu estis tiel bona al mi kiel li povis, kaj honorfraŭlino donis al mi per propra mano la piedingan trinkaĵon. Nun, ne estis pli por fari, krom ke la sinjorino sidiĝu malantaŭ mi sur propra selo, kion ŝi faris, kaj metis brakon ĉirkaŭ mi por resti.

Kaj tiel ni ekrajdis, kaj ĉiuj adiaŭis nin kaj ŝvingis siajn naztukojn aŭ helmojn; kaj ĉiu kiun ni renkontis, kiam ni iris malsupren kaj tra la vilaĝo, estis respektama al ni, krom kelkaj malpuraj knabetoj en la periferio. Ili diris:

"Ho, kia knabo!"

Kaj ĵetis terbulojn al ni.

Laŭ mia sperto, knaboj estas samaj en ĉiuj eraoj. Ili ne respektas ion ajn, ili ne zorgas pri io aŭ iu ajn. Ili diras "Ekstaru, kalvulo!" al la profeto, kiu iris senofende en la griza antikveco; ili atakas min en la sankta krepusko de la mezepoko; kaj mi vidis ilin agi same dum la administrado de Buchanan; mi memoras, ĉar mi estis tie kaj helpis. La profeto havis siajn ursojn kaj aranĝis la aferojn kun siaj knaboj; kaj mi volis subeniri kaj aranĝi la aferojn kun miaj, sed

tio ne funkêius, êar mi ne povus denove iri supren.
Mi abomenas landon sen gruo.

12. Malrapida torturo

Subite, ni estis en la kamparo. Estis tre bele kaj agrable en tiuj solecaj arbaroj en la frua, freŝa mateno en la unua komenco de la aŭtuno. El montetopintoj ni vidis belajn, verdajn valojn sternitajn sube, kun fluoj serpentumantaj tra ili, kaj insulaj arbaretoj tie kaj ĉi tie, kaj grandaj solaj kverkoj dissemitaj kaj ĵetantaj nigrajn ombrojn, kaj malantantaŭ la valojn, ni vidis vicojn de montetoj, en bluaj nebuloj, en ondanta perspektivo ĝis la horizonto, kaj kun grandaj interspacoj malklara makulo blanka aŭ griza sur ondopinto, kaj ni sciis ke ĝi estis kastelo. Ni iris trans larĝaj naturaj herbaroj, flamantaj de roso, kaj ni moviĝis kiel spiritoj; sur la mola torfo, niaj piedoj ne faris sonon; ni songe iris tra maldensejoj, en verde lumanta nebulo, kiu ricevis sian koloron el la suntrempita tegmento de folioj supre, kaj ĉe niaj piedoj, la plej klaraj kaj malvarmaj riveretoj saltis kaj babilis super la ŝtonoj, kaj faris ian flustrantan muzikon, komfortiga aŭskulti; kaj foje ni lasis la mondon malantaŭe kaj eniris la solenajn grandajn profundaĵojn kaj riĉan krepuskon de la arbaro, kie evitemaj, sovaĝaj bestoj ĉirkaŭkuradis kaj malaperis antaŭ ol vi eĉ rigardis la lokon de kie venis la bruo; kaj kie nur la plej fruaj birdoj aperis kaj ekkantis tie kaj ekkverelis ĉi tie kaj

mistike kaj malproksime martelis kaj tamburis por trovi vermojn sur arbotrunko ie en la nepenetrebla profundo de la arbaro. Kaj post iom da tempo, ni denove eniris la brilon.

Ĉirkaŭ la tria aŭ kvara aŭ kvina fojo, kiam ni eniris la brilon – kelkajn horojn post la sunsupreniro, pli-malpli – ne plu estis same agrable. Komencis esti varmege. Tio estis tute rimarkinda. Post tio ni devis tre longe iri sen ombro. Nun estas strange kiel etaj iritoj pli kaj pli kreskas, se ili iam komenciĝis. Pri aferoj, pri kiuj mi komence tute ne zorgis, mi nun zorgis treege – kaj ĉiam pli, la tutan tempon. La unuaj dek aŭ dek kvin fojoj kiam mi volis havi mian poŝtukon, mi ŝajnis ne zorgi; mi pluiris, kaj diris ke ne gravas, kaj forgesis pri tio. Sed nun estis malsame. Mi volis ĝin la tutan tempon, nur ĉiam gurdis tion, kaj neniun ripozon. Mi ne povis forgesi tion; kaj do mi perdis mian paciencon kaj diris ke pendu la homo kiu faris armaĵon sen iuj poŝoj. Vi komprenu, mi havis miajn naztukojn en la helmo; kaj kelkajn aliajn aferojn; sed estis tia helmo kiun vi ne povas mem forigi. Mi ne pensis pri tio kiam mi surmetis ĝin; kaj fakte mi ne sciis tion. Mi supozis ke ĝi estis aparte komforta tie. Kaj do nun, je la penso ke ĝi estas tie, tiel proksima kaj tamen neatingebla, ĝi iĝis pli malfacile eltenebla. Jes, kion vi ne povas havi, tion vi deziras, ĉefe; ĉiu notis tion. Nu, tial mi ne pensis pri io alia; ĉiuj

miaj pensoj estis en la helmo; kaj mejlon post mejlo ili restis tie, imagis la nadtukon, bildigis la nadtukon; kaj estis amare kaj malfacile ke la sala ŝvito fluetis en miajn okulojn, kaj mi ne povis sekigi ĝin. Tio ŝajnas bagatelo, surpapere, sed tute ne estis bagatelo; estos la plej reala mizero. Mi ne dirus tion se ne estus tiel. Mi decidis ke venontfoje, mi kunportos saketon; ĝi aspektu kiel ajn, kaj homoj diru ion ajn. Kompreneble, tiuj feraj knaboj de la Ronda Tablo pensos ke estas skandalo, kaj eble ili blasfemos pri ĝi; sed mi mem preferas havi komforton unue, kaj stilon due. Do ni daŭre iradis, kaj fojfoje ni venis al polva aero, kaj la polvo leviĝis en nuboj kaj eniris mian nazon kaj igis min terni kaj plori; kaj kompreneble mi diris aferojn kiun mi ne devus diri, mi ne neas tion. Mi ne estas pli bona ol aliaj.

Ŝajnis ke ni ne renkontos aliajn en ĉi tiu soleca Britio, eĉ ne trolon; kaj pensante pri mia humoro tiam, tio signifis ke la trolo estis bonŝanca; tio estas, trolo kun nadtuko. La plej multaj kavaliroj pensis nur pri kiel ekhavi lian armaĵon; sed se mi havus nur lian tukon, li povus daŭre havi sian feron, laŭ mia opinio.

Samtempe, estis pli kaj pli varme en mia fero. Vi vidu, la suno brilis kaj varmigis ĝin ĉiam pli la tutan tempon. Nu, kiam vi estas tiel malvarma, ĉiu detalo iritas vin. Kiam mi iris, mi bruliĝis kiel stako de teleroj, kaj tio ekscitis min; kaj cetere,

ŝajnis ke mi ne povis elteni tiun ŝildon kraki kaj brui, jen ĉe mia brusto, jen ĉe mia dorso; kaj se mi komencis iri, miaj artikoj grincis kaj kriis tiel lacige kiel faras ĉarumo, kaj ĉar nia irado ne kreis venton, mi riskis esti bakata en tiu forno; kaj cetere, ju pli trankvile vi iris, des pli la fero pezis sur vi, kaj des pli da tunoj vi ŝajnis mem pezi ĉiuminute. Kaj vi devas ĉiam ŝanĝi manon, kaj movi la lancon al la alia piedo, estis tiel lacige teni ĝin longe per la sama mano.

Nu, vi scias, kiam vi ŝvitas tiel, en riveroj, venas tempo kiam vi – kiam vi – nu, kiam vi jukas. Vi estas interne, viaj manoj estas ekstere; du jen vi estas; nenio krom fero inter ili. Ne estas bagatelo, kiel ajn sonas. Unue estas unu loko; poste alia; poste iom pli; kaj ĝi ĉiam pli disvastiĝas; kaj fine, la tuta teritorio estas okupita, kaj neniuj povas imagi kiel vi sentas, nek kiel malagrabla estas. Kaj kiam tio atingis sian kulminon, kaj ŝajnis al mi ke mi ne eltenos pli, muŝo venis tra la kadro kaj sidiĝis sur mia nazo; kaj la kadro estis fiksita kaj ne povis moviĝi, kaj mi ne povis levi la vizieron; kaj mi nur povis skui mian kapon, kiu nun estis bolante varma, kaj la muŝo – nu, vi scias kiel muŝo agas kiam certa pri io – li nur notis la skuon sufiĉe por iri de nazo al lipo, de lipo al orelo, ĉiam zumante, kaj ĉiam flugante kaj mordante, en maniero kiun iu tiel maltrankvila kiel mi jam tutsimple ne povis

elteni. Do mi kapitulacis, kaj mi lasis Alisande liberigi min de la helmo. Poste, ŝi malplenigis ĝin de la naztukoj kaj plenigis ĝin de akvo, kaj mi trinkis kaj poste ekstaris, kaj ŝi verŝis la ceteron en la armaĵon. Oni ne povas imagi kiel refreŝige estis. Ŝi daŭre prenis akvon kaj verŝis, ĝis mi estis tre malseka kaj tute komforta.

Estis bone havi ripozon – kaj pacon. Sed nenio estas perfekta en ĉi tiu vivo, iam ajn. Antaŭ iom da tempo mi faris pipon, kaj ankaŭ iom da sufiĉe bona tabako; ne la vera, sed tio kion uzis kelkaj indianoj: interna ŝelo de saliko sekigita. Tiuj komfortiloj estis en la helmo, kaj nun mi denove havis ilin, sed neniujn alumetojn.

Iom post iom, dum la tempo pasis, unu iritanta fakto devigis sin al mi – ke ni estis regataj de la vetero. Armita novulo ne povas surĉevaliĝi sen helpo, kaj multe da ĝi. Alisande ne sufiĉis, almenaŭ ne por mi. Ni devis atendi ĝis iu venos. Atendi silente estus sufiĉe agrable, ĉar mi estis plena de pripensendaĵoj, kaj mi volis havi tempon prilabori ilin. Mi volis provi kaj pripensi kiel homo racia, aŭ eĉ nur duone racia, iam povis lerni porti armaĵon, pripensante kiel malkomforta ĝi estas; kaj kiel ili sukcesis vivteni tian modon dum generacioj, kiam estis evidente ke tio, kion mi devis suferi hodiaŭ, ili devis suferi dum siaj tutaj vivoj. Mi volis pripensi tion; kaj mi ankaŭ volis elpensi iun manieron reformi tiun

malbonon kaj persvadi la popolon lasi la stultan modon formorti; sed pensi ne eblis en la nunaj cirkonstancoj. Oni ne povis pensi tie, kie estis Alisande.

Ŝi estis estaĵo tute cedema, kaj bonkora, sed ŝia parolfluo estis same senĉesa kiel ventumilo, kaj faris vian kapon same sentema kiel la veturiloj en la urbo. Se ŝi havus korkon, ŝi estus komforto. Sed oni ne povas korkŝtopi tiajn homojn; ili mortus. Ŝia buŝo moviĝis la tutan tagon, kaj vi kredus ke io certe okazos al ŝia maŝino, iom post iom; sed ne, neniam ĝi malfunkciis; kaj ŝi neniam devis serĉi siajn vortojn. Ŝi povis mueli, kaj pumpi, kaj turniĝi, kaj zumi la tutan semajnon, kaj neniam halti por aldoni oleon aŭ forblovi polvon. Kaj tamen, la rezulto estis nur vento. Ŝi neniam havis ideojn, ne pli ol nebulo. Ŝi estis perfekta babilantino, mi volas diri buŝo, buŝo, buŝo, parolo, parolo, parolo, gurdado, gurdado, gurdado; sed same bona, kiel ŝi povis esti. Mi ne havis ion kontraŭ ŝia muelilo tiun matenon, ĉar mi havis tiun vespejon de aliaj problemoj; sed pli ol unufoje dum la posttagmezo, mi devis diri:

"Ripozu, infano; kiel vi foruzas la hejman aeron, la regno devas ekimporti ĝin morgaŭ, kaj ĝi jam havas malmulte da mono."

13. Liberaj viroj

Jes, estas strange kiel mallongan tempon ĉiufoje homo povas esti kontenta. Antaŭ nur mallonga tempo, dum mi rajdis kaj suferis, kia ĉielo ŝajnus ĉi tiu paco, ĉi tiu ripozo, ĉi tiu dolĉa trankvileco en ĉi tiu aparta angulo ĉe ĉi tiu kantanta fluo, kie mi povus esti tute komforta la tutan tempon metante fojfoje kuleregon da akvo en mian armaĵon; tamen jam mi iĝis malkontenta; parte ĉar mi ne povis ekbruligi mian pipon – ĉar, kvankam antaŭlonge mi fondis alumetfabrikon, mi forgesis kunporti alumetojn – kaj parte ĉar ni ne havis ion por manĝi. Jen alia ekzemplo de la infana frivoleco de tiu tempo kaj popolo. Viro en armaĵo ĉiam fidis ke la bonŝanco donos al li manĝaĵojn dum li vojaĝas, kaj estus ŝokata per la penso pendigi korbon de buterpanoj sur sia lanco. Verŝajne estis eĉ ne unu kavaliro de la Ronda Tablo kiu ne pli volonte mortus ol estus trovata kun io tia sur sia flagstango. Kaj tamen, nenio estus pli prudente. Estis mia plano kaŝe kunpreni kelkajn buterpanojn en mia helmo, sed mi estis interrompata, kaj devis pardonpeti kaj meti ilin flanken, kaj hundo trovis ilin.

La nokto proksimiĝis, kaj kun ĝi ŝtormo. Rapide malheliĝis. Ni devis ekkampi, kompreneble. Mi trovis bone protektitan lokon por la fraŭlino sub roko, kaj foriris kaj trovis

alian por mi mem. Sed mi devis resti en mia armaĵo, ĉar mi ne povis mem forigi ĝin, kaj tamen ne povis permesi ke Alisande helpu min, ĉar tiom similus al senvestiĝo antaŭ aliaj viroj. Ne fakte signifus tion, ĉar mi havis vestaĵojn sube; sed oni ne tiel rapide liberiĝas de siaj denaskaj antaŭjuĝoj, kaj mi sciis ke kiam mi forigos tiun metalan jupon, mi estos ĝenata.

Kun la ŝtormo venis veterŝanĝo; kaj ju pli forta la vento blovis, kaj ju pli sovaĝe pluvis, des pli kaj pli malvarme estis. Sufiĉe frue, pluraj specoj de insektoj kaj formikoj kaj vermoj kaj aliaj komencis veni el la malseko kaj rampi en mian armaĵon por varmiĝi; kaj dum kelkaj el ili kondukis bone, premis sin al miaj vestaĵoj kaj trankviliĝis, la plej multaj tamen estis senripozaj, malkomfortaj, kaj neniam restis senmovaj, sed ĉiam ĉasis ion, sen scii kion; precipe la formikoj, kiuj iris en laciga procesio de unu pinto de mi al la alia ĉiuhore, kaj kun tiaj estaĵoj mi neniam plu volas dormi. Mi konsilus homojn en tia situacio ne ruliĝi aŭ batadi, ĉar tio interesigas ĉiaspecajn bestojn kaj igas ĉiun el ili voli veni kaj vidi kio okazas; kaj pro tio, ĉio iĝas pli malbona ol jam estis, kaj kompreneble vi kverelas eĉ pli vigle, se vi povas. Tamen, se oni ne ruliĝas kaj batadas, oni mortas; do eble estas same bone agi unumaniere kiel male; fakte ne estas elekto. Eĉ profunde frostigita, mi povis senti tiun tiklon,

kiel faras kadavro kiam traktata per elektro. Mi diris ke mi neniam pli portos armaĵo post ĉi tiu vojaĝo.

Ĉiujn tiujn komplikajn horojn, kiam mi estis frostigita kaj tamen estis en vivanta fajro, kiel vi povus diri, pro tiu svarmo de rampantoj, ke tiu sama nerespondebla demando rondiris kaj rondiris tra mia laca kapo: kiel homoj eltenas tiun mizeran armaĵon? Kiel ili povis elteni ĝin dum ĉiuj generacioj? Kiel ili povas dormi nokte, timante la turmentojn de la venonta tago?

Kiam la mateno finfine venis, mia stato estis sufiĉe malbona: mizera, duone dormanta, eluzita, pro mankanta dormo; laca pro ĉirkaŭbatado; malsata pro longa fastado; sopiranta banon, kaj liberiĝon de la bestoj; kaj kripligita de reŭmatismo. Kaj kiel fartis la nobele naskita, la titolhava aristokrato, la demoiselle Alisande la Carteloise? Ho, ŝi estis freŝa kiel sciuro; ŝi estis dorminta kiel la mortaj; kaj se temas pri bano, verŝajne nek ŝi, nek iu alia nobelo en la lando, iam banis sin, do ŝi ne sopiris tion. Laŭ modernaj mezuroj, tiuj homoj estis nur moderigitaj sovaĝuloj. Tiu nobela sinjorino ne montris apartan urĝon iri al matenmanĝo – kaj ankaŭ tio ŝajnas iom sovaĝa. Dum siaj vojaĝoj, tiuj britoj kutimiĝis al longaj fastoj, kaj ili sciis kiel elteni ilin; kaj ankaŭ kiel plenigi la stomakon antaŭ eventualaj fastoj, kiel faras hindoj kaj anakondoj.

Plej verŝajne, Alisande jam antaŭmanĝis por tritaga streĉo.

Ni ekiris antaŭ sunsupreniro, Alisande rajdante kaj mi lamante poste. Post duona horo ni renkontis grupon de ĉifonaj mizeruloj, kiuj kuniĝis por ordigi tion kio estis rigardata kiel ŝoseo. Ili estis humilaj kiel bestoj al mi, kaj kiam mi proponis matenmanĝi kun ili, ili estis tiel flatataj, tiel imponataj de tiu neordinara patrona afableco mia, ke unue ili ne povis kredi ke mi estis serioza. Mia sinjorino moke ridetis kaj iris flanken; ŝi diris, kaj ili povis aŭdi tion, ke ŝi povus same bone manĝi kun la aliaj bovinoj – rimarko kiu ĝenis tiujn kompantindajn homojn nur ĉar temis pri ili, kaj ne ĉar insultis ilin, ĉar tion ĝi tute ne faris. Tamen, ili ne estis sklavoj, ne posedaĵoj. Pro leĝa kaj lingva sarkasmo, ili estis liberaj viroj. Sep dekonoj de la libera loĝantaro de la lando apartenis ĝuste al ilia klaso kaj grado: malgrandaj "sendependaj" kamparanoj, metiistoj ktp; kio signifas ke ili estis la nacio, la vera Nacio; ili estis pli-malpli ĉio de tiu kio estis uzebla, aŭ inda ŝpari, aŭ vere respektinda, kaj forigi ilin estus forigi la Nacion kaj lasi iun forĵetaĵon, iun rubon, en la formo de reĝo kaj nobelaro, pigraj, neproduktantaj, spertaj ĉefe en la artoj de malŝparo kaj detruo, kaj tute ne uzeblaj aŭ valoraj en iu racie konstruita mondo. Kaj tamen, per genia ruzo, tiu orita malplimulto, anstataŭ

esti en la malantaŭo de la procesio, kie ĝi estis hejme, ĝi marŝis kun flugantaj flagoj en ĝia pinto; elektis sin mem esti la Nacio, kaj tiuj sennombraj konkvoj permesis tion tiel longe ke ili finfine akceptis ĝin kiel vero; kaj ne nur tio, sed kredis ke estis ĝuste kaj tiel kiel devas esti. La pastroj diris al iliaj patroj kaj al ili mem ke tiu ironia stato estis komandita de Dio; do, ne pripensante kiel malsimile al Dio estus amuziĝi per sarkasmoj, kaj precipe per tiel travideblaj kiel ĉi tiuj, ili ĉesis cerbumi pri la afero kaj iĝis respektome silentaj.

La babilado de tiuj modestaj homoj sonis sufiĉe strange en eks-usona orelo. Ili estis liberaj viroj, sed ili ne povas forlasi la bienojn de siaj sinjoro aŭ episkopo sen lia permeso; ili ne povis baki sian propran panon, sed devis mueligi sian grenon kaj bakigi sian panon en liaj muelejo kaj bakejo, kaj pagi multe por tio; ili ne povis vendi parton de siaj posedaĵoj sen pagi al li belan procentaĵon, nek aĉeti parton de posedaĵoj de iu alia sen mone memori lin pro la privilegio; ili devis rikolti lian grenon por li senpage, kaj esti pretaj veni tuj kiam ordinataj, lasante ilian propran rikolton esti detruata de la minacanta ŝtormo; kaj ili devis lasi lin planti fruktarbojn en iliaj kampoj, kaj poste silenti pri sia kolero, kiam liaj senpensaj fruktkolektantoj distretis la grajnon ĉirkaŭ la arboj; ili devis sufoki sian koleron, kiam

liaj ĉasistaroj galopis tra iliaj kampoj kaj detruis la rezulton de ilia pacienca laborado; ili ne estis permesataj mem havi kolombojn, kaj kiam la svarmoj de la kolombejo de la mastro atakis iliajn rikoltojn, ili ne devis perdi la paciencon kaj mortigi birdon, ĉar la puno estus terura; kiam la rikolto estis finfine farita, tiam venis la procesio de rabistoj por elpremi monon; unue la Eklezio forprenis sian grasan dekonon, poste la komisaro de la reĝo prenis sian dudekonon, poste la popolo de mia sinjoro prenis grandan parton de la restaĵo; post kio, la senhaŭtigita libera viro rajtis meti la ceteron en sian budon, se valoris la penon; estis impostoj, kaj impostoj, kaj impostoj, kaj pli da impostoj, kaj impostoj denove, kaj aliaj impostoj – por ĉi tiu libera kaj sendependa malriĉulo, sed neniuj por lia sinjoro la barono aŭ episkopo, neniuj por la malŝparema nobelaro aŭ la ĉionvoranta Eklezio; se la barono volis dormi neĝenate, la libera viro devis sidi sendorme la tutan nokton post la laboro de la tago kaj vipi la basenon por teni la ranojn trankvilaj; se la filino de la libera viro – sed ne, tiu lasta fiago de monarĥia regado estas nepresigebla; kaj fine, se la libera viro, senesperigita pro siaj turmentoj, trovis sian vivon neeltenebla sub tiaj kondiĉoj, rezignis ĝin kaj fuĝis al la morto por kompato kaj rifuĝo, la ĝentila Eklezio kondamnis lin al eterna fajro, la ĝentila leĝo entombigis lin je noktomezo

ĉe vojkrucio kun paliso tra la dorso, kaj lia mastro la barono aŭ la episkopo konfiskis liajn tutajn posedaĵojn kaj elĵetis liajn vidvinojn kaj senpatrajn infanojn.

Kaj ĉi tie tiuj liberaj viroj kunvenis frumatene por labori pri la ŝoseo de ilia mastro la episkopo, po tri tagojn – senpage; ĉiu estro de familio, kaj ĉiu filo de familio, po tri tagojn, senpage, kaj pli-malpli unu plian tagon por iliaj servistoj. Ja estis kiel legi pri Francio kaj la francoj, antaŭ la ĉiam memorinda kaj benita Revolucio, kiu forigis mil jarojn da tiaj friponaĵoj per nur unu rapida tajdo-ondo de sango – unu: pago de tiu malnovega ŝuldo, duona guto de sango por ĉiu barelo premita per malrapida torturo el tiuj homoj dum dek streĉitaj jarcentoj de malĝusto kaj honto kaj mizero, simila nur al la infero mem. Estis du "teruraj reĝimoj", se ni nur volas memori kaj rigardi ilin; unu murdis pasie, la alia malvarmakore; unu daŭris nur monatojn, antaŭ tio la alia daŭris dum mil jaroj; unu mortigis dek mil homojn, la alia cent milionojn; sed nin timigas nur la "teroroj" de la malgranda, la momenta, por tiel diri; sed kio estas rapida morto per hakilo, kompare al tutviva morto per malsato, malvarmo, insulto, krueleco kaj kordoloro? Kio estas rapida morto per fulmo, kompare al morto per malrapida fajro ĉe la paliso? Urba tombejo povas enhavi la ĉerkojn plenigitajn de tiu

mallonga teruro, pro kiu ni ĉiuj lernis indigniĝi kaj funebri; sed la tuta Francio apenaŭ povus enhavi la ĉerkojn plenigitajn per tiu praa kaj vera teruro – tiu neesprimeble amara kaj timiga teruro, kiun neniu el ni lernis vidi en sia tutaĵo, kiu ne vekas ĉe ni la kompaton meritatan.

Tiuj malriĉaj, ŝajne liberaj viroj, kiuj nun matenmanĝis kaj parolis kun mi, estis tiel plenaj de respekto por ilia reĝo kaj Eklezio kaj nobelaro kiel ilia plej aĉa malamiko povus deziri. Estis io kompatinde ridinda pri tio. Mi demandis al ili ĉu ili kredis ke iam ekzistis nacio kie ĉiuj povis voĉdoni, kaj kiu tiam elektis ke unusola familio kaj ĝiaj idoj regos ĝin ĉiam, ĉu spertaj ĉu stultaj, nur ili kaj neniuj aliaj familioj – ankaŭ ne tiu de la voĉdonanto; kaj ankaŭ elektis ke certaj cent familioj estu levataj al al vertige altaj rangoj, kaj al kiuj oni donos ofende heredatajn honorojn kaj privilegiojn, ankaŭ malsame al la ceteraj familioj de la nacio – *inkluzive lian propran*.

Ili ĉiuj aspektis konfuzaj, kaj diris ke ili ne sciis; ke ili neniam pensis pri tio antaŭe, kaj ke ili neniam havis la ideon ke iu nacio povus esti tia ke ĉiu homo *povus* partopreni la regadon. Mi diris ke mi vidis unu tian – kaj ke ĝi daŭros ĝis ĝi havos Establitan Eklezion. Denove, ili estis tute konfuzaj – komence. Sed fine, unu viro levis sian rigardon kaj petis min diri tion denove; kaj paroli malrapide, por ke li povu iom post iom kompreni.

Mi faris tiel; kaj post iom da tempo li kaptis la ideon, kaj li batis per sia pugno kaj diris ke *li* ne kredis ke nacio, kie ĉiu homo povus voĉdoni, libervole genuiĝis tiel en la koto; kaj ke ŝteli de nacio ĝian volon kaj preferon certe estas krimo, kaj la ĉefa el ĉiuj krimoj. Mi diris al mi mem:

"Ĉi tiu estas viro. Se mi havus sufiĉe da tiaj malantaŭ mi, mi ekluktus por la bona vivo de ĉi tiu lando, kaj provus montri min mem ĝia plej lojala civitano, farante sanan ŝanĝon en ĝia regsisistemo."

Vi vidu: lojaleco por mi estis lojaleco al onia lando, ne al ĝiaj institucioj aŭ profesiuloj. La lando estas la vera afero, la esenca afero, la eterna afero; estas la afero protektinda, kaj prizorginda, kaj meritanta lojalecon; institucioj estas eksteraj, ili estas nur ĝiaj vestaĵoj, kaj vestaĵoj povas esti eluzitaj, esti ĉifonitaj, ĉesi esti komfortaj, ĉesi protekti la korpon kontraŭ vintro, malsano kaj morto. Esti lojala al ĉifonoj, krei por ĉifonoj, adori ĉifonojn, morti por ĉifonoj – tio estas lojaleco al malracio, estas pure besta; apartenas al monarĥio, estis elpensita de monarĥio; lasu la monarĥion havi ĝin. Mi venis el Konektikuto, kies konstitucio proklamas "ke ĉiu politika potenco apartenas al la popolo, kaj ĉiuj liberaj registaroj estas fonditaj sur ilia aŭtoritato kaj instituciigita por ĝia bono; kaj ĝi havas *ĉiam* neneeban kaj neforigeblan rajton

ŝanĝi la registaran sistemon en maniero, kiun ĝi trovas taŭga".

Laŭ tiu evangelio, la civitano kiu kredas sin vidi ke la politikaj vestaĵoj de la socio estas foruzitaj, kaj tamen restas silenta kaj ne agitas por nova kompleto, tiu estas mallojala; li estas perfidanto. Eĉ se nur li kredas sin vidi tiun disfalon, tio ne senkulpigas lin; estas lia devo tamen agiti, kaj estas la devo de la aliaj malelekti lin se ili ne vidas la aferon same kiel li.

Kaj nun mi estis ĉi tie, en lando kie la rajto diri kiel la lando estu regata estis limigita al ses personoj el ĉiuj mil de sia loĝantaro. Se la naŭcent naŭdek kvar esprimus nekontentecon pri la regsistemo, kaj proponus ŝanĝi ĝin, tiam la ses homoj tremus kiel unu, estus tiel mallojale, tiel malhonorige, tial putra, nigra perfido. Mi iĝis, por tiel diri, akciulo en kompanio kie naŭcent naŭdek kvar el la membroj kontribuis per la tuta mono kaj faris la tutan laboron, kaj la aliaj ses elektis sin mem permanenta estraro kaj prenis la tutan profiton. Ŝajnis al mi, ke kio la naŭcent naŭdek kvar trompitoj bezonis, tio estis nova kontrakto. Kio plej plaĉus al la cirka flanko de mia naturo, tio estus rezigni la estrecon kaj instigi al ribelo kiu estos revolucio; sed mi sciis ke la Jack Cade aŭ Wat Tyler, kiu provus ion tian sen unue eduki sian materialon ĝis revolucia grado, tiu preskakŭ certe fiaskus. Mi neniam kutimiĝis

al fiaskoj, eĉ se mi diras tion mem. Do, la "kontrakto", kiu de iom da tempo formiĝis en mia menso, estis io tute alia ol la speco de Cade kaj Tyler.

Do mi ne parolis pri sango kaj ribelo al tiu viro kiu sidis tie kaj maĉis nigran panon kun tiu aro de perfortataj kaj miskondukataj homaj ŝafoj, sed prenis lin flanken kaj parolis kun li alimaniere. Kiam mi finparolis, mi igis lin pruntedoni al mi iom da inko el siaj vejnoj; kaj per ĝi kaj lignero, mi skribis sur peco de ŝelo:

Metu lin en la hom-fabrikon

kaj donis al li, kaj diris:

"Prenu ĉi tion al la palaco de Kameloto, kaj donu ĝin al Amyas le Poulet, kiun mi nomas Clarence, kaj li komprenos."

"Li do estas pastro," la ulo diris, kaj io el la entuziasmo forlasis lian vizaĝon.

"Kiel – pastro? Ĉu mi ne diris al vi ke neniuj posedaĵoj de la Eklezio, neniuj sklavo de papo aŭ episkopo povas eniri mian hom-fabrikon? Ĉu mi ne diris al vi ke vi ne povus eniri ĝin, se via religio, kiu ajn ĝi estas, ne estus via propra libera posedaĵo?"

"Jes, tiel estas, kaj pro tio mi ĝojis; tial mi ne ŝatis, kaj sentis en mi fridan dubon, kiam mi aŭdis ke tiu pastro estas tie."

"Sed li ne estas pastro, mi ja diras."

La ulo tute ne aspektis konvinkita. Li diris:

"Li ne estas pastro, kaj tamen povas legi?"

"Li ne estas pastro, kaj tamen povas legi – jes, kaj ankaŭ skribi, fakte. Mi mem instruis lin."

Lia vizaĝo klariĝis.

"Kaj estas la unua afero kiun vi mem lernos en tiu fabriko..."

"Mi? Mi donus sangon el mia koro por koni tiun arton. Mi ja estos via sklavo, via..."

"Ne, vi ne estos, vi ne estos ies ajn sklavo. Prenu vian familion kaj iru. Via sinjoro la episkopo konfiskos viajn etajn posedaĵojn, sed tio ne gravas. Clarence ordigos ĉion por vi."

14. "Defendu vin, sinjoro!"

Mi pagis tri pencojn por mia matenmanĝo, kaj ekstrema prezo tio estis, ĉar oni povus doni matenmanĝon al dek du homoj por tiu sumo; sed nun mi sentis min bone, kaj mi ĉiam estis iom malŝparema, ĉiuokaze; kaj cetere, tiuj homoj volis doni tiun manĝon senpage, kvankam tre malriĉaj, do estis granda plezuro montri mian grandan dankemon per granda financa elspezo, kie la mono donos multe pli da bono ol ĝi farus en mia helmo, kie tiuj pencoj, faritaj el fero kaj ne malpezaj, je la valoro de duona dolare estis al mi granda ŝarĝo. Mi elspezis monon iom tro libere tiutempe, tio estas vere; sed unu kialo al tio estis ke mi ne tute bone konis la proporciojn, eĉ nun, post tiel longa vivado en Britio – ne povis vere kompreni ke unu penco en la lando de Arturo, aŭ kelkaj dolaroj en Konektikuto, pli-malpli estis la sama afero; nur ĝemeloj, oni povas diri, kiam temas pri aĉetpovo. Se mia foriro el Kameloto povus esti prokrastata nur kelkajn tagojn, mi povus pagi al tiuj homoj per belaj novaj moneroj el nia propra monfarejo, kaj tio plaĉus al mi; kaj ankaŭ al ili, ne malpli. Mi adoptis nur la usonajn valorojn. Nun post unu aŭ du semajnoj, moneroj de kvin, dek, dudek kvin kaj kvindek pencoj, kaj ankaŭ iomete da oro, fluos malrapide sed

konstante tra la komercaj vejnoj de la regno, kaj mi atendis ke tiu nova sango freŝigos ĝian vivon.

La kamparanoj devis kontribui ion, por iel balanci mian donemon, ĉu mi ŝatus tion ĉu ne; mi lasis ilin doni al mi silikon kaj ŝtalon; kaj tuj, kiam ili metis Alisanden kaj min sur la ĉevalo, mi ekbruligis mian pipon. Kiam la unua fumo eliris la kradon de mia helmo, ĉiuj tiuj homoj kuris al la arbaro, kaj Alisande falis malantaŭen al la tero kun surda bruo. Ili kredis ke mi estis unu el tiuj fajrovomantaj drakoj, pri kiuj ili aŭdis tiel multe el kavaliroj kaj aliaj profesiaj mensogantoj. Estis tre malfacile al mi persvadi tiujn homojn reveni tiel proksimen ke ili povis aŭdi miajn klarigojn. Poste mi diris al ili, ke ĉi tio estis magiaĵo danĝera nur al miaj malamikoj. Kaj mi promesis, kun mia mano sur la koro, ke se ĉiuj, kiuj ne sentis sin malamikaj al mi, proksimiĝos kaj pasos min, ili vidos ke nur tiuj kiuj restis for estos mortigataj. La procesio moviĝis sufiĉe rapide. Oni ne povis raporti mortojn, ĉar neniu estis sufiĉe scivola por resti malproksime kaj vidi kio okazos.

Nun mi perdis iom da tempo, ĉar tiuj grandaj infanoj, ne plu timantaj, tiom entuziasmiĝis pri mia tiel impona artfajrado ke mi devis resti kaj fumi kelkajn pliajn pipojn antaŭ ol ili lasis min foriri. Tamen tiu prokrasto ne estis tute senfrukta, ĉar necesis multe da tempo por ke Alisande tute

kutimiĝu al la nova afero; ŝi ja estis tiel proksima al ĝi. Ĝi ankaŭ blokis ŝian parolilon, dum longa tempo, kaj tio estis gajno. Sed super ĉiuj aliaj benoj aldonitaj mi lernis ion. Nun mi estis preta renkonti iun ajn giganton aŭ trolon.

Ni atendis kune kun sankta ermito tiun nokton, kaj mia okazo venis ĉirkaŭ meze de la venonta posttagmezo. Ni iris transverse tra granda herbejo, kaj mi cerbumis silente, aŭdante nenion, vidante nenion, kiam subite Alisande subite interrompis rimarkon, kiun ŝi komencis tiun matenon, per la krio:

"Defendu vin, sinjoro – vivdanĝero antaŭe!"

Kaj ŝi glitis suben de la ĉevalo kaj kuris iom kaj staris. Mi levis la rigardon kaj vidis, malproksime en la ombro de arbo, ses armitajn kavalirojn kaj iliajn armilportistojn; kaj tuj estis bruoj inter ili, kaj streĉo de selrimenoj. Mia pipo estis preta kaj estus ekbruligota, se mi ne estus plene okupata de pensado pri kiel forigi subpremadon el ĉi tiu lando kaj redoni al ĝia loĝantaro ĝiajn ŝtelitajn rajtojn kaj virecon sen ofendi iun. Mi tuj ekbruligis, kaj kiam mi havis bonan fajron, jen ili venis. Kaj ĉiuj kune; nenio de tiuj kavaliirecaj grandanimaĵoj, pri kiuj oni tiel multe legas – po unu reĝa friponeto, kaj la aliaj atendantaj ke ĉio okazas ĝuste. Ne, ili venis kune, kurantaj kune, venis kiel salvo el baterio; venis kun la kapoj suben, kun plumtufoj flirtantaj

malantaŭen, kun lancoj horizontalaj. Estis bela vidaĵo, ja tre bela – por iu kiu sidis en arbo. Mi lasis mian lancon ripozi kaj atendis, dum mia koro batis, ĝis la fera ondo estis preta atingi min. Poste mi blovis blankan fumon tra la krado de mia helmo. Vi devus vidi la ondon dispeciĝi! Ĉi tio estis pli bela vidaĵo ol la antaŭa.

Sed ĉi tiuj homoj haltis, du- aŭ tricent jardojn for, kaj tio maltrankviligis min. Mia kontenteco kolapsis, kaj timo venis; mi juĝis ke mi estis perdita. sed Alisande estis radiant, kaj ŝi parolos bone; sed mi haltigis ŝin, kaj diris ke mia magiaĵo malsukcesis, tiel aŭ ĉi tiel, kaj ŝi devas rapide surĉevaliĝi, kaj ni rajdu por savi niajn vivojn. Ne, ŝi ne faros tion. Ŝi diris ke mia magiaĵo senpotencigis tiujn kavalirojn; ili ne daŭre rajdis, ĉar ili ne povis; ili baldaŭ falos el siaj seloj; kaj ni havos iliajn ĉevalojn kaj armaĵojn. Mi ne povis perfidi tiel simplan fidon, do mi diris ke estis eraro; ke kiam mia fajro mortigis entute, ĝi mortigis tuj; ne, la homoj ne mortos, io misfunkciis, io ĉe mia maŝinaro, mi ne povis diri kio; sed ni devis rapide foriri, ĉar post minuto, ili denove atakos nin. Alisande ridis, kaj diris:

"Ho sinjoro, ili ne estas tiaj! Sir Lanceloto batalos kontraŭ drakoj, kaj atendos, kaj atakos ilin denove, kaj denove, kaj ankoraŭ denove, ĝis li venkos kaj detruos ilin; kaj same faros Sir Pellinore, kaj Sir Aglovale, kaj Sir Carados, kaj

eble aliaj, sed krom ili, neniu kuraĝos tion, la pigruloj diru kion la pigruloj volas. Kaj se temas pri tiuj uloj tie, ĉu vi kredas ke ili ne havis sufiĉe, sed volas havi pli?"

"Do kion ili atendas? Kial ili ne foriras? Neniu malhelpas ilin. Mi mem estas preta pardoni ĉion, certe."

"Foriras, vi diras? Ho, estu trankvila pri tio. Ili ne sonĝas pri tio, ho ne, ne ili. Ili atendas por kapitulaci."

"Vere? Se ili volas, kial ili tion ne faras?"

"Ili tre ŝatus. Sed se vi scius kiel estimataj estas la drakoj ĉi tie, vi ne kritikus ilin. Ili ne kuraĝas veni."

"Do mi povus iri al ili, kaj..."

"Ili do atendus ĝis vi venos. Mi iros."

Kaj tion ŝi faris. Ŝi estis bona homo kunhavi dum rabekskurso. Mi mem tre hezitus fari ĉi tion. Baldaŭ mi vidis la kavalirojn forrajdi, kaj Alisanden reveni. Tio malpezigis min. Mi juĝis ke ŝi ne sukcesis tuj venki – mi volas diri, en ilia interparolo; aliokaze, tiu ne estus tiel mallonga. Sed montriĝis ke ŝi sukcesis tute bone; fakte mirinde. Ŝi diris ke kiam ŝi informis ilin ke mi estas la Estro, ili tuj komprenis kie ili loĝis; "batis ilin kaj timigis ilin," estis ŝiaj vortoj; kaj tiam ili estis pretaj akcepti ĉion, kion ŝi postulos. Do ŝi lasis ilin ĵuri ke ili aperos en la kortegp de reĝo Arturo post ne pli ol du tagoj kaj kapitulaci, kun

ĉevalo kaj armaĵo, kaj esti miaj kavaliroj ekde tiam, kaj obei miajn ordonojn. Kiel pli bone ŝi faris tion, ol mi mem povus! Ŝi estis elstara.

15. La rakonto de Alisande

"Do nun mi posedas kelkajn kavalirojn," mi diris kiam ni forrajdis. "Kiu iam kredis ke mi vivos sufiĉe longe por listigi tiajn posedaĵojn? Mi ne scios kion fari kun ili, se mi ne vendos ilin. Kiom da ili estas, Alisande?"

"Sep, ho bona sinjoro, kaj iliaj armilportistoj."

"Tio estas bona kolekto. Kiuj ili estas? Kie ili loĝas?"

"Tion mi ne scias. Mi diros tion poste."

"Ne forgesu la vakerojn, Alisande."

"La vakerojn?"

"Jes, la kavalirojn, sciu; vi diris ke vi rakontos al mi pri ili."

"Mi faros, kaj mi tuj komencu. Do la du foriris kaj rajdis en grandan arbaron. Kaj..."

"Diable!"

Vi komprenu, mi tuj ekkonis mian eraron. Mi startigis ŝian maŝinon; estis mia propra kulpo; ŝi bezonas tridek tagojn por veni al la faktoj. Kaj ŝi plejofte komenciĝis sen antaŭparolo, kaj finiĝis sen rezulto. Se oni interrompus ŝin, ŝi aŭ nur kontinuus sen rimarki tion, aŭ respondis per kelkaj vortoj, kaj poste elparolis tion denove. Do, interrompoj nur malhelpis; kaj tamen, mi devis interrompi, kaj interrompi sufiĉe ofte, por savi mian vivon; oni mortus se oni lasus ŝian monotonecon guti sur oni la tutan tagon.

"Diable!" mi diris en mia premateco.

Ŝi tuj eksilentins kaj rekomenciĝis:

"Do la du foriris kaj rajdis en grandan arbaron. Kaj..."

"Kiuj du?"

"Sir Gawaine kaj Sir Uwayne. Kaj poste ili venis al monaĥejo, kaj tie ili estis bone loĝigataj. Kaj matene ili aŭdis iliajn mesojn en la preĝejo, kaj poste ili forrajdis ĝis ili venis al granda arbaro; tiam Sir Gawaine rimarkis, en valo ĉe turo, dek du belajn virinojn, kaj du kavaliroj armitaj sur grandaj ĉevaloj, kaj la virinoj iris tien kaj reen apud arbo. Kaj poste, Sir Gawaine rimarkis ke pendis blanka ŝildo sur tiu arbo, kaj ĉiam, kiam la virinoj venis al ĝi, ili kraĉis al ĝi, kaj kelkaj ĵetis ŝlimteron sur la ŝildon..."

"Nu, se mi ne mem, Alisande, vidis tiajn aferojn en ĉi tiu lando, mi ne kredus tion. Sed mi vidis tion, kaj nun mi povas fakte vidi tiujn estaĵojn, marŝante antaŭ tiu ŝildo kaj agante tiel. Ĉiuj virinoj ĉi tie certe agadas kiel obsedataj. Jes, kaj mi volas diri la plej bonaj, la plej alta elito. La plej modesta telefonistino laŭ dekmil mejloj de drato povus instrui ĝentilecon, paciencon, modestecon, manierojn, al la plej alta dukino en la lando de Arturo."

"Telefonistino?"

"Jes, sed ne petu min klarigi; estas nova speco de knabino, oni ne havas ilin ĉi tie; oni ofte

parolas akre al ili kiam ili tute ne kulpas, kaj oni ne povas plu bedaŭri tion kaj honti pro tio en mil tricent jaroj, estas tiel malpura konduto kaj tiel neprovokata; fakto estas ke neniu ĝentilhomo iam faras tion – kvankam mi – nu, mi mem, se mi devas konfesi..."

"Eble ŝi..."

"Ne zorgu pri ŝi; ne zorgu pri ŝi; mi diris al vi ke mi neniam povos klarigi ŝin tiel ke vi povos kompreni."

"Estu tiel, ĉar vi tiel volas. Tiam Sir Gawaine kaj Sir Uwaine iris kaj salutis ilin, kaj demandis ilin kial ili tiel insultis la ŝildon. Sinjoroj, la virinoj diris, ni diros tion al vi. En ĉi tiu lando estas kavaliro kiu posedas ĉi tiun ŝildon, kaj li sufiĉe bone povas uzi siajn manojn, sed li malamas kaj abomenas ĉiujn virinojn, kaj tial ni faras ĉi tiujn insultojn al la ŝildo. Mi diros al vi, diris Sir Gawaine, ne decas ke bona kavaliro malamas kaj abomenas ĉiujn virinojn, kaj eble, kvankam li malamas vin, li havas iun kaŭzon, kaj eble li amas virinojn aliloke, kaj estas mem amata, kaj estas tiel vigla homo kiel vi diras..."

"Vigla homo – jes, jes, tio estas viro kiu plaĉas al ili, Alisande. Pensanta homo – pri tia afero ili neniam pensas. Tom Sayers – John Heenan – John L. Sullivan – ho, se vi povus esti ĉi tie. Vi havus viajn krurojn sub la Ronda Tablo, kaj "Sir" antaŭ viaj nomoj, ene de dudek kvar

horoj; kaj vi povus aranĝi novan distribuon de la edzinigitaj princinoj kaj dukinoj en la Korto ene de dudek kvar pliaj. Fakte estis nur ia polurita kortego de sovaĝuloj, kaj ne estas inter ili eĉ unu virino ne preta je la unua signo iri al la viro kun la plej multaj skalpoj."

"Kaj esti tiel vigla homo kiel vi diras, diris Sir Gawaine. Nu, kiel li nomiĝas? Sir, ili diris, lia nomo estas Marhaus, filo de la reĝo de Irlando."

"Nun rigardu kaj tenu vin firme, ni devas salti super ĉi tiu ravino... Nun ĉio estas bona. Ĉi tiu ĉevalo apartenas al cirko; li naskiĝis antaŭ sia tempo."

"Mi konas lin bone, diris Sir Uwayne, li estas same bona kavaliro kiel iu nun vivanta. Ĉar mi vidis lin en turniro kie multaj kavaliroj kolektiĝis, kaj tiam neniu el ili povis kontraŭstari lin. Kaj, diris Sir Gawaine, sinjorinoj, mi pensas ke vi kulpas, ĉar oni povas supozi ke tiu kiu pendigis la ŝildon ne estas malproksima, kaj tiam eble tiuj kavaliroj atakos lin surĉevale, kaj al tio plej kulpas vi; ĉar mi ne plu restos por vidi ŝildon de kavaliro malhonorigata. Kaj tiam Sir Uwayne kaj Sir Gawaine foriris iom el ili, kaj poste ili vidis ke Sir Marhaus venis rajdante sur granda ĉevalo rekte al ili. Kaj kiam la dek du virinoj vidis Sir Marhaus, ili fuĝis en la turon kie ili estus frenezaj, kaj kelkaj el ili falis laŭvoje. Tiam unu el la kavaliroj de la turo pretigis sian ŝildon, kaj diris

laŭte: Sir Marhaus, defendu vin! Kaj ili rajdis unu al la alian tiel ke la kavaliro rompis sian lancon al Marhaus, kaj Sir Marhaus batis lin ke li rompis lian kolon kaj la dorson de la ĉevalo..."

"Nu, tio estas la problemo pri ĉi tiu sistemo, ĝi detruas tiel multajn ĉevalojn."

"Tion vidis la alia kavaliro de la turo, kaj li pretigis sin kontraŭ Marhaus, kaj ili renkontiĝis tiel fervore, ke la kavaliro de la turo estis baldaŭ batata, ĉevalo kaj viro, ambaŭ mortaj..."

"*Plia* ĉevalo for! Mi diras ke ĉi tio estas kutimo finigenda. Mi ne povas kompreni kiel homoj kun iuj sentoj povas aplaŭdi kaj apogiti tion."

"Do tiuj du kavaliroj renkontiĝis kun granda bruo..."

Mi notis ke mi jam dormis kaj malkaptis unu ĉapitron, sed mi nenion diris. Mi juĝis ke la irlanda kavaliro nun havis problemojn kun la vizitantoj, kaj tiel montriĝis.

"... kaj Sir Uwayne batis Sir Marhaus tiel ke lia lanco dispeciĝis kontraŭ lia ŝildo, kaj Sir Marhaus batis lin tiel forte ke ĉevalo kaj viro falis al la tero, Sir Uwayne sur la maldekstra flanko..."

"Por diri la veron, Alisande, via lingvaĵo estas iom tro simpla; la vortaro estas tro limigita, kaj tial la priskriboj ne estas sufiĉe variaj, ili similas al plataj dezertoj de faktoj, kaj ne sufiĉe da

pitoreskaj detaloj; tial ili estas sufiĉe monotonaj; fakte, ĉiuj bataloj estas similaj; kelkaj homoj renkontiĝas kun granda bruoj, kaj lanco rompiĝas, kaj unu rompas sian ŝildon kaj la alia falas, ĉevalo kaj viro, super la ĉevalovosto kaj rompas sian kolon, kaj tiam la proksima kandidato venas bruante, kaj rompas *sian* lancon, kaj la alia viro rompas sian ŝildon, kaj falas, ĉevalo kaj viro, super la ĉevalovosto kaj rompas *_sian_* kolon, kaj poste estas alia elektata, kaj alia kaj alia kaj ankoraŭ alia, ĝis ili ĉiuj finiĝas; kaj kiam fine vi volas kalkuli la rezulton, tiam vi ne povas distingi unu batalon de la alia, kaj ne vidi kiu batis; kaj kiel *bildo*, de viva kaj furioza batalo, ha! ĝi estas pala kaj sensona – nur fantomoj batalantaj en nebulo. Ho kara, kion tiu magra vortaro farus el la plej impona spektaklo? La brulo de Romo en la tempo de Nerono, ekzemple. Gi dirus nur: 'Urbo bruligita. Neniu asekuro. Knabo rompis fenestron. Fajrobrigadano rompis sian kolon.' Ja *tio* ne estas *bildo*."

Tio estis bona prelego, mi pensis, sed ĝi ne movis Alisanden, eĉ ne unusolan plumon; ŝia maŝino denove ekmoviĝis, tuj kiam mi forigis la kovrilon.

"Tiam Sir Marhaus turnis sian ĉevalon kaj rajdis al Sir Gawaine kun sia lanco. Kaj kiam li vidis tion, li pretigis sian ŝildon, kaj ili mallevis siajn lancojn, kaj ili renkontiĝis kun la tuta forto

de siaj ĉevaloj, kaj ili ambaŭ batis unu la alian tiel forte en la mezo de la ŝildoj, sed la lanco de Sir Gawaine rompiĝis..."

"Mi sciis ke tio okazos."

"... sed la lanco de Sir Marhaus ne; kaj tiam Sir Gawaine kaj lia ĉevalo falis kapaltere..."

"Ĝuste tiel – kaj rompis sian dorson."

"... kaj leĝere Sir Gawaine ekstaris kaj tiris sian glavon, kaj atakis Sir Marhaus piede, kaj ili fervore renkontiĝis, kaj batis per siaj glavoj, kaj iliaj ŝildoj dispeciĝis, kaj ili ekhavis kavetojn en siaj helmoj kaj maŝkiraso, kaj ili vundis unu la alian. Sed Sir Gawaine, ekde la naŭa horo matene, dum tri horoj iĝis pli kaj pli forta, kaj triobligata estis lia forto. Ĉion tion vidis Sir Marhaus, kaj tre miris kiel lia forto kreskis, kaj ili forte vundis unu la alian; kaj kiam venis la tagmezo..."

La ĉiama kantado portis min al scenoj kaj sonoj de mia infanaĝo:

"New Haven! Dek minutoj por refreŝigaĵoj. La konduktoro frapos la gongon du minutojn antaŭ foriro – vojaĝantoj per Shore Line, bonvolu sidiĝi en la malantaŭa vagono, ĉi tiu vagono ne kontinuos... buterpanoj... krevmaizo..."

"... kaj kreskis trans tagmezo kaj ĝis vespero. La forto de Sir Gawaine malkreskis, kaj li preskaŭ svenis, eble li ne eltenos multe pli, kaj Sir Marhaus iĝas ĉiam pli granda..."

"Kio kompreneble streĉis lian armaĵon; sed neniu el tiuj hometoj zorgus multe pri tia bagatelo."

"Kaj do, Sir Kavaliro," diris Sir Marhaus, "mi bone sentis ke vi estas akceptebla kavaliro, kaj tiel bona fortulo kiel mi iam renkontis, dum tio ankoraŭ daŭris, kaj niaj kvereloj ne estas grandaj, kaj tial mi bedaŭras ke mi devis lezi vin, ĉar mi sentas ke vi malfortiĝas. Ha, diris Sir Gawaine, bona kavaliro, vi diras la vorton kiun mi devus diri. Kaj tiam ili forigis siajn helmojn kaj kisis unu la alian, kaj tie ili ĵuris aŭ ami unu la alian kiel fratoj..."

Sed tiel mi perdis la fadenon, kaj ekdormetis, pensante kiel malfeliĉe estis ke homoj kun tiel bonaj fortoj – fortoj kiuj ebligis al ili stari en tiel peza fero, kaj ege ŝviti, kaj bati unu al la alian dum ses horoj seninterrompe – ke ili ne naskiĝis en tempo, kiam ili povus trovi pli bonan uzon de tiuj fortoj. Prenu azenon, ekzemple: azeno havas tian forton, kaj uzas ĝin por uzebla celo, kaj estas valora en ĉi tiu mondo ĉar li *estas* azeno; sed nobelo ne estas valora ĉar li *estas* azeno. Tio estas mikso ĉiam senefika, kaj oni devus neniam pruvi ĝin. Kaj tamen, se vi iam komencis eraron, ĝi jam estas farita, kaj vi neniam scias kio estos la rezulto.

Kiam mi denove konsciiĝis kaj komencis aŭskulti, mi notis ke mi perdis plian ĉapitron, kaj ke Alisande vagis longan vojon kun sia popolo.

"Kaj do ili rajdis kaj venis en profundan valon, super kiu estis la komenco de fluo, bela fontano, kaj tri fraŭlinoj sidis apude. En ĉi tiun landon, diris Sir Marhaus, neniam venis kavaliro post ĝia kristaniĝo, sed li trovis strangajn aventurojn..."

"Ĉi tio ne estas bona formo, Alisande. Sir Marhaus, filo de la reĝo de Irlando, parolas same kiel ĉiuj aliaj; vi devus doni al li dialekton, aŭ almenaŭ karakterizan blasfemon, tiel oni rekonas lin tuj kiam li parolas, eĉ se oni ne mencias lian nomon. Tiel kutime faras grandaj verkistoj. Vi devus lasi lin diri: 'En ĉi tiun landon, fi do, neniam venis kavaliro post ĝia kristaniĝo, sed li trovis strangajn aventurojn, fi do.' Aŭdu kiel pli bone tio sonas."

"...neniam venis kavaliro sed li trovis strangajn aventurojn, fi do. Ĝi fakte faras, bona sinjoro, kvankam estas sufiĉe malfacile diri, sed eble mi parolos pli rapide iom post iom. Kaj poste ili rajdis al la fraŭlinoj, kaj ili salutis unu la alian, kaj la plej aĝa havis girlandon de oro ĉirkaŭ sia kapo, kaj ŝi estis almenaŭ sesdek jarojn aĝa..."

"La *fraŭlino* estis?"

"Ja fakte, kara sinjoro – kaj ŝiaj haroj estis blankaj sub la girlando..."

"Celuloidaj dentoj, po naŭ dolaroj, plej verŝajne – ne bone fiksitaj, iras supren kaj suben kiam oni manĝas, kaj elfalas kiam oni ridas."

"La dua fraŭlino estis tridek jarojn aĝa, kun ringo de oro ĉirkaŭ sia kapo. La tria fraŭlino estis nur dek kvin jarojn aĝa..."

Penso-ondoj venis super mia animo, kaj la voĉo malaperis el mia aŭdkampo.

Dek kvin! Ho, mia koro rompiĝis, mi perdis mian karulinon! Ĝuste ŝia aĝo, kiu estis tiel ĝentila, kaj aminda, kaj tute mia, kaj kiun mi nenam plu vidis! Kiel la penso pri ŝi portas min reen super larĝaj maroj de memoro al malklara tempo, feliĉa tempo, post tiel multegaj jarcentoj, kiam mi kutime vekiĝis en la mildaj someraj matenoj, el la dolĉaj sonĝoj pri ŝi, kaj diris "Ha lo, Centraloj!", nur aŭdis ŝian karan voĉon reflui al mi kun la "Saluton, Hank!" kio estis muziko de la sferoj al mia sorĉita orelo. Ŝi ricevis tri dolarojn semajne, sed ŝi meritis ilin.

Mi ne povis sekvi la pliajn klarigojn de Alisande pri kiuj estis niaj kaptitaj kavaliroj, nun – mi volas diri, se ŝi iam klarigos kiuj ili estis. Mia intereso estis for, miaj pensoj estis malproksimaj, kaj malgajaj. Aŭdante fragmentojn de la rakonto, kaptataj tie kaj ĉi tie, tiam kaj ĉi tiam, mi nur malklare notis ke ĉiu el tiuj tri kavaliroj prenis unu el tiuj du fraŭlinoj malantau si sur la ĉevalo, kaj unu rajdis norden, unu

orienten kaj unu suden, por serĉo aventurojn, kaj denove renkontiĝi kaj mensogi, post jaro kaj tago. Jaro kaj tago – kaj sen pakaĵoj. Tia estis la ĝenerala simpleco de la lando.

La suno nun subeniris. Estis ĉirkaŭ la tria horo posttagmeze kiam Alisande komencis diri al mi kiuj estis la vakeroj; do ŝi sufiĉe bone progresis – por esti ŝi. Frue aŭ malfrue ŝi atingos la celon, sendube, sed oni povis devigi ŝin hasti.

Ni proksimiĝis al kastelo, kiu staris sur alta tero, granda, forta, respektinda domo, kies grizaj turoj kaj muroj estis ĉarme vestitaj de hedero, kaj kies tuta majesta maso estis dronigitaj en la brilo de la subeniranta suno. Estis la plej granda kastelo kiun ni vidis, do mi pensis ke ĝi eble estis nia celo, sed Alisande diris ke ne. Ŝi ne sciis kiu posedis ĝin; ŝi diris ke ŝi pasis ĝin sen eniri, kiam ŝi estis survoje al Kameloto.

16. Morgan le Fay

Se oni kredus vagantajn kavalirojn, ne ĉiuj kasteloj estis agrablaj lokoj por gastigi. Fakte, vagantaj kavaliroj *ne* estis kredindaj homoj – tio estas, mezuritaj per modernaj normoj de vereco; sed se vi mezurus ilin per la normoj de ilia propra tempo, kaj juĝus ilin per tiuj, vi ricevus la veron. Estis tre simple: el iu aserto vi forstrekis naŭdek sep procentojn; la cetero estis faktoj. Nun farinte tion, restis la vero ke se mi povus scii ion pri kastelo antaŭ soni la pordogongon – mi volas diri: antaŭ voki la gardistojn – estus saĝe fari tion. Do plaĉis al mi kiam mi vidis malproksime rajdiston turniĝi en la suba parto de la vojo, kiu serpentumis malsupren el la kastelo.

Kiam ni proksimiĝis unu al la alia, mi vidis ke li portis helmon kun plumbufo, kaj ŝajnis esti cetere vestita en ŝtalo, sed ankaŭ kun stranga aldono -- rigida kvarangula vesto, kiel kapoto de heraldo. Tamen, mi devis rideti al mia propra forgesemo kiam mi proksimiĝis kaj legis sur lia kapoto:

"Sapo de Persimonns – ĉiuj unuaj virinoj uzas ĝin."

Tio estis mia propra eta ideo, kaj ĝi havis plurajn sanigajn celojn por civilizi kaj levi ĉi tiun landon. Unue, ĝi estis kaŝita bato al tiu stultaĵo de vagantaj kavaliroj, kvankam neniu krom mi mem

suspektis tion. Mi elsendis kelkajn el tiuj homoj – la plej kuraĝajn kavalirojn kiujn mi povis trovi – ĉiu premita inter afiŝtabuloj kun tiu aŭ alia teksto, kaj mi juĝis ke iom post iom, kiam ili estos sufiĉe multaj, ili komencos aspekti ridindaj; kaj tiam, eĉ la ŝtalvestita azeno kiu *ne* havas tabulojn komencas aspekti ridinda, ĉar li estas eksmoda.

Due tiuj misiistoj, iom post iom, kaj sen krei suspektojn aŭ maltrankvilecon, enkondukos bazan purecon ĉe la nobelaro, kaj el tie, ĝi fluos suben al la popolo, se oni povos teni la pastrojn trankvilaj. Tio subfosos la Eklezion. Mi volas diri: estos paŝo en tiu direkto. Poste, edukado – poste, libereco – kaj post tio, ŝi komencos disfali. Estas mia konvinko ke ĉiu Establita Eklezio estas establita krimo, establita sklavejo, do mi ne havis skrupulojn, sed estis preta ataki ĝin iamaniere kaj kun ia ajn armilo kiu certe detruus ĝin. Ja en mia propra pasinteco – en malproksimaj jarcentoj, kiuj ne ankoraŭ moviĝis en la utero de la tempo – estis majunaj angloj kiuj imagis ke ili naskiĝis en libera lando; "libera" lando kun limigita religilibereco, kaj Establita Anakronismo.

Miaj misiistoj estis instruitaj laŭtlegi la oritajn tekstojn sur iliaj kapotoj – la pompa oro estis bela ideo, mi povus instigi la reĝon porti afiŝtabulon pro tiu barbara pompo – ili laŭtleagu tiujn tekstojn kaj poste klarigu al la genobeloj kio estas sapo; kaj se la genobeloj timas ĝin, lasu ilin testi ĝin al

hundo. La posta ago de la misiisto estu kunvenigi la familion kaj uzi ĝin sur si mem; li permesu al si ĉiujn eksperimentojn, kiel ajn senesperajn, por konvinki la nobelaron ke sapo estas sendanĝera; se restos iu fina dubo, li devas kapti ermiton – la arbaroj estis plenaj de ili; sanktuloj ili nomis sin, kaj sanktuloj ili estis kredataj esti. Ili estis nepriskribeble sanktaj, kaj faris miraklojn, kaj ĉiuj respektis ilin. Se ermito povis lavi sin kaj tamen vivi, kaj se tio ne konvinkis dukon, do rezignu, lasu lin sola.

Kiam ajn miaj misiistoj kaptis vagantan kavaliron survoje ili lavis lin, kaj kiam li estis saniĝinta, ili lasis lin ĵuri ke li havos afiŝtabulon kaj dissemos sapon kaj civilizon dum la cetero de siaj tagoj. Sekve, la laborantoj pri tio iĝis pli kaj pli multaj, kaj la reformo daŭre disvastiĝis. Mia sapfabriko frue sentis la streĉon. Unue, mi havis nur du manojn; sed antaŭ forlasi mian hejmon, mi jam dungis dek kvin, kaj estis aktiva tage kaj nokte; kaj la atmosfera rezulto iĝis tiel klara, ke la reĝo iel svenis kaj anhelis kaj diris ke li kredas ke li ne eltenos tion multe pli, kaj Sir Lanceloto apenaŭ povis fari ion ajn krom iri tien kaj reen sur la tegmento kaj blasfemi, kvankam mi diris al li ke estis pli aĉe tie supre ol ie aliloke, sed li diris ke li deziras multe da aero; kaj li ĉiam plendis ke palaco ne estas la ĝusta loko por sapfabriko ĉiuokaze, kaj diris ke se iu volus fondi tian en lia

hejmo, li estu malbenita se li ne strangolos lin. Ankaŭ sinjorinoj ĉeestis, sed tiuj homoj neniam multe zorgis pri tio; ili blasfemus antaŭ infanoj, se ili blovus en ilia direkto kiam la fabriko laboris.

La nomo de tiu misiista kavaliro estis La Cote Male Taile, kaj li diris ke en tiu kastelo loĝis Morgan le Fay, fratino de reĝo Arturo, kaj edzino de reĝo Uriens, monarĥo de regno ĉirkaŭ same granda kiel la Distrikto de Kolumbio – vi povis stari en ĝia mezo kaj ĵeti ŝtonojn en la apudan landon. "Reĝoj" kaj "regnoj" estis same multaj en la tiama Britio, kiel en la eta Palestino en la tempo de Josuo, kiam oni devis dormi kaŭrante, ĉar oni ne povis streĉi la krurojn sen pasporto.

La Cote estis tre deprimita, ĉar ĉi tie li havis la plej grandan fiaskon de sia kampanjo. Li ne vendis eĉ unu sapon; tamen li uzis ĉiuj trukojn, li eĉ lavis ermiton; sed la ermito mortis. Tio estis vere grava fiasko, ĉar tiu besto estos nun nomata martiro, kaj li havos sian lokon inter la sanktuloj de la romia kalendaro. Tial li lamentis, la kompatinda Sir La Cote Male Taile, kaj profunde. Kaj tial mia koro sangis por li, kaj mi sentis ke mi devis komforti kaj starigi lin. Tial mi diris:

"Ne ĉagrenu, bona kavaliro, ĉar ĉi tio ne estas malvenko. Ni havas cerbojn, vi kaj mi; ĉar por tiuj kiuj havas cerbojn, ne ekzistas malvenkoj, nur venkoj. Vidu kiel ni ŝanĝos ŝajnan

katastrofon en anoncon; anoncon por nia sapo; kaj la plej grandan iam elpensitan; anoncon kiu aliigos la malvenkon ĉe Mount Washington al la venko ĉe Matterhorn. Ni skribos sur nia afiŝtabulo: '*Protektata de la elektitaj.*' Kiel tio sonas?"

"Vere, estas bonege pensita!"

"Nu, mi devas agnoski ke por nur modesta anonco unulinia, ĝi estas genia."

Do malaperis la ĉagrenoj de la kompatinda kolportisto. Li estis kuraĝa homo, kaj impone batalis antaŭe. Plej fama li estis pro la okazintaĵoj dum ekskurso kiel ĉi tiu, kiun li iam faris kun sinjorino nomita Maledisanto, kiu parolis same sperte kiel Alisande, kvankam alimaniere, ĉar ŝia longo elkraĉis nur insultojn kaj malagrablaĵojn, dum la muziko de Alisande estis pli ĝentila. Mi bone konis lian rakonton, do mi sciis kiel interpreti la kompaton kiu estis en lia vizaĝo kiam li adiaŭis min. Li supozis ke mi havis amare malfacilan tempon.

Alisande kaj mi diskutis lian rakonton, dum ni rajdis, kaj ŝi diris ke la malbonŝanco de La Cote komenciĝis samtempe kun tiu vojaĝo; ĉar la arlekeno de la reĝo venkis lin la unuan tagon, kaj en tiaj okazoj estis kutimo de la knabino transiri al la venkinto, sed Maledisanto ne faris tion; kaj ŝi ankaŭ poste insiste restis ĉe li, post ĉiuj liaj malvenkoj. Sed, mi diris, supozu ke la venkinto

rifuzas akcepti sian akiraĵon? Ŝi diris ke tio ne estas problemo – li devas. Li ne povas rifuzi -- tio ne estus regule. Mi notis tion. Se la muziko de Alisande iam estos malfacile elteni, tiam mi lasos kavaliron venki min, esperante ke ŝi transiros al li.

Ĝustatempe ni estis vokataj de la gardistoj, sur la kastelaj muroj, kaj post intertraktado ni estis enlasataj. Mi ne povas diri ion agrablan pri tiu vizito. Sed ĝi ne estis seniluziigo, ĉar mi konis sinjorinon Le Fay laŭfame, kaj mi ne atendis ion agrablan. Ŝi estis alte respektata de la tuta regno, ĉar ŝi kredigis al ĉiuj ke ŝi estis granda sorĉistino. Ĉiuj ŝiaj agoj estis malicaj, ĉiuj ŝiaj instinktoj diablaj. Ŝi estis plena ĝis la brovoj de glacia malico. Ŝia tuta pasinteco estis nigra pro krimoj; kaj inter ŝiaj krimoj, murdoj estis oftaj. Mi tre scivoleme volus vidi ŝin, same sciloleme volus vidi Satanon. Je mia surprizo, ŝi estis bela; ŝiaj nigraj pensoj ne faris ŝian vizaĝon hida, alta aĝo ne sulkis sian satenan haŭton aŭ faris ĝin malpli freŝa. Ŝi povus esti rigardata kiel la nepino de la maljuna Uriens, aŭ kiel la fratino de sia propra filo.

Tuj kiam ni estis sekure inter la pordoj de la kastelo, ni estis ordonataj iri al ŝi. Reĝo Uriens estis tie, maljunulo kun ĝentila vizaĝo kaj modesta mieno; kaj ankaŭ la filo, Sir Uwayne le Blanchemains, pri kiu mi kompreneble

interesiĝis pro la tradicio ke li iam batalis kontraŭ tridek kavaliroj, kaj ankaŭ pro lia vojaĝo kun Sir Gawaine kaj Sir Marhaus, per kiu Alisande distris min. Sed Morgan estis la ĉefa logilo, la plej videbla homo ĉi tie; ŝi estis la ĉefo de ĉi tiu hejmanaro, tio estis evidente. Ŝi sidigis nin, kaj poste ŝi komencis, kun ĉiaspecaj ĝentilaĵoj, fari al mi demandojn. Ho kara, estis kvazaŭ parolis birdo aŭ fluto, aŭ io simila. Mi sentis min persvadita ke ĉi tiu virino estis viktimo de kalumnio kaj mensogoj. Ŝi pepadis, kaj ŝi pepadis, kaj baldaŭ bela, juna paĝio, vestita kiel ĉielarko, kaj movanta sin same senĝene kiel mara ondo, venis kun io sur ora pleto, kaj kiam li genuiĝis por doni tion al ŝi, li troigis sian ĝentilecon kaj perdis la balancon, kaj do falis leĝere al ŝia genuo. Ŝi pikis lin per ponardo same memkompreneble kiel iu alia mortpikus raton!

Kompatinda infano! Li falis al la planko, tordis siajn silkajn membrojn en unu granda ondo de doloro, kaj mortis. El la maljuna reĝo venis kontraŭvola "O-o-o!" de kompato. Pro la rigardo, kiun li rivevis, li subite eksilentis kaj ne aldonis pliajn streketojn. Sir Uwayne, je signo de sia patrino, iris al la antaŭĉambro kaj vokis kelkajn servistojn, kaj dumtempe la sinjorino milde pluparolis.

Mi vidis ke ŝi estis bona dommastrino, ĉar dum ŝi parolis, ŝi rigardetis la servistojn, por vidi

ke ili senproteste pritraktis la kadavron kaj eligis ĝin el la ĉambro; kiam ili revenis kun freŝaj, puraj mantukoj, ŝi resendis ilin por preni la aliajn; kaj kiam ili finviŝis la plankon kaj foriris, ŝi indikis ruĝan makulon, grandan kiel larmo, kiun iliajn malpli akraj okuloj ne vidis. Estis evidente al mi ke La Cote Male Taile ne estis vidinta la mastrinon de la domo. Ofte mutaj faktoj parolas pli laŭte ol iu lango.

Morgan le Fay daŭre parolis same muzike kiel antaŭe. Mirinda virino. Kaj kian rigardon ŝi havis; kiam ĝi falis riproĉe al tiuj servistoj, ili resaltis kaj ektimis, kiel faras simplaj homoj kiam fulmoj venas el la nuboj. Mi povus mem kutimiĝi al tio. Estis same kun maljuna, kompatinda frato Uriens; li ĉiam estis proksime al timego; ŝi eĉ ne povis turni sin al li sen ke li ektremis.

Meze en la interparolado, mi diris ion admiran pri reĝo Arturo, momente forgesante kiel tiu virino malamamis sian fraton. Tiu eta flataĵo sufiĉis. Ŝia mieno nebuliĝis kiel antaŭ ŝtormo; ŝi vokis siajn gardistojn, kaj diris:

"Metu ĉi tiujn kanajlojn en la karcerojn."

Tio dolorigis miajn orelojn, ĉar ŝiaj karceroj havis certan reputacion. Mi ne povis elpensi ion por diri – aŭ fari. Sed Alisande reagis alimaniere. Kiam la gardisto metis manon sur mi, ŝi ekparolis kun la plej trankvila memfido, kaj diris:

"Vundoj de Dio, ĉu vi volas esti detruota, ho frenezulino? Ja estas la estro!"

Ho kiel feliĉa ideo tio estis! – kaj tiel simpla; tamen, mi neniam ekpensus pri ĝi. Mi naskiĝis modesta; ne ĉie, sed kelkloke; kaj jen unu el tiuj lokoj.

La efiko al la sinjorino estis elektra. Ĝi klarigis ŝian mienon, revenis ŝiaj ridetoj kaj flataĵoj; sed tamen ŝi ne povis tute kaŝi ke ŝi terure timis. Ŝi diris:

"Ho, nur aŭskultu vian servistinon! Kiel se iu kun miaj talentoj povus diri tion kion mi ĵus diris al iu kiu venkis Merlinon, kaj ne serĉi. Per miaj magiaĵoj mi antaŭvidis ke vi venos, kaj per ili mi sciis kiam vi eniris ĉi tie. Mi tiel ludis nur esperante surprizi vin por ke vi montru ion de via arto, ne dubante ke vi atakos la gardistojn per kaŝitaj fajroj, tuj cindrigante ilin, miraklo multe trans mia propra eblo, sed kion mi longe havis infanecan deziron vidi."

La gardistoj estis malpli scivolemaj, kaj eliris tuj kiam ili ricervis permeson.

17. Reĝa bankedo

Kiam la sinjorino vidis min pacema kaj ne ofendita, ŝi sendube juĝis ke ŝia senkulpigo trompis min; ĉar ŝia timo forvaporigis, kaj ŝi baldaŭ tiel obstine volis instigi min montri mian arton kaj mortigi iun, ke la tuta afero iĝis ĝeniga. Sed feliĉe por mi, ŝi estis baldaŭ interrompata per la voko al preĝo. Mi volas diri tion pri la nobelaro: kiel ajn tirana, murdema, rabanta kaj morale putra ĝi estis, ĝi estis profunde kaj entuziasme religia. Nenio povis malhelpi ilin regule kaj fidele fari la piaĵojn ordonitajn de la Eklezio. Pli ol unufoje mi vidis nobelon, kiu preskaŭ venkis malamikon, paŭzi kaj preĝi antaŭ tranĉi lian kolon; pli ol unufoje mi vidis nobelon, embuskinte kaj mortiginte sian malamikon, iri al la plej proksima preĝejeto apudvoja kaj humile danki, sen eĉ unue prirabi la kadavron. Ne ekzistis io pli bona aŭ dolĉa eĉ en la vivo de Benvenuto Cellini, tiu kruda sanktulo mil jarojn poste. Ĉiuj nobeloj de Britio, kun iliaj familioj, ĉeestis diservojn matene kaj vespere ĉiutage, en siaj privataj preĝejetoj, kaj eĉ la plej aĉajn el ili havis familiajn diservojn ankaŭ kvin aŭ ses kromajn fojojn. Pri tio oni danku nur la Eklezion. Kvankam mi ne estis amiko de tiu Katolika Eklezio, mi devis agnoski tion. Kaj ofte, kontraŭvole, mi kaptis min mem dirante:

"Kio estus ĉi tiu lando sen la Eklezio?"

Post la preĝoj ni vespermanĝis en granda bankeda salono, lumigata de centoj da sebaz kandeloj, kaj ĉio estis tiel bona kaj abunda kaj krude granda kiel konvenis al la reĝa rango de la gastigantoj. En la pinto de la salono, sur estrado, estis la tablo de la reĝo, de la reĝino kaj de ilia filo, princo Uwayne. El tie streĉis sin laŭ la salono la ĝenerala tablo, sur la planko. Tie sidis la vizitantaj nobeloj kaj la plenkreskintaj membroj de iliaj familioj, de ambaŭ seksoj – la sidanta kortumo, fakte – sesdek unu personoj; pli sube sidis malaltaj funkciuloj de la hejmo, kun siaj ĉefaj subuloj; sume cent dek ok homoj sidantaj, kaj ĉirkaŭ samnombraj livrevestitaj servistoj starantaj malantaŭ iliaj seĝoj, aŭ servantaj en unu aŭ alia funkcio. Estis tre bona ekzercado. En galerio, orkestro kun cimbaloj, kornoj, harpoj kaj aliaj hororoj, komencis la programon per io kio ŝajnis esti la kruda unua skizo aŭ origina angoro de la lamento konota en venontaj jarcentoj kiel "In the Sweet Bye and Bye". Ĝi estis nova, kaj devus esti pli provludita. Pro iu aŭ alia kialo, la reĝino pendigis la komponiston, post la vespermanĝo.

Post tiu muziko, la pastro kiu staris malantaŭ la reĝa tablo legis longan preĝon en io kiu devis ŝajni latino. Poste ĉiuj kelneroj lasis siajn lokojn, kaj kuregis, flugis, prenis kaj portis, kaj la granda

manĝado komenciĝis; neniuj voroj ie ajn, sed senlima atento. La vicoj de buŝoj malfermiĝis kaj fermiĝis unisone, kaj la sono similis al subteraj maŝinoj.

La detruado kontinuus dum unu kaj duona horoj, kaj ĝi estis tute neimagebla. El la ĉefa parto de la festo – la granda, sovaĝa porko, kiu komence estis streĉita tiel impone – restis nur io kio similis al krinolino, kaj li nur estis simbolo kaj ekzemplo de tio kio okazis al ĉiuj aliaj manĝaĵoj.

Kun la kukoj kaj tiel plu komenciĝis la vigla drinkado – kaj la babilado. Stofa post stofa de vino kaj medo malaperis, kaj ĉiuj iĝis komfortaj, poste feliĉaj, poste gajegaj – ambaŭ seksoj – kaj iom post iom sufiĉe laŭtaj. Oni rakontis terurajn anekdotojn, sed neniun ruĝiĝis; kaj kiam oni venis al la esenco, ĉiuj ridis tiel laŭte ke ili skuis la kastelon. La sinjorinoj respondis per rakontetoj kiuj preskaŭ igis reĝinon Margareta de Navaro, aŭ eĉ Elizabeta de Anglio, kaŝi sin malantaŭ naktuko, sed neniun kaŝis ŝin, nur ridis – kriegis, vi povas diri. En preskaŭ ĉiuj el tiuj teruraj rakontoj, pastroj estis la kuraĝaj herooj, sed tio ne ĝenis la pastron tie, li ridis kun la aliaj; eĉ pli, post invito li elkriis kanton ne malpli kuraĝa ol iu alia kantata dum tiu vespero.

Je noktomezo, ĉiuj estis mortige lacaj, kaj havis koldoloron pro la ridado; kaj ĝenerale estis

ebriaj; kelkaj plorante, kelkaj tenere, kelkaj gaje, kelkaj kvereleme, kelkaj mortaj kaj sub la tablo. El la sinjorinoj, la plej aĉa spektaklo estis aminda, juna dukino, ĝuste edziniĝonta; kaj certe, ŝi estis spektaklo. Ĝuste tia kia ŝi estis, ŝi povus esti modelo por portreto de la juna filino de la reganto de Orleano, ĉe la sama vespermanĝo el kiu ŝi estis portata, blasfemanta, ebria kaj senhelpa, al sia lito, dum la perditaj kaj lamentataj tagoj de la Malnova Reĝimo.

Subite, ĝuste kiam la pastro levis siajn manojn, kaj ĉiuj konsciaj kapoj estis respektame atendantaj la venontan benon, aperis sub la volbo de la malproksima pordo en la alia fino de la salono maljuna kaj kurba kaj blankhara virino, kiu apogis sin sur lambastono; kaj ŝi levis la bastonon kaj indikis per ĝi la reĝinon kaj kriis:

"La kolero kaj malbeno de Dio falu sur vin, ho virino sen kompato, kiu mortigis mian senkulpan nepon kaj senkonsoligis ĉi tiun malnovan koron, kiu havis nek infanon, nek amikon, nek loĝejon, nek komforton en la tuta mondo krom li!"

Ĉiuj kruccsignis sin en terura timo, ĉar malbeno estis terura afero por tiuj homoj; sed la reĝino ekstaris majeste, kun la morto-lumo en la okulo, kaj elĵetis la senkompatan ordonon:

"Metu manojn al ŝi! Al la paliso kun ŝi!"

La gardistoj lasis siajn lokojn por obei. Estis honto; estis kruele vidi tion. Kio fareblis?

Alisande rigardis min; mi sciis ke ŝi havis alian inspiron. Mi diris:

"Faru tion kion vi elektas."

Post momento ŝi staris kaj rigardis la reĝinon. Ŝi indikis min, kaj diris:

"Sinjorino, *li* diras ke tiel ne povos esti. Nuligu la ordonon, aŭ li nuligos la kastelon kaj ĝi malaperos, kiel la senesenca ŝtofo de sonĝo!"

Diable, kian frenezan kontrakton devigi al iu! Se la reĝino...

Sed tie mia konsterniĝo trankviliĝis, kaj mia paniko malaperis; ĉar la reĝino malfortiĝis kaj neniel kontraŭstaris, sed per mansigno nuligis sian ordonon kaj falis sur la seĝon. Kiam ŝi eksidis, ŝi ne plu estis ebria. Nek multaj el la aliaj. La kunvenintoj ekstaris, forbalais la ceremoniojn, kaj kuris al la pordo amase, faligis seĝojn, frakasis ujojn, tiris, luktis, interpremiĝis – faris ĉion por eliri antaŭ ol mi ŝanĝos opinion kaj ĵetos la kastelon en la senmezuran malplenon de la spaco. Nu ja, ili *estis* superstiĉaj. Estas malfacile kompreni tion.

La kompatinda reĝino estis tiel timigita kaj humiligita ke ŝi eĉ ne kuraĝis pendigi la komponiston, sen antaŭe konsulti min. Mi tre kompatis ŝin – fakte iu iajn estus, ĉar ŝi vere suferis; do mi volonte farus ion ajn ne troan, kaj mi tute ne deziris mem troigi ion. Do mi bone pripensis, kaj fine mi ordonis la muzikistojn veni

al ni kaj denove ludi tiun "In the Sweet Bye and Bye", kion ili faris. Tiam mi komprenis ke ŝi pravis, kaj permesis al ŝi pendigi la tutan orkestron. Tiu eta mildigo de mia sinteno havis bonan influon al la reĝino. Ŝtatis to ne multe gajnas se li arbitre postulas rigidan aŭtoritaton ĉiam kiam tio eblas, ĉar tio vundigas la ĝustan fieron de liaj subuloj, kaj tiel subfosas lian propran forton. Eta cedo fojfoje, kiam tio ne povas kaŭzi damaĝon, estas pli saĝa politiko.

Nun, kiam la reĝino denove havis trankvilan animon, kaj noteble feliĉan, ŝia vino kompreneble estis denove rimarkebla, kaj tio iomete ekmovis ŝin. Mi volas diri ke ĝi eksonigis ŝian muzikon – la arĝentan sonorilon de ŝia lango. Ho, ŝi estis majstra babilanto. Ne taŭgus se mi indikus ke estis nun sufiĉe malfrue kaj ke mi estis laca kaj tre dormema. Mi bedaŭris ke mi ne enlitiĝis kiam mi havis la ŝancon. Nun mi devis elteni; ne ekzistis alia ebleco. Do ŝi babilis kaj babiladis, en la cetere tute silenta kaj dormanta kastelo, ĝis finfine venis, kvazaŭ el profunde sub ni, malproksima krio – kun agonio sono pro kiu mia karno ŝrumpis. La virino eksilentis, kaj ŝiaj okuloj eklumis pro plezuro; ŝi klinis sian gracion kapon, kiel faras birdo kiam ĝi aŭskultas. La sono denove boris sian vojon supren tra la silento.

"Kio estas?" mi diris.

"Estas vere obstina animo, kaj ĝi longe elportas. Nun multajn horojn."

"Elportas kion?"

"La torturstablon. Venu – vi vidos ion gajigan! Se li nun ne malkaŝos sian sekreton, vi vidos lin distirita."

Kia silka friponino ŝi estis; kaj tiel trankvila kaj balancita, dum la nervoj laŭ miaj kruroj doloris pro empato kun tiu homo. Kondukataj de gardistoj en armaĵoj kun brulantaj torĉoj ni marŝis tra eĥantaj koridoroj, kaj laŭ ŝtonaj ŝtuparoj malsekaj kaj gutantaj, kaj odorantaj de ŝimoj kaj de lumo enŝlosita dum eraoj – vojaĝo frosta kaj harstariga, kaj longa, kaj ĝi ne iĝis malpli longa aŭ pli gaja pro la babilado de la sorĉistino, temanta pri tiu suferanto kaj lia krimo. Li estis akuzita, de anonima informanto, esti mortiginta cervon en reĝa parko. Mi diris:

"Anonima atesto ne estas ĝusta agado, via moŝto. Estus pli juste konfronti la akuzaton kun la akuzanto."

"Mi ne pensis pri tio, ĉar tio ne estas tre grava. Sed eĉ se mi volus, mi ne povus, ĉar la akuzanto venis maskita nokte, kaj informis la arbargardiston, kaj tuj foriris, do la arbargardisto ne konas lin."

"Ĉu do nur tiu Nekonato vidis kiu mortigis la cervon?"

"Ne, *neniu* vidis kiam ĝi estis mortigata, sed tiu Nekonato vidis ĉi tiun akran mizerulon proksima al la loko kie kuŝis la cervo, kaj li venis kun vere lojala urĝo kaj diris tion al la arbargardisto."

"Do ankaŭ la Nekonato estis proksima al la morta cervo? Ĉu ne iom eblas ke li mem mortigis ĝin? Lia lojala urĝo – en masko – ŝajnas nur iomete suspektinda. Sed pro kiu celo via moŝto torturas la malliberulon? Al kio uzas?"

"Se al nenio, li ne konfesos; kaj se tiel, lia animo estos perdita. Pro sia krimo li ne plu rajtas vivi, laŭ la leĝo – kaj mi certe garantias ke li ne vivos! – sed mi riskus mian propran animon, se mi lasus lin morti sen pekconfeso kaj pardono. Mi ja estus stulta se mi saltus en la inferon por plaĉi al *li*."

"Sed, via moŝto, supozu ke li havas nenion por konfesi?"

"Tion ni baldaŭ vidos. Se mi torturos lin ĝismorte kaj li ne konfesos, eble tio montros ke li fakte havis nenion por konfesi – vi certe agnoskas ke estas tiel? Tiam mi ne estos damnata pro nekonfesinta homo, kiu havis nenion por konfesi – do mi estos sekura."

Estis la obstina stulteco de la tempo. Ne eblis argumenti kun ŝi. Argumentoj neniam povas venki ŝtonigintan edukadon, same kiel ondoj ne povas venki rokon. Kaj ŝia edukado estis ĉies. La

plej klara cerbo en la lando ne povus kompreni ke ŝia pozicio estis mankhava.

Kiam ni eniris la torturĉambron, mi vidis bildon kiu ne plu lasos min; ho se ĝi farus. Loke naskita juna giganto, ĉirkaŭ tridekjara, kuŝis streĉita surdorse sur la stablo, kun la man- kaj piedartikoj ligitaj al ŝnuroj, al vinĉoj en ambaŭ ekstremoj. Li tute ne havis koloron; lia mieno estis tordita kaj fiksita, kaj li havis ŝvitgutojn sur la frunto. Pastroj klinis sin super li ambaŭflanke; la ekzekutisto staris proksime; gardistoj gardostaris; fumantaj torĉoj staris en ingoj laŭ la muroj; en angulo kaŭris kompatinda, juna estaĵo, ŝia vizaĝo angore streĉita, duone sovaĝa kun ĉasata rigardo en la okuloj, kaj sur ŝiaj genuoj dormis eta infano. Ĝuste kiam ni pasis la sojlon, la ekzekutisto iom turnis sian maŝinon, pro kio kriis kaj la malliberulo kaj la virino; sed mi kriegis, kaj la ekzekutisto malstreĉis la maŝinon sen vidi kiu parolis. Mi ne lasos la teruron kontinui; mortigos min se mi vidos tion. Mi petis la reĝinon lasi min malplenigi la ĉambron kaj paroli kun la malliberulo sola; kaj kiam ŝi intencis protesti, mi parolis mallaŭte kaj diris ke mi ne volis agi maltrankvilige antaŭ ŝiaj servistoj, sed mi devas insisti; ĉar mi estis reprezentanto de reĝo Arturo, kaj mi parolis lianome. Ŝi komprenis ke ŝi devis akcepti tion. Mi petis ŝin lasi min kun tiuj homoj, kaj poste foriri. Tio ne

estis agrable al ŝi, sed ŝi akceptis; kaj faris eĉ pli ol mi intencis postuli. Mi volis nur la apogon de ŝia propra aŭtoritato; sed ŝi diris:

"Vi faru ĉion kiel ĉi tiu sinjoro ordonos. Li estas la estro."

Certe estis bona vorto por sorĉi. Oni povus vidi tiujn ratojn turniĝi. La gardistoj de la reĝino ekstaris en linio, kaj ŝi kaj ili formariĝis, kun siaj torĉportantoj, kaj vekis la eĥojn de la kavernotuneloj per siaj ritmaj paŝoj. Mi forigis la malliberulon de la torturstablo kaj metis lin sur la lito, kaj medikamentojn sur liaj vundoj, kaj donis al li vinon por trinki. La virino rampis proksimen kaj rigardis, fervore, ame, sed time – kiel iu kiu timas kontraŭbaton; fakte, ŝi provis kaŝe tuŝi la frunton de la viro, kaj saltis malantaŭen, bildo de timo, kiam mi senkonscie turniĝis al ŝi. Estis kompatveke vidi tion.

"Ho dio," mi diris, "karesu lin, knabino, se vi volas. Faru kion ajn vi volas; ne zorgu pri mi."

Ho, ŝiaj okuloj estis same dankemaj kiel tiuj de besto, kiam vi faras al ĝi ion ĝentilan kion ĝi komprenas. La infano ne plu ĝenis ŝin, kaj ŝia vango tuŝis tiun de la viro ene de minuto, kaj ŝiaj manoj karesis liajn harojn, kaj ŝiaj feliĉaj larmoj fluis. La viro reviviĝis, kaj karesis sian edzinon per siaj okuloj; pli ol tio li ne povis fari. Mi opiniis ke mi nun povis malplenigi la lokon, kaj

tion mi faris, forigis ĉiujn krom la familion kaj min mem. Poste mi diris:

"Nun, amiko, diru al mi vian version de tio kio okazis; mi jam konas la alian."

La viro kapindikis rifuze. Sed la virino ŝajnis ĝojigita – kiel aspektis al mi – ĝojigita pro mia propono. Mi pludiris:

"Ĉu vi konas min?"

"Jes. Ĉiuj faras, en la landoj de Arturo."

"Se vi ricevis ĝustajn raportojn pri mi, vi ne devas timi paroli."

La virino interrompis, fervore:

"Ho bona sinjoro, persvadu lin! Vi povas kaj vi faros. Ho, li tiel suferis; kaj li faris tion por mi – por *mi*! Kaj kiel mi povas elteni tion? Ho, se mi povus vidi lin morti – dolĉa, rapida morto; ho, Hugo mia, mi ne eltenos ĉi tion!"

Kaj ŝi komencis singulti kaj rampi ĉe miaj piedoj, kaj daŭre petadi. Petadi kion? La morton de la viro? Mi ne povis bone kompreni tion. Sed Hugo interrompis ŝin kaj diris:

"Bonvolu! Vi ne scias pri kio vi petas. Ĉu mi malsatigu miajn amatajn, por gajni mildan morton? Mi kredis ke vi konas min pli bone."

"Nu," mi diris, "mi ne povas tute kompreni ĉi tion. Estas enigmo. Nun..."

"Ho, kara mia sinjoro, se vi nur povos persvadi lin! Pripensu kiel liaj torturoj suferigas

min! Ho, kaj li ne volas paroli – dum la sanigo, la konsolo en benata, rapida morto..."

"_Kiel_ vi babilas? Li iros el ĉi tie libera kaj sana – li ne mortos."

La blanka vizaĝo de la viro lumiĝis, kaj la virino ĵetis sin al mi en tute surpriza eksplodo de ĝojo, kaj ekkriis:

"Li estas savita! – ĉar estas la vorto de la reĝo el la buŝo de lia servisto – Arturo, la reĝo kies vorto estas oro!"

"Do vi kredas ke mi povas esti fidata, malgraŭ ĉio. Kial vi ne faris tion antaŭe?"

"Kiu dubis? Ne mi, certe; kaj ne ŝi."

"Nu, kiel vi do ne rakontis al mi vian version?"

"Vi nenion promesis. Se jes, estus alia afero."

"Nu, mi komprenas... kaj tamen mi kredas ke mi ne tute komprenas. Vi eltenis la torturon kaj rifuzis konfesi; kio montras tute klara al eĉ la plej granda stultulo ke vi havis nenion por konfesi..."

"Mi, sinjoro? Kiel? Estis mi kiu mortigis tiun cervon!"

"Ĉu? Ho, jen la plej miksitaj misteroj kiu iam..."

"Kara sinjoro, mi surgenue petis lin konfesi, sed..."

"Vi _faris_! Pli kaj pli komplike. Kial vi volis ke li faru tion?"

"Ĉar tio donus al li rapidan morton, kaj savus lin de ĉiu tiu kruela doloro."

"Nu... jes, estas logiko en tio. Sed *li* ne deziris la rapidan morton."

"Li? Nu, certe li faris."

"Sed do, kial ajn li *ne* konfesis?"

"Ho, kara sinjoro, kaj lasi edzinon kaj infanon sen pano kaj domo?"

"Ho, koro de oro, nun mi komprenas! La amara leĝo prenas la posedaĵojn de la juĝita homo, kaj elĵetas lian vidvinon kaj liajn infanojn. Ili povis torturi vin ĝismorte, sed sen juĝo aŭ konfeso ili ne povis rabi viajn edzinon kaj infanon. Vi apogis ilin kiel viro; kaj *vi* – ja vera edzino kaj vera virino – vi povus liberigi lin de la torturo je la prezo de mem malsati kaj malrapide morti – nu, devigas al humileco scii kion via sekso povas fari, kiam temas pri memoferado. Mi donos al vi ambaŭ lokon en mia kolonio; vi ŝatos tion; estas fabriko kie mi, el blinde rampantaj aŭtomatoj, faras _homojn_."

18. En la kavernoj de la reĝino

Nu, mi aranĝis ĉion tion; kaj mi sendigis la viron hejmen. Mi havis grandan deziron torturi la ekzekutiston; ne ĉar li estis bona, diligenta kaj forte laboranta oficisto – ĉar certe ne estis malmerito lia ke li faris siajn devojn bone – sed por repagi ke li vanteme batis kaj alimaniere ĝenis tiun junan virinon. La pastroj informis min pri tio, kaj tre volonte vidus lin punata. Io tiel malagrabla aperis fojfoje. Mi volas diri, epizodoj kiuj montris ke ne ĉiuj pastroj estas blufoj kaj memserĉantoj, sed ke multaj el ili, eĉ la granda plimulto, estis je la sama nivelo kiel la ordinaraĵ homoj, sinceraj kaj bonkoraj, kaj volantaj mildigi la homajn problemojn kaj suferojn. Nu, tio ne helpeblis, do mi malofte ĉagreniĝis pri ĝi, kaj neniam po multajn minutojn; mi neniam havis la kutimon multe zorgi pri io kio ne helpeblas. Sed mi ne ŝatis tion, ĉar estis ĝuste tiaj aferoj kiuj instigis homojn akcepti Establitan Eklezion. Ni *devas* havi religion – memkompreneble – sed laŭ mia opinio devus temi pri kvardek liberaj seĝoj, por ke ili rigardu unu la alian, kiel estis en Usono dum mia tempo. Koncentrita potenco en politika maŝino estas malbone; kaj Establita Maŝino estas nur politika maŝino; estis inventita por tio; estas nutrita, prizorgita, ŝirmita por tio; ĝi estas malamiko de homa libereco, kaj ĝi faras nenion

bonan, kion ĝi ne povus fari pli bone se splitita kaj disigita. Tio ne estis leĝo; ne estis evangelio; estis nur opinio – mia opinio, kaj mi estis nur homo, nur unu homo; do ĝi ne valoris pli ol tiu de la papo – nek malpli, certe.

Nu, mi ne povis torturi la ekzekutiston, nek fajfi pri la ĝustaj plendoj de la pastroj. La ulo devis estis iamaniere punata, do mi malaltigis lin de lia ofico al orkestrestro – de la nova orkestro, nun fondota. Li forte petis, kaj diris ke li ne kapablas ludi – valida protesto, sed iom malforta, ĉar en la lando estis neniuj muzikistoj kiu povis.

La reĝino estis tre kolera, venontmatene, kiam ŝi eksciis ke ŝi havas nek la vivon de Hugo, nek liajn posedaĵojn. Sed mi diris al ŝi ke ŝi devos elteni tion; ĉar, dum leĝo kaj kutimo certe donis al ŝi la rajton kaj al lia vivo kaj al liaj posedaĵoj, tamen estis malgravigaj cirkonstancoj, do en la nomo de reĝo Arturo mi pardonis lin. La cervo detruis la kampojn de la viro, kaj li mortigis ĝin en subita pasio, ne por gajno; kaj li portis ĝin en la reĝan arbaron esperante ke tio malebligos la trovon de la farinto. Diable, mi ne povis igi ŝin kompreni ke subita pasio estas malgraviga cirkonstanco kiam oni mortigas cervon – aŭ homon – do mi rezignis, kaj lasis sin paŭzi. Mi ja kredis ke mi igos ŝin kompreni, rimarkante ke ŝia propra subita pasio en la kazo de la paĝio modifis tiun krimon.

"Krimon!" ŝi elkriis. "Kiel vi parolas! Krimon, ĉu? Mi ja *pagos* por li!"

Ho, ne valoris la penon malŝpari tempon al tio. Edukado – edukado estas ĉio; nur la edukado faras la personon. Ni parolas pri naturo; tio estas stulteco; ne ekzistas naturo; tio, al kio ni donas tiun misgvidan nomon, estas nur heredo kaj edukado. Ni ne havas proprajn pensojn, proprajn opiniojn; ili estas transdonataj al ni, enigataj en nin. Ĉio kio estas origina en ni, kaj tial sufiĉe kredinda aŭ malkredinda al ni, povas esti kovrata kaj kaŝata de la pinto de kambria pinglo, kaj la cetero estas atomoj kontribuitaj de, kaj hereditaj el, vico de prapatroj malantaŭen tra miliardo de jaroj al la praminulo aŭ akrido aŭ simio, el kiu nia specio estis tiel lacige, tiel fanfarone, tiel senprofite evoluinta. Kaj se temas pri mi, ĉio pri kio mi pensas en ĉi tiu malgaja, teda pilgrimado, en ĉi tiu patosa vagado inter la eternecoj, estas rigardi kaj humile vivi puran kaj altan kaj neriproĉeblan vivon, kaj savi tiun solan mikroskopan atomon en mi kiu estas fakte *mi*; la cetero povas surteriĝi en Ŝeolo, kaj mi ne zorgas pri tio.

Ne, diable, ŝia intelekto estis bona; ŝi havis sufiĉe da cerbo, sed ŝia edukado faris el ŝi azenon – tio estas, en perspektivo de multaj jarcentoj poste. Mortigi la paĝion ne estis krimo – estis ŝia rajto; kaj je sia rajto ŝi insistis, trankvile kaj ne

konscia pri io ofendiga. Ŝi estis la rezulto de generacioj de edukado en la neekzamenita kaj neatakita kredo ke la leĝo, kiu permesis al ŝi mortigi subulon kiam ŝi tiel elektis, estis tute justa kaj ĝusta.

Nu, ni devas doni eĉ al Satano liajn rajtojn. Ŝi meritis komplimenton pro unu afero; kaj mi provis doni ĝin, sed la vortoj fiksiĝis en mia gorgo. Ŝi havis la rajton mortigi la knabon, sed ŝi tute ne devis pagi por li. Tio estis leĝo por kelkaj aliaj homoj, sed ne por ŝi. Ŝi sciis tre bone ke ŝi estis tre donema kiam ŝi pagis por tiu knabo, kaj ke mi ja devis diri ion ĝentilan pri tio, sed mi ne povis – mia buŝo rifuzis. Mi ne povis ne vidi, en mia fantazio, tiun kompatindan maljunan avinon kun sia frakasita koro, kaj tiun junan, belan estaĵon kiu kuŝis buĉita, kun siaj etaj silkaj vestaĵoj plenaj de lia ora sango. Kiel ŝi povus *pagi* por li? Al *kiu* ŝi povus pagi? Kaj do, bone sciante ke ĉi tiu virino, edukita kiel ŝi estis, meritis laŭdon, eĉ flatadon, mi tamen ne povis eldiri tion, edukita kiel *mi* estis. La plej bona kion mi povis fari estis kapti komplimenton el ekstero, por tiel diri – kaj bedaŭrinde, ĝi estis vera:

"Sinjorino, via popolo adoras vin pro ĉi tio."

Tute vere, sed mi intencis pendigi ŝin pro tio iun tagon, se mi vivos. Kelkaj el tiuj leĝoj estis tro aĉaj, troege aĉaj. Mastro povis mortigi sian sklavon pro nenio; nur pro malico, aŭ por pasigi

la tempon – ĝuste kiel ni vidis ke la kronigita kapo povis fari kun *sia* sklavo, tio estas, kun iu ajn. Nobelo povis mortigi liberan homon nenobelan, kaj pagi por li – kontante aŭ per naturaĵoj. Nobelon povis mortigi nobelon senkoste, se temis pri la leĝo, sed li povis atendi samstilan venĝon. *Iu ajn* povis mortigi *iun ajn*, krom la ordinarulo kaj la sklavoj; tiuj havis neniujn privilegiojn. Se ili mortigis, estis murdo, kaj la leĝo ne toleris murdon. Ĝi tuj neniigis la prov-aganton – kaj ankaŭ lian familion, se li murdis iun kun plej alta rango. Se ordinarulo donis al nobelo vundeton kiu ne mortigis, eĉ ne dolorigis, li tamen ricevis la plej severan punon: ĉevaloj tute distiris lin, kaj ĉiuj venis por vidi la spektaklon, kaj ŝerci, kaj amuziĝi; kaj kelkaj el la plej bonaj spektakloj de la plej bonaj homoj estis same krudaj, kaj same nepresigeblaj, kiel kelkaj ja presigitaj de la agrabla Casanova en lia ĉapitro pri la senmembrigo de la kompatinda malamiko de Ludoviko 15-a.

Mi jam vidis sufiĉe de tiu timiga loko, kaj mi volis foriri, sed mi ne povis, ĉar mi pripensis ion pri kio mia konscienco ĉiam memorigis min kaj ne lasis min forgesi. Se mi povus refari la homon, mi farus lin sen konscienco. Estas unu el la plej malagrablaj aferoj ligitaj al persono; kaj kvankam ĝi certe faras multe da bono, sed en longa perspektivo, oni ne povas diri ke ĝi estas

profitiga; estus multe pli bone havi malpli da bono kaj pli da komforto. Tamen, tio estas nur mia opinio, kaj mi estas nur unu homo; aliaj – kun malpli da sperto – eble pensas alimaniere. Ili rajtas havi sian opinion. Mi povas nur insisti ke mi rimarkis mian konsciencon dum multaj jaroj, kaj mi scias ke ĝi kaŭzas pli da problemoj ol io alia, kion mi havis ekde la komenco. Mi supozas ke komence mi laŭdis ĝin, ĉar ni laŭdas ĉion kio estas nia; kaj tamen, kiel stulte estis pensi tiel. Se ni rigardas tion alimaniere, ni vidas kiel absurde estas: se mi havus amboson en mi, ĉu mi laŭdus ĝin? Kompreneble ne. Kaj tamen, se vi vere pripensas, ne estas granda diferenco inter koncienco kaj amboso – se temas pri komforto. Mi notis tion mil fojojn. Kaj vi povus dissolvi amboson per acidoj, kiam vi ne plu povus elteni ĝin; sed ne ekzistas maniero dissolvi konsciencon – almenaŭ ne por ĉiam. Almenaŭ mi ne konas iun.

Estis io kion mi volis fari antaŭ foriri, sed tio estis malagrabla, kaj mi tute ne volis ekagi. Nu, tio zorgigis min la tutan matenon. Mi povus menci tiun al la maljuna reĝo, sed al kio servus? – li estis nur estingita vulkano; li iam estis aktiva, sed lia fajro estis for ekde longe, nun li estis nur impona cindrokolono; sufiĉe ĝentila, kaj sufiĉe amikema por mia celo, sendube, sed ne uzebla. Li estis nenio, ĉi tiu tiel nomata reĝo; la reĝino

estis la sola potenco ĉi tie. Kaj ŝi estis Vezuvio. Kiel favoro, ŝi povus konsenti varmigi aron de paseroj por vi; sed poste ŝi eble kaptus la okazon por mem ekagi kaj entombigi urbon. Tamen, mi pripensis ke same ofte kiel alimaniere, kiam vi atendas la plej malbonan, vi ricevos ion kio tamen ne estas tiel malbona.

Mi do kolektis miajn fortojn kaj prezentis la aferon al Ŝia Reĝa Moŝtino. Mi diris ke mi estis ĝenerala malliberejinspektisto en Kameloto kaj en najbaraj kasteloj, kaj kun ŝia permeso mi ŝatus ekzameni ŝian kolekton, ŝiajn aĵojn – tio estas, ŝiajn malliberulojn. Ŝi kontraŭstaris; sed mi atendis tion. Sed ŝi fine konsentis. Mi atendis ankaŭ tion, sed ne tiel rapide. Tio pli-malpli finis miajn zorgojn. Ŝi vokis siajn gardistojn kaj torĉojn, kaj ni subeniris en la karcerojn. Tiuj situis sub la fundoj de la kastelo, kaj ĝenerale estis etaj ĉeloj fositaj el la malmola roko. Kelkaj el tiuj ĉeloj havis tute neniun lumon. En unu el ili estis virino, en malpuraj ĉifonoj, kiu sidis sur la tero, kaj ne volis respondi al demando aŭ diri eĉ unu vorton, sed nur rigardis nin unu- aŭ dufoje, tra reto de tufaj haroj, kvazaŭ por vidi kiu hazarda afero estis, kiu ĝenis per sono kaj lumo la senenhavan, tedan songon, kiu iĝis ŝia vivo; post tio, ŝi sidis klinita, kun la malpuraĵkovritaj fingroj nenionfarante interplektitaj en sia sino, kaj donis neniun plian signon. La kompatinda

ostaro estis virino, ŝajne mezaĝa; sed nur ŝajne; ŝi estis ĉi tie dum naŭ jaroj, kaj ŝi havis dek ok jarojn kiam ŝi venis. Ŝi estis ordinarulo, kaj ŝi estis sendita ĉi tien dum sia edziniga nokto de Sir Breuse Sance Pit , najbara sinjoro, kies vasalo ŝia patro estis, kaj al kiu ŝi rifuzis tion kion oni poste nomis *rajto de sinjoro*; kaj cetere, ŝi oponis perforton per perforto kaj el etis preskaŭ deciltron de lia preskaŭ sankta sango. La juna edzo tiam ekagis, kredante ke la vivo de lia edzino estis en danĝero, kaj  etis la nobelon en la aron de humilaj kaj tremantaj gastoj de la edzi ofesto, en la antaŭ ambron, kaj lasis lin tie surprizita per tiu stranga traktado, kun por  iam amaraj sentoj al ambaŭ geedzoj.  ar tiu sinjoro ne havis multe da restanta karcerloko, li petis la re inon gastigi la du krimulojn, kaj  i tie en ŝia bastilo ili estis ekde tiam;  i tien, fakte, ili venis malpli ol unu horon post sia krimo, kaj poste ili neniam vidis unu la alian. Jen ili estis, entombigitaj kiel du bufoj en la sama roko; ili pasigis naŭ tutnigrajn jarojn malpli ol kvindek futojn unu de la alia, sed neniu de ili sciis  u la alia ankoraŭ vivis  u ne. Dum la unuaj jaroj, ilia sola demando estis – prezentata kun petegoj kaj larmoj kiuj povus movi ŝtonojn, post iom da tempo, eble, sed koroj ne estas ŝtonoj: " u li vivas?" " u ŝi vivas?" Sed ili neniam ricevis

respondon; kaj fine, ili ne plu faris tiun demandon – aŭ iun alian.

Mi volis vidi la viron, aŭdinte ĉion tion. Li havis tridek kvar jarojn, kaj aspektis sesdekjara. Li sidis sur kvarangula ŝtono, kun sia kapo klinita, siaj antaŭbrakoj restantaj sur la genuoj, siaj longaj haroj pendantaj kiel franĝo antaŭ sia vizaĝo, kaj li murmuris al si mem. Li levis sian mentonon kaj malrapide rigardis nin, tute senforte, kaj palpebrumis al la akra lumo de la torĉoj. Poste, li denove klinis sian kapon, denove murmuris, kaj ne plu atentis nin. Ĉeestis kelkaj malsane mutaj atestantoj. Sur liaj man- kaj piedartikoj estis cikatroj, malnovaj kaj eluzitaj, kaj ligita al la ŝtono sur kiu li sidis estis ĉeno kun katenoj; sed ĝi nun kuŝis sur la tero, kaj estis tute kovrita de rusto. Ĉenoj ne plu necesas, kiam la animo forlasis malliberulon.

Mi ne povis vekti la viron; do mi diris ke ni venigu lin al ŝi, kaj vidu – al la edzino kiu estis la plej bela estaĵo surtere al li, iam – rozoj, perloj kaj roso, iĝintaj karno, por li; miraklo, la ĉefa de la naturo; kun okuloj kiel neniuj aliaj okuloj, kaj voĉo kiel neniua alia voĉo, kaj freŝeco, kaj supla, juna gracio, kaj beleco, kiu apartenis ĝuste al la estaĵoj de la sonĝoj – li pensis – kaj al nenio alia. Kiam li vidis ŝin, lia frostiĝinta sango ekvivis; kiam li vidis ŝin...

Sed estis seniluziiĝo. Ili sidis kune sur la tero kaj dum momento rigardis unu la alian en la vizaĝo, malklare scivolemaj, iel malforte bestece; poste ili forgesis la ĉeeston, unu de la alia, kaj mallevis la rigardojn, kaj vi vidis ke ili denove estis for kaj vagadis en iu malproksima lando de sonĝoj kaj ombroj, pri kiu ni scias nenion.

Mi eligis ilin kaj sendis ilin al iliaj amikoj. La reĝino ne tre ŝatis tion. Ne ĉar ŝi havis iun personan intereson pri la afero, sed ŝi trovis ĝin senrespekta al Sir Breuse Sance Pité. Tamen, mi certigis al ŝi ke, se li trovis ke li ne povas elteni tion, mi aranĝos lin tiel ke li ja povos.

Mi liberigis kvardek sep malliberulojn el tiuj teruraj ratotruoj, kaj lasis nur unun. Li estis sinjoro, kaj mortigis alian sinjoron, ian parencon de la reĝino. Tiu alia sinjoro embuskis lin por murdi lin, sed ĉi tiu ulo estis pli rapida kaj tranĉis lian kolon. Tamen, ne tial mi lasis lin en malliberejo, sed ĉar li malice detruis la solan publikan fonton en unu el liaj mizeraj vilaĝoj. La reĝino devis pendigi lin ĉar li mortigis ŝian parencon, sed mi ne povis permesi tion; ne estis krimo mortigi murdiston. Sed mi diris ke mi volonte lasos ŝin pendigi lin ĉar li detruis la fonton; do ŝi kontentigis sin per tio, ĉar estis pli bone ol nenio.

Ho Dio, pro kiuj bagatelaj agoj la plej multaj el tiuj kvardek sep viroj kaj virinoj estis tie

enŝlositaj! Fakte, kelkaj estis tie ne pro iu ajn aparta krimo, sed nur por kontentigi ies malamon; kaj eĉ ne ĉiam de la reĝino mem, sed de iu amiko. La krimo de la plej nova malliberulo estis nur rimarko kion li faris. Li diris ke li kredis ke se vi nudigus la nacion kaj sendus fremdulon tra la amaso, li ne povus distingi reĝon de fuŝkuracisto, aŭ dukon de hoteloficisto. Evidente, jen homo kies cerbo ne estis igita intelekta pureo per stulta edukado. Mi liberigis lin kaj sendis lin al la Fabriko.

Kelkaj el la ĉeloj hakitaj el la malmola roko situis tre proksime al la krutaĵo, kaj ĉiu el tiuj havis mallarĝan truon eksteren, do la malliberulo havis etan radion de la benita suno por sia komforto. La kazo de unu el tiuj kompatindaj uloj estis aparte akra. El sia malluma hirunda truo alte en la granda muro de natura roko, li povis elrigardi tra la mallarĝa truo kaj vidi sian propran domon tie en la valo; kaj dum dudek tri jaroj li rigardis ĝin, tra tiu truo, kun granda sopiro. Li povis vidi la lumojn tie dumnokte, kaj dumtage li povis vidi figurojn eniri kaj elveni – lian edzinon kaj liajn infanojn, kelkajn el ili, sendube, kvankam li ne povis distingi ilin je tiu distanco. Dum la jaroj li notis festojn tie, kaj provis ĝoji, kaj scivolis ĉu povis temi pri geedziĝoj aŭ io alia. Kaj li notis entombigojn; kaj ili streĉis lian koron. Li povis distingi la ĉerkon,

sed li ne povis mezuri ĝian grandecon, do li ne povis diri ĉu entombigis edzinon aŭ infanon. Li povis vidi la procesion, kun pastroj kaj funebrantoj, solene foriri, portante la sekreton kun ili. Li lasis post si kvin infanojn kaj edzinon; kaj dum dek naŭ jaroj li vidis kvin entombigojn, kaj neniu el ili estis sufiĉe humila por povi temi pri servisto. Do li perdis kvin el siaj trezoroj; ankoraŭ devis resti unu – unu nun senlime, nedireble kara – sed *kiu?* ĉu edzino aŭ infano? Tio estis la demando kiu torturis, nokte kaj tage, ĉu li dormis ĉu estis veka. Nu, havi intereson, ian ajn, kaj duonan lumradion, kiam vi estas en karcero, tio bone apogas la korpon kaj vivtenas la intelekton. Ĉi tiu homo ankoraŭ estis en sufiĉe bona kondiĉo. Kiam li finprezentis al mi sian malfeliĉan rakonton, mia mensa stato estis tiu kiu estus via propra, se vi estus normalhome scivolema; tio estas, mi brulis same vigle kiel li por scii kiu membro de lia familio ankoraŭ restis. Do mi mem akompanis lin hejmen, kaj agrable surpriza festo estis – ventegoj kaj ŝtormoj de freneza ĝojo, kaj tutaj niagaroj de feliĉaj larmoj; kaj diable! ni trovis la siatempe junan patrinon, nun griziĝanta survoje al la duona jarcento, kaj la bebojn ĉiuj viroj kaj virinoj, kaj kelkaj el ili geedziĝintaj kun propraj familioj – ĉar eĉ ne unu membro de la tribo estis morta! Imagu la genian malicon de tiu reĝino: ŝi aparte elektis tiun

malliberulon, kaj ŝi mem *elpensis* ĉiujn tiujn entombigojn, por bruligi lian koron; kaj la plej sublima detalo estis ke ŝi aranĝis unu entombigon *maltro*, por ke li detruu sian kompatindan animon divenante *kiu*.

Sen mi, li neniam elirus. Morgan le Fay malamis lin tutkore, kaj ŝi neniam moliĝus al li. Kaj tamen li faris sian krimon senpripense pli ol pure malice. Li diris ke ŝi havis ruĝajn harojn. Nu, ŝi havis; sed tio ne estis la ĝusta maniero paroli pri tio. Kiam ruĝharuloj havas pli ol certan rangon, iliaj haroj estas kaŝtankoloraj.

Pripensu: inter tiuj kvardek sep malliberuloj, estis kvin kies nomoj, krimoj, kaj datoj de enkarceriĝo ne plu estis konataj! Unu virino kaj kvar viroj – ĉiuj klinitaj, kaj sulkaj, kaj senanimaj patriarĥoj. Ili mem antaŭlonge forgesis tiujn detalojn; almenaŭ, ili havis nur malklarajn teoriojn pri ili, nenion por ĉiam konstatitan, kaj nenion kion ili ripetis dufoje per la samaj vortoj. La vico de pastroj, kies tasko estis ĉiutage preĝi kun la malliberuloj kaj memorigi ilin ke Dio lokigis ilin tie, pro tiu aŭ alia saĝa kialo, kaj instrui ilin ke pacienco, humileco kaj akcepto de subpremado estis tio, kion Li amis vidi ĉe homoj de malalta rango, havis tradiciojn pri tiuj kompatindaj homaj ruinoj, sed nenion pli. Tiuj tradicioj ampleksis nur malmulton, ĉar ili menciis nur la longecon de la enkarceriĝo, kaj ne

la nomojn de la krimoj. Kaj eĉ kun la helpo de la tradicio la sola afero pruvebla estis ke neniu el la kvin vidis la taglumon dum tridek kvin jaroj; kiom pli longe daŭris tiu manko, oni ne povis diveni. La reĝo kaj la reĝino sciis nenion pri tiuj mizeraj estaĵoj, krom ke ili estis hereditaj, kune kun la trono, de la antaŭa posedanto. Neniu pri ilia historia estis transdonata kune kun iliaj personoj, do la ricevantoj konsideris ilin senvaloraj, kaj tute ne interesiĝis pri ili. Mi diris al la reĝino:

"Sed kial vi do ne liberigis ilin?"

La demando estis cerbumiga. Ŝi ne sciis *kial* ŝi ne faris tion; ŝi neniam havis la ideon. Do jen ŝi, antaŭpriskribanta la veran historion de la estontaj malliberuloj en Château d'If, sen scii tion. Nun ŝajnis evidente al mi ke, kun ŝia edukado, tiuj hereditaj malliberuloj estis nur posedaĵoj – ne pli, ne malpli. Nu, kiam ni heredas posedaĵon, ni ne havas la ideon forĵeti ĝin, eĉ se ni ne alte taksas ĝin.

Kiam mi kunportis mian procesion de homaj vespertoj supren, en la taglumon, al la brilanta posttagmeza suno – unue metante al ili okulbendojn, pro kompato al okuloj tiel longe ne torturitaj per lumo – ili estis vidindaĵo. Skeletoj, birdotimigiloj, troloj, patosaj timoj, ĉiuj el ili; la plejeble laŭleĝaj infanoj de la Monarĥio laŭ la

graco de Dio kaj de la Establita Eklezio. Mi murmuris distrite:

"Ho, se mi povus fotografi ilin!"

Vi vidis tiajn homojn, kiuj neniam konfesus ke ili ne konas la signifon de nova, granda vorto. Ju pli nesciantaj ili estas, des pli decidemaj ili estas ŝajnigi ke vi ne pafis super iliaj kapoj. La reĝino estis tia homo, kaj tial ŝi ĉiam agis plej stulte. Ŝi hezitis dum momento; poste, ŝia vizaĝo lumiĝis per subita kompreno, kaj ŝi diris ke ŝi faros tion por mi.

Mi pensis al mi mem: Ŝi? Kion ŝi entute povas scii pri fotografio? Sed estis malbona okazo por pensi. Kiam mi ĉirkaŭrigardis, ŝi proksimiĝis al la procesio kun hakilo!

Nu, ŝi certe estis scivolema, Morgan le Fay. Mi vidis multajn malsamajn virinojn en mia vivo, sed ŝi estis pli malsama ol ĉiuj aliaj. Kaj kiel klare tipa por ŝi estis tiu epizodo. Ŝi ne pli bone ol ĉevalo sciis kiel fotografi procesion; sed kiam en dubo, estis karakterize por ŝi provi fari tion per hakilo.

19. Kavalirvagado kiel profesio

Alisande kaj mi denove estis sur la vojo, la postan matenon, brilan kaj fruan. Estis tiel bone malfermi siajn pulmojn kaj denove enspiri tutajn barelojn de la bonodora aero de la benita Dio, rosplena kaj arbargusta, post sufokado de korpo kaj animo dum du tagoj kaj du noktoj, en la moralaj kaj fizikaj fiodoroj en tiu netolerebla vulturejo! Por mi, tio estas; kompreneble, la loko estis sufiĉe agrabla por Alisande, ĉar ŝi kutimiĝis al altranga vivo.

Kompatinda knabino, ŝia buŝo nun devis lacige ripozi dum iom da tempo, kaj mi atendis ricevi la sekvojn. Mi pravis; sed ŝi plej uzeble helpis min en la kastelo, kaj ege apogis kaj fortigis min per gigantaj stultaĵoj, kiuj pli utilis en tiu situacio ol duoble grandaj saĝecoj; do mi pensis ke ŝi rajtis movi sian muelilon iomete, se ŝi volis, kaj neniel ĝenis min kiam ŝi ekis:

"Nun ni turnas nin al Sir Marhaus, kiu rajdis kun la sinjorino de tridek vintroj de aĝo suden..."

"Ĉu vi vidos ĉu vi povos elpensi ion novan pri la pado de la vakeroj, Alisande?"

"Jes ja, mia bona sinjoro."

"Do plui. Mi ne interrompos ĉifoje, se mi povos helpi tion. Komencu denove; nur eki, kaj paroli pri ĉio, kaj mi plenigos mian pipon kaj bone atentos."

"Nun ni turnas nin al Sir Marhaus, kiu rajdis kun la sinjorino de tridek vintroj de aĝo suden. Kaj ili venis al profunda arbaro, kaj tie pasigis la nokton, kaj ili plurajdis en profunda vojo, kaj fine ili venis al palaco kie loĝis la duko de la Sudaj Marĉoj, kaj tie ili petis loĝejon. Kaj matene, la duko vokis Sir Marhaus kaj petis lin veni. Kaj do Sir Marhaus ellitiĝis kaj prenis siajn armilojn, kaj meso estis kantata antaŭ li, kaj li matenmanĝis, kaj surĉevaliĝis en la korto de la kastelo, tie ili batalos. Do tie jam estis la duko surĉevale, armita, kun siaj ses filoj, kaj ĉiu havis lancon enmane, kaj tiel ili renkontiĝis, dum la duko kaj liaj du filoj rompis siajn lancojn al li, sed Sir Marhaus levis sian lancon kaj tuŝis neniun el ili. Tiam venis la kvar filoj po du, kaj du el ili rompis siajn lancojn, kaj same faris la aliaj du. Kaj dum la tuta tempo, Sir Marhaus ne tuŝis ilin. Poste, Sir Marhaus kuris al la duko, kaj batis lin per sia lanco, tiel ke ĉevalo kaj viro falis alteren. Kaj same li servis liajn filojn. Kaj poste Sir Marhaus iris suben kaj ordonis al la duko kapitulaci, aŭ li mortigos lin. Kaj poste kelkaj el liaj filoj reviviĝis, kaj intencis ataki Sir Marhaus. Tiam Sir Marhaus diris al la duko: Haltigu viajn filojn, aŭ mi faros al vi ĉion. Kiam la duko vidis ke li eble ne evitos la morton, li kriis al siaj filoj ke ili kapitulacu al Sir Marhaus. Kaj ili ĉiuj falis surgenuen kaj donis la tenilojn de siaj glavoj al la kavaliro, kaj li akceptis ilin. Kaj

poste ili helpis sian patron ekstari, kaj ili ĉiuj unuanime promesis al Sir Marhaus ke ili neniam estos malamikoj de reĝo Arturo, kaj ke poste je pentekosto, li kaj liaj filoj venos kaj akceptos la gracon de la reĝo.

Ĝuste tion diras la rakonto, bona Sir Estro. Nun vi sciu ke ĝuste tiu duko kaj liaj ses filoj estas tiuj, kiun ankaŭ vi antaŭ kelkaj tagoj venkis kaj sendis al la kortego de Arturo!"

"Sed Alisande, vi ne povas serioze diri tion!"

"Se mi ne diras la veron, la sekvoj trafu min."

"Nu nu nu – kiu iam kredus ion tian? Unu granda duko kaj ses dukidoj; nu, Alisande, ja estis eleganta kapto. Kavalirvagado estas tre stulta profesio, laciga kaj streĉa laboro, sed mi komencas kompreni ke tamen *estas* mono en ĝi, se vi estas bonŝanca. Ne ke mi iam laborus pri ĝi kiel negoco; ĉar mi ne farus. Neniu sana kaj laŭleĝa negoco povas esti fondata sur spekulado. Sukcesa kirlo en la ekzercado de kavalirvagado – kio estas tio, kiam vi forblovas la sensencaĵojn, kaj restas nur malvarmaj faktoj? Nur angulo de porkaĵo, kaj el tio vi povas fari nenion. Vi estas riĉa – jes – subite riĉa – dum ĉirkaŭ unu tago, eble semajno; poste iu ekspluatos la merkaton kontraŭ vi, kaj tiam via borso falos; ĉu ne estas tiel, Alisande?"

"Se estas tiel ke mia animo malfunkcias, kaj montras simplan lingvon en tia maniero ke la vortoj ŝajnas stari kaj disfali..."

"Ne servas al io ĉirkaŭiri kaj solvi ĉion tiel, Alisande; estas *tiel*, ĝuste kiel mi diras. Mi *scias* ke estas tiel. Kaj cetere, kiam vi venas al la praroko, kavalirvagado estas eĉ pli aĉa ol porkaĵo; ĉar kio ajn okazas, la porkaĵo restas, kaj do almenaŭ iu profitis; sed kiam la merkato falas, en kirlo de kavalirvagado, kaj ĉiu kavaliro aldonas siajn havaĵojn, kiujn tiajn vi do havas? Nur stakon de disbatitaj kadavroj kaj unu aŭ du barelojn de frakasitaj feraĵoj. Ĉu vi povas nomi *tiujn* havaĵoj? Mi certe preferas porkaĵon. Ĉu mi pravas?"

"Ho, eble ĉar mia kapo estas konfuzita pro la multaj aferoj de la ĵusaj aventuroj, pro kiuj ne nur mi, ne nur vi, sed ni ĉiuj, ŝajnas al mi..."

"Ne, ne estas via kapo, Alisande. Ĝi estas bona, laŭ la cirkonstancoj, sed vi ne konas negocadon; tie estas la problemo. Ne taŭgas al vi argumenti pri negocado, kaj vi agas malĝuste se vi ĉiam provas. Tamen, krom tio, ja estis bona kapto, kaj ĝi naskos bonajn reputaciojn en la kortego de Arturo. Kaj parolante pri la vakeroj, kiel stranga lando estas ĉi tio por virinoj kaj viroj kiuj neniam iĝas maljunaj. Nun jen Morgan le Fay, same freŝa kiel juna kokino, ŝajnas, kaj jen tiu maljuna duko de la Sudaj Marĉoj ankoraŭ

hakanta per glavo kaj lanco en sia aĝo, edukinte tian familion kiel lia. Kiel mi komprenis la aferon, Sir Gawaine mortigis sep el liaj filoj, kaj li ankoraŭ havis ses, kiujn Sir Marhaus kaj mi venigu al la kampadejo. Kaj ankaŭ estis la sinjorino, aĝa de sesdek vintroj, kiu ankoraŭ ĉirkaŭiras en sia frosta florado – Kiel aĝa vi estas, Alisande?"

Estis la unua fojo, kiam mi trafis trankvilan punkton en ŝi. La muelilo haltis por esti riparita, aŭ io. Inter la sesa kaj la naŭa, ni iris dek mejlojn, kio estis sufiĉe multe por ĉevalo kiu portis viron, virinon kaj armaĵon; poste ni haltis por longa tagmezo sub kelkaj arboj ĉe klara rivereto.

Kaj tiam venis kavaliro rajdanta; kaj kiam li proksimiĝis li dolorplene ĝemis, kaj per la vortoj mi komprenis ke li blasfemis kaj malbenis, kaj tamen mi estis ĝoja ke li venis, ĉar mi vidis ke li portis afiŝtabulon, sur kiu estis skribite per leteroj brile oraj:

"Uzu la profilaktikan dentobrosilon de Peterson – faras ĉion!"

Mi estis ĝoja ke li venis, ĉar ĝuste per tiu signo, mi sciis ke li estis unu el miaj kavaliroj. Estis Sir Madok de la Montaine, grandkorpa ulo kies ĉefa atingo estis kiam li preskaŭ sendis Sir Lanceloton super lia ĉevalvosto. Li neniam restis longe ĉe

fremdulo sen trovi iun aŭ alian pretekston menci tion. Sed estis alia fakto preskaŭ same granda, kiun li neniam premis al iu alia senpete, kaj tamen neniam prisilentis kiam petata: tio estas, ke la kialo ke li ne tute sukcesis estis, ke li estis interrompita kaj mem falis super ĉevalvosto. Tiu senkulpa ulo ne vidis iun gravan malsamecon inter tiuj du faktoj. Mi ŝatis lin, ĉar li estis serioza en sia laboro, kaj tre valora. Kaj estis tiel bone rigardi lin, kun siaj larĝaj kirasitaj ŝultroj, kaj sia granda leoneca kapo, kaj sia granda ŝildo kun la amuza bildo de gantita mano prenanta profilaktitan dentobrosilon, kun la slogano: "*Provu Nefarution*". Tio estis dentopasto, kiun mi lanĉis.

Li estis laca, li diris, kaj fakte li aspektis tia; sed li ne volis elĉevaliĝi. Li diris ke li ĉasis la stovpolurilulon; kaj dirinte tion, li denove komencis blasfemi kaj malbeni. La afiŝtabululo menciita estis Sir Ossaise de Surluse, kuraĝa kavaliro, kaj sufiĉe fama ĉar li iam provis batali en turniro kun neniu malpli ol Sir Gaheris mem – tamen sensukcese. Li havis leĝeran kaj ridantan temperamenton, kaj por li nenio en ĉi tiu mondo estis serioza. Ĝuste tial mi elektis lin por krei stovpolursenton, Ne ankoraŭ ekzistis stovoj, do povis esti nenio serioza pri stovpolurilo. La ulo devis nur rapide kaj iom post iom pretigi la

publikon por la granda ŝanĝo, kaj igi ĝin anticipe ŝati purecon por la tempo kiam la stovo aperos.

Sir Madok estis tre amara, kaj denove ekblasfemis. Li diris ke li ĉifonigis sian animon per la blasfemado; kaj tamen li ne intencis elĉevaliĝi, nek ripozi, nek aŭskulti iun konsoladon, ĝis li trovos Sir Ossaise kaj solvos la aferon. Ŝajnis, laŭ tio kion mi povis kombini de la neblasfemaj fragmentoj de lia parolado, ke li hazarde renkontis Sir Ossaise frumatene, kaj ke tiu diris al li ke se li volus iri rekte tra la kampoj kaj marĉoj kaj rompitaĵoj kaj maldensejoj, li povus bridi vojaĝantaron kiu estus maloftaj aĉetantoj de profilaktaĵoj kaj dentopastoĵoj. Kun tipa fervoro, Sir Madok ekiris, kaj post tri horoj de terura trarajdado, li kaptis sian predon. Estis la kvin patriarĥoj liberigitaj el la karceroj la pasintan vesperon! Kompatindaj maljunuloj, nur antaŭ dudek jaroj iu el ili ankoraŭ havis restantan denton.

"Nu nu nu lin," diris Sir Madok, "se mi ne stovpoluros lin se mi trovos lin, lasu tion al mi; ĉar neniam iu kavaliro, ĉu Ossaise aŭ iu alia, faros al mi tian malbonan servon kaj daŭre vivos, se mi trovos lin, kaj ke mi faros tion, mi hodiaŭ sincere ĵuris."

Kaj kun tiuj vortoj kaj aliaj, li leĝere prenis sian lancon kaj foriris. Meze de la posttagmezo, ni mem renkontis unun el tiuj patriarĥoj, ĉe la

limo de malriĉa vilaĝo. Li varmigis sin per la amo de parencoj kaj amikoj, kiujn li ne vidis dum kvindek jaroj; kaj ĉirkaŭ lin, karesantaj lin, estis ankaŭ idoj de lia propra korpo, kiujn li tute ne vidis ĝis nun; sed por li, ĉiuj tiuj estis fremduloj, lia memoro estis for, lia animo estis senviva. Ŝajnis nekredinde ke iu homo povus travivi duonan jarcenton enŝlosita en malluma truo kiel rato, sed ĉi tie estis lia maljuna edzino kaj kelkaj malnovaj kamaradoj, kiuj povis atesti pri tio. Ili povis memori lin kia li estis en la freŝeco kaj forto de liaj junaj jaroj, kiam li kisis sian infanon kaj donis ĝin al la manoj de ĝia patrino, kaj foriris en tiun longan forgeson. La homoj en la kastelo ne povis diri ene de duona generacio kiom longe la viro estis enŝlosita pro sia nekonata kaj forgesita krimo; sed tiu maljuna edzino sciis; kaj same faris ŝia maljuna infano, kiu staris tie inter ŝiaj geedziĝintaj gefiloj kaj provis kompreni patron kiu estis al ŝi nomo, penso, senforma bildo, tradicio, dum ŝia tuta vivo, kaj kiu nun estis subite konkreta karno kaj sango, kaj starigita antaŭ ŝia vizaĝo.

Estis stranga situacio; tamen ne tial mi donis lokon al ĝi ĉi tie, sed pro io kio ŝajnis al mi eĉ pli stranga. Nome, ke tiu terura subpremado ne igis la subprematoj koleri kontraŭ siaj subpremantoj. Ili estis heredantoj kaj celoj de krueleco tiel longe, ke nenio povis surprizi ilin krom ĝentileco. Jes,

tio fakte estis stranga revelacio, kiel profunde tiu popolo sinkis en sklaveco. Ilia tuta vivo estis reduktita al monotona, morta nivelo de pacienco, rezigno, muta, senplenda akcepto de kio ajn okazos al ili dum ĉi tiu vivo. Eĉ ilia imagkapablo estis morta. Kiam vi povas diri tion pri homo, mi supozas ke li falis plej profunde; ne estas por li pli profunda abismo.

Mi fakte deziris ke mi estus irinta iun alian vojon. Ĉi tio ne estis tia sperto kian ŝtatisto devus renkonti, dum li enmense planis pacan revolucion. Ĉar ĝi ne povis ne venigi la neeviteblan fakton ke, malgraŭ ĉiu ĝentila babilado kaj filozofiado, neniuj popolo en la mondo iam liberiĝis per piaj vortoj kaj bona moralo; estas neŝanĝebla leĝo ke ĉiuj revolucioj sukcesontaj devas *komenciĝi* en sango, kio ajn okazos poste. Se la historio instruas ion ajn, ĝi instruas tion. Kion tiuj homo bezonis do estis terorreĝimon kaj gilotinon, kaj mi estis malĝusta homo por ili.

20. La kastelo de la trolo

Du tagojn poste, je tagmezo, Alisande komencis montri signojn de ekscito kaj febra atendado. Ŝi diris ke ni proksimiĝis al la kastelo de la trolo. Mi ricevis malkomfortan ŝokon. La celo de nia vojaĝo iom post iom estis malaperinta el miaj pensoj; ĉi tiu subita revivigo de ĝi igis ĝin sajni tute vera kaj surpriziga dum momento, kaj vekis en mi akran intereson. Ĉiuminute, Alisande pli ekscitiĝis; kaj same mi, ĉar tiaj aferoj infektas. Mia koro ekbategis. Oni ne povas rezonadi kun sia koro; ĝi havis siajn proprajn leĝojn, kaj batas pri aferoj kiujn la intelekto malestimas. Baldaŭ, kiam Alisande forglitis de la ĉevalo, donis al mi signon ke mi haltu, kaj kaŝe rampis, kun la kapo klinita preskaŭ al la genuoj, al vico de arbustoj proksime de krutaĵo, mia koro batis pli forte kaj rapide. Kaj tiel estis ĝis ŝi povis kaŝe rigardi super la deklivo; kaj same dum mi rampis al ŝia flanko surgenu. Ŝiaj okuloj brilis nun, kiam ŝi indikis per fingro, kaj anhelante flustris:

"La kastelo! La kastelo! Vidu, kiel ĝi staras!"

Kiel bonvenan seniluziiĝon mi spertis! Mi diris:

"Kastelo? Ja estas nur porkejo; porkejo kun palisaro ĉirkaŭe."

Ŝi ŝajnis surprizita kaj malgaja. La vivo malaperis el ŝia vizaĝo; kaj dum longa tempo, ŝi estis perdita en pensoj kaj silenta. Poste:

"Ĝi ne estis sorĉita antaŭe," ŝi diris pripensante, kiel al si mem. "Kaj kiel stranga estas ĉi tiu miraklo, kaj kiel timiga – ke por unu spektanto ĝi estas sorĉita kaj ŝajnas malalta kaj sed por alia spektanto ĝi ne estas sorĉita, neniel ŝanĝiĝis, sed ankoraŭ staras same solide, ĉirkaŭata de fosaĵo, kun flagoj flirtantaj al la blua ĉielo el la turoj. Kaj Dio protektu nin, kiel pikas la koron vidi denove ĉiujn graciajn malliberulojn, kaj la malĝojon pli profundan en iliaj dolĉaj vizaĝoj! Ni estas malfruaj, kaj meritas mallaŭdon."

Mi komprenis la indikon. La kastelo estis sorĉita al *mi*, ne al ŝi. Mi malŝparis tempon se mi provus argumenti kontraŭ ŝia iluzio, tio ne eblus; mi devis teni ŝin en bona humoro. Do mi diris:

"Ĉi tio estas ofta okazo – ke io estas sorĉita al unu okulo, dum al alia ĝi aperas en sia vera formo. Vi aŭdis pri tio antaŭe, Alisande, kvankam vi hazarde ne mem spertis ĝin. Sed nenio malbona okazis. Fakte, estas feliĉe ke estas tiel kiel estas. Se tiuj sinjorinoj estus porkoj al ĉiuj kaj al si mem, estus necese rompi la sorĉon, kaj eble estus maleble se oni ne trovus ekzakte kiel ĝi funkciis. Kaj ankaŭ riske, ĉar se oni provas malsorĉi sen havi la ĝustan klavon, oni facile eraras, kaj faras

el la porkoj hundojn, kaj el la hundoj katojn, kaj le la katoj ratojn, kaj tiel plu, kaj finfine reduktas onian materialon en nenion, aŭ en senodoran gason kiun oni ne povas sekvi – kio, kompreneble, esence estas la sama afero. Sed ĉi tie, bonŝance, nenies okuloj krom miaj propraj estas sub la sorĉo, do ne estos sekvoj se oni nuligos ĝin. Ĉi tiuj sinjorinoj restas sinjorinoj por vi, kaj por si mem, kaj por ĉiuj aliaj; kaj samtempe ili neniel suferos pro mia eraro, ĉar kiam mi scias ke iu ŝajna porko fakte estas sinjorino, tio sufiĉas por mi, mi scias kiel trakti ŝin."

"Dankon, ho bona sinjoro, vi parolas kiel anĝelo. Kaj mi scias ke vi liberigos ilin, ĉar vi ŝatas fari grandajn agojn kaj vi havas manojn same fortajn kaj volon same firman kiel iu kavaliro nun vivanta."

"Mi ne lasos principon en la porkejo, Alisande. Ĉu ĉi tiuj tri, kiuj al miaj erarantaj okuloj ŝajnas malsataj porkistoj..."

"La *troj*? Ĉu ankaŭ *ili* ŝanĝiĝis? Vere mirige. Nun mi timas; ĉar kiel vi povas celkonscie bati, kiam duono de ilia alteco estas al vi nevidebla? Ho, estu singarda, bona sinjoro; ĉi tio estas pli malfacila ol mi kredis."

"Estu trankvila, Alisande. Mi devas scii nur *kiom* de troj estas nevideblaj; tiam mi scios kiel

trafi esencan organon. Ne timu, mi baldaŭ nuligos tiujn trompistojn. Restu kie vi estas."

Mi lasis Alisanden surgenue tie, kadavrovizaĝa sed kuraĝa kaj esperplena, kaj rajdis suben al la porkejo, kaj faris interkonsenton kun la porkistoj. Mi gajnis ilian dankemon aĉetante ĉiujn porkojn por la ronda sumo de dek ses pencoj, kio estis iom super la oficiala prezo. Tio estis lastmomente; ĉar la Eklezio, la posedanto de la bieno, kaj la aliaj impostkolektantoj venus la postan tagon kaj kolektus preskaŭ ĉiujn bestojn, lasante la porkistojn sufiĉe senporkaj kaj Alisanden senprincina. Sed nun la impostuloj povis esti pagataj kontante, kaj tamen restis io. Unu el la viroj havis dek infanojn; kaj li diris ke lastjare, kiam pastro venis kaj el liaj dek porkoj prenis la plej grasan, kiel dekonaĵon, lia edzino atakis lin, ofertis al li infanon anstataŭe, kaj diris:

"Vi besto sen ono de kompato, kial lasi mian infanon, sed rabi kion mi bezonas por doni al ĝi manĝon?"

Kiel strange. La sama afero okazis en Kimrio dum mia tempo, sub la sama malnova Establita Eklezio, kiun multaj kredis ŝanĝis sian naturon kiam ĝi ŝanĝis sian veston.

Mi forsendis la tri virojn, kaj poste mi malfermis la porkejpordon kaj indikis al Alisande ke ŝi venu – kion ŝi faris; kaj ne

trankvile, sed rapide kiel herbeja fajro. Kaj kiam mi vidis ŝin ĵeti sin al tiuj porkoj, kun ĝojlarmoj fluantaj sur sia vizaĝo, kaj premi ilin al sia koro, kaj kisi ilin, kaj karesi ilin, kaj alparoli ilin respekteme per iliaj princaj nomoj, mi hontis pro ŝi, hontis pro la homaro.

Ni devis hejmenigi tiujn porkojn – dek mejlojn; kaj neniuj sinjorinoj iam estis pli kapricaj aŭ kontraŭaj. Ili volis resti en neniu vojo, en neniu pado; ili trarompis la buŝojn ĉiuflanke, kaj forfluis en ĉiujn direktojn, super rokoj, kaj montetoj, kaj la plej krudaj lokoj kiujn ili povis trovi. Kaj ili ne devis esti batataj, aŭ krude alparolataj; Alisande ne eltenus vidi ilin traktataj en maniero kiu ne taŭgis al ilia rango. La problemkaŭzanta maljuna porkino devis esti alparolata per "sinorino", kaj "via moŝto", kiel la aliaj. Estas iritige kaj malfacile kuri post porkoj, en armaĵo. Estis unu eta grafino, kun fera ringo en la muzelo kaj apenaŭ haroj sur la dorso, kiu estis la plej diabla. Ŝi devigis min kuri dum tuta horo, super ĉia tero, kaj poste ni estis ĝuste kie ni ekkuris, farinte neniun veran progreson. Finfine mi ekprenis ŝian voston, kaj tiris ŝin dum ŝi kriis. Kiam mi atingis Alisanden, ŝi terure ektimis, kaj diris ke estis, milde dirite, malĝentile tiri grafinon per ŝia trenajo.

Ni hejmenigis la porkojn ĝuste kiam mallumiĝis – la plej multajn. La princino

Nerovens de Morganore ne ĉeestis, nek du el la servistinoj, nome fraŭlino Angela Bohun kaj fraŭlino Elaine Courtemains, el kiuj la unua estis nigra porkino kun blanka stelo sur la frunto, kaj la dua bruna kun maldikaj kruroj kaj leĝere lamanta per la antaŭa dekstra – du el la plej maltrakteblaj estaĵoj, kiujn mi iam vidis. Inter la mankantaj estis ankaŭ pluraj simplaj baroninoj – kaj mi volis ke ili restu mankantaj; sed ne, ĉio kolbasviando estis trovenda; do servistoj estis elsendataj kun torĉoj por tiucele traserĉi la arbarojn kaj montetojn.

Kompreneble, la tuta aro estis loĝigata en la domo, kaj diable! – ne, mi neniam vidis ion similan. Nek iam aŭdis pri io simila. Estis kiel ribelo en gasrezervujo.

21. La pilgrimoj

Kiam mi finfine enlitiĝis, mi estis nedireble laca; la streĉado, kaj la ripozo por la longe trouzitaj muskoloj, kiel lukse, kiel agrable! Sed pli ol tio mi ne atingis – dormo ankoraŭ ne eblis. La tirado kaj kriado de la nobeloj tra ĉiuj haloj kaj koridoroj estis nova pandemonio, kiu tenis min tute maldormanta. Dume, kompreneble, miaj pensoj kuradis; kaj ĉefe ili pritraktis la strangan iluzion de Alisande. Jen ŝi, tiel sana persono kiel la lando povis montri; kaj tamen, el mia perspektivo, ŝi agis kiel frenezulino. Mia lando, la potenco de edukado, de influo, de studado! Ĝi povas igi iun kredi ion ajn. Mi devis meti min en la lokon de Alisande por kompreni ke ŝi ne estis freneza. Jes, kaj meti ŝin en mian lokon, por montri kiel facile estas ŝajni freneza al iu kiu ne lernis same kiel vi lernis. Se mi dirus al Alisande ke mi vidis veturilon, sen ia ajn magio, moviĝi kvindek mejlojn hore; ke mi vidis homon, sen magiaj povoj, eniri korbon kaj ŝvebi inter la nuboj ĝis ne plu videbla; kaj aŭdis, sen la helpo de iu nekromanciisto, konversacion de homo plurcent mejlojn for; tiam Alisande ne nur kredus ke mi estas freneza, ŝi kredus ke ŝi scias tion. Ĉiuj ĉirkaŭ ŝi kredis je magiaĵoj; neniuj havis iujn dubojn; dubi ke kastelo povas iĝi porkejo, kaj ĝiaj loĝantoj porkoj, estus la sama afero kiel se

mi dubus inter konektikutanoj la realecon de la telefono kaj ĝiaj mirakloj – kaj en ambaŭ okazoj tio tute pruvis malsanan animon, malstabilan rezonadon. Jes, Alisande estis mense sana; tion oni devas agnoski. Se ankaŭ mi volis esti mense sana – al Alisande – mi devis silenti pri miaj superstiĉoj pri nesorĉitaj kaj nemiraklaj lokomotivoj, balonoj kaj telefonoj. Cetere, mi kredas ke la mondo ne estas plata, kaj ne havas kolonojn sub si kiel apogon, nek baldakenon super si por fortenti universon de akvo kiu plenigis la tutan spacon supre; sed ĉar mi estis la sola homo en la regno kun tiel malpiaj kaj krimaj opinioj, mi komprenus ke estus saĝe silenti ankaŭ pri tio, se mi ne volis estis subite forlasata de ĉiuj kiel frenezulo.

La venontan matenon, Alisande kunvenigis la porkojn en la manĝejo kaj donis al ili matenmanĝon, servis ilin persone kaj ĉiel montris la profundan respekton, kiun la denaskuloj de ŝia insulo, antikvaj kaj modernaj, ĉiam sentis por rango, kia ajn estus ĝia ekstera formo kaj ĝia mensa kaj morala enhavo. Mi povus manĝi kun la porkoj, se mi havus denaskan rangon similan al mia alta oficiala; sed tion mi ne havis, do mi akceptis la neeviteblan prestiĝoperdon kaj ne plendis. Alisande kaj mi matenmanĝis ĉe la dua tablo. La familio ne estis hejme. Mi diris:

"Kiom estas en la familio, Alisande, kaj kie ili nun estas?"

"Familio?"

"Jes."

"Kiu familio, mia bona sinjoro?"

"Nu, ĉi tiu familio; via propra familio."

"Bedaŭrinde, mi ne komprenas. Mi ne havas familion."

"Ĉu ne? Sed Alisande, ĉu ĉi tio ne estas via hejmo?"

"Kiel povus esti? Mi ne havas hejmon."

"Do, kies domo ĉi tio estas?"

"Tion mi dirus al vi, se mi mem scius."

"Ĉu vi eĉ ne konas ĉi tiujn homojn? Do, kiu invitis nin ĉi tien?"

"Neniu invitis nin. Ni nur venis; jem ĉio."

"Jen, virino, plej eksterordinara spektaklo. Pli impertinente ol imageble. Ni trankvile iras en ies domon, kaj plenigas ĝin per la solaj veraj nobeloj surtere sur kiuj la suno iam lumis, kaj poste montriĝas ke ni eĉ ne scias kiel li nomiĝas. Kiel vi iam kuraĝis premesi al vi tion? Mi supozis, kompreneble, ke estas via hejmo. Kion diros la homo?"

"Kion li diros? Kion li povos diri, krom danki nin?"

"Danki nin pro kio?"

Ŝia mieno estis nekomprenanta kaj surprizita.

"Vere, mi ne komprenas viajn strangajn vortojn. Ĉu vi kredas ke homo kiel li havus dufoje en sia vivo la honoron bonvenigi tiajn homojn kiel ni venigis al lia domo?"

"Nu, se vi pensas tiel. Ne, oni povas veti ke nun por la unua fojo li estas tiel traktata."

"Do lasu lin esti dankema, kaj esprimi tion per dankemaj vortoj kaj deca humileco; se ne, li estus hundo, kaj heredanto kaj prapatro de hundoj."

Por mi, la situacio estis malkomforta. Ĝi eble estos pli tia. Povus esti bona ideo kunigi la porkojn kaj pluiri. Do mi diris:

"La tago pasas, Alisande. Estas tempo kunigi la nobelojn kaj ekiri."

"Kial, bona sinjoro kaj estro?"

"Ni volas venigi ilin al ilia hejmo, ĉu ne?"

"Ho, aŭdu lin! Ili venas el ĉiuj partoj de la tero! Ĉiu devas rapidi al sia propra hejmo; aŭ ĉu vi kredas ke ni povas fari ĉiujn tiujn vojaĝojn dum unu vivo tiel mallonga kiel Tiu ordonis kiu kreis la vivon, kaj same la morton kun la helpo de Adam, kiu per peko persvadita de sia edzino, kiu estis trompita kaj forlogita de la granda malamiko de la homo, tiu serpento nomita Satano, antaŭe konsekrita kaj apartigita al tiu malica laboro venkante kontraŭon kaj envion en lia koro tra sovaĝaj ambicioj kiuj portis melduon kaj ŝimon al naturo iam tiel blanka kaj pura kiam ĝi estis kune kun siaj fratoj, lumantaj kaj multaj,

naskitaj en maldensejo kaj ombro de tiu bela
ĉielo en kiu ĉiuj estas denaskaj al tiu riĉa bieno
kaj..."

"Ho dio!"

"Sinjoro?"

"Nu, vi scias ke ni ne havas tempon por tiaj
aferoj. Ĉu vi ne komprenas, ni povus disigi tiujn
homojn en la tuta mondo pli rapide ol vi bezonas
por klarigi ke ni ne povas fari tion. Ni ne
interparolu nun, ni agu. Vi volas esti singarda; vi
ne lasu vian muelilon movi vin tiel, en momento
kiel la nuna. Nun ek – kaj akre. Kiu hejmenigos
la aristokratojn?"

"Kompreneble iliaj amikoj. Tiuj venos al ili el
la foraj anguloj de la tero."

Tio estis fulmo el klara ĉielo, ĉar neatendita;
kaj la malŝargiĝo estis kiel pardono al
malliberulo. Komprenebla, ŝi restos por liveri la
aĵojn.

"Do, Alisande, ĉar nia entrepreno estas bele
kaj sukcese finita, mi iros hejmen kaj raportos;
kaj se iam alia..."

"Ankaŭ mi estas preta; mi iros kun vi."

La pardono estis nuligita.

"Ĉu? Vi iros kun mi? Kial?"

"Ĉu vi kredas ke mi perfidos mian kavaliron?
Tio estus malhonorige. Mi ne rajtas disiri de vi
antaŭ ol en kavalira renkontiĝo en la kampo iu pli
forta kavaliro ĝuste venkos kaj ĝuste portos min.

Mi estus mallaŭdinda se mi kredus ke tio povos iam okazi."

"Elektita por longa mandato," mi suspiris al mi mem. "Preferinde, mi uzos la situacion plej bone."

Do mi ekdiris:

"Bone, ni ekiru."

Dum ŝi foriris por larme adiaŭi la porkojn, mi donis la tutan nobelaron al la servistoj. Kaj mi petis ilin preni brosilon kaj brosi iom kie la nobeloj ĉefe loĝis kaj promenis; sed ili opiniis ke tio apenaŭ valorus la penon, kaj cetere estus sufiĉe grava devio de la kutimoj, kaj tial kaŭzus klaĉadon. Devio de la kutimoj – tio estis decida; jen nacio preta fari iun ajn krimon, krom tio. La servistoj diris ke ili sekvos la kutimojn, kutimoj kiuj iĝis sanktaj ĉar respektataj ekde tempo antaŭ ĉiuj memoroj; ili metos freŝan skirpon sur ĉiuj plankoj, kaj poste ne plu videblis la spuroj de la nobela vizito. Estis ia satiro al la naturo; estis la scienca metodo, la geologia metodo; ĝi metis la historion de la familio en tavoloita dokumento; kaj la historiisto povos trafolumi ĉion, kaj konstati per la restaĵoj de ĉiu periodo kiujn dietajn ŝanĝojn la familio enkondukis sinsekve dum cent jaroj.

La unua afero kiun ni renkontis tiun tagon estis procesion de pilgrimoj. Ĝi ne iris nian vojon, sed ni tamen aliĝis al ĝi, ĉar ĉiuhore mi nun pli

bone komprenis ke se mi volas regi tiun landon saĝe, mi devos informiĝi pri la detaloj de ĝia vivo, kaj ne malrekte, sed per propraj observado kaj ekzamenado.

Ĉi tiu aro de pilgrimoj similis al tiu de Chaucer tiel: ke estis en ĝi homoj el ĉiuj altnivelaj profesioj kiujn la lando povis montri, kaj koresponda varieco de vestaĵoj. Estis tie viroj junaj kaj maljunaj, virinoj junaj kaj maljunaj, homoj gajaj kaj seriozaj. Ili rajdis sur muloj kaj ĉevaloj, kaj ne estis tie eĉ unu porvirina selo; ĉar tiu specialaĵo restos nekonata en Anglio dum ankoraŭ naŭcent jaroj.

Estis agrabla, amikeca, sociema vojaĝantaro; pia, feliĉa, gaja kaj plena de nekonscia akreco kaj senkulpaj maldececoj. Kion ili rigardis kiel gaja rakonto ĉirkaŭiris kaj ne ĝenis pli ol en la plej bona angla socio dek du jarcentojn poste. Praktikaj ŝercoj, dignaj al la anglaj cerboj en la unua kvarono de la malproksima deknaŭa jarcento, okazis kelkloke laŭvice, kaj kaŭzis la plej amuzitajn aplaŭdojn; kaj kelkfoje, kiam brila rimarko estis farata je unu pinto de la procesio kaj komencis sian vojaĝon al la alia, vi povis noti kiel ĝi iris per la ridado kiun ĝi kaŭzis laŭ sia vojo; kaj ankaŭ per la ruĝiĝo de la muloj post ĝi.

Alisande konis la celon de ĉi tiu pilgrimado, kaj ŝi informis min. Ŝi diris:

"Ili iras al la Valo de Sankteco, por esti benataj de la diecaj pilgrimoj kaj trinki la miraklan akvon kaj iĝi puraj de pekoj."

"Kie estas tiu akviga loko?"

"Ĝi situas dutagan vojaĝon de ĉi tie, ĉe la limo de la lando kiu nomiĝas Kukola Regno."

"Rakontu al mi pri ĝi. Ĉu estas fama loko?"

"Ho, jes, certe. Ne ekzistas loko pli fama. Antaŭlonge vivis tie abato kaj liaj monaĥoj. Verŝajne ne estis en la mondo homoj pli sanktaj ol ili; ĉar ili ĉiam studis piajn librojn, kaj neniam parolis unu al alia, aŭ fakte al iu ajn, kaj manĝis putrintajn plantojn kaj nenion pli, kaj dormis malmole, kaj preĝis multe, kaj lavis sin neniam; kaj ili portis la samajn vestaĵojn ĝis ili falis el iliaj korpoj pro aĝo kaj disfalo. Tute ĝuste, ili iĝis konataj en la tuta mondo pro tiuj sanktaj severecoj, kaj vizitataj de homoj riĉaj kaj malriĉaj, kaj respektataj."

"Diru pli."

"Sed ĉiam mankis tie akvo. Dum iam la sankta abato preĝis, responde granda fluo de klara akvo mirakle aperis en dezerto. Nun la kapricaj monaĥoj estis tentataj de la Diablo, kaj ili seninterrompe luktis kun sia abato, kaj petegis lin ke li konstruu banon; kaj kiam li estis laca kaj ne plu povis rezisti, li diris ke do estu laŭ via volo, kaj li promesis ke li tiel faros. Nun rimarku kio estas forlasi la purecon kiun Li amas, kaj ludi kun

pureco monda kaj ofenda. Tiuj monaĥoj ja eniris la banon, kaj eliris ĝin lavitaj kaj blankaj kiel neĝo; kaj vidu! En tiu momento aperis Lia signo mirakle mallaŭdanta ilin! Ĉar lia ofendita akvo ĉesis flui, kaj tuttute malaperis."

"Ili estis milde punataj, Alisande, se oni konsideras kiel oni rigardas tiajn krimojn en ĉi tiu lando."

"Ho jes; sed estis ilia unua peko; kaj ili longe vivis perfekte, kaj neniel malsimilis al la anĝeloj. Preĝoj, larmoj, turturado de la karno, ĉio estis vane, kaj la akvo ne denove ekfluis. Eĉ procesioj, eĉ bruloferoj, eĉ votaj kandeloj al la Virgulino – ili ĉiuj malsukcesis; kaj la tuta lando miris."

"Kiel strange trovi ke eĉ ĉi tiu industrio havas siajn financajn panikojn, kaj foje vidas ke la moneroj kaj banknotoj havos nulan valoron, kaj ĉio haltas. Pluparolu, Alisande!"

"Do iam, post jaro kaj tago, la bona abato humile kapitulacis kaj detruis la banon. Kaj vidu, Lia kolero tiam malaperis, kaj la akvo riĉe refluis, kaj eĉ ĝis hodiaŭ ĝi ne ĉesis flui same senmezure."

"Do mi supozas ke neniuj lavis sin poste."

"Kiu provus tion, tiu povus havi sian kaprimenon senpage; jes, kaj rapide li bezonus ĝin."

"La komunumo poste prosperis?"

"Ĝuste ekde tiu tago. La famo de la miraklo disvastiĝis al ĉiuj landoj. El ĉiuj landoj venis monaĥoj por aliĝi; ili venis en svarmoj, ĝuste kiel fiŝoj; kaj la monaĥeĥejo havis unu novan domon post la alia, ĉiam pliaj, kaj tiel malfermis siajn brakojn kaj akceptis ilin. Kaj ankaŭ monaĥinoj venis; kaj pli da ili, kaj eĉ pli; kaj konstruis monaĥinejon sur la mala flanko de la valo, kaj aldonis domon post domo, ĝis ĝi estis granda. Kaj tiuj estis amikecaj al la aliaj, kaj ili kune amlaboris, kaj kune ili konstruis grandan hejmon por trovitaj infanoj meze en la valo inter ili."

"Vi parolis pri iuj ermitoj, Alisande."

"Ili kunvenis tien el la plej malproksimaj partoj de la tero. Ermito fartas plej bone kie estas multaj pilgrimoj. Tie mankas nenispecaj ermitoj. Se iu mencias ermiton de speco, kiun li kredas esti nova, kaj trovebla nur en iu malproksima, stranga lando, lasu lin nur skrapi la truojn kaj kavojn kaj marĉojn laŭ la Valo de Sankteco, kaj de ĉiu speco li certe trovos multajn."

Mi komencis iri apud fortika ulo kun grasa, bonhumora vizaĝo, por fari min agrabla kaj kolekti kelkajn pliajn faktetojn; sed mi apenaŭ konatiĝis kun li, kiam li, fervore kaj malgracie, komencis ekrakonti, en la sama eterna maniero, la saman malnovan anekdoton – tiun kiun Sir Dinadan rakontis al mi, kiam mi havis problemojn kun Sir Sagamor kaj estis de li

elvokata pro ĝi. Mi pardonpetis kaj iris al la malantaŭo de la procesio, kun malĝoja koro, kun volo forlasi ĉi tiun maltrankvilan vivon, ĉi tiun larmovalon, ĉi tiun mallongan tagon de rompita ripozo, de nuboj kaj ŝtormo, de laciga lukto kaj monotona malvenko; kaj tamen mi evitis la ŝanĝon, memorante kiel longa estas la eterneco, kaj kiel multaj iris tien kiuj aŭdis tiun anekdoton.

Frue posttagmeze, ni atingis alian procesion de pilgrimoj; sed en ĉi tiu estis neniu gajeco, neniuj ŝercoj, neniu ridado, neniu ludado, neniuj ĝojplena ebrio, nek de juneco nek de grizaj jaroj. Tamen ambaŭ estis tie, junaj kaj maljunaj; grizaj maljunaj viroj kaj virinoj, fortaj viroj kaj virinoj mezaĝaj, junaj edzoj, junaj edzinoj, etaj knaboj kaj knabinoj, kaj tri beboj ĉe la brusto. Eĉ la infanoj ne ridetis; estis eĉ ne unu vizaĝo inter tiuj kvindek homoj ne malgaja, ne kun tiu senespera mieno kiu estas la frukto de longaj kaj malfacilaj problemoj kaj malnova konateco kun senespero. Ili estis sklavoj. Ĉenoj iris de iliaj katenitaj piedoj kaj manoj al leda zono super iliaj talioj; kaj ĉiuj krom la infanoj estis ankaŭ ligitaj unuj al la iliaj en vico, ses futojn unu de la alia, per unusola ĉeno kiu iris de kolumo al kolumo laŭ la tuta vico. Ili iris piede, kaj estis irintaj tricent mejlojn en dek ok tagoj, manĝante la plej malmultekostajn manĝaĵojn, kaj tre malmulte. Ili dormis en tiuj ĉenoj ĉiunokte, kunligitaj kiel porkoj. Ili havis

sur la korpoj kelkajn mizerajn ĉifonojn, sed oni ne povis diri ke ili estis vestitaj. Iliaj feroj forfrotis la haŭton de iliaj piedartikoj, kaj faris vundojn kun puso kaj vermoj. Iliaj nudaj piedoj estis ŝiritaj, kaj neniu iris sen lami. Unue estis cent el tiuj kompatinduloj, sed ĉirkaŭ duono estis vendita dumvoje. La komercisto kiu respondecis pri ili rajdis ĉevalon kaj portis vipon kun mallonga tenilo kaj longa, peza skurĝo, splititan ĉe la fino en plurajn vostojn kun nodoj. Kun tiu vipo li batis la ŝultrojn de ĉiuj kiuj ŝanceliĝis pro laceco kaj doloro, kaj rektigis ilin. Li ne parolis; la vipo klarigis lian deziron sen tio. Neniu el tiuj mizeraj estaĵoj levis la rigardon, kiam ni pasis rajdante; ili montris neniun konscion pri nia ĉeesto. Kaj ili faris neniun sonon, krom unu, nome la surdan kaj teruran tinton de iliaj ĉenoj de la komenco al la fino de la longa vico, kiam kvardek tri katenitaj piedoj leviĝis kaj subentretis samtempe. La vico movigis en nubo, kiun ĝi mem faris.

Ĉiuj tiuj vizaĝoj estis grizaj kaj kovritaj de polvo. Oni vidis tian kovron sur mebloj en malplenaj domoj, kaj skribis siajn hazardajn pensojn en ĝi per sia fingro. Mi ekmemoris tion kiam mi notis la vizaĝojn de kelkaj el tiuj virinoj, junaj patrinoj portantaj bebojn kiuj estis proksimaj al morto kaj libereco, kiel io en iliaj koroj estis skribita en la polvo sur iliaj vizaĝoj,

klare videble, kaj dio, kiel klare legebla! ĉar estis la pado de larmoj. Unu el tiuj junaj patrinoj estis nur knabino, kaj pikis mian koron legi tiun skribaĵon, kaj pripensi ke ĝi venis el la brusto de tia infano, brusto kiu ne devus jam koni tiajn problemojn, sed nur la gajecon de la mateno de la vivo; kaj sendube...

Ĝuste tiam ŝi ŝanceliĝis, kapturna pro laceco, kaj tuj falis la vipo kaj forigis parton de haŭto el ŝia nuda ŝultro. Pikis min kvazaŭ ĝi trafis min kaj ne ŝin. La mastro haltigis la vicon kaj saltis el sia ĉevalo. Li kuris kaj blasfemis al la knabino, kaj diris ke ŝi jam kaŭzis sufiĉe da problemoj per sia maldiligenteco, kaj ĉar ĉi tiu ebleco estos lia lasta, li nun finos la aferon. Ŝi falis surgenuen kaj levis siajn manojn kaj komencis petegi, kaj plori, kaj krei, kun pasia timo, sed la mastro ne atentis tion. Li fortiris la infanon de ŝi, kaj poste devigis la virsklavojn ĉenitajn antaŭ kaj malantaŭ ŝi ĵeti ŝin al la tero kaj teni ŝin tie kaj malkovri ŝian korpon; kaj tiam li ekagis kun sia skurĝo kiel frenezulo, ĝis ŝia dorso estis senhaŭtigita, dum ŝi kriis kaj luktis kompatiginde. Unu el la viroj kiuj tenis ŝin forturnis sian vizaĝon, kaj pro tiu humanisma ago li estis mem skoldata kaj vipata.

Ĉiuj niaj pilgrimoj spektis kaj komentis – pri kiel sperte oni uzis la vipon. Ili estis tro hardigitaj pro dumviva ĉiutaga vidado de sklaveco por noti ke io alia en la spektaklo estis komentinda. Jen

kio sklaveco povis fari, ostigante kion oni povas nomi la superan lobon de homaj sentoj; ĉar tiuj pilgrimoj estis bonkoraj homoj, kaj ili ne permesus tiun homon trakti ĉevalon tiel.

Mi volis haltigi la tutan aferon kaj liberigi la sklavojn, sed tio ne taŭgus. Mi ne devis interveni tro kaj famiĝi por meti min mem super la leĝoj de la lando kaj la rajtoj de la civitanoj senskrupule. Se mi vivos kaj bonfartos, mi estos la morto de la sklaveco, tion mi decidis; sed mi provos aranĝi tiel, ke kiam venos la tempo mortigi ĝin, tio okazos laŭ ordono de la nacio.

Ĝuste ĉi tie estis la apudvoja loko de forĝisto; kaj nun venis terposedanto kiu aĉetis tiun knabinon antaŭ kelkaj mejloj, por livero ĉi tie kie ŝiaj feroj povis esti forigataj. Ili estis forigataj; poste estis kverelo inter la vendanto kaj la aĉetanto pri kiu pagu la forĝiston. En la momento kiam la knabino estis libera de siaj ĉenoj, ŝi ĵetis sin, freneze larmanta, en la brakojn de la sklavo kiu forturnis sian vizaĝon kiam ŝi estis vipata. Li premis ŝin al sia brusto, kaj kovris ŝian vizaĝon kaj tiun de la infano per kisoj, kaj lavis ilin per la pluvo de siaj larmoj. Mi demandis. Jes, mi pravus; ili estis geedzoj. Oni devis disigi ilin perforte; la knabinon oni devis fortiri, kaj ŝi luktis kaj batalis kaj kriis kvazaŭ freneziĝinta ĝis vojkurbiĝo kaŝis ŝin; kaj eĉ poste, ni povis aŭdeti la malfortigantajn kriojn, ĉiam pli malproksimajn.

Kaj la edzo kaj patro, kiam liaj edzino kaj infano estis for, kaj li neniam en la vivo revidos ilin? – nu, vidi lin estis tute neelteneble, do mi fortunis min; sed mi sciis ke mi neniam forigos lian bildon el mia kapo, kaj tie ĝi ankoraŭ restas, kaj tordas mian koron ĉiam kiam mi pensas pri ĝi.

Ni ekloĝis en gastejo en vilaĝo ĝuste ĉe la vesperkrepusko, kaj kiam mi venontmatene ellitiĝis kaj elrigardis, mi vidis kiel kavaliro venis rajdante en la ora gloro de la nova tago, kaj mi rekonis kavaliron mian – Sir Ozana le Cure Hardy. Li laboris por la sinjoraj vestaĵoj, kaj precipe cilindraj ĉapeloj. Li estis vestita tute en ŝtalo, en la plej bela armaĵo de tiu tempo – ĝis tie kie devus esti la helmo; sed li ne havis helmon, li portis brilan cilindran ĉapelon, kaj estis spektaklo kiel ridinda kiel oni povis voli vidi. Estis alia kaŝa plano mia por nuligi la nobelaron, farante ĝin groteska kaj absurda. El la selo de Sir Ozana pendis granda kvanto de ledaj ĉapelujoj, kaj ĉiam kiam li renkontis vagantan kavaliron, li devigis lin ĵuri ke li servos min, kaj donis al li ĉapelon kaj lasis lin porti ĝin. Mi vestiĝis kaj kuris suben por bonvenigi Sir Ozana kaj aŭdi liajn novaĵojn.

"Kiel iras la negocado?" mi demandis.

"Vi notu ke restas al mi nur ĉi tiuj kvar; sed ili estis dek ses kiam mi foriris de Kameloto."

"Nu, vi certe agis bone, Sir Ozana. Kie vi estis lastatempe?"

"Mi ĝuste nun venas el la Valo de Sankteco, se vi permesas."

"Mi mem estas survoje tien. Ĉu io okazas en la monaĥaro, krom la kutimaj aferoj?"

"Bonvolu ne demandi tion! ... Donu bonan manĝaĵon, knabo, kaj ne avare, se vi valoras vian kronon; do iru leĝere al la stalo, kaj faru ĝuste kiel mi ordonas... Sinjoro, malfacilajn novaĵojn mi kunportas, kaj – ĉi tiuj estas pilgrimoj? Tiam vi ne povas fari pli bone, bonaj homoj, ol kunveni kaj aŭdi mian rakonton, ĉar ĝi koncernas vin, ĉar vi provas trovi tion kion vi ne trovos, kaj serĉas kion vi serĉos vane, ĉar mia vivo estas ostaĝo por mia vorto, kaj miaj vorto kaj mesaĝo estas ĉi tiuj, nome: Ke okazis io kio antaŭe okazis nur unu fojon dum ĉi tiuj ducent jaroj, kio estis la unua kaj lasta fojo kiam tiu malfeliĉa okazintaĵo trafis la sanktan valon tiel laŭ ordono de la Plej Alta, pro kialoj justaj, kie..."

"La mirakla fonto ne plu fluas!"

Tiel kriis unisone dudek pilgrimoj.

"Vi parolas vere, bonaj homoj. Mi estis ĵus dironta la samon, kiam vi faris tion."

"Ĉu iu denove lavis sin?"

"Ne; oni suspektis tion, sed neniuj kredas. Oni kredas ke estas iu alia peko, sed neniuj scias kiu."

"Kiel ili sentas pri la katastrofo?"

"Neniu povas priskribi tion per vortoj. La fonto estis dum naŭ tagoj seka. La preĝoj kiuj tiam komenciĝis, kaj la lamentado en sakaĵo kaj cindro, kaj la sanktaj procesioj – neniuj el tiuj ĉesis ĉu tage ĉu nokte, do la monaĥoj kaj monaĥinoj kaj trovitaj infanoj estas tute elĉerpitaj, kaj pendigis preĝojn skribitajn sur pergameno, ĉar restis al ili neniuj fortoj por levi la voĉon. Kaj finfine ili vokis vin, Sir Estro, por provi magion kaj sorĉadon; kaj se vi ne povus veni, tiam la mesaĝisto venigu Merlinon, kaj li nun estis tie dum ĉi tiuj tri tagoj, kaj diras ke li venigos tiun akvon eĉ se li devos eksplodigi la globon kaj ruinigi ĝiajn regnojn por fari tion; kaj tutkuraĝe li uzas sian magion kaj vokas siajn diablojn veni ĉi tien kaj helpi, sed eĉ guteton de akvo li ne ankoraŭ venigis, ne tiom kio estus malseketo sur la surfaco de kupra spegulo, se vi ne enkalkulas la amason de ŝvito kiun li ellasis inter suno kaj suno dum sia energia klopodado; kaj se vi..."

La matenmanĝo estis preta. Tuj post ĝi, mi montris al Sir Ozana la vortojn kiujn mi skribis en lia ĉapelo: *Ĥemia departemento, laboratoria alkonstruaĵo, sekcio G. Pxxp. Sendu du de la unua grandeco, du de numero 3, kaj ses de numero 4, kune kun la propraj komplementaj detaloj – kaj du el miaj edukitaj asistantoj. Kaj mi diris:*

"Nun iru al Kameloto tiel rapide kiel vi povas, brava kavaliro, kaj montru la skribiton al Clarence, kaj diru ke li liveru tiujn petitajn aferojn al la Valo de Sankteco plejeble rapide."

"Tiel mi faros, Sir Estro."

Kaj li estis for.

22. La sankta fonto

La pilgrimoj estis homoj. Se ne, ili agus malsame. Ili estis farintaj longan kaj malfacilan vojaĝon, kaj nun, kiam la vojaĝo estis preskaŭ finita, kaj ili eksciis ke tio, pro kio ili ĉefe venis, ne plu ekzistis, ili ne faris tiel kiel verŝajne farus ĉevaloj aŭ katoj aŭ vermoj – reiris al io pli profitdona – ne, se ili antaŭe estis tute fervoraj vidi la miraklan fonton, nun ili estis kvardekfoje pli fervoraj vidi la lokon kie ĝi estis. Oni ne povas kompreni la homojn.

Ni iris sufiĉe rapide, kaj kelkajn horojn antaŭ sunsubeniro ni staris alte apud la Valo de Sankteco, kaj ni rigardis ĝin de unu fino al la alia kaj notis ĝiajn detalojn. Tio estas, ĝiajn grandajn detalojn. Tiuj estis la tri domaroj. Ili estis malproksimaj, izolitaj kaj riĉaj, sed aspektis kiel ludiloj en io kiu similis al dezerto – kaj estis. Tia sceno ĉiam estas malgajiga, ĝi estas tiel impone senmova, kaj aspektas tiel trempita en morto. Sed ĉi tie estis sono, kiu interrompis la silenton nur por pliigi la sengajecon; tio estis la malforta, malproksima sono de sonoriloj, kiu neregule atingis nin per la vento, kaj tiel malforte, tiel milde, ke ni apenaŭ sciis ĉu ni aŭdis ĝin per niaj oreloj aŭ per niaj animoj.

Ni atingis la monaĥejon antaŭ la mallumo, kaj tie la viroj povis ekloĝi, sed la virinoj estis

plusenditaj al la monaĥinejo. La sonoriloj nun estis proksimaj, kaj ilia solena sono batis la orelojn kiel mesaĝo de juĝado. Superstiĉa senespero ekposedis la koron de ĉiu monaĥo kaj montris sin en lia timiga vizaĝo. Ĉie aperis tiuj nigrevestitaj, molsandalaj, palvizaĝaj fantomoj, flirtis kaj malaperis, silentaj kiel la estaĵoj de maltrankvila sonĝo, kaj same timigaj.

La ĝojo de la maljuna abato, kiam li vidis min, estis patosa. Eĉ ploriga; sed la larmojn faligis li mem. Li diris:

"Ne atendu, filo, sed komencu vian savigan laboron. Se ni ne denove havos la akvon, kaj baldaŭ, ni estos perdataj, kaj la bona laboro de ducent jaroj devos ĉesi. Kaj vi faru tion per magio kiu estas sankta, ĉar la Eklezio ne toleras ke laboro por ŝi estas farata per magio de la diablo."

"Kiam mi laboras, patro, estu certa ke neniuj laboro de la diablo estas ligita al tio. Mi uzos neniujn artojn kiuj venas el la diablo, kaj neniujn erojn ne kreitajn de la mano de Dio. Sed ĉu Merlino laboras strikte pie?"

"Ho, li diris ke li faros tiel, mia filo, li diris ke li faros tiel, kaj li eĉ ĵuris tion."

"Do, en tiu kazo, lasu lin daŭrigi."

"Sed certe vi ne sidos nenion farante, sed helpos?"

"Ne funkcias se oni miksas metodojn, patro; nek estus profesie ĝentile. Du en la sama profesio ne malpliproponu unu la alian. Ni povus same bone malaltigi la prezojn, kaj esti kontentaj per tio; la fina rezulto estus la sama. Merlino havas la kontrakton; neniuj alia magiistoj povos tuŝi ĝin ĝis li rezignos."

"Sed mi prenos ĝin de li; estas terura situacio, kaj la ago estas tial defendebla. Kaj se ne estus tiel, kiu donos leĝon al la Eklezio? La Eklezio donas leĝon al ĉiuj; kaj kion ŝi volas fari, tion ŝi rajtas fari, kiu ajn estos vundata. Mi prenos ĝin el li; vi tuj komencu."

"Ne povas esti tiel, patro. Sendube, kiel vi diras, kie potenco superas, tie oni povas fari kiel oni volas kaj ne suferi iujn sekvojn; sed por ni malriĉaj magiistoj ne estas tiel. Merlino estas tre bona magiisto malgrandaskale, kaj havas sufiĉe bonan provincan famon. Nun li luktadas, kaj faras sian plejbonon, kaj ne estus ĝentile se mi transprenus lian laboron antaŭ ol li mem rezignos ĝin."

La vizaĝo de la abato lumiĝis.

"Ho, tio estas simpla afero. Estas manieroj persvadi lin rezigni."

"Ne-ne, patro, tio ne estus lerte, kiel ili diras. Se li estus persvadata kontraŭ sia propra volo, li plenigus tiun fonton per malica sorĉo kiu barus min ĝis mi trovus ĝian sekreton. Eble postulus

unu monaton. Mi povus aranĝi etan propran magiaĵon kiun mi nomus telefonon, kaj li ne povus trovi ĝian sekreton dum cent jaroj. Jes, vi vidas, li povus bari min dum unu monato. Ĉu vi volus riski unu monaton dum seka sezono kiel ĉi tiu?"

"Monaton! Jam la penso tremigas min. Faru laŭ via volo, mia filo. Sed mia koro estas peza pro ĉi tiu seniluziiĝo. Foriru de mi, kaj lasu min porti mian animon laca kaj atendanta, same kiel mi faris ĉi tiujn dek longajn tagojn, tiel ŝajnigante tion kion oni nomas ripozo, la kuŝanta korpo aspektanta kiel ripozanta dum interne ne estas tiel."

Kompreneble estus plej bone, ĝenerale, se Merlino fajfus pri la ĝentileco kaj rezignus, ĉar li neniam povos ekmovi tiun akvon, ĉar li estis vera magiisto de tiu tempo; kio signifas ke la grandaj mirakloj, tiuj kiuj donis al li lian famon, ĉiam hazarde okazis kiam neniu krom Merlino mem ĉeestis; li ne povis ekmovi tiun fonton se ĉiuj ĉirkaŭstaris kaj rigardis; homamaso estis same malbona por la miraklo de magiisto tiutempa kiel estis por la miraklo de spiritisto en mia tempo; certe ĉeestus iu skeptikulo kiu lumigus la ĉambron en la plej grava momento kaj malhelpus ĉion. Sed mi ne volis ke Merlino retiriĝu de la laboro antaŭ ol mi mem povos efike transpreni ĝin; kaj mi ne povus fari tion antaŭ ol mi ricevos

miajn aĵojn de Kameloto, kaj tio postulus du aŭ tri tagojn.

Mia ĉeesto donis esperon al la monaĥoj, kaj multe gajigis ilin; ili eĉ ĝuis bonan manĝadon tiunokte, por la unua fojo dum dek tagoj. Tuj kiam iliaj stomakoj estis fortigitaj, iliaj animoj komencis rapide stariĝi; kiam la medo komencis ĉirkaŭiri, ili ekstaris pli rapide. Kiam ĉiuj estis iomete ebriaj, la sankta komunumo havis bonan kialon daŭre drinki la tutan nokton; do ni restis tie kaj faris tiel. La etoso iĝis tre gaja. Bonaj, malnovaj, dubindaj rakontoj estis prezentataj, faris la larmojn flui kaj buŝoj malfermiĝegi kaj la rondaj stomakoj skuiĝi pro rido; kaj dubindaj kantoj estis kriataj en forta koruso kiu tute silentigis la sonon de la grandaj sonoriloj.

Finfine mi kuraĝis mem rakonti; kaj granda estis la sukceso. Ne tuj, kompreneble, ĉar la denaskulo de tiuj insuloj ĝenerale ne rapide reagis al io humura; sed kiam mi ripetis la rakonton la kvinan fojon, kelkloke oni iom ridis; la okan fojon, ili komencis iom fali; la dekduan, ili disfalis; kaj la dekkvinan, ili frakasiĝis, kaj per brosililo, mi kolektis ilin. Tio lingvaĵo estas bildiga. Tiuj insulanoj – nu, komence ili pagas malrapide, kaj vi ne tuj rehavos vian investon, sed fine ili pagos pli ol ĉiuj aliaj nacioj kune.

La venontan tagon mi estis frue ĉe la fonto. Merlino estis tie, sorĉante kiel kastoro, sed ne

venigante malsekon. Li ne estis bonhumora; kaj ĉiun fojon, kiam mi menciatis ke eble, lia kontrakto estis tro peza por novulo, li aktivigis sian langon kaj blasfemis kiel episkopo – tio estas, franca episkopo de la komenco de la deknaŭa jarcento.

La situacio estis pli-malpli tia kiel mi atendis. La "fonto" estis ordinara tia, ĝi estis fosita en la ordinara maniero, kaj ĝi ekhavis siajn ŝtonajn murojn en la ordinara maniero. Nenio pri ĝi estis mirakla. Kaj eĉ la mensogo kiu kreis ĝian famon ne estis mirakla; mi povus rakonti ĝin mem, kun unu mano ligita. La fonto situis en malluma ĉambro, kiu estis en la centro de kapelo de hakita ŝtono, sur kies muroj pendis piaj bildoj de kvalito kiuj farus maltaŭgulo senti sin bona; bildoj kiuj memorigis kuracmiraklojn, kiuj okazis pro la akvoj kiam neniu rigardis. Tio estas, neniu krom anĝeloj; ili ĉiam ĉeestas kiam oni atendas iun miraklon – por mem aperi en la bildo, eble. Anĝeloj ŝatas tion same multe kiel fajro-brigado; vidu la malnovajn majstrojn!

La fontoĉambro estis malforte lumigata de lampoj; la akvo estis prenata per vinĉo kaj ĉeno de monaĥoj, kaj verŝajne unue en trogon kaj de tie en ŝtonan rezervujon ekstere en la kapelo – tio estas, kiam estis akvo prenebla – kaj neniuj krom monaĥoj povis eniri la fontoĉambron. Mi eniris, ĉar mi havis portempan permeson fari tion, danke

al mia profesia frato kaj subulo. Sed li ne eniris mem. Li faris ĉion per magiaj kantoj; li neniam uzis sian intelekton. Se li enirus tien kaj uzus siajn okulojn, kaj ne sian senordan animon, li povus kuraci la fonton per naturaj manieroj; kaj poste fari el tio miraklon per la kutimaj metodoj; sed ne, li estis maljuna stultulo, magiisto kiu kredis je sia propra magio; kaj neniu magiisto povas prosperi se handikapita per tia superstiĉo.

Mi havis ideon ke la fonto eklikis; ke kelkaj el la murŝtonoj plej malsupre falis kaj malkovris fendojn kiuj permesis la akvon elflui. Mi mezuris la ĉenon – naŭdek ok futojn. Poste mi vokis kelkajn monaĥojn, ŝlosis la pordon, prenis kandelon, kaj lasis ilin malsuprenigi min en la trogon. Kiam la ĉeno estis tute disvolvita, la kandelo konfirmis mian suspekton: granda parto de la muro estis for, kaj montris bonan, grandan fendon.

Mi preskaŭ bedaŭris ke mia teorio pri la problemoj de la fonto estis korektaj, ĉar mi havis alian kiu estis pli facile interpretebla kiel miraklo. Mi memoris ke en Usono, multajn jarcentojn poste, kiam ole-fonto ĉesis flui, oni provis eligi ĝin per dinamita eksplodo. Se mi trovus ĉi tiun fonton seka kaj neniun klarigon, mi povus surprizi tiujn homojn plej noble lasante iun sen aparta valoro faligi tien dinamitan bombon. Mi havis la ideon nomumi Merlinon. Tamen, estis

klare ke ne estis loko por la bombo. Oni ne povas havi ĉion kiel oni ŝatus. Ĉiuokaze, ne taŭgas esti deprimata pro seniluziiĝo; oni devus decidi ke oni rektigu la aferon. Kaj tion mi faris. Mi diris al mi mem: Se ne urĝas, mi povas atendi; tiu bombo ankoraŭ povos havi sian tempon. Kaj tiel okazis.

Kiam mi denove estis surtere, mi forigis la monaĥojn, kaj faligis hokfadenon; la fonto estis cent kvindek futojn profunda, kaj en ĝi estis kvardek unu futoj da akvo! Mi vokis monaĥon kaj demandis:

"Kiel profunda estas la fonto?"

"Tion, sinjoro, mi ne scias; neniu diris tion al mi."

"Kiel la akvo kutime staras en ĝi?"

"Proksime al la plej supra parto, dum ĉi tiuj du jarcentoj, laŭ tiuj kiuj vidis ĝin, kaj diris al ni tra niaj antaŭuloj."

Estis vere – almenaŭ kiam temis pri nunaj aferoj – ĉar estis atestanto, kaj pli bona ol monaĥo: nur ĉirkaŭ dudek aŭ tridek futoj de la ĉeno estis uzdifektita; la cetero estis neuzita, sed rustinta. Kio okazis, kiam la fonto malfunkciis tiun alian fojon? Sendube, iu praktikema homo venis kaj ordigis la likon, kaj poste diris al la abato ke li trovis per magio ke se la peka banejo estus detruata, la fonto denove fluus. Nun la liko revenis, kaj tiuj infanoj certe preĝis, kaj procesiis, kaj sonigis siajn sonorilojn por havi ĉielan

apogon ĝis ili ĉiuj sekiĝis kaj forbloviĝis, kaj neniuj senkulpulo inter ili eĉ pensis ke li faligu hokfadenon en la fonton, aŭ subeniri en ĝin, kaj trovi kio fakte okazis. Malnova penskutimo estas unu el la plej malfacilaj aferoj el kiuj oni povas liberiĝi en ĉi tiu mondo. Ĝi estas transigata kiel fizika formo kaj koloro; kaj se iu, tiutempe, havus ideon kiun liaj prapatroj ne havis, oni suspektus ke li estas ekstergeedza. Mi diris al la monaĥo:

"Estas malfacila miraklo revenigi akvon en sekan fonton, sed ni provos, se mia frato Merlino malsukcesos. Frato Merlino estas sufiĉe bona artisto, sed nur kiam temas pri distro-magio, kaj eble li ne sukcesos; fakte, tre verŝajne li ne sukcesos. Sed pro tio oni ne mallaŭdu lin; se iu povas fari *tian* magion, li scias sufiĉe por havi hotelon."

"Hotelon? Mi ne kredas ke mi aŭdis..."

"Pri hotelo? Estas tio kion vi nomas gastejo. Tiu kiu povas fari ĉi tiun miraklon, povas havi hotelon. Mi povas fari ĉi tiun miraklon; mi faros ĉi tiun miraklon; tamen mi ne provas kaŝi al vi ke estas miraklo kiu tuttute finuzos la okultajn fortojn."

"Neniu konas tiun veron pli bone ol la frataro, fakte; ĉar estas dirite ke antaŭe, tio estis treege malfacile kaj postulis unu jaron. Tamen, Dio donu al vi bonan sukceson, kaj por tio ni preĝos."

Fakte estis bona ideo disvastigi ke la afero estas malfacila. Multaj etaĵoj iĝis grandaj per la ĝusta reklamo. Tiu monaĥo estis plena de la malfacileco de tiu entrepreno; li plenigos la aliajn. Post du tagoj, la soleco tondros.

Kiam mi iris hejmen tagmeze, mi renkontis Alisanden. Ŝi estis vidinta la ermitojn. Mi diris:

"Mi ŝatus fari tion mem. Nun estas merkredo. Ĉu estas tie matineo?"

"Ĉu estas kio, ho sinjoro?"

"Matineo. Ĉu estas por ili malfermite posttagmeze?"

"Por kiuj?"

"Por la ermitoj, kompreneble."

"Malfermite?"

"Jes, malfermite. Ĉu tio ne estas sufiĉe klare? Ĉu ili malfermiĝas je tagmezo?"

"Malfermiĝas?"

"Malfermiĝas? Jes, malfermiĝas. Kio estas malfacile pri tio? Mi neniam vidis tian stultulon; ĉu vi ne povas kompreni ion ajn? Klare dirite, ĉu ili fermas la vendejon, finas la ludon, estingas la fajrojn..."

"Fermas, finas, estingas..."

"Nu, ne zorgu pri tio; vi lacigas min. Ŝajnas ke vi ne povas kompreni la plej simplan aferon."

"Mi ŝatus plaĉi al vi, sinjoro, kaj estas ĉagreno al mi ke mi malsukcesas, sed ĉar mi estas nur simpla fraŭlino kaj havas neniun edukadon, ĉar

mi estas ekde la lulilo nebaptita en tiuj profundaj akvoj de lernado kiuj majestigas tiun kiu partoprenas tiun plej noblan sakramenton, farante lin respektinda al la mensa okulo de la humila mortonto, kiu per manko de tiu granda sanktigo vidas en sia propra needukita stato nur simbolon de tiu alia manko kiu homoj publikigas al la kompata okulo kun sakaĵoj sur kiuj estas dissemita la cindro de malĝojo, kaj do, kiam tiulo en la mallumo de sia animo renkontos tiujn orajn frazojn de alta mistero, tiujn fermitajn vendejojn, finitajn ludojn, estingitajn fajrojn, kaj nur pro la graco de Dio li ne eksplodas pro envio al la animo kiu povas naski, kaj la lango kiu povas liveri tiel grandajn kaj dolĉe sonantajn parolmiraklojn, kaj se estos konfuzo en tiu pli humila animo, kaj maleblo diveni la signifojn de tiuj mirakloj, tiam se tiu kompreno ne estas vana sed tute vera, nu do ĝi estas la vera esenco de respektama adorado kaj ne estu leĝere malrespektata, kaj ne estis, kaj vi notis tiun vizaĝon de humoro kaj animo kaj komprenis ke kion mi volis mi ne povis, kaj kion mi ne povis mi preferinde ne faris, nek tamen nek preferus faru *nek* povis, nek preferis ne fari nek ne povis, povus esti avantaĝe ŝanĝita al la dezirata *volis*, kaj tial mi petas vin pardoni mian mankon, pro via granda ĝentileco, ho bona mastro kaj plej kara sinjoro."

Mi ne povis kompreni ĉion – tio estas, ne la detalojn – sed mi kaptis la ĝeneralan ideon; kaj ankaŭ sufiĉe de ĝi por honti. Ne estis juste prezenti tiujn teknikaĵojn de la deknaŭa jarcento al la needukita infano de la sesa, kaj poste kvereli al ŝi ĉar ŝi ne povis sekvi la rezonadon; kaj kiam ŝi ankaŭ faris ĉion kion ŝi povis, kaj ne estis ŝia kulpo ke ŝi ne povis atingi la celon; do mi pardonpetis. Poste ni agrable forserpentumis al la ermitaj truoj, bone interparolante, kaj pli bonaj amikoj ol iam antaŭe.

Mi iom post iom ekhavis misteran kaj tremantan respekton por tiu ĉi knabino; nuntempe, kiam ajn ŝi forlasis la stacion kaj ekmovis la trajnon tra unu el siaj senhorizontaj, transkontinentaj frazoj, mi ekkomprenis ke mi havis antaŭ mi la Patrinon de la Germana Lingvo. Mi estis tiel imponita de tio, ke foje, kiam ŝi komencis malplenigi unu el tiuj frazoj al mi, mi senkonscie ekstaris plej respektme, kun nuda kapo; kaj se vortoj estus akvo, mi certe estus dronigata. Ŝi agis tute germane. Kio ajn estis en ŝi por esti liverata, ĉu nur simpla rimarko, ĉu prediko, ĉu enciklopedio, ĉu la historio de iu milito, ŝi metis sĉion en unusolan frazon, aŭ mortis. Kiam ajn la literatura germana plonĝas en frazon, vi ne plu vidos ĝin ĝis ĝi aperos je la alia flanko de ĝia Atlantiko, kun sia verbo en la buŝo.

Ni vagadis de ermito al ermito dum la tuta posttagmezo. Estis tre stranga bestaro. La ĉefa konkurado inter ili ŝajnis esti vidi kiu povis esti plej malpura kaj havi la plej multajn parazitojn. Iliaj manieroj kaj sintenoj estis la lasta esprimo de memkontento. Estis la fiero de unu anakoreto kuŝi nuda en la ŝlimo, kaj lasi la insektojn mordi lin nebarite; fiero de alia estis klini sin al roko la tutan tagon, klare videbla al la multaj pilgrimoj, kaj preĝi; fiero de tria estis iri nuda kaj rampi sur kruroj kaj brakoj; de kvara kuntreni, jaron post jaro, okdek funtojn de fero; de kvina neniam kuŝi kiam li dormis, sed stari inter la dorn-arbustoj kaj ronki kiam tie estis pilgrimoj kiuj povis rigardi; virino, kiu havis blankajn harojn pro aĝo, kaj neniujn aliajn vestaĵojn, estis nigra de la kapo al la piedoj pro kvardek sep sanktaj jaroj sen akvo. Grupoj de rigardantaj pilgrimoj staris ĉirkaŭ ĉiu el tiuj strangaj objektoj, respektive admirante, kaj enviaj pri la senmakula sankteco kiun tiuj piaj ekzercoj gajnis al ili el postulanta ĉielo.

Post iom da tempo, ni iris por vidi unu el la vere grandaj. Li estis tre fama; lia famo penetris la tutan kristanaron; la noblaj kaj konataj vojaĝis el la plej malproksimaj landoj sur la globo por montri al li sian respekton. Lia loĝejo estis en la centro de la plej larĝa parto de la valo; kaj ĉiu tiu spaco estis bezonata por enteni la homamasojn.

Lia loĝejo estis kolono sesdek futojn alta, kun larĝa estrado supre. Nun li faris tion, kion li faris ĉiutage dum dudek jaroj ĝis tie supre -- klinante sian korpon seninterrompe kaj rapide preskaŭ ĝis la piedoj. Tio estis lia maniero preĝi. Mi mezuris tion per klikhorloĝo, ĉar li faris mil ducent kvardek kvar klinoj en dudek kvar minutoj kaj kvardek ses sekundoj. Ŝajnis malprofitige lasi ĉion tiun energion malŝpariĝi. Estis unu el la plej uzeblaj en la meĥaniko, la pedalmovo; do mi notis en mia memorlibro ke mi iun tagon metos al li sistemon de elastaj rimenoj, kaj per tio movos kudromaŝinon. Mi poste efektivigis tiun planon, kaj mi ricevis de li kvin jarojn de bona servado; dum tiu tempo, li faris preskaŭ dekok mil unuaklasajn ĉemizojn, tio estas ĉiutage dek. Mi lasis lin labori ankaŭ dimanĉe; li agadis same dimanĉe kiel dum la aliaj tagoj, kaj ne taŭgis malŝpari la forton. Tiuj ĉemizoj kostis al mi nenion, krom iomete por la materialo – mi liveris tion mem, ne estus ĝuste lasi lin fari tion – kaj ili vendiĝis kiel fumo al pilgrimoj por po unu kaj duona dolaroj, kio estis la prezo por kvindek bovinoj aŭ purrasa ĉevalo en Arturujo. Ili estis rigardataj kiel perfekta protekto kontraŭ peko, kaj miaj kavaliroj ĉie faris tian reklamon, per farbo kaj ŝablonoj; baldaŭ ne estis roko aŭ ŝtona muro ie en Anglio, kie vi ne povis legi el unumejla distanco:

*Aĉetu la solan veran kolonsanktulon;
apogatan de la Nobelaro. Patento petata.*

Estis pli da mono en la negocado ol oni sciis kiel uzi. Kiam ĝi pligrandiĝis, mi prezentis aferojn taŭgajn al reĝoj, kaj ion grandiozan al dukinoj kaj similuloj.

Sed ĉirkaŭ tiam mi notis ke la moviganta maŝino nun staris sur unu kruro, kaj mi trovis ke estis iu problemo kun la alia; do mi staplis la negocon kaj malplenigis ĝin, finance aligante Sir Bors de Canis kaj kelkajn el liaj amikoj; ĉar la laboro ĉesis post malpli ol jaro, kaj la bona sanktulo atingis sian finan pacon. Sed li meritis tion. Mi povas diri tion por li.

Kiam mi vidis lin tiun unuan fojon -- tamen, liaj personaj kondiĉoj ne povas esti bone priskribataj ĉi tie. Vi povas legi tion en *Lives of the Saints*.*

*Ĉiuj detaloj pri la ermitoj en ĉi tiu ĉapitro estas prenitaj el Lecky – sed tre modifitaj. Ĉar ĉi tiu libro ne estas historia, sed nur rakonta, la plej multaj el la sinceraj asertoj de la historiisto estis tro fortaj por esti citataj ĉi tie. – La angla eldonisto

23. La restaŭro de la fonto

Sabate tagmeze mi iris al la fonto kaj rigardis iomete. Merlino ankoraŭ bruligis fumpulvorojn, kaj movis la manojn en la aero, kaj murmuris sensencaĵojn same forte kiel iam; sed li ŝajnis sufiĉe malgaja, ĉar kompreneble li ne ankoraŭ ekis eĉ ŝviteton en tiu fonto. Fine mi diris:

"Kiel la afero promesas nuntempe, kunulo?"

"Vidu, ĝuste nun mi provas la plej fortan sorĉon konatan al la princoj de la okultaj artoj en la orientaj landoj; se mi ne sukcesos, nenio helpos. Pacon, ĝis mi finiĝos."

Ĉifoje li vokis fumon, kiu mallumigis la tutan regionon, kaj certe malkomfortigis la ermitojn, ĉar la vento blovis al ili, kaj ĝi kovris iliajn loĝejojn per densa kaj ondanta nebulo. Li eligis same amasojn da vortoj, kaj tordis sian korpon kaj segis la aeron per siaj manoj tute eksterordinare. Post dudek minutoj li sidiĝis anhelante, kaj tute elĉerpita. Nun venis la abato kaj plurcent gemonahoj, kaj malantaŭ ili multaj pilgrimoj kaj kelkaj akreoj de trovitaj infanoj, ĉiuj logataj de la granda fumo, kaj ĉiuj ege ekscititaj. La abato maltrankvile demandis pri la rezultoj. Merlino diris:

"Se iu laboro de mortonto povus rompi la sorĉon kiu ligas tiujn akvojn, tion farus tio kion mi ĵus provis. Mi fiaskis; per kio mi nun scias ke

tio, kion mi timis, estas establita vero: la fiasko de ĉi tiu provo pravas ke la plej forta spirito konata al la magiisto de la oriento, kies nomon neniu povas eldiri kaj tamen vivi, mem sorĉis ĉi tiun fonton. Ne spiras mortonto, kaj neniam spiro, kiu povas penetri la sekreton de tiu sorĉo, kaj sen tiu sekreto neniu povas rompi ĝin. Tiu akvo neniam plu fluos, bona patro. Mi faris ĉion kio homo povas. Lasu min foriri."

Kompreneble, tio tre konsternis la abaton. Li turnis sin al mi, kun mieno kiu montris tion, kaj diris:

"Vi aŭdis lin. Ĉu estas vere?"

"Parto de tio estas vera."

"Ne ĉio, ne ĉio! Kiu parto estas vera?"

"Ke tiu spirito kun la rusa nomo sorĉis ĉi tiun fonton."

"Vundoj de Dio, tiam ni estas perditaj!"

"Eble."

"Sed ne certe? Vi volas diri, ne certe?"

"Tiel estas."

"Do vi ankaŭ volas diri ke, kiam li diras ke neniu povas rompi tiun sorĉon..."

"Jes, kiam li diras tion, li ne necese diras la veron. Ekzistas kondiĉoj, sub kiuj provo rompi ĝin povus havi certajn ŝancojn – tio estas, certajn etajn, tre malgrandajn ŝancojn – sukcesoj."

"La kondiĉoj..."

"Ho, ili ne estas malfacilaj. Nur ĉi tiuj: Mi volas ke la fonto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ĝis duona mejlo, estu disponebla nur al mi de sunsubeniĝo ĉivespere ĝis mi forigos la malpermeson – kaj ke neniu rajtu transiri ĉi tiun teron krom kun mia permeso."

"Ĉu tiuj estas ĉiuj?"

"Jes."

"Kaj vi ne timas pruvi?"

"Ho, tute ne. Oni povas fiaski, kompreneble; kaj oni povas ankaŭ sukcesi. Oni povas provi, kaj mi estas preta fari tion. Ĉu mi havas permeson?"

"Ĉi tiujn kaj ĉiujn aliajn kiujn vi povas nomi. Mi elsendos ordonojn pri tio."

"Atendu," diris Merlino kun malica rideto. "Ĉu vi scias ke tiu, kiu volas rompi tiun sorĉon, devas koni la nomon de tiu spirito?"

"Jes, mi konas lian nomon."

"Kaj ĉu vi ankaŭ scias ke nur koni ĝin ne sufiĉas, sed vi devas ankaŭ eldiri ĝin? Ha ha! Ĉu vi sciis tion?"

"Jes, mi sciis ankaŭ tion."

"Vi havis tiun scion! Ĉu vi estas stulta? Ĉu vi intencas eldiri tiun nomon kaj morti?"

"Eldiri ĝin? Jes, certe. Mi eldirus ĝin eĉ se ĝi estus kimra."

"Do vi estas jam homo mortinta; kaj mi iras por informi Arturon."

"Tre bone. Prenu vian valizon kaj foriru. Kion vi devas fari estas iri hejmen kaj aranĝi la veteron, Johano W. Merlino."

Tiu sago trafis sian celon; kaj pri ĝi, li grimacis; ĉar li estis la plej aĉa vetermagiisto en la regno. Kiam ajn li parolis pri danĝero laŭ la marbordo, sekvis tuta semajno senventa, certe, kaj ĉiam kiam li antaŭvidis belan veteron, tiam pluvegis. Sed mi tamen lasis lin resti en la veterburoo, por subfosi lian famon. Tamen, tiu pafisto instigis lin, kaj anstataŭ iri hejmen por raportoj pri mia morto, li diris ke li restos kaj ĝuos ĝin.

Miaj du spertuloj venis vespere, kaj sufiĉe lacaj, ĉar ili estis farintaj duoblan vojaĝon. Ili kunhavis pakmulojn, kaj kunportis ĉion kion mi bezonis – ilojn, pumpilon, plumbtubon, grekan fajron, faskojn de grandaj rakedoj, romiajn kandelojn, kolorigitajn fajroŝprucojn, elektrikajn maŝinojn, kaj multajn alilajn aferojn – ĉion necesan por la plej impona miraklo. Ili vespermanĝis kaj dormetis, kaj ĉirkaŭnokte ni eliris tra soleco tiel malplena kaj tuteca ke pli ol sufiĉis por la petataj permesoj. Ni ekposedis la fonton kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Miaj knaboj estis spertuloj pri ĉiuspecaj aferoj, ekde la ŝtonkovrado de fonto ĝis la konstruo de matematika instrumento. Unu horon antaŭ sunsupreniro la liko estis perfekte riparita, kaj la

akvo komencis levi sin. Poste ni metis niajn piroteknikaĵojn en la kapelo, ŝlosis la lokon kaj iris hejmen por enlitiĝi.

Antaŭ ol la tagmeza meso estis finita, ni denove estis ĉe la fonto, ĉar ankoraŭ io estis farenda, kaj mi decidis fari la miraklon antaŭ noktomezo, pro aferecaj kialoj; ĉar dum miraklo farata por la Eklezio dum labortago valoras sufiĉe, tamen valoras sesfoje pli se vi faras ĝin dimanĉe. Dum naŭ horoj, la akvo levis sin ĝis sia kutima nivelo; tio estas, malpli ol dudek tri futoj de la plej supra. Ni enmetis malgrandan feran pumpilon, unu el la unuaj faritaj de mia fabriko proksime al la ĉefurbo; ni boris en ŝtonan rezervujon, kiu staris apud la ekstera muro de la fontoĉambro, kaj enmetis parton de plumba tubo kiu estis sufiĉe longa por atingi la pordon de la kapelo kaj projekcii trans la sojlo, kie la fluanta akvo estos videbla al la ducent kvindek akreoj de homoj, kiujn mi intencis ĉeesti sur la plata tero antaŭ ĉi tiu eta sankta montero ĝustatempe.

Ni malfermis malplenan barelon kaj levis ĝin al la plata tegmento de la kapelo, kie ni fiksis ĝin bone, enverŝis pulvon ĝis ĝi kuŝis loze unu colon profunde sur la fundo; poste ni starigis rakedojn en la barelo tiel dense kiel ili povis loze stari, ĉiuj diversaj specoj de rakedoj kiuj ekzistas; kaj ili faris grandan kaj imponan faskon, mi povas diri al vi. Ni metis la fadenon de elektriĉa poŝbaterio

en tiun pulvon, ni metis tutan baterion de greka fajro sur ĉiu angulo de la tegmento – blua en unu angulo, verda en alia, ruĝa sur alia, kaj purpura sur la lasta – kaj metis en ĉiu fadenon.

Ĉirkaŭ ducent jardojn for, sur la plata tero, ni faris enfermejon de traboj, ĉirkaŭ kvar futojn altaj, kaj metis tabulojn sur ĝi, kaj tiel faris estradon. Ni kovris ĝin per belaj gobelinoj, prunteprenitaj por la okazo, kaj plej supre ni metis la tronon de la abato mem. Kiam oni faros miraklon por nescianta tribo, oni volas enmeti ĉiujn detalojn kiuj gravas; oni volas havi ĉiujn ecojn imponaj al la publika okulo; oni volas ke la ĉefa gasto sentas sin komforta; poste oni povas agi libere kaj uzi la trukojn je ilia plena valoro. Mi konas la valoron de tiuj aferoj, ĉar mi konas la homan naturon. Oni ne povas meti tro da stilo en miraklon. Kostas problemojn, kaj laboron, kaj foje monon; sed finfine oni estas repagata. Nu, ni metis la fadenojn en la teron apud la kapelo, kaj poste metis ilin sub la teron al la estrado, kaj kaŝis la bateriojn tie. Ni metis ŝnurbarilon cent futojn kvadrato ĉirkaŭ la estrado por forbari la ordinarajn homojn, kaj tio finis la laboron. Mia ideo estis: malfermi la pordojn je dek kaj tridek, komenci la spektaklon iom post dek unu kaj dudek kvin. Mi deziris postuli enirpagon, sed kompreneble tio ne taŭgis. Mi diris al miaj knaboj ke ili estu en la kapelo jam je la deka,

antaŭ ol iuj aliaj estis tie, kaj ke ili estu pretaj manovri la pumpilojn je la ĝusta momento, kaj doni ĉion. Poste ni iris hejmen por vespermanĝi.

La novaĵoj pri la katastrofo de la fonto ĝis nun vojaĝis longe; kaj nun dum du aŭ tri tagoj, konstanta fluo de homoj venis en la valon. La malsupra parto de la valo iĝis unu granda kampadejo; ni havos bonan spektantaron, neniu dubo pri tio. Kriantoj ĉirkaŭiris fruvespere kaj anoncis la venontan provon, kio rapidigis ĉies pulson ĝis febra nivelo. Ili diris ke la abato kaj lia oficiala sekvantaro aperos feste vestitaj kaj sidiĝos sur la estrado je la deka kaj tridek, ĝis kiam la tuta areo je mia dispono devos esti malplena; la sonoriloj tiam ĉesos soni, kaj tiu signo permesos al la amaso veni kaj preni siajn lokojn.

Mi estis sur la estrado kaj tute preta por honorigi lin, kiam la solena procesio de la abato aperis – kion ĝi faris nur kiam ĝi estis preskaŭ ĉe la ŝnurbarilo, ĉar estis senstela, nigra nokto, kaj neniuj torĉoj permesataj. Kune kun ĝi venis Merlino, kaj prenis antaŭan seĝon sur la estrado; ĝuste nun li plenumis sian promeson. Oni ne povis vidi la homamason kiu estis kune ekster la barilo, sed ĝi tamen estis tie. En la momento kiam la sonoriloj eksilentis, tiu amaso fluis super la limo kiel granda, nigra ondo, kaj dum tuta duonhoro ĝi daŭre fluadis, kaj poste ĝi firmiĝis,

kaj oni povus iri sur pado de homaj kapoj dum – nu, mejloj.

Mi nun havis solenan scenejan atendon dum ĉirkaŭ dudek minutoj – io pri kio mi kalkulis por efekto; estas ĉiam bone lasi onian spektantaron havi okazon plialtigi siajn esperojn. Finfine, venis el la silento nobla latina ĉanto – viraj voĉoj – kreskis kaj malaperis en la nokto, majesta melodia ondo. Ankaŭ tio estis mia ideo, kaj estis unu el la plej geniaj efektoj kiujn mi iam inventis. Kiam ĝi estis finiĝinta, mi ekstaris sur la estrado kaj disigis miajn manojn, dum du minutoj, kun mia vizaĝo levita – tio ĉiam kaŭzas profundan silenton – kaj poste mi malrapide elparolis ĉi tiun fantomecan vorton en timiga maniero, pro kiu centoj tremis, kaj multaj virinoj svenis:

"Constantinopolitanscherdudelsackspfeifen-machersgesellschaft!"

Ĝuste kiam mi ellamentis la lastajn partojn de tiu vorto, mi tuŝis unu el miaj elektraj kontaktoj, kaj tiu tuta malluma mondo de homoj malkaŝiĝis en hida, blua brilo! Ĝi estis grandega – tiu efekto! Multaj homoj kriis, virinoj ekkaŭris kaj foriris en ĉiujn direktojn, trovitaj infanoj kolapsis amase. La abato kaj la monaĥoj kruccsignis sin sperte, kaj iliaj lipoj flirtis per agitataj preĝoj. Merlino daŭre regis sin, mirige bone, li ja neniam vidis ion

similan antaŭe. Nun estis la tempo amasigi la efektojn. Mi levis miajn manojn kaj ĝemdiris ĉi tiun vorton – kvazaŭ en agonio:

"Nihilistendynamittheaterkaestchenssprengungs-
-attentaetsversuchungen!"

– kaj lumigis la ruĝan fajron! Vi devus aŭdi tiun oceanon de homoj lamenti kaj krii kiaj tiu karmezina infero aliĝis al la blua! Post sesdek sekundoj mi kriis:

"Transvaaltruppentropentransporttrampelt-
hiertreibertrauungsthraenentragedie!"

– kaj lumigis la verdan fajron! Atendinte nur kvardek sekundojn ĉifoje, mi disigis miajn brakojn kaj tondris la ruinigantajn silabojn de ĉi tiu vorto de vortoj:

"Mekkamuselmannenmasenmenschenmoerder-
moerenmuttermarmormonumentenmacher!"

– kaj enverŝis la purpuran brilegon! Jen ili, ĉiuj brilantaj samtempe, ruĝa, blua, verda, purpura! – kvar furiozaj vulkanoj kiuj suprenĵetas grandajn nubojn de radianta fumo, kaj disvastigas blindigantan ĉielarkan tagmezon al la plej

malproksimaj anguloj de la valo. Fore oni povis vidi tiun ulon sur la kolono starante rigide al la fono de la ĉielo, kaj lia pendola movo ĉesis por la unua fojo dum dudek jaroj. Mi sciis ke miaj knaboj estis ĉe la pumpilo nun, kaj pretaj. Do mi diris al la abato:

"La tempo venis, patro. Mi estas preta eldiri la timatan nomon kaj ordoni la sorĉojn nuliĝi. Vi volas apogi vin, kaj teni ion."

Poste mi kriis al la popolo:

"Atentu, post unu minuto la sorĉo estos rompita, aŭ neniuj mortonto povas rompi ĝin. Se ĝi rompiĝis, ĉiuj scios, ĉar vi vidos la sanktan akvon flui el la kapela pordo!"

Mi staris kelkajn sekundojn, por doni al la aŭskultantoj okazon disvastigi miajn vortojn al tiuj kiuj ne povis aŭdi ilin, kaj tiel informi la plej malproksimajn. Poste mi faris kelkajn grandajn gestojn, kaj kriis:

"Aŭdu, mi ordonas la malican spiriton kiu posedas la sanktan fonton nun vomi al la ĉielo ĉiujn inferajn fajrojn, kiuj ankoraŭ restas en li, kaj tuj nuligi sian sorĉon, kaj fuĝi el ĉi tie al la kavo, por tie kuŝi ligita dum mil jaroj. Per lia propra timiga nomo mi ordonas lin – BGWJJILLIGKKK!"

Poste, mi tuŝis la barelon de rakedoj, kaj vasta fontano de blindigantaj fajrolancoj siblante vomiĝis al la zenito, kaj meze en la ĉielo

eksplodis en ŝtormo de fulmantaj juveloj! Forta vekrio ekaŭdiĝis el la kunvenintaj homoj – poste ŝanĝiĝis en sovaĝa hosana de ĝojo – ĉar tie, klare videbla en la timiga lumo, ili vidis la liberigitan akvon kure flui! La maljuna abato ne povis diri eĉ unu vorton, pro larmoj kaj sufokata gorĝo; sen eldiri ion ajn li brakumis min kaj frakasis min. Tio diris pli ol vortoj. Kaj estis pli malfacile eliri, en lando kie fakte ne troveblis kuracistoj kiuj valoris ion ajn.

Vi devus vidi tiujn akreojn de homoj ĵeti sin en tiun akvon kaj kisi ĝin; kisi ĝin, kaj karesi ĝin, kaj paroli al ĝi kvazaŭ ĝi estus viva, kaj bonvenigi ĝin reen kun la karaj nomoj kiujn ili donis al siaj amataj, ĝuste kiel se estus amiko longe foririnta kaj perdita, kaj nun denove hejmen reveninta. Jes, estis bele vidi tion, kaj pro tio mi pli ol antaŭe pensis pri ili.

Mi sendis Merlinon hejmen sur tabulo. Li falis kaj svenis kiel terglito kiam mi elparolis tiun timigan nomon, kaj poste li neniam denove vekigis. Li neniam antaŭe aŭdis tiun nomon – nek mi – sed por li, ĝi estis la ĝusta. Iu ajn sensencaĵo estus la ĝusta. Li poste agnoskis ke eĉ la patrino mem de la spirito ne povus elparoli tiun nomon pli bone ol mi. Li neniam povis kompreni kiel mi povis postvivi tion, kaj mi ne informis lin. Nur junaj magiistoj fordonas tian sekreton. Dum tri monatoj, Merlino provis sorĉojn por trovi la

profundan sekreton kiel elparoli tiun nomon kaj tamen vivi. Sed li ne sukcesis.

Kiam mi komencis iri al la kapelo, la homamaso flankeniris respekteme por doni al mi larĝan, liberan vojon, kvazaŭ mi estus ia supera estaĵo – kaj tio mi estis. Mi estis konscia pri tio. Mi kunprenis noktan aron de monaĥoj, kaj instruis ilin pri la mistero de la pumpilo, kaj laborigis ilin, ĉar estis evidente ke granda parto de la popolo tie sidiĝos kun la akvo dum la tuta nokto, do estis nur juste ke ili havu de ĝi ĉion kion ili volis. Por tiuj monaĥoj tiu pumpilo mem estis sufiĉe granda miraklo, kaj ili multe miris pri ĝi; kaj admiris kiel efike ĝi funkciis.

Estis granda nokto, magia nokto. Estis famo en ĝi. Mi apenaŭ povis ekdormi en ĝia gloro.

24. Rivala magiisto

Mia influo en la Valo de Sankteco nun estis tre grava. Ŝajnis inde provi fari el ĝi ion valoran. La penso venis al mi la postan matenon, kiam mi vidis unu el miaj kavaliroj en la sapa negoco veni rajdante. Laŭ la historio, la monaĥoj en tiu loko antaŭ du jarcentoj estis tiel ĉimondaj ke ili volis lavi sin. Eble ankoraŭ restis iom da fermentaĵo de tiu maljusteco. Do mi vokis fraton:

"Ĉu vi ne ŝatus banon?"

Li tremis je la penso – li pensis pri la danĝero de tio al la fonto – sed li diris kun profunda sento:

"Oni ne devas demandi tion al mizerulo, kiu ne spertis tiun benitan refreŝiĝon post sia infanaĝo. Ho se Dio permesus al mi lavi min! Sed ne eblas, ho bona sinjoro, ne tentu min; estas malpermesite."

Kaj poste li suspiris tiel korŝire ke mi decidis ke li havu almenaŭ unu tavolon de sia posedaĵo forigata, eĉ se tio kostus mian tutan enflumon kaj bankrotigis la planojn. Do mi iris al la abato kaj petis permeson por tiu frato. Li paliĝis je la penso – mi ne diras ke oni povis vidi lin paliĝi, ĉar kompreneble vi ne povus vidi tion sen unue skrapi lin, kaj mi ne zorgis sufiĉe por skrapi lin, sed mi sciis ke la paleco estis tie, ĉiuokaze, kaj nur librokovrildikece malproksima de la surfaco -- paliĝis, kaj tremis. Li diris:

"Ho filo, petu pri io ajn kion vi volas, kaj tio estos via, kaj libere donita el dankema koro – sed ĉi tio, ho ĉi tio! Ĉu vi volas denove forĉasi la benitan akvon?"

"Ne, patro, mi ne forĉasos ĝin. Mi havas misteran scion kiu diras al mi ke estis eraro kiam oni kredis ke la institucio de la bano malbenis la fontanon."

Granda intereso komencis montriĝi en la vizaĝo de la maljunulo.

"Mia scio diras al mi ke la bano ne kulpis al tiu malbona okazintaĵo, kiun kaŭzis tute alia speco de peko."

"Tio estas kuraĝaj vortoj... sed... sed tre bonvenaj, se ili estas veraj."

"Ili estas fakte veraj. Lasu min rekonstrui la banon, patro. Lasu min rekonstruu ĝin, kaj la fontano fluos ĉiam."

"Ĉu vi promesas ĉi tion? Ĉu vi promesas tion? Diru la vorton – diru ke vi promesas tion."

"Jes, mi promesas tion."

"Tiam mi mem havos la unuan banon! Iru – iru al via laboro. Ne prokrastu, ne prokrastu, sed iru."

Mi kaj miaj knaboj tuj eklaboris. La ruinoj de la malnova banejo ankoraŭ estis tie, en la subtera etaĝo de la monaĥejo, kaj ne mankis eĉ unu ŝtono. Ili estis lasitaj ĝuste tiel, dum ĉiuj tiuj vivtempoj, kaj evitataj kun pia timo, kiel aferoj malbenitaj.

Post du tagoj ĉio estis farita kaj la akvo ene – granda baseno kun klara, pura akvo, en kiu oni povus naĝi. Kaj estis akvo libere fluanta. Ĝi venis enen, kaj iris eksteren, tra la malnovaj tuboj. La maljuna abato plenumis sian promeson, kaj estis la unua kiu provis ĝin. Li iris suben nigra kaj tremanta, lasante la tutan nigran komunumon supre maltrankvila kaj plena de antaŭtimoj; sed lli revenis blanka kaj gaja, kaj la ludo estis finita! Unu plia venko.

Bonan kampanjon ni faris en tiu Valo de Sankteco, kaj mi estis tre kontenta, kaj preta iri plu, sed min baris seniluziiĝo. Mi tre malvarmumis, kaj tiu vivigis malnovan, dormantan reŭmatismen. Kompreneble, la reŭmatismo trovis mian plej malfortan lokon, kaj ekrestis tie. Tio estis la loko kie la abato brakumis min kaj frakasis min, tiun fojon kiam li sentis ke li devis montri sian dankemon per brakumo.

Kiam mi finfine eliris, mi estis ombro. Sed ĉiuj estis atentaj kaj ĝentilaj, kaj tio revenigis ĝojon en mian vivon, kaj estis la ĝusta medicino por rapide denove helpi resaniĝanton al sano kaj forto; do mi rapide pliboniĝis.

Alisande estis eluzita de flegado, do mi decidis ĉirkaŭiri sola, kaj lasi ŝin kaj la monaĥinojn ripozi. Mia ideo estis maski min al libera homo de kamparana nivelo, kaj vagadi tra

la lando dum unu aŭ du semajnoj piede. Tio donus al mi la okazon manĝi kaj loĝi kun la plej malalta kaj malriĉa tavolo de liberaj civitanoj je egalecaj kondiĉoj. Ne estis alia maniero por mi informiĝi perfekte pri ilia ĉiutaga vivo, kaj pri kiel la leĝoj influas ĝin. Se mi irus inter ili kiel nobelo, estus limoj kaj konvencioj kiuj forbaris min de iliaj privataj ĝojoj kaj problemoj, kaj mi atingus nur la eksteran ŝelon.

Unu matenon mi ekstere faris longan promenon por ekzerci miajn muskolojn antaŭ la vojaĝo, kaj supreniris la verton laŭ la norda flanko de la valo, kiam mi venis al artefarita malfermaĵo en la surfaco de malalta deklivo, kaj konis ĝin pro ĝia loko kiel ermitejo, kiun oni ofte indikis al mi el malproksime kiel loĝejo de ermito tre fama pro malpureco kaj strikteco. Mi sciis ke li antaŭnelonge estis ofertita postenon en la Granda Saharo, kie leonoj kaj sablomuŝoj faris la ermitan vivon aparte alloga kaj malfacila, kaj ke li iris al Afriko por ekposedi ĝin, do mi pensis ke mi enrigardu kaj vidu kiel la etoso de tiu loĝejo harmoniis kun lia famo.

Mia surprizo estis granda: la loko estis antaŭnelonge lavita kaj ordigata. Poste estis alia surprizo. En la profunda ombro de la kavo, mi aŭdis etan sonorilon, kaj poste ĉi tiu voko:

"Ha lo, Centraloj! Ĉu estas vi, Kameloto? Vidu, vi povas ĝojigi vian koron kaj vi havas

fidon kaj kredas je la mirindaĵo ke ĝi venos en ne atendita vestaĵo kaj manifestiĝas en neebaj lokoj – jen staras en la karno la granda Estro, kaj per viaj propraj oreloj vi aŭdos lin paroli!"

Nun kia radikala renverso estis tio; kia miksaĵo de eksterordinaraj absurdaĵoj; kia fantazia kuniĝo de maloj kaj nekombineblaĵoj – la hejmo de la blufa miraklo iĝis la homo de vera tia, la loĝejo de mezepoka ermito iĝis telefoncentralo!

La telefonisto eliris en la lumon, kaj mi ekkonis unu el miaj junaj knaboj. Mi diris:

"Kiom longe ĉi tiu oficejo estis ĉi tie, Ulfius?"

"Ekde noktomezo, ho bona sinjoro Estro, se tio plaĉas al vi. Ni vidis multajn lumojn en la valo, kaj do opiniis bone fondi stacion, ĉar kie estas tiel multaj lumoj, tie certe estas urbo sufiĉe granda."

"Tute korekte. Ne estas urbo en la konvencia signifo de la vorto, sed tamen estas bona loko. Ĉu vi scias kie vi estas?"

"Mi ne havis tempon esplori tion; ĉar kiam miaj kamaradoj foriris por labori aliloke, lasante min prizorgi la postenon, mi havis bezonatan ripozon, decidinte ke mi esploros kiam mi vekiĝos, kaj raportos la nomon de la loko al Kameloto por registro."

"Nu, ĉi tio estas la Valo de Sankteco."

Tio ne havis efiken; tio estas, li ne eksaltis kiam mi diris la nomon, kiel mi atendis ke li faros. Li nur diris:

"Mi raportos tiel."

"Nu, la ĉirkaŭantaj regionoj estas plenaj de la bruoj de lastatempaj mirakloj kiuj okazis ĉi tie! Ĉu vi ne aŭdis pri ili?"

"Ho, vi memoru ke ni moviĝas nokte, kaj evitas ĉiun interparoladon. Ni lernas nenion, krom tio kion ni aŭdas per la telefono el Kameloto."

"Nu, _ili_ scias ĉion pri tiu afero. Ĉu ili diris nenion al vi pri la granda miraklo kiam oni restaŭris sanktan fontanon?"

"Ho, *tio*? Jes, certe. Sed la nomo de _ĉi tiu_ valo estas tute alia ol tiu de *tiu*; fakte ne eblus ke ili estu pli malsi..."

"Kiu do estis tiu nomo?"

"La Valo de Sataneco."

"*Tio* klarigas la aferon. Malbenitaj estu la telefonoj, ĉiuokaze. Ĝi estas vera demono por transdoni similecon de sonoj, kio estas tute alia afero ol simileco de signifo. Sed ne gravas, nun vi konas la nomon de la loko. Voku Kameloton!"

"Ĉu la reĝo konas la vojon ĉi tien?"

"La reĝo? – Ne, nek al iu alia loko en lia regno, eble; sed la knaboj kiuj helpis vin pri via miraklo gvidos lin, kaj montros kie li ripozu tagmeze kaj dormu nokte."

"Tio venigos ilin ĉi tien – kiam?"

"Meze de la posttagmezo, aŭ pli malfrue, la trian tagon."

"Kelkajn aliajn novaĵoj?"

"La reĝo komencis starigi la permanentan armeon, kiun vi proponis al li; unu regimento jam estas preta, kun oficiroj."

"Diable! Mi volis mem prizorgi tion. Estas nur unu aro de viroj en la regno kiu taŭgas kiel oficiroj en regula armeo."

"Jes – kaj vi miros kiam vi ekscios ke en tiu regimento estas eĉ ne unu homo el West Point."

"Pri kio vi parolas? Ĉu vi estas serioza?"

"Vere estas kiel mi diris."

"Ho, tio malkomfortigas min. Kiuj estis elektitaj, kaj laŭ kiu metodo? Ekzamenado sub konkurenco?"

"Fakte, mi scias nenion pri la metodo. Sed mi scias ĉi tien – ĉiuj tiuj oficiroj venas el nobelaj familioj, kaj naskiĝis – kiel vi diras? – stultuloj."

"Io malĝustas, Clarence."

"Do komfortigu vin mem; ĉar du kandidatoj al posteno de leŭtenanto fakte vojaĝas ĉi tien kun la reĝo – junaj nobeloj ambaŭ – kaj se vi nur restas tie kie vi estas, vi aŭdos ilin ekzamenataj."

"Tio estas gravaj novaĵoj. Ĉiuokaze, mi enigis unu homon el West Point. Metu viron sur ĉevalo kaj sendu lin al la lernejo kun mesaĝo; li mortigu

ĉevalojn, se necese, sed li devas esti tie hodiaŭ antaŭ sunsubeniĝo, kaj diri..."

"Ne necesas. Mi metis terfadenon al la lernejo. Bonvolu lasi min aligi min al ĝi."

Sonis bone! En ĉi tiu etoso de telefono kaj fulmrapida komunikado kun malproksimaj regionoj, mi denove spiris la aeron de la vivo, post longa sufokado. Mi tiam komprenis kiel timiga, dormiga, malviva hororo ĉi tiu lando estis al mi dum ĉiuj ĉi tiuj jaroj, kaj kiel mi estis en tiel sufokata mensostato ke mi kutimiĝis al tio tiom ke mi apenaŭ povis noti tion.

Mi donis miajn ordonojn al la estro de la Akademio persone. Mi ankaŭ petis lin doni al mi iom da papero kaj fontplumon kaj skatoleton, pli-malpli, de sekur-alumetoj. Mi laciĝis pri la nehavo de tiuj komfortaĵoj. Mi povus havi ilin nun, ĉar nun mi ne plu intencis porti armaĵojn, kaj tial mi povis atingi miajn poŝojn.

Kiam mi revenis al la monaĥejo, mi trovis ke io interesa ĝuste okazis. La abato kaj liaj monaĥoj kunvenis en la granda halo, kaj rigardis kun infaneca miro kaj fido la spektaklon de nova magiisto, ĵus veninta. Lia vestaĵo estis ekstreme fantazia; tiel teatreca kaj stultiga kiel io portata de indiana sanigisto. Li movis la brakojn, kaj murmuris, kaj gestadis, kaj skizis misterajn formojn en la aero kaj sur la planko – la ordinara afero, vi sciu. Li estis famulo el Azio – tiel li diris,

kaj tio sufiĉis. Tiaj pruvoj estis bonaj kiel oro, kaj akceptataj ĉie.

Kiel facile kaj malmultekoste esti granda magiisto je la kondiĉoj de tiu ulo! Lia specialaĵo estis diri al vi kion iu ajn sur la surfaco de la tero faras ĝuste nun; kaj kion li faris iam ajn en la pasinteco, kaj kion li faros iam ajn en la estonteco. Li demandis ĉu iu volis scii kion la imperiestro de la Oriento faris nun? La brilantaj okuloj kaj frotataj manoj elokvente respondis – ĉi tiu respektinda homamaso *ja* volis scii kion tiu monarĥo faras ĝuste nun. La blufanto murmuradis iom pli, kaj poste serioze li anoncis:

"La alta kaj potenca imperiestro de la Oriento ĝuste nun metas monon en la manon de sankta, almozpetanta monaĥo – unu, du, tri monerojn, kaj tute de arĝento."

Admirantaj huraoj el ĉie ĉirkaŭe:

"Mirinde!"

"Magie!"

"Kiom da studado, kiom da laboro, por ekhavi tian mirigan povon!"

Ĉu ili volas scii kion la plej alta sinjoro de Hindio faras? Jes. Li diris al ili kion faras la plej alta sinjoro de Hindio. Poste li diris al ili kion faras la sultano de Egiptio; same kion faras la reĝo de la Malproksimaj Maroj. Kaj tiel plu kaj tiel plu; kaj kun ĉiu nova miraklo, eĉ pli kreskis la admirado pri lia akurateco. Ili kredis ke li certe

devos iam esti ne tute certa; sed ne, li neniam devis heziti; li ĉiam sciis, kaj ĉiam tute precize. Mi komprenis ke se ĉi tio kontinuos, mi perdos mian superecon, ĉi tiu ulo kaptos mian sekvantaron, mi estos lasita en la malvarmo. Mi devas bremsi lian radon, kaj tuj. Mi diris:

"Se mi rajtas demandi, mi tre ŝatus scii kion faras certa persono."

"Demandu, kaj libere. Mi respondos."

"Estos malfacile – eble maleble."

"Mia arto ne konas tiun vorton. Ju pli malfacile estas, des pli certe mi malkaŝos tion."

Vi vidu, mi kreskigis la intereson. Kaj ĝi jam estis sufiĉe granda; oni povis vidi tion ĉe ĉiuj ĉirkaŭantaj koloj, kaj la duone haltigita spirado. Do nun mi atingis la klimakson:

"Se vi faros neniun eraron – se vi vere diros al mi tion kion mi volas scii – mi donos al vi ducent arĝentajn pencojn."

"Tiu riĉaĵo estas mia! Mi diros al vi tion kion vi volas scii."

"Do diru al mi kion mi faras per mia dekstra mano."

"Hooo!"

Estis ĝenerala elkrio de surprizo. Neniu en tiu homamaso elpensis la simplan trukon demandi pri iu kiu ne estis dekmil mejlojn for. La magiisto estis forte batata; estis io kio neniam antaŭe okazis al li, kaj ĝi senmovigis lin; li ne sciis kiel

reagi al ĝi. Li aspektis dormigita, konfuzita; li ne povis diri eĉ unu vorton.

"Venu," mi diris, "pri kio vi atendas? Ĉu eblas ke vi povas tuj respondi kaj diri kion faras iu ĉe la alia flanko de la tero, kaj tamen ne povas diri kion faras iu malpli ol tri jardojn for de vi? Homoj malantaŭ mi scias kion mi faras per mia dekstra mano – ili konfirmos se vi diros la veron."

Li ankoraŭ estis muta.

"Bone. Mi diros kial vi ne parolas; nome, ĉar vi ne scias. Vi_magiisto! Bonaj amikoj, ĉi tiu vagabondo nur blufas kaj mensogas."

Tio dolorigis la monaĥojn kaj timigis ilin. Ili ne kutime aŭdis ke tiuj majestaj estaĵoj estis insultataj, kaj ili ne sciis kiuj estos la sekvoj. Nun estis profunda silento; ĉiuj havis duperstiĉajn timojn. La magiisto komencis kunigi siajn pensojn, kaj kiam li fine ridetis leĝere kaj senzorge, ĉiuj treege senpeziĝis; ĉar tio indikis ke li ne estis detruema. Li diris:

"Mutigis min la senzorgemo de la vortoj de ĉi tiu persono. Ĉiuj sciu, se hazarde iu ankoraŭ ne scias, ke sorĉistoj je mia nivelo ne degnas zorgi pri la agoj de aliaj homoj ol reĝoj, princoj, imperiestroj, tiuj kiuj naskiĝis en purpuro kaj nur tiuj. Se vi demandus al mi kion Arturo, la granda reĝo, nun faras, tiam estus alia afero, kaj mi dirus tion al vi; sed kion faras subulo ne interesas min."

"Ho, mi miskomprenis vin. Mi kredis ke vi diris 'iu ajn', kaj tial mi supozis ke 'iu ajn' inkluzivas – nu, iun ajn; tio estas, ĉiujn."

"Tion ĝi faras – tio estas, ĉiujn el alta familio; kaj precipe, se ili estas reĝaj."

"Tiel, ŝajnas al mi, tre bone povas esti," diris la abato, kiu vidis sian ŝancon ebenigi la aferon kaj eviti katastrofon, "ĉar plej verŝajne mirinda donaco kiel ĉi tiu ne estu uzata por malkaŝi agojn de malpli altaj estaĵoj ol tiuj naskitaj proksime al la plej altaj pintoj. Nia Arturo la Reĝo..."

"Ĉi vi volas scii kion li faras?"

"Tre ĝoje, jes, kaj dankeme."

Ĉiuj estis tuj denove plenaj de respekto kaj intereso, la nekorekteblaj idiotoj. Ili rigardis la magiaĵojn koncentriĝinte, kaj rigardis min kun mieno de "Nu, kion vi diras nun?", kiam venis la informo:

"La reĝo estas laca post la ĉaso, kaj kuŝas en sia palaco dum du horoj, en sensonĝa dormo."

"Dio benu lin!" diris la abato, kaj krucignis sin; "Tiu dormo refreŝigu liajn korpon kaj animon."

"Tio eblus, se li dormus," mi diris, "sed la reĝo ne dormas; la reĝo rajdas."

Jen denove problemoj – konflikto inter aŭtoritatoj. Neniu sciis je kiu el ni oni kredu; mi ankoraŭ havis iom da famo ĉi tie. La mokemo de la magiisto vekiĝis, kaj li diris:

"Ho, mi vidis multajn bonegajn sorĉistojn kaj profetojn kaj magiistojn en mia vivo, sed ĝis nun neniujn kiuj povis sidi senmove kaj rigardi la centron de la aferoj, sen eĉ magian kanton kiel helpo."

"Vi vivis en la arbaroj, kaj tial perdis multon. Mi mem uzas magiajn kantojn, kiel faras ĉi tiu bona frataro – sed nur kiam gravas."

Kiam temas pri sarkasmoj, mi kredas ke mi scias kiel aserti min. Tiu bato trafis la ulon. La abato demandis pri la reĝino kaj la kortego, kaj ricevis ĉi tiun informon:

"Ili ĉiuj dormas, tute lacigitaj, same kiel la reĝo."

Mi diris:

"Tio estas nur alia mensogo. Duono de ili amuzigas sin, la reĝino kaj la alia duono ne dormas, ili rajdas. Nun vi eble povas plivastigi vin iomete, kaj diri al ni kien iras la reĝo kaj la reĝino kaj ĉiuj kiuj ĝuste nun rajdas kun ili?"

"Ili nun dormas, kiel mi diris; sed morgaŭ ili rajdos, ĉar ili vojaĝos al la maro."

"Kaj kie ili estos je vespero postmorgaŭ?"

"Malproksime norde de Kameloto, farinte duonon de sia vojaĝo."

"Tio estas alia mensogo, je la grandeco de cent kvindek mejloj. La vojaĝo tute ne estos duone farita, ĝi estos tute farita, kaj ili estos *ĉi tie*, en ĉi tiu valo."

Tio estis bona pafo! Ĝi tre ekscitis la abaton kaj la monaĥojn, kaj ĝi profunde skuis la magiiston. Mi tuj kontinuis:

"Se la reĝo ne venos, mi estos elĵetata sur tango; se li ja venos, estos elĵetata vi."

La postan tagon mi iris al la telefonoficejo kaj trovis ke la reĝo jam pasis du urbojn en la vojo. Mi sammaniere vidis lian progreson la postan tagon. Mi silentis pri tiuj aferoj. La raportoj de la tria tago montris ke se li daŭre iros same rapide, li venos je la kvara posttagmeze. Ankoraŭ, ne videblis ie ajn intereso pri lia veno; ŝajnis esti neniuj preparoj por ricevi lin solene, vere stranga afero. Nur unu afero povus klarigi tion: la alia magiisto certe faris alian proponon. Tio estis vere. Mi demandis amikon mian, monaĥon, pri tio, kaj li diris, jes, la magiisto provis kelkajn pliajn sorĉojn kaj trovis ke la kortego decidis fari neniun vogajon, sed resti hejme. Pensu pri tio! Imagu kiom valoras famo en tia lando. Tiuj homoj vidis min fari la plej spektaklan magion en la historio, kaj la solan en ilia memoro kiu havis pozitivan valoron, kaj tamen jen ili, pretaj iri kun aventuristo kiu povis prezenti neniujn pruvojn pri sia potenco krom siajn proprajn nepruvitajn vortojn.

Tamen, ne estis bona politiko lasi la reĝon veni sen iujn ceremoniojn, do mi iris kaj kolektis procesion de pilgrimoj kaj eligis aron de ermitoj

kaj devigis ilin je la dua horo por ricevi lin. Kaj tiel estis kiam li venis. La abato estis senhelpa de kolero kaj humiligo kiam mi kondukis lin eksteren sur balkonon kaj montris al li la ŝtatĉefon veni, kaj eĉ ne unu monaĥo ĉeestis por bonvenigi lin, neniuj vivo aŭ muziko por gajigi lin. Li ĵetis unu rigardon kaj poste kuris por voki siajn fortojn. La venontan minuton, la sonoriloj sonis furioze, kaj la pluraj domoj vomis gemonaĥojn, kiuj svarmis al la venanta procesio; kaj kun ili iris tiu magiisto – kaj jes, li sidis sur stango, laŭ ordono de la abato; kaj lia famo estis en la ŝlimo, kaj mia denove estis en la ĉielo. Jes, oni povas ĝisdatigi sian famon en tia lando, sed oni ne povas esti senmova dum oni faras tion; oni devas esti alerta la tutan tempon.

25. Ekzamenado sub konkurencio

Kiam la reĝo vojaĝis por havi ŝanĝon de aero, aŭ faris rondvojaĝon tra la regno, aŭ vizitis malproksiman nobelon kiun li volis bankrotigi per la kostoj por vivteni lin, parto de la administrantaro venis kun li. Tio estis tiam laŭmode. La komitato kiu ekzamenis la kandidatojn al postenoj en la armeo venis kun la reĝo al la Valo, kvankam ili povus fari siajn taskojn same bone hejme. Kaj kvankam ĉi tiu ekspedicio estis strikte libertempa vojaĝo por la reĝo, li tamen daŭre okupis sin je kelkajn de siaj oficialaj funkcioj. Li batalis kontraŭ la malbono, kiel kutime; li prezentis kortegon ĉe la pordo dum sunsupreniro, kaj li juĝis, ĉar li mem estis la plej alta juĝisto de la regno.

Li tre bone brilis en tiu lasta funkcio. Li estis saĝa kaj homeca juĝisto, kaj li klare faris sian plejeble bonan – laŭ sia propra kompreno. Tio estas grava rezervo. Lia kompreno – tio estas lia edukado – ofte kolorigis liajn decidojn. Kiam ajn estis konflikto inter nobelo kaj malpli alta homo, la reĝo ĉiam simpatiis kun la unua, ĉu li iom sciis pri tio aŭ ne. Ne eblis io alia. Estas bone konate, en la tuta mondo, kiel la efikoj de sklaveco malakrigas la moralon de la sklavposedanto; kaj privilegiata klaso, nobelaro, estas nur aro de sklavposedantoj sub alia nomo. Tio sonas akre,

sed devus ne ofendi iun ajn – eĉ ne la nobelon mem – se ne la fakto mem estas ofendo; ĉar la eldiro nur esprimas fakton. Gravas la abomena sklavsystemo mem, ne ĝia nomo. Oni devas nur aŭdi nobelon paroli pri iu sub li por rekoni – tre malmulte modifitan – la sintenon de la sklavposedanto mem; kaj malantaŭ tiuj estas la sinteno de la sklavposedanto, la malakrigitaj sentoj de la sklavposedanto. Ambaŭ estas efikoj de la sama kaŭzo: la malnova kutimo de la posedanto rigardi sin mem kiel plivalora estaĵo. La juĝoj de la reĝo ofte estis maljustaj, sed al tio kulpis nur lia edukado, liaj naturaj kaj neŝanĝeblaj simpatioj. Li same malbone taŭgis kiel juĝisto kiel estus statistike normala patrino kiel laktodistribuanto al malsataj infanoj kiam ĉiuj malsatis; ŝiaj propraj infanoj ricevus iom pli ol la aliaj.

Iu vere stranga kazo prezentiĝis al la reĝo. Juna knabino, sengepatra, kiu posedis sufiĉe grandan bienon, edziniĝis al bona junulo kiu posedis nenion. La bieno de la knabino situis sur tero posedata de la Eklezio. La episkopo de la diocezo, aroganta filo de la alta nobelaro, postulis la bienon de la knabino ĉar ŝi edziniĝis private, kaj tiel ŝtelis de la Eklezio unu el ĝiaj rajtoj kiel sinjoro de tiu terpeco – tiun poste nomatan *rajto de la sinjoro*. La puno por rifuzo aŭ evito estis konfisko. La defendo de la knabino

estis ke la sinjoro de tiu areo estis la episkopo, kaj la aparata rajto ĉi tie ne estis transdonebla, sed devis esti ekzercata de la sinjoro mem aŭ nuliĝi; kaj ke pli malnova leĝo, de la Eklezio mem, strikte malpermesis al la episkopo ekzerci ĝin. Estis vere tre stranga kazo.

Ĝi memorigis min pri io, kion mi legis kiam juna, pri la ruza maniero de la aldermanoj de Londono kolekti monon por konstrui la *Mansion House*. Kiu ne ricevis la Sakramenton laŭ anglikana ritaro, tiu ne povis iĝi ŝerifo de Londono. Alikredanoj do ne estis elekteblaj; ili ne povis kandidati se petitaj, ili ne povis servi se elektitaj. La aldermanoj, sendube jankioj alivestitaj, elpensis tiun belan solvon: ili decidis pri statuto ke punpago £ 400 ĉiu kiu rifuzas kandidati al tiu posteno, kaj £ 600 ĉiu kiu, se elektita, rifuzas servi. Poste ili eklaboris kaj elektis amason de alikredanoj, unu post la alia, kaj tiel plu ĝis ili kolektis £ 15 000 en punpagoj; kaj tie staras la impona *Mansion House* ĝis hodiaŭ, por memorigi la ruĝiĝantan civitanon pri antaŭlonga kaj bedaŭrata tago, kiam aro de jankioj ŝtelvenis en Londonon kaj ludis ludojn de la speco kiu donis al ilia tribo unikan kaj malklaran famon inter ĉiuj vere bonaj kaj sanktaj popoloj sur la tero.

La kazo de la knabino ŝajnis al mi forta; la kazo de la episkopo estis same forta. Mi ne vidis

kiel la reĝo eskapu el tiu truo. Sed li eliris. Mi citas lian decidon:

"Vere mi ne vidas grandan malfacilaĵon ĉi tie; la afero estas tiel simpla ke eĉ infano povus solvi ĝin. Se la juna edziniĝonto anoncus la aferon, laŭstatute, al sia feŭda sinjoro kaj protektanto la episkopo, ŝi ne suferus iun perdon; ĉar tiu episkopo povus havi apartan permeson portempe ebligante al li ekzerci tiun rajton, kaj tiel ŝi konservus ĉion kion ŝi havis. Dum, ne farante sian unuan devon, ŝi ne faris ĉiujn; ĉar kiu, prenante ŝnuregon, tranĉas ĝin super siaj manoj, devas fali; ne estas defendo diri ke la cetero de la ŝnurego estas bona, kaj tiel oni ne evitas la danĝeron, kiel li trovos. Pardonu, la kazo de la virino estas putra je la radiko. La kortumo decidas ke ŝi perdu al la nomita episkopo ĉiujn siajn posedaĵojn, eĉ la lastan pencokvaronon kiun ŝi havas, kaj ke ŝi pagu tion. La posta!"

Jen tragika fino de bela mielmonato, post malpli ol tri monatoj. La kompatindaj junuloj! Ili vivis dum tiuj tri monatoj tute ĉirkaŭataj de ĉimondaj komfortoj. Tiuj vestaĵoj kaj ornamaĵoj, kiujn ili portis, estis tiel bonaj kaj belaj kiel permesis la plej streĉita interpreto de la imponaj leĝoj al personoj de ilia rango; kaj en tiuj belaj vestaĵoj, dum ŝi ploris al lia ŝultro, kaj li provis konsoli ŝin per esperigaj vortoj al la muziko de senespero, ili iris el la kortumo en la mondon sen

hejmo, sen lito, sen pano; ja eĉ la almozpetantoj laŭ la vojoj ne estis tiel malriĉaj kiel ili.

Nu, la reĝo eskapis el la truo; kaj je kondiĉoj kiuj kontentigis la Eklezion kaj la ceteran nobelaron, sendube. Homoj skribas multajn bonajn kaj kredindajn argumentojn por apogi monarĥion, sed restas la fakto ke kie ĉiu homo en ŝtato havas voton, tie ne eblas brutalaj leĝoj. La popolo de Arturo kompreneble estus malbona materialo por respubliko, ĉar ili estis tiom longe humiligitaj de la monarĥio; kaj tamen, eĉ ili estus sufiĉe inteligentaj por rapide nuligi tiun leĝon kiun la reĝo ĵus uzis, se ili povus libere voĉdoni pri ĝi. Certa frazo iĝis tiel ofta en la buŝo de la mondo, ke ĝi ekŝajnis signifi ion – signifi tion kio estas subkomprenata, kiam oni elparolas ĝin; tio estas la frazo ke tiu aŭ ĉi tiu aŭ la alia nacio eble estas "kapabla regi sin mem"; kaj la subkomprenata signifo estas ke estis iu nacio ie, en tiu aŭ alia tempo, kiu *ne* kapablis fari tion – ne estis same kapabla regi sin kiel memnomumitaj specialistoj povis aŭ povos regi ĝin. La plej bonaj animoj de ĉiuj nacioj, en ĉiuj tempoj, venis amase el la popolanaro de la nacio, kaj nur el la ordinara popolanaro – ne el la privilegiitaj klasoj; kaj do, senkonsidere de la intelekta nivelo de la nacio, ĉu alta ĉu malalta, la plej granda parto de ĝia kapablo situis en la longaj vicoj de ĝiaj sennomaj kaj malriĉaj, do neniam okazis ke

mankis al ĝi multe da materialo por regi sin mem. Kio konfirmas ĉiam memevidentan fakton: ke eĉ la plej bone regata kaj plej libera kaj plej klera monarĥio tamen ne povas uzi la plej bonajn kondiĉojn atingeblajn al ĝia popolo; kaj ke same estas por similaj registaroj je pli malalta nivelo, la tutan vojon al la plej malalta.

Reĝo Arturo plirapidigis la armeon longe trans miaj kalkuloj. Mi ne kredis ke li agos pri tiu afero dum mi estas for; kaj do mi ne faris planon kiel mezuri la meritojn de oficiroj. Mi nur rimarkis ke estus saĝe profunde ekzameni ĉiun kandidaton; kaj private, mi intencis kompili liston de militaj kvalifikoj kiujn neniu povis plenumi, krom miaj West Point-anoj. Tio devus esti prizorgata antaŭ ol mi foriris; ĉar la reĝo estis tiel imponata de la ideo pri staranta armeo, ke li ne povis atendi, sed devis ekagi tuj, kaj fari tiel bonan planon por ekzaminado kiel li povis elpensi per sia propra kapo.

Mi estis senpacienca vidi kio tio estas; kaj ankaŭ por montri kiel pli admirinda estis tiu, kiun mi prezentos al la ekzaminanta komitato. Mi ĝentile timigis la reĝon per tio, kaj tio vekis lian scivolemon. Kiam la komitato kunsidis, mi eniris kun li, kaj post ni venis la kandidatoj. Unu el tiuj kandidatoj estis unu el miaj West Point-anoj, juna kaj brila, kaj kun li venis kelkaj el miaj West Point-profesoroj.

Kiam mi vidis la komitaton, mi ne sciis ĉu plori ĉu ridi. Ĝia estro estis la oficiro konota al venontaj jarcentoj kiel Norroy King-at-Arms! La du aliaj membroj estis pli malaltaj estroj en lia buroo; kaj ĉiuj tri estis pastroj, kompreneble, ĉiuj funkciuloj kiuj devis scii kiel legi kaj skribi estis pastroj.

Miaj kandidatoj estis vokataj unue, pro ĝentileco al mi, kaj la komitatestro ekdemandis lin kun oficiala soleneco:

"Nomo?"

"Mal-Ease."

"Filo de?"

"Webster."

"Webster – Webster. Hm – m – mi ne povas memori tiun nomon. Profesio?"

"Teksisto."

"Teksisto! Dio helpu nin!"

La reĝo perdis la balancon, de la kapo al la piedoj; unu oficisto svenis, kaj la aliaj preskaŭ.

La komitatestro koncentris sin, kaj diris indigne:

"Sufiĉas. Foriru."

Sed mi apelaciis al la reĝo. Mi petis ke mia kandidato estu ekzamenata. La reĝo volis, sed la komitato, kie ĉiuj estis alte naskitaj, petegis la reĝon ne tiel malhonorige devigi ilin ekzameni filon de teksisto. Mi sciis ke ili ĉiukaze ne sciis sufiĉe por povi ekzameni lin, do mi preĝis kune

kun ili kaj la reĝo transigis la devon al miaj profesoroj. Mi estis preparinta kretotabulon, kaj nun ĝi estis starigata, kaj la spektaklo komenciĝis. Estis bele aŭdi la knabon prezenti la militosciencan, kaj ruli sin en detaloj pri batalo kaj sieĝo, akiro kaj transporto, minado kaj kontraŭminado, granda taktiko, granda strategio kaj malgranda strategio, signalservado, infanterio, kavalerio, artilerio, kaj ĉio pri sieĝo-pafiloj, kampo-pafiloj, Gatling-pafiloj, kanelitaj pafiloj, glatboritaj, musketekzercado, revolverekzercado – kaj eĉ ne unu vorton el tio, tiuj stultuloj povis kompreneti, kompreni – kaj estis bele vidi lin sur la kretotabulo prezenti matematikajn koŝmarojn kiujn la anĝeloj mem ne povus solvi, kaj fari tion kvazaŭ estus nenio – ĉiojn pri eklipsoj, kaj kometoj, kaj solsticoj, kaj konstelacioj, kaj meza tempo, kaj sidera tempo, kaj vespermanĝa tempo, kaj enlitiĝa tempo, kaj ĉiu alia imagebla afero super la nuboj aŭ sub ili, per kiu oni povus ataki kaj dolorigi malamikon, tiel ke li volos ne esti veninta – kaj kiam la knabo finfine soldatsalutis kaj ekstaris flanke, mi estis sufiĉe fiera por brakumi lin, kaj ĉiuj aliaj estis tiel nebuligitaj ke ili aspektis parte ŝtonigitaj, parte ebriaj, kaj tute kaptitaj kaj neĝkovritaj. Mi juĝis ke la kuko estis nia, kaj per granda plimulto.

Edukado estas vasta afero. Ĉi tiu estis la sama junulo, kiu venis al West Point tiel nescianta ke,

kiam mi demandis lin: "Se generalo sidas sur ĉevalo en la batalkampo, kaj tiu estas pafata, kion li devus fari?", li tute naive respondis:

"Ekstari kaj brosi sin."

Unu el la junaj nobeloj nun estis vokata. Mi pensis ke mi mem iom demandu lin. Mi diris:

"Ĉu vi povas legi, sinjoro?"

Lia vizaĝo ruĝiĝis indigne, kaj li ekpafis al mi:

"Ĉu vi kredas ke mi estas iu oficisto? Mi kredas ke mi ne estas de sango kiu..."

"Respondu al la demando!"

Li sufokis sian kolero kaj sukcesis respondi:

"Ne."

"Ĉu vi povas skribi?"

Li volis rifuzi ankaŭ tion, sed mi diris:

"Vi nur zorgu pri la demandoj, kaj ne komentu. Vi ne estas ĉi tie por prezenti vian sangon aŭ viajn prapatrojn, kaj nenio tia estos permesata. Ĉu vi povas skribi?"

"Ne."

"Ĉu vi konas la multiplikan tabelon?"

"Mi ne scias pri kio vi parolas."

"Kiom estas naŭfoje ses?"

"Tio estas mistero kaŝita de mi ĉar la ebleco kompreni ĝin ne aperis en mia vivtempo, kaj do, ĉar mi ne bezonas scii tion, mi ne havas tiun konon."

"Se A vendas barelon da cepoj al B, kaj se ĉiu buŝelo valoras du pencojn, kaj anstataŭe ricevas ŝafojn por po kvar pencoj kaj hundon valorantan unu pencon, kaj se C mortigas la hundon antaŭ la livero, ĉar mordita de tiu, kiu erare kredis ke li estis D, kiom da pago ankoraŭ estu donota al A de B, kaj kiu pagu por la hundo, C aŭ D, kaj kiu ricevu la monon? Se A, ĉu la penco sufiĉas, aŭ ĉu li povas postuli plian kompenson en la formo de aldonata mono por la ebla gajno kiun li povus ricevi por la hundo, klasifikebla kiel gajnita profito, tio estas fruktuzo?"

"Vere, en la tutsaĝa kaj nekonebla providenco de Dio, kiu moviĝas en misteraj manieroj por fari siajn miraklojn, mi neniam aŭdis tian demandon, tiel konfuzantan la animon kaj kaŭzantan konstipon de la pensoj. Tial mi petas vin lasu la hundon kaj la cepojn kaj tiujn homojn kun la strangaj kaj sendiaj nomoj ricevi siajn respektivajn savojn el siaj mizeraj kaj mirindaj malfacilaĵoj sen mia helpo, ĉar vere iliaj problemoj jam estas sufiĉe grandaj, kaj se mi provus helpi, mi nur pligravigus ilin, kaj tamen eble mem ne vivus sufiĉe longe por vidi la katastrofajn rezultojn."

"Kion vi scias pri la leĝoj de altiro kaj gravito?"

"Se estas tiaj, eble lia moŝto la reĝo decidis pri ili dum mi estis malsana dum la komenco de la jaro kaj tial ne eksciis pri tio."

"Kion vi scias pei la scienco de optiko?"

"Mi scias pri registroj de lokoj, kaj pri seneskaloj de kasteloj, kaj pri ŝerifoj de landoj, kaj pri multaj malaltaj rangoj kaj honorigaj titoloj, sed pri tiu kiun vi nomas Scienco de Optiko mi ne aŭdis antaŭe; ĉu eble estas nova titolo?"

"Jes, en ĉi tiu lando."

Provu imagi tiun moluskon serioze petante oficialan postenon, kia ajn sub la suno! Li ja havis ĉiujn signojn de tajpisto, krom lia emo seninvite korekti vian gramatikon kaj interpunkcion. Estis nekompreneble ke li ne provis ricevi iom da tia helpo el lia neelĉerpebla stoko de nekapablo por la laboro. Sed tio ne pruvis ke li ne havas la necesan kapablon por la profesio, nur ke ni ne ankoraŭ estis tajpisto. Turmentinte lin iom pli, mi donis lin al la profesoroj, kaj ili travidis lin pri scienca militado, kaj kompreneble ili trovis lin malplena. Li sciis iom pri la militado de tiu tempo – kaŝpafado por mortigi trolojn, kaj taŭrobataloj en la turnira areno, kaj tiaj aferoj – sed krom tio, li estis malplena kaj neuzebla. Poste ni pritraktis la alian junan nobelon, kaj li estis ĝemelo de la unua, kiam temis pri nescio kaj nekapablo. Mi transdonis ilin al la manoj de la prezidanto de la

komitato kun la komfortiga konscienco kiom ili valoris. Ili estis ekzamenataj en la sama ordo kiel la antaŭaj.

"Nomo, bonvolu?"

"Pertipole, filo de Sir Pertipole, barono de Barley Mash."

"Avo?"

"Ankaŭ Sir Pertipole, barono de Barlehy Mash."

"Patro de tiu?"

"La samaj nomo kaj titolo."

"Kaj patro de tiu?"

"Neniu, bona sinjoro; la vico finiĝas antaŭ ol ĝi atingas tiun lokon."

"Ne gravas. Sufiĉas kvar generacioj; tio plenumas la postulojn de la regulo."

"Plenumas kiun regulon?" mi demandis.

"La regulon kiu postulas kvar generaciojn de nobeleco; se ne, la kandidato ne estas elektebla."

"Ĉu homo ne povas esti elektata kiel leŭtenanto en la armeo, se li ne povas pruvi kvar generaciojn de nobelaj prapatroj?"

"Ĝuste; nek leŭtenanto, nek alia oficiro, povas esti elektata sen tiu kvalifiko."

"Ho, tio estas tre surpriziga. Al kio bona servas tia kvalifiko?"

"Al kio bona? Tio estas impertinenta demando, ho bona sinjoro kaj Estro, ĉar ĝi eĉ

dubigas la saĝecon de nia sankta Patrino, la Eklezio."

"Kiel?"

"Ĉar ŝi decidis pri la sama regulo kiam temas pri sanktuloj. Laŭ ŝia leĝo, neniu povas esti sanktuligata ĝis li estis morta dum kvar generacioj."

"Mi komprenas, mi komprenas – estas la sama afero. Tio estas mirige. En unu kazo, homo kuŝas morta-viva dum kvar generacioj – mumiigita en nescio kaj neagemo – kaj tio kvalifikas lin ordoni vivantajn homojn, kaj preni ilian bonstaton en siaj senpotencaj manoj; kaj en la alia kazo, homo kuŝas kun vermoj kaj morto dum kvar generacioj, kaj tio kvalifikas lin servi en la ĉiela kampo. Ĉu lia reĝa moŝto akceptas tiun strangan leĝon?"

La reĝo diris:

"Fakte, mi vidas nenion strangan en ĝi. Ĉiuj lokoj de honoro kaj profito apartenas, pro naturaj rajtoj, al tiuj kiuj estas de nobela sango, kaj same tiuj titoloj en la armeo apartenas al ili, kaj tiel estus ankaŭ sen ĉi tiu aŭ iu ajn regulo. La regulo nur indikas limon. Ĝia celo estas forbari tro novan sangon, kiu lezus la prestiĝon de tiuj titoloj, kaj homoj kun altaj prapatroj turnus la dorsojn kaj rifuzus akcepti ilin. Mi meritis mallaŭdon se mi permesus tion. Vi povas permesi tion, se vi tiel emas, ĉar al vi estis donata tiu aŭtoritato, sed ke la reĝo farus tion estus la plej

stranga frenezeco, kaj neniuj povus kompreni tion."

"Mi kapitulacas. Pluparolu, Sir Estro de Herald's College."

La prezidanto ree ekparolis tiel:

"Per kiu granda kontribuo al la honoro de la Trono kaj ŝtato, la fondinto de via granda vico levis sin al la sankta digno de la brita nobeleco?"

"Li fondis bierfarejon."

"Sinjoro, la Komitato trovas ĉi tiun kandidaton perfekta pri ĉiuj postuloj kaj kvalifikaĵoj de soldata rango, kaj ĝi tenas lian kazon malferma al decido post laŭregula ekzamenado de la alia kandidato."

La alia kandidato venis kaj mem pruvigis ekzakte kvar generaciojn de nobeleco. Ili do havis same grandajn armeajn kvalifikaĵojn.

Li staris flanke dum momento, kaj Sir Pertipole estis plie demandata:

"Kiun rangon havis la edzino de la fondinto de via vico?"

"Ŝi venis el la plej altaj terposedantaj grandsinjoroj, sed ŝi ne estis nobela; ŝi estis ĝentila kaj pura kaj donema, kun neriproĉeblaj vivo kaj karaktero, kaj pri tio ŝi estis samnivela kun la plej bona sinjorino en la lando."

"Tio sufiĉas. Malsupreniru."

Li denove vokis la alian kandidaton, kaj demandis:

"Kiuj estis la rango kaj titolo de la prapatrino kiu donis britan nobelecon al via granda domo?"

"Ŝi estis amorantino de reĝo, kaj levis sin al tiu alta rango per sia propra senhelpa merito el la kloako kie ŝi naskiĝis."

"Ho, tio ja estas vera nobeleco, tio estas la ĝusta kaj perfekta miksaĵo. La leŭtenanteco estas via, bona sinjoro. Ne malestimu ĝin; ĝi estas la modesta ŝtupo kiu kondukas vin al grandecoj pli dignaj de la brilo de origino kiel via."

Mi sinkis en la senplankan truon de humiligo. Mi estis promesinta al mi mem facilan triumfon al la zenito, kaj jen la rezulto!

Mi preskaŭ hontis vidi la vizaĝon de mia kompatinda, senluziigita kandidato. Mi diris al li ke li iru hejmen kaj estu pacienca, ĉi tio ne estis la fino.

Mi havis privatan aŭdiencon kun la reĝo, kaj faris al li proponon. Mi diris ke estis tute ĝuste fari nobelojn oficiroj de tiu regimento, kaj li ne povus agi pli saĝe. Ankaŭ estus bona ideo aldoni kvincent oficirojn; fakte, aldoni tiom da oficiroj kiom estis da nobeloj kaj parencoj de nobeloj en la lando, eĉ se en la armeo fine estos kvinfoje da oficiroj kiel da senranguloj, kaj tiel fari ĝin la regimento plej prestiĝa, plej enviata, la regimento de la reĝo mem, kaj tiel kun la rajto batali memstare kaj memstile, iri kien ĝi volas kaj reveni kiam tio al ĝi plaĉas, dum milita tempo,

kaj esti tute bona kaj sendependa. Tio igus tiun regimenton dezirata de la tuta nobelaro, kaj ĉiuj estus kontentaj kaj feliĉaj. Poste ni farus la ceteron de la staranta armeo el ordinara materialo, kun neniuloj kiel oficiroj, kiel decus – neniuloj elektitaj nur pro sia efikeco – kaj ni devigus tiun regimenton agi strikte, permesus al ĝi neniujn nobelajn liberecojn, kaj devigus ĝin fari la tutan laboron kaj obstinan marteladon, kaj do, kiam ajn tiuj de la reĝo mem estis lacaj kaj volis foriri por havi iom da ŝanĝo, kaj festi inter troloj, ili povus fari tion senĝene, sciante ke la afero estis en sekuraj manoj malantaŭe, kaj la aferoj daŭre estos prizorgataj tute kiel kutime. La reĝo tre ŝatis la ideon.

Kiam mi notis tion, tio donis al mi valoran ideon. Mi kredis ke mi finfine trovis vojon el malnova kaj obstina malfacileco. Vi komprenu, la reĝidoj de la Pendragona dinastio estis longvivaj kaj tre efikaj naskantoj. Kiam ajn infano estis naskata al iu de ili – kaj tio okazis sufiĉe ofte – estis sovaĝa ĝojo en la buŝo de la nacio, kaj ĉagreno en ĝia koro. La ĝojo estis dubinda, sed la ĉagreno estis honesta. Ĉar la okazintaĵo signifis nova postulo pri reĝa subvencio. Longa estis la listo de tiuj reĝidoj, kaj ili estis longa kaj ĉiam kreskanta ŝarĝo al la regna kaso kaj minaco al la krono. Tamen, Arturo ne povis kredi je la lasta fakto, kaj li ne volis

aŭskulti pri iu el miaj pluraj planoj por anstataŭi la regnajn subvenciojn per io alia. Se mi povus persvadi lin tuj apogi iun el tiuj malproksimaj idoj el sia propra poŝo, mi povus multe fanfaroni pri tio, kaj tio havus bonan efikon al la nacio; sed ne, li ne volis aŭdi pri io tia. Li havis preskaŭ religian pasion pri reĝa subvencio; li ŝajnis rigardi ĝin kiel ian sanktan gajnon, kaj oni ne povis iriti lin tiel rapide kaj certe per alia maniero ol atako al tiu respektinda institucio. Se mi kuraĝus singarde subkompreni ke ne estis alia respektinda familio en Anglio kiu akceptus esti tiel humila, ke ĝi elstreĉu la ĉapelon – tamen, post tio mi neniam povis diri pli; li ĉiam interrompis min tie, kaj tre akre.

Sed mi kredis ke mi finfine vidis mian ŝancon. Mi fondu tiun elitajn regimenton el nur oficiroj – eĉ ne unu senrangulo. Duono de ili estu nobeloj, kiuj plenigu ĉiujn lokojn ĝis generalmajoro, kiuj servos senpage kaj mem pagos siajn proprajn kostojn; kaj ili ĝoje faros tion, kiam ili lernos ke la cetero de la regimento konsistos nur el princoj el reĝa sango. Tiuj princoj el reĝa sango havu la rangojn de generaleŭtenanto kaj supren ĝis feldmarŝalo, estu abunde salajrataj, ekipataj kaj manĝaĵataj de la ŝtato. Aldone – kaj tio estis la genia detalo – estu proklamate ke tiuj princaj granduloj estu ĉiam alparolataj per mirige impona titolo (kiun mi poste elpensos) kaj ili, kaj

nur ili en tuta Anglio, estu tiel alparolataj. Fine, ĉiuj princoj de reĝa sango povu libere elekti: aliĝi al tiu regimento, ricevi tiun grandan titolon, kaj rezigni la reĝan subvencion, aŭ resti ekstere kaj ricevi subvencion. Bela detalo: princoj el reĝa sango ne ankoraŭ naskitaj, sed baldaŭ naskotaj, povus *naskiĝi* en la regimenton, kaj komenciĝi bone, kun bonaj salajroj kaj ĉiamaj postenoj, post regula informo el la gepatroj.

Ĉiuj knaboj aliĝos, mi estis certa pri tio; do ĉiuj ekzistantaj subvencioj nuliĝos; ke la novnaskitoj ĉiam aliĝos estis same certe. Ene de sesdek tagoj, tiu amuza kaj bizara anomalio, la reĝa subvencio, ne plu estos vivanta fakto, kaj havos sian lokon inter la strangaĵoj de la pasinteco.

26. La unua gazeto

Kiam mi diris al la reĝo ke mi eliros alivestita al eta libera homo, por vidi la landon kaj konatiĝi kun la pli modesta vivo de la popolo, li tuj entuziasmiĝis pri tiu novaĵo, kaj nepre volis mem partopreni la aventuron – nenio povis haltigi lin – li lasos ĉion kaj kunvenos – estis la plej bela ideo, kiun li renkontis dum multaj tagoj. Li volis elŝteliĝi tra la malantaŭa pordo kaj komencu tuj; sed mi montris al li ke tio ne taŭgos. Ja li devus pagi por la reĝa malsano – do tuŝi ĝin – kaj ne estus ĝuste seniluziigi la domon, kaj ne kaŭzos prokraston kiu valoris la penon, ĉiukaze, ĉar temis nur pri unu nokto. Kaj mi pensis ke li devis diri al la reĝino ke li foriros. Kiam mi diris tion, lia vizaĝo nebuliĝis kaj li aspektis malgaja. Mi bedaŭris ke mi parolis, precipe kiam li diris:

"Vi forgesas ke Lanceloto estas ĉi tie; kaj kie estas Lanceloto, ŝi ne rimarkas se la reĝo foriras, nek kiun tagon li revenas."

Kompreneble, mi ekparolis pri io alia. Jes, Ginevra estis bela, vere, sed ankaŭ sufiĉe stulta. Mi neniam enmetis min en tiajn aferojn, tio ne estis mia tasko, sed mi tre malŝatis vidi kiel la aferoj evoluas, kaj mi ne hezitas diri tion. Multajn fojojn ŝi demandis al mi:

"Sir Estro, ĉu vi vidis ie Sir Lanceloton?"

Sed se ŝi iam sopiris la reĝon, mi hazarde ne ĉeestis.

Estis tre bela plano por la afero de la reĝa malsano – tre bone planita kaj kredinda. La reĝo sidis sub baldakeno; ĉirkaŭ li estis granda pastraro en plena religia vestaro. Elstare, kaj pro loko kaj pro persona vestaro, staris Marinel, ermito kaj fuŝkuracisto, por prezenti la malsanulojn. Ĉie sur la granda planko, kaj eĉ ĝis la pordoj, en plena konfuzo, kuŝis la skrofolaj, sub forta lumo. Estis same bona kiel pentraĵo; fakte, ŝajnis planita por aspekti kiel tia, kvankam tiel ne estis. Ĉeestis okcent malsanuloj. La laboro okazis malrapide; ĝi ne estis sufiĉe nova por interesi min, ĉar mi jam vidis la ceremoniojn; la tutaĵo baldaŭ tedis min, sed la regularo postulis ke mi restu tie. La kuracisto estis tie, ĉar en ĉiuj tiaj homamasoj estis multaj kiuj nur imagis ke io ĉe ili estis malĝusta, kaj multaj kiuj sciis ke ili estas sanaj, sed deziris la senmortan honoron havi korpan kontakton kun reĝo, kaj ankoraŭ aliaj kiuj ŝajnigis sin esti malsanaj por havi la moneron kiu akompanis la korpan kontakton. Ĝis nun, tiu monero estis eteta orpeco valoranta ĉirkaŭ triona dolaro. Kiam vi pripensas kiom tiu sumo povis aĉeti, tiam kaj tie, kaj kie multaj estis la skrofolaj, kiam ne mortintaj, tiam vi povas kompreni ke la ĉiujara pago por la reĝa malsano nur estis la *River and Harbor Bill* de tiu registaro

por ĝia preno de la regna kaso, kaj la ŝanco akapari la kremon de la troaĵo. Do mi private tuŝis la regnan kason mem por la reĝa malsano. Mi metis ses seponojn de la sumo en la regnan kason unu semajnojn antaŭ ol forlasi Kameloton kaj iri al miaj aventuroj, kaj ordonis ke la restanta sepono estu ŝanĝata al kvinpencaj moneroj, kaj donata en la manojn de la ministro pri la reĝa malsano; kvin pencoj por ĉiu ora monero, komprenu, kiu labori por tiu. Eble tio estos iom peza ŝarĝo al la kvinpenco, sed mi juĝis ke ĝi povos elteni tion. Ĝenerale, mi ne ŝatas dilui kapitalon, sed mi pensis ke tio estis bone en ĉi tiu kazo, ĉar ĉiuokaze estis nur donaco. Kompreneble, oni povas dilui donacon kiom ajn oni volas; kaj tion mi ĝenerale faras. La malnovaj oraj kaj arĝentaj moneroj de la lando havis antikvan kaj nekonatan originon, ĝenerale, sed kelkaj el ili estis romiaj; ili estis malbone formitaj, kaj malofte pli rondaj ol la luno unu semajnon post plenluno; ili estis martelitaj, ne stampitaj, kaj ili estis tiel frotuzitaj ke la teksto sur ili estis same nelegeblaj kiel vezikoj, kaj aspektis kiel tiaj. Mi juĝis ke klare legebla kaj nove stampita kvinpenco, kun klare videbla bildo de la reĝo sur unu flanko kaj de Ginevra sur la alia, kaj iu bela kaj pia slogano, imponos al la skrofolaj same bone kiel pli nobla monero kaj plaĉos al ili multe pli; kaj mi pravis. Ĉi tiu grupo estis la unua al kiu

ĝi estis provata, kaj tio perfekte funkciis. La savo de mono estis ekonomie notinda. Vi komprenos tion pro ĉi tiuj ciferoj: ni tuŝis iom pli ol sepcent el la okcent pacientoj; kun la antaŭaj prezoj, tio kostus al la registaro ĉirkaŭ ducent kvardek dolarojn; kun la novaj prezoj, ni devis pagi nur ĉirkaŭ tridek kvin dolarojn; do ni tuj savis pli ol ducent dolarojn. Por kompreni kiom tio signifis, pripensu ĉi tiujn aliajn ciferojn: la ĉiulandaj kostoj por nacia registaro samvaloras al tri tagoj de meza salajro por ĉiu individuo de la popolo, se oni kalkulas ĉiun individuon kiel viron. Se vi prenas nacion de sesdek milionoj, kie la meza salajro estas du dolaroj tage, tritaga salajro prenita el ĉiu individuo donos tricent sesdek milionojn da dolaroj kaj pagos la kostojn de la registaro. En mia tempo, en mia propra lando, tiu mono estis kolektata per impostoj, kaj la civitano imagis ke la eksterlanda importisto pagis ĝin, kaj komfortigis lin pensi tiel; dum fakte ĝin pagis la usona popolo, kaj ke la kosto estis tiel egale dividita inter ili ke la ĉiujara kosto por la posedanto de cent milionoj, kaj la ĉiujara kosto por la suĉanta bebo de taglaboristo, estis ekzakte la sama – ĉiu pagis ses dolarojn. Neniu povus esti pli egaleca ol tio, mi kredas. Nu, Skotlando kaj Irlando pagis impostojn al Arturo, kaj sume, la popoloj de la britaj insuloj estis iom malpli ol unu miliono. La meza salajro de meĥanikisto estis tri

pencoj tage, kiam li pagis siajn proprajn vivkostojn. Laŭ tiu regulo, la kostoj de la nacia registaro estis naŭdek mil dolaroj jare, aŭ ĉirkaŭ ducent kvindek dolaroj tage. Do, kiam mi anstataŭis oron per kvinpencoj dum tago de reĝa malsano, mi ne nur kaŭzis damaĝon al neni, kaŭzis nekontentigon al neni, sed tuŝis ĉiujn koncernatojn kaj cetere savis kvar kvinonojn de la naciaj kostoj de tiu tago – savo kiu egalus al okcent mil dolaroj en mia tempo en Usono. Farante tiun kontribuon, mi uzis saĝecon tre malproksiman – la saĝecon de mia infanaĝo – ĉar la vera ŝtathomo ne malrespektas iun ajn saĝecon, kiel ajn malalta estas ĝia origino; dum mia infanaĝo, mi ĉiam savis miajn pencojn kaj kontribuis per butonoj al la misia agado en eksterlando. Por la nescianta sovaĝulo, butonoj estas same valoraj kiel moneroj, sed por mi la monero estas pli valora ol butonoj; ĉiuj estis feliĉaj, kaj neni damaĝata.

Marinel akceptis la pacientojn kiam ili venis. Li ekzamenis la kandidaton; se li ne povas kvalifiki sin, li estos forigata; se li povis, li estos transdonata al la reĝo. Pastro elparolis la vortojn:

"Ili metos siajn manojn al la malsanuloj, kaj tiuj resaniĝos."

Poste, la reĝo karesis la vundojn, dum la legado daŭris; fine, la paciento estis akceptata kaj ricevis sian moneron – la reĝo mem pendigis lin

ĉirkaŭ lia kolo – kaj estis forsendata. Ĉu vi kredas ke tio kuracus? Jes, certe. Iuj ajn frazoj kuracos, se la fido de la paciento estas sufiĉe forta. Supre ĉe Astolato estis kapelo kie la Virgulino iam aperis al knabino, kiu kutimis gvidi anserojn tie – ŝi mem diris tion – kaj ili konstruis la kapelon tie, kaj pendigis tie bildon de la okazintaĵo – bildo, al kiu oni kredus ke estus danĝere por malsana homo proksimiĝi; dum, male, miloj da lamaj kaj malsanaj venis kaj preĝis antaŭ ĝi ĉiujare kaj foriris tute sanaj; kaj eĉ la sanuloj povis rigardi ĝin kaj vivi. Kompreneble, kiam mi aŭdis pri tiuj aferoj, mi ne kredis je ili; kaj kiam mi iris tien kaj vidis ilin, mi devis kapitulaci. Mi vidis ke la kuracoj influis min mem; kaj ili estis veraj kuracoj, kaj ne dubeblaj. Mi vidis kriplulojn, kiujn mi jam vidis apud Kameloto dum jaroj sur lambastonoj, veni kaj preĝi antaŭ tiu bildo, meti la bastonojn sur la tero kaj foriri ne plu lamaj. Tie estis stakoj de lambastonoj, lasitaj de tiaj homoj kiel pruvoj.

En aliaj lokoj, homoj traktis la animon de paciento, sen diri al li eĉ unu vorton, kaj kuracis lin. En aliaj, ekspertoj kunigis pacientojn en ĉambro kaj preĝis por ili, kaj apelaciis al ilia fido, kaj tiuj pacientoj foriris kuracitaj. Kiam ajn oni trovas reĝon, kiu ne povas kuraci la reĝan malsanon, oni povas esti certa ke la plej valora superstiĉo kiu apogas lian tronon – la kredo de la

regato ke Dio nomumis lian reganton – jam ĉesis. Kiam mi estis juna, la monarĥoj de Anglio ne plu tuŝis pro la malbono, sed ili ne havis kialon ne fari tion; ili povus kuraci ĝin kvardek naŭ fojojn el kvindek.

Do, kiam la pastro estis ĉantinta dum tri horoj, kaj la bona reĝo polurinta la pruvojn, kaj la malsanaj ankoraŭ premvenis same multaj kiel antaŭe, mi komencis senti min neelteneble tedata. Mi sidis ĉe malfermita fenestro ne malproksime de la baldakeno. Por la kvincenta fojo, paciento venis antaŭen por havi sian malbelecon karesata; denove, ĉi tiuj vortoj estis ĉantataj: "Ili metos siajn manojn al la malsanuloj..." kiam ekstere eksonis, laŭte kiel trumpeto, tonon kiu sorĉis mian animon kaj ĵetis dek tri senvalorajn jarcentojn ĉirkaŭ miaj oreloj:

"Kameloto *Semajna Hosana kaj Literatura Vulkano!* – plej nova elsono – nur du pencojn – ĉio pri la granda miraklo en la Valo de Sankteco."

Venis iu pli granda ol reĝoj – la gazetportisto. Sed mi estis la sola en tiu homamaso kiu sciis kion signifis tiu granda nasko, kaj kion tiu imperiestra magiisto venis en la mondon por fari.

Mi ĵetis kvinpencan moneron el la fenestro kaj ricevis mian gazeton; la pragazetportisto de la mondo iris ĉirkaŭ la angulo por ricevi mian ŝanĝmonon, kaj li ankoraŭ ne revenis. Estis

ĝojigege denove vidi gazeton, tamen mi sentis sekretan ŝokon kiam miaj rigardoj falis sur la unuaj rubrikoj. Mi vivis tiel longe en malseka etoso de respekto kaj humileco, ke ili sendis tremigantan, malvarman ondeton tra mi:

GRANDA FESTO EN LA VALO DE SANKTECO!

LA AKVOFLUOJ ŜTOPITAJ!

FRATO MERLINO FARAS SIAN EBLON,
SED MALSUKCESAS?

Sed la Estro sukcesas je siaj unuaj provoj!

La mirakla fonto malŝtopita en terura eksplodo de

INFERA FAJRO KAJ FUMO KAJ TONDRO!

La sidejo de la buteo surprizita!

SENKOMPARAJ ĜOJOJ!

-- kaj tiel plu, kaj tiel plu. Jes, estis tro laŭte. Iam mi povus ĝui ĝin kaj vidi en tio nenion eksterordinaran, sed nun sonis false. Estis bona arkansasa ĵurnalismo, sed ĉi tie ne estis Arkansaso. Cetere, la antaŭlasta lineo intencis ofendi la ermitojn, kaj eble perdigi al ni ilian apogon. Fakte, estis tro leĝera tono en la tuta gazeto. Estis evidente ke mi profunde ŝanĝiĝis sen noti tion. Mi trovis min malagrabla tuŝataj de etaj, impertinentaj malrespektoj, kiuj ŝajnus nur tute taŭga retoriko en pli frua periodo de mia vivo. Estis multegaj aferoj ĉitiaj, kaj ili malkomfortigis min:

Loka fumo kaj cindro

Sir Lanceloto renkontis maljunan reĝon
Agrivande de Irlando neatendite lastsemajne sur

la erikejo sude de la porkejo de Six Balmoral le Merveilleuse. La vidvino estas informita.

Ekspedicio No 3 komenciĝos ĉirkau la unua venontmonate por serĉi Sir Sagramor la Deziroma. Ĝin estros la konata Kavaliro de la Ruĝaj Maldensejoj, akompanata de Sir Persant de Inde, kiu estas kompetenta, inteligenta, bonmaniera kaj ĉiumanire bloko, kaj cetere akompanata de Sir Palamides la Saraceno, kiu mem ne estas iu mola bero. Ĉi tio ne estas pikniko, tiuj uloj estas seriozaj.

La legantoj de Hosana bedaŭros aŭdi ke la bela kaj ŝatata Sir Charolais de Gaŭlio, kiu dum sia kvarsemajna restado en la Taŭro kaj la Hipogloso, ĉi tiu urbo, gajnis ĉiun koron per siaj poluritaj manieroj kaj eleganta konversacio, iros hejmen hodiaŭ. Venu denove, Karlo!

La financa planado de la entombigo de la forpasinta Sir Dalliance, filo de la duko de Kornvalo, mortigita en renkonto kun la Giganto de la Nodita Bastono lastmarde ĉe la limoj de la Ebenajo de Sorĉado, estis en la manoj de la ĉiam afabla kaj efika Mumble, princo de funebraĵistoj, kaj ne ekzistas iu pli kontentiga sperto havi la lastajn bedaŭrindajn ritojn plenumitaj. Provu lin!

La korajn dankojn de Hosana devas doni la personaro, de la redaktisto kaj malsupren al la diablo, al la ĉiam afabla kaj agrabla Alta Komisaro de la Tria Asististo de la Palaco V-t

por pluraj pladoj de glaciaĵo, kun kvalito kiu faras la okulojn de la ricevantoj malsekaj pro dankemo. Kiam tiu administrantaro volas havi dezirindan nomon por frua promocio, Hosana volas havi ŝancon fari proponon.

Fraŭlino Irene Dewlap, el Suda Astolato, vizitas sian onklon, la ŝatata gastiganto de la Gastejo de Bovtraktantoj, Hepata Pado, ĉi tiu urbo.

Juna Barker, la balgo-riparisto, denove estas hejme, kaj aspektas multe pli sana post sia feria rondirado al la ĉirkaŭloĝantaj forĝejoj. Vidu lian anoncon!

Kompreneble, estis sufiĉe bona ĵurnalismo por komencanto. Mi sciis tion tre bone, kaj tamen estis iel seniluziige. "Kortega Rondletero" plaĉis al mi pli; fakte, ĝia simpla kaj digna respektemo tre refreŝigis min post ĉiuj tiuj maldignaj intimaĵoj. Sed eĉ tio povus esti pli bona. Kion ajn oni faras, ne eblas meti multe da variaĵoj en kortega rondletero. Mi agnoskas tion. Estas io profunde monotona en ĝiaj faktoj, kio baras kaj malhelpas oniajn plej sincerajn provojn brili kaj entuziasmigi. La plej bona maniero fari tion – fakte la sola saĝa maniero – estas kaŝi ripeton de faktoj per variado de formo; senhaŭtigi vian fakton ĉiufoje, kaj surmeti novan kovron de vortoj. Tio trompas la okulon; vi kredas ke estas

nova fakto. donas al vi la ideon ke la kortego daŭras kiel ĉio; tio ekscitas vin, kaj vi malplenigas la tutan kolonon, kun bona apetito, kaj eble vi neniam notas ke estas barelo de supo farita el unusola fabo. La maniero de Clarence estis bona, estis simpla, estis digna, estis direkta kaj afereca; mi nur diras ke ne estis la plej bona maniero:

Kortera Rondletero

Lunde, la Reĝo rajdis en la parko.
Marde, la Reĝo rajdis en la parko.
Merkrede, la Reĝo rajdis en la parko.
Ĵaude, la Reĝo rajdis en la parko.
Vendrede, la Reĝo rajdis en la parko.
Sabate, la Reĝo rajdis en la parko.
Dimanĉe, la Reĝo rajdis en la parko.

Tamen, rigardante la gazeton iom post iom, mi estis tre kontenta pri ĝi. Etaj teknikaj fuŝaĵoj estis videblaj tie kaj ĉi tie, sed ne tiel multaj ke gravus, kaj ĉiuokaze estis sufiĉe bona arkansasa presprovaĵo, kaj pli bona ol necesis en la tempo kaj lando de Arturo. Ĝenerale, la gramatiko estis manka kaj la frazkonstruado pli-malpli lama; sed mi ne tre zorgis pri tiuj aferoj. Ili estas miaj propraj ordinaraĵoj mankoj, kaj oni ne kritiku aliajn pro aferoj kie oni mem ne estas perfekta.

Mi estis sufiĉe literaturmalsata por voli vori la tutan gazeton tuj, sed mi povis manĝi nur iomete, kaj poste devis prokrasti, ĉar la monaĥoj ĉirkaŭ mi sieĝis min per fervoraj demandoj: Kio estas tiu stranga afero? Al kio ĝi celas? Ĉu estas naztuko? Ĉabrako? Parto de ĉemizo? El kio ĝi konsistas? Kiel maldika ĝi estas, kaj kiel bela kaj rompebla; kaj kiel ĝi kraketas! Ĉu ĝi elfrotiĝos, vi kredas, kaj ĉu la pluvo ne detruos ĝin? Ĉu estas skribaĵo kio aperas sur ĝi, aŭ ĉu estas nur ornamaĵoj? Ili suspektis ke estis skribaĵo, ĉar tiuj inter ili kiuj scipovis legi la latinan kaj iomete la grekan rekonis kelkajn el la literoj, sed ili ne povis trovi iun signifon en ili. Mi formulis mian informon plejeble simple:

"Estas publika gazeto; mi klarigos kio estas tio, iam. Ne estas ŝtofo, ĝi estas el papero; iam mi klarigos kio estas papero. La linioj sur ĝi estas legaĵo; kaj ne skribita permane, sed presigita; iom post iom mi klarigos kio estas presigo. Mil el ĉi tiuj folioj estis faritaj, ĉiuj tute similaj al ĉi tiu, en ĉiu detalo – oni ne povas apartigi ilin."

Tiam ili ĉiuj ekkriis surprizite kaj admire:

"Mil! Ho, granda laboro – tutjara laboro por multaj homoj."

"Ne – nur unutaga laboro por unu viro kaj unu knabo."

Ili krucsignis sin, kaj elspiris unu aŭ du protektajn preĝojn.

"Hooo – miraklo, magiaĵo! Malluma laboro de sorĉado."

Mi lasis tion esti. Poste mi mallaŭte legis, al tiel multaj kiel povis kunigi siajn razitajn kapojn en aŭskultebla distanco, parton de la rakonto pri la miraklo kiam oni restaŭris la fonton, kaj min akompanis dum la tuta tempo surprizitaj kaj respektemaj elkrioj:

"Hooo!"

"Kiel vere!"

"Mirige, mirige!"

"Ĝuste tiel okazis, mirige ekzakte!"

Kaj ĉu ili rajtas preni ĉi tiun aĵon en siaj manoj, kaj senti ĝin kaj ekzameni ĝin? – Ili estos tre singardaj. Do ili prenis ĝin, kaj traktis ĝin tiel singarde kaj respekte kiel se ĝi estus iu sankta afero el iu supernatura regiono, kaj singarde sentis ĝian strukturon, karesis ĝian agrablan kaj glatan surfacon per restanta tuŝo, kaj karesis la mistikajn literojn per fascinitaj okuloj. Tiuj grupigitaj, klinitaj kapoj, tiuj ravitaj vizaĝoj, tiuj parolantaj okuloj – kiel belaj al mi! Ĉar ĉu ĉi tio ne estis mia amata, kaj ĉu ne ĉiu tiu muta miro kaj intereso kaj omaĝo estis la plej esprimiga kaj libervola komplimento al ĝi? Mi do sciis kion sentas patrino kiam virinoj, ĉu fremdaj ĉu amikaj, prenas ŝian novan bebon, kaj premas sin al ĝi per unu fervora impulso, kaj klinas siajn kapojn super ĝi en transcenda adorado pro kio la tuta

cetera universo malaperas el ilia konscio kvazaŭ ĝi ne ekzistus, portempe. Mi sciis kiel ŝi sentas, kaj ke ne ekzistas alia kontentigita ambicio, ĉu de reĝo, konkeranto aŭ poeto, kiu iras eĉ duonvoje al tiu trankvila alta pinto aŭ kiu diras eĉ duone tiel dian kontentecon.

Dum la tuta cetera kunsidado, mia gazeto iris de grupo al grupo tien kaj reen kaj ĉirkaŭen tra tiu vasta halo, kaj miaj feliĉaj okuloj estis ĉiam sur ĝi, kaj mi sidis senmova, plonĝinta en kontentigon, ebria pro ĝojo. Jes, jen paradizo; mi gustumis ĝin unufoje, eĉ se neniam denove.

27. La jankio kaj la reĝo vojaĝas inkognite

Kiam estis tempo enlitiĝi, mi prenis la reĝon al miaj privataj ĉambroj por tranĉi liajn harojn kaj helpi lin porti pli simplajn vestaĵojn. La altaj klasoj portis siajn harojn tranĉitajn ĉe la frunto, sed krom tie pendantaj ĝis la ŝultroj, dum la plej malaltaj ordinaruloj tranĉis ilin kaj antaŭe kaj malantaŭe; la sklavoj, tute male, lasis siajn harojn kreski libere. Do mi metis bovlon super lia kapo kaj fortranĉis ĉion kio kreskis sub ĝi. Mi ankaŭ tondetis liajn vangobarbojn kaj lipharojn ĝis ili estis nur duonan colon longaj; kaj mi provis fari tion neartisme, kaj mi sukcesis. Estis kruda malbeligo. Kiam li surprenis siajn malgraciajn sandalojn, kaj sian longan jakon de kruda, bruna tolo, kiu pendis rekte el lia kolo ĝis liaj piedartikoj, li ne plu estis la plej bela viro en sia regno, sed unu el la plej malbelaj, plej ĉiutagaj kaj plej malallogaj. Ni estis vestitaj kaj razitaj same, kaj povus aperi kiel etkampanoj, aŭ bienaj inspektistoj, aŭ paŝtistoj, aŭ transportistoj; jes, aŭ vilaĝaj metiistoj, se ni tiel elektas, ĉar niaj vestaĵoj fakte estis universalaj inter malriĉuloj, ĉar tiel fortaj kaj malmultekostaj. Mi ne volas diri ke ĝi estus vere malmultekosta al iu tre malriĉa, sed ke ĝi estis la plej malmultekosta materialo havebla por viraj vestaĵoj – materialo fabrikita, komprenu.

Ni forŝteliĝis unu horon antaŭ matenkrepusko, kaj kiam la suno estis klare videbla, ni jam iris ok aŭ dek mejlojn, kaj estis meze en maldense loĝigita kamparo. Mi havis sufiĉe pezan dorsosakon; ĝi estis plena de manĝaĵoj – manĝaĵoj por la reĝo, ĝis li povis al kutimiĝi al la kruda manĝaĵo de la lando sen malsaniĝi.

Mi trovis komfortan sidlokon por la reĝo apud la vojo, kaj poste donis al li unu aŭ du buŝplenojn por trankviligi lian stomakon. Poste mi diris ke mi trovos iom da akvo por li, kaj forvadis. Parto de mia plano estis iri ekster lia vidkampoj kaj sidiĝi kaj ripozi iom sola. Mi ĉiam kutimis stari en lia ĉeesto; eĉ ĉe la ŝtata komitato, krom tiuj maloftaj okazoj kiam la kunsido daŭris tre longe, ja dum pluraj horoj; tiam mi havis etan senspinan aferon, kiu similis al inversa kulvert, kaj estis same komforta kiel dentodoloro. Mi ne volis enĵeti lin subite, sed iom post iom. Nun ni devos sidi kune kiam kun aliaj, aŭ homoj notos; sed ne estus bona politiko se mi ludos egalecon kun li, kiam tio ne estis necese.

Mi trovis la akvon ĉirkaŭ tricent jardojn for, kaj estis ripozinta ĉirkaŭ dudek minutojn, kiam mi aŭdis voĉojn. Tute bone, mi pensis – kamparanoj irantaj al la laboro; verŝajne neniu alia movus sin tiel frue. Sed tuj poste, tiuj venantoj ekaperis ĉe kurbiĝo de la vojo – bone vestitaj homoj altnivelaj, kun pakmuloj kaj

akompanataj de servistoj! Mi pafe ekkuris, tra la arbustoj, la plej mallongan vojon. Dum iom da tempo ŝajnis ke tiuj homoj pasos la reĝon antaŭ mi; sed senespero donas al oni flugilojn, kaj mi klinis mian korpon antaŭen, enspiris, retenis la spiron kaj flugis. Mi alvenis. Kaj en bona tempo.

"Pardonu min, mia reĝo, sed nun ne estas tempo por ceremonioj – saltu! Saltu surpieden – kelkaj altnivelaj homoj venas."

"Ĉu tio estas io miriga? Lasu ilin veni."

"Sed sinjoro! Oni ne devas vidi vin sidanta. Stariĝu! – kaj staru en humila pozo dum ili pasas. Vi estas kamparano, memoru."

"Vere – mi forgesis tion, ĉar mi planis grandan militon kontraŭ Gaŭlio" – nun li staris, sed bieno povus ekstari pli rapide, se ĝi povus per tio iom gajni – "kaj tia venis penso kaj faligis tiun majestatan sonĝon kiu..."

"Pli humila sinteno, mia sinjoro la reĝo – kaj rapide! Klinu vian kapon! – Pli! – Ĉiam pli! – Lasu ĝin fali!"

Li honeste faris kion li povis, sed dio mia, tio ne estis multe. Li aspektis same humila kiel la oblikva turo de Pizo. Pli ol tio oni povus diri. Fakte, estis tiel tondre mizera sukceso, ke dubemaj mienoj videblis laŭ la tuta vico, kaj impona servisto plej malantaŭ levis sian vipon; sed mi saltis ĝustatempe kaj estis sub ĝi kiam ĝi falis; kaj protektata de ĉiuj krudaj ridoj kiuj

sekvis, mi parolis akre kaj avertis la reĝon nenion rimarki. Li regis sin dum momento, sed malfacile; li volis vori la procesion. Mi diris:

"Tio haltigus niajn aventurojn jam ĉe la komenco; kaj ĉar ni ne havas armilojn, ni povus fari nenion kun tiu armita aro. Se ni sukcesu en nia entrepreno, ni devas ne nur aspekti kiel kamparanoj sed ankaŭ agi kiel tiaj."

"Tio estas saĝeco; neniu povas nei tion. Lasu nin pluriri, Sir Estro. Mi notos kaj lernos, kaj faros mian fareblon."

Li plenumis sian promeson. Li faris ĉion kion li povis, sed mi vidis pli bonajn spektaklojn. Se vi iam vidis aktivan, senzorgan, entrepreneman infanon fari diligente unu petolaĵon post la alia dum la tuta tago, kaj maltrankvilan patrinon ĉiam tuj malantaŭ li, kaj apenaŭ savi lin por ke li ne dronigu sin aŭ aŭ rompi sian kolon per ĉiu nova eksperimento, tiam vi vidis la reĝon kaj min.

Se mi povus antaŭvidi kia la afero estos, mi dirus: Ne, se iu volas vivteni sin per montrado de reĝo kiel kamparano, lasu lin provi; mi povas fari pli kun bestoĝardeno, kaj travivi pli longe. Kaj tamen, dum la unuaj tri tagoj mi neniam lasis lin eniri kabanon aŭ alian loĝejon, Se li povus esti akceptata ie dum tiuj unuaj tagoj, estus en malgrandaj gastigejoj kaj sur la vojo; do ni iris nur al tiuj lokoj. Jes, li certe agis tiel bone kiel li

povis, sed kion pri tio? Li tute ne pliboniĝis, laŭ kio mi povis vidi.

Li ĉiam timigis min, ĉiam konfliktis kun novaj surprizantoj, en novaj kaj neatenditaj lokoj. Komence de la vespero la duan tagon, kion li faras? Li tutsimple prenas ponardon el la interno de sia jako!

"Ho diable, sinjoro, kie vi ricevis tion?"

"El kontrabandisto en la gastigejo, hieraŭ vespere."

"Kial ajn vi aĉetis ĝin?"

"Ni fuĝis el pluraj danĝeroj per ruzo – via ruzo – sed mi pensis ke estus nur singarde se ankaŭ mi portus armilon. Via eble ne servos en iu tikla situacio."

"Sed homoj de nia nivelo ne rajtas porti armilojn. Kion dirus sinjoro – jes, aŭ iu ajn persono de certa rango – se li kaptus suprenirantan kampanon kun ponardo en siaj vestaĵoj?"

Ni estis bonŝancaj ke neniu venis ĝuste tiam. Mi persvadis lin forĵeti la ponardon; kaj tio estis same facile kiel persvadi infanon forĵeti iun brilan, freŝan manieron mortigi sin. Ni pluiradis, silentaj kaj pensantaj. Fine, la reĝo diris:

"Kiam vi scias ke mi pripensas ion nekonvenan, aŭ ion danĝeran, kial vi ne avertas min ĉesi tion?"

Tio estis surpriziga demando, kaj cerbumiga. Mi ne tute sciis kiel respondi al ĝi, aŭ kion diri; kaj tial, kompreneble, finfine mi diris la naturan aferon:

"Sed sinjoro, kiel mi povas scii kiel vi pensas?"

La reĝo subite haltis, kaj fiksrigardis min.

"Mi kredis ke vi estas pli granda ol Merlino; kaj vere vi estas, en magio. Sed profetado estas pli granda ol magio. Merlino estas profeto."

Mi komprenis ke mi faris eraron. Mi devis reiri al mia perdita tero. Post profunda pripensado kaj zorgema planado, mi diris:

"Sinjoro, mi estis miskomprenata. Mi klarigos. Estas du specoj de profetado. Unu estas la dono antaŭscii aferojn kiuj estas nur mallonge antaŭe, la alia estas la dono antaŭscii aferojn kiuj estas tutaj eraoj kaj jarcentoj for. Kiu dono estas la pli granda, vi kredas?"

"Ho, la lasta, plej certe!"

"Vere. Ĉu Merlino posedas ĝin?"

"Parte, jes. Li antaŭdiris misterojn pri miaj naskiĝo kaj estonta reĝeco kiuj estis dudek jarojn for."

"Ĉu li iam iris trans tio?"

"Mi kredas ke li ne asertas pli."

"Verŝajne estas lia limo. Ĉiuj profetoj havas siajn limojn. La limo de kelkaj el la grandaj profetoj estis cent jaroj."

"Tiuj estas malmultaj, mi kredas."

"Estis du eĉ pli grandaj, kies limoj estis kvarcent kaj sescent jaroj, kaj unu kies limo estis eĉ sepcent dudek."

"Vere mirige."

"Sed kio estas tiuj kompare al mi? Ili estas nenio."

"Kion? Ĉu vi vere povas trarigardi eĉ tiel longan tempon kiel..."

"Kiel sepcent jaroj? Ho sinjoro, tiel klare kiel la vidkapablo de aglo, mia profeta okulo penetras kaj malkaŝas la estontecon de ĉi tiu mondo dum preskaŭ dek tri kaj duona jarcentoj!"

Mia lando, vi devus vidi la okulojn de la reĝo malrapide malfermiĝi, kaj levi la tutan atmosferon de la tero unu tutan colon! Tio decidis pri Frato Merlino. Oni neniam devis pruvi siajn faktojn, kun tiuj homoj oni devis nur aserti ilin. Neniu iam havis la ideon dubi.

"Nu ja," mi pludiris, "mi _povus_ fari ambaŭ specojn de profetado – la longan kaj la mallongan – se mi elektus ĉiam ekzerci tion; sed mi malofte ekzercas alian specon ol la longa, ĉar la alia estas sub mia digno. Ĝi pli taŭgas por sorcistoj kiel Merlino – mallongvostaj profetoj, kiel ni nomas ilin en la profesio. Kompreneble, mi fojfoje tamen faras mallongan profetaĵon, sed ne ofte – fakte preskaŭ neniam. Vi memoru ke estis multe da babilado, kiam vi venis al la Valo de Sankteco,

ke mi profetis vian venon kaj ekzakte kiam vi venos, du aŭ tri tagojn antaŭe."

"Fakte jes, nun mi memoras."

"Nu, mi povus fari tion eĉ kvardekfoje pli facile, kaj aldoni mil pli detalojn, se estus kvincent jarojn antaŭe anstataŭ du aŭ tri tagoj."

"Kiel mirige ke estus tiel!"

"Jes, vera eksperto povas ĉiam antaŭdiri ion kvincent jarojn antaŭe pli facile ol se estas nur kvincent sekundoj."

"Kaj tamen, racie devus esti male; devus esti kvincentfoje pli facile antaŭdiri la lastan ol la unuan, ĉar vere, ĝi estas tiel proksime ke neinspirita homo devus preskaŭ povi vidi ĝin. Vere, la leĝo de profetado fakte neas la probablon, kaj tre strange faras la malfacilan facila, kaj la facilan malfacila."

Estis saĝa kapo. La ĉapo de kamparano ne sufiĉe maskis ĝin; vi povus scii ke ĝi estis kapo de reĝo en subakviga kloŝo, se vi povus aŭdi ĝin laborigi sian intelekton.

Mi havis novan profesion nun, kaj multon por fari. La reĝo tiom deziris scii ĉion kio okazos dum la venontaj dek tri jarcentoj, kvazaŭ li kredus ke li travivos ilin. Ekde tiam, mi profetis ke mi estos senhara ĉar mi provos satigi tiun deziron. Mi foje en la vivo agis maldiskrete, sed kiam mi nun ludis la rolon de profeto, tio estis la plej aĉa. Tamen, ĝi havis siajn avantaĝojn.

Profeto ne bezonas havi cerbon. Havi tion komprenebe estas bone, por la ordinaraj postuloj de la vivo, sed ĝi ne estas uzebla en profesia laboro. Ĝi estas la plej ripoziga el ĉiuj profesioj. Kiam la spirito de profetado venas al vi, vi tutsimple prenas vian intelekton kaj metas ĝin en malvarman lokon por ripozi, malligas vian buŝon kaj lasas ĝin sola; ĝi mem laboros; la rezulto estas profetaĵo.

Ĉiutage venis vaganta kavaliro aŭ iu simila, kaj kiam la reĝo vidis ilin, lia milita spirito ĉiufoje vekigis. Li certe forgesus, kaj dirus ion al ili en stilo iom pli alta ol lia ŝajna rango, kaj tial mi ĉiam forigis lin el la vojo ĝustatempe. Tiam li staris kaj vidis per malfermigitegaj okuloj; kaj fiero lumo fulmis el ili; kaj liaj naztruoj malfermiĝis kiel tiuj de milit-ĉevalo, kaj mi sciis ke li sopiris batali kun ili. Sed ĉirkaŭ la tagmezo dum la tria tago mi haltis en la vojo por fari preventaĵon pri kiu mi ekpensis pro la vipobato kiu trafis min antaŭ du tagoj; preventaĵo kiun mi poste decidis ne fari; mi tiom abomenis fondi ĝin; sed nun mi ĵus havis novan memorigon: dum mi senzorge paŝadis, kun buŝo malfermita kaj intelekto ripozanta, ĉar mi profetis, mi puŝis mian piedfingron kaj falis surteren. Mi estis tiel pala ke dum momento mi ne povis pensi; poste mi mole kaj zorgeme ekstaris kaj malbutonis mian dorsosakon. Mi havis tiun dinamitan

bombon en ĝi, envolvita en lano en skatolo. Estis bona afero kunporti; venos la tempo kiam mi povos fari miraklon per ĝi, eble, sed estis nervozige havi ĝin proksime, kaj mi ne volis peti la reĝon porti ĝin. Tamen mi devis aŭ forĵeti ĝin, aŭ elpensi iun sekuran manieron esti kune kun ĝi. Mi eligis ĝin kaj metis ĝin en mian almozpétantan sakon, kaj ĝuste tiam venis kelkaj kavaliroj. La reĝo staris, impona kiel statuo, kaj rigardis ilin – forgesis denove, kompreneble – kaj antaŭ ol mi povis averti lin, estis tempo por li salti, kaj bone ke li tion faris. Li supozis ke ili iros flanken. Iri flanken por eviti piedtreti kamparanon? Kiam ajn li mem flankeniris – aŭ eĉ havis la okazon fari tion, se kamparano vidis lin aŭ iun alian noblan kavaliron ĝustatempe por ŝpari al li la penon? La kavaliroj tute ne atentis la reĝon; la atentado estis lia tasko, kaj se li ne saltus, li estus trankvile tretata de la ĉevaloj, kaj priridata de la homoj.

La reĝo fajre furiozis, kaj elĵetis siajn defion kaj insultojn kun tre reĝa forto. La kavaliroj nun estis iom malproksimaj. Ili haltis, tre surprizataj, kaj turnis sin en siaj seloj kaj rigardis malantaŭen, kvazaŭ cerbumante ĉu indas la penon zorgi pri tiaj simpluloj kiel ni. Poste ili turnis la ĉevalojn kaj ekrajdis al ni. Eĉ ne momento estu perdota. Mi ekrajdis al *ili*. Mi pasis ilin rapidege, kaj ĝuste tiam mi elĵetis harstarigan, animbruligan,

dektriartikan insulton, kompare al kiu tiu de la reĝo ŝajnis malbona kaj simpla. Mi prenis ĝin el la deknaŭa jarcento, kiam oni sciis kiel fari tion. La kavaliroj preskaŭ atingis la reĝon, kiam ili fine povis halti; poste, tute furiozaj, ili starigis siajn ĉevalojn sur iliaj malantaŭaj kruroj, turnigis ilin, kaj hej! ili venis, brusto al brusto. Mi estis sepdek jardojn for, tiam, kaj supreniris ŝtonegon apudvojan. Kiam ili estis malpli ol tridek jardojn for de mi, horizontaligis siajn longajn lancojn, klinis siajn helmitajn kapojn, kaj tiam, kun siaj ĉevalharaj plumtufoj flirtantaj rekte malantaŭ ili, tre bela vidaĵo, tiu fulmanta ekspreso rapidatakis min! Kiam ili estis malpli ol dek kvin jardojn for, mi ĵetis tiun bombon bone celitan, kaj ĝi trafis la teron sub la nazoj de la ĉevaloj.

Jes, estis bona afero, tre bona kaj bela por vidi. Similis al vaporŝipo eksplodanta sur la Misisipo; kaj dum la postaj dek kvin minutoj, ni staris sub konstanta pluveto de mikroskopaj fragmentoj de kavaliroj kaj metalo kaj ĉevaloj. Mi diras ni, ĉar la reĝo aliĝis al la spektantaro, kompreneble, tuj kiam li povis denove spiri. Tie estis truo, kiu donos multe da laboro al ĉiuj homoj en tiu regiono dum kelkaj jaroj – por tion klarigi, mi volas diri: por plenigi ĝin. Tion oni faros relative baldaŭ, kaj la laboro iris al la elektitaj malmultaj: kamparanoj en tiu bieno, kaj neniun pagon ili ricevos.

Sed mi mem klarigis tion al la reĝo. Mi diris ke estis farite per dinamita bombo. Tiu informo ne malutilis al li, ĉar post ĝi, li sciis same multe kiel antaŭe. Tamen estis nobla miraklo, en liaj okuloj, kaj donis novan poenton al mi super Merlino. Mi kredis ke taŭgis klarigi ke ĉi tio estis miraklo tiel malofta, ke ne eblis fari ĝin, krom kiam la atmosferaj kondiĉoj estis tute ĝustaj. Se ne, li petus min ripeti ĝin ĉiam kiam li havis bonan objekton, kaj tio kaŭzus problemojn, ĉar mi ne kunportis pli da bomboj.

28. Trejnante la reĝon

Matene la kvaran tagon, ĝuste kiam la suno supreniris, kaj ni estis irintaj dum horo en la malvarma krepusko, mi faris decidon: la reĝo *devis* esti trejnata, la aferoj ne povis daŭre esti kiel nun, li *devis* esti prenata en mano kaj decideme kaj konscience trejnata, aŭ ni neniam kuraĝos eniri 3; eĉ la katoj scius ke tiu maskita homo estas blufanto kaj ne kamparano. Do mi deklaris paŭzon kaj diris:

"Sinjoro, inter vestaĵoj kaj vizaĝo vi estas tute akceptebla, ne estas kontraŭdiro; sed inter vestaĵoj kaj sinteno, vi estas tute malĝusta, estas tute videbla kontraŭdiro. Via soldata paŝado, via sinjora sinteno – tiuj ne taŭgas. Vi staras tro rekte, vi rigardas tro alten, tro memfide. La zorgoj de regno ne pezigas la ŝultrojn, ili ne faligas la mentonon, ili ne malsuprenigas la altan rigardon, ili ne metas dubon kaj timon en la koron kaj montras tion per ŝrumpinta korpo kaj malcerta irado. Estas la mizeraj zorgoj de la malalte naskitaj kiuj kaŭzas tion. Vi devas lerni la trukon, vi devas imiti la signojn de malriĉeco, mizero, subpremado, insultoj, kaj la aliaj multaj kaj oftaj nehomaĵoj kiuj malplenigas viron de lia vireco kaj faras el li lojala kaj ĝusta kaj akceptata subulo kiu kontentigas siajn mastrojn, aŭ eĉ la infanoj scios kia vi estas malantaŭ via masko, kaj ni estos

frakasataj en la unua domo kie ni haltos. Bonvolu iri ĉi tiel!"

La reĝo zorge rigardis, kaj poste provis imiti.

"Sufiĉe bone – sufiĉe bone. La mentono iom pli malalte, bonvolu – tiel, tre bone. Okuloj tro altaj; bonvolu ne rigardi la horizonton, rigardu la teron, dek paŝojn antaŭ vi. Ho – tio estas pli bone, tio estas tre bone. Sed bonvolu atendi; vi montras tro multe da forto, tro multe da decidemo; vi preferinde pli trotaĉu. Rigardu min, bonvolu – ĉi tiel mi volas diri... Nun vi proksimiĝas; jen la ideo – aŭ almenaŭ io simila... Jes, tio estas sufiĉe bone. *Sed!* Io tre grava mankas. Mi ne tute scias kio estas. Bonvolu iri tridek jardojn, por ke mi havu perspektivon... Do vidu: via kapo estas ĝusta, rapideco ĝusta, ŝultroj ĝustaj, okuloj ĝustaj, mentono ĝusta, irmaniero, starmaniero, ĝenerala stilo ĝustaj – ĉio estas ĝusta! Kaj tamen restas la fakto, ke la tutaĵo estas malĝusta. La kontoj ne estas en balanco. Faru tion denove, bonvolu... *nun* mi kredas ke mi komencas kompreni kio estas. Jes, mi komprenas. Vidu, la vera senspiriteco mankas; jen la problemo. Ĉio estas amatorece – meĥanikaj detaloj ĉiuj bonaj, preskaŭ ekzaktaj; ĉio pri la iluzio perfekta, krom ke ĝi ne kreas iluzion."

"Kion oni do devas fari por venki?"

"Lasu min pensi... mi ne ŝajnas povi tute kompreni. Fakte, nenio povas ĝustigi la aferon

krom praktikado. Ĉi tio estas bona loko por ĝi: radikoj kaj ŝtona tero por rompi vian imponan iradon, areo kie ni ne estos interrompataj, nur unu kampo kaj unu kabano videblaj, kaj tiel malproksimaj ke neniuj povus vidi nin el tie. Estos bohe forlasi la vojon iomete kaj uzi la tutajn tagojn ekzercante vin, sinjoro."

Post iom da tempo de ekzercado, mi diris:

"Nun, sinjoro, imagu ke ni estas ĉe la pordo de la kabano tie, kaj la familio estas antaŭ ni. Pluiru, bonvolu, alparolu la estron de la domo!"

La reĝo senkonscie rektiĝis kiel monumento kaj diris, kun glacigita aŭtoritato _

"Servistaĉo, metu ĉi tien seĝon, kaj servi al mi kiun ajn ĝojon vi havas."

"Ho, sinjoro, tio ne estis bone farite."

"Kio mankas?"

"Tiuj homoj ne nomis unu la aliajn 'servistaĉo'."

"Ho, ĉu tio estas vere?"

"Jes; nur tiuj super ili nomas ilin tiel."

"Do mi devis provi denove. Mi nomos lin fripono."

"Ne ne, ĉar li eble estas libera."

"Ho, ĉu? Do eble mi nomos lin 'bona homo'."

"Tio taŭgas, sinjoro, sed eĉ pli bone estus se vi dirus 'amiko', aŭ 'frato'."

"Frato – al malpuraĵo kiel tiu?"

"Jes, sed ni ŝajnigas ke ankaŭ ni estas malpuraĵo kiel tiu.

"Eĉ estas vere, mi diras. Frato, metu ĉi tien seĝon, kaj al ĝi kian ajn ĝojon kiun vi havas. *Nun* estas ĝuste."

"Ne tute, ne tute ĝuste. Vi petis por unu, ne por *ni* – por unu, ne por ambaŭ; manĝaĵo por unu, seĝo por unu."

La reĝo ŝajnis konfuzita – li ne estis intelekta atleto. Lia kapo estis sablohorloĝo. Ĝi povis enhavi ideon, sed nur po unu grajnon, ne la tutan ideon samtempe.

"Ĉu ankaŭ vi volus havi seĝon – kaj sidi?"

"Se mi ne sidus, la homo notus ke ni nur ŝajnigas esti samrangaj, kaj ke ni faras tion sufiĉe malbone."

"Tio estas bone kaj vere dirite! Kiel mirinda estas la vero, en kiu ajn neatendata formo! Jes, li devas meti seĝojn kaj manĝaĵojn al ambaŭ, kaj servante nin ne doni akvujon kaj buŝtukon kun pli da respekto al unu al ni ol al la alia."

"Estas ankaŭ alia detalo kiu devas estu korektata. Li devas preni nenion ekstere; li devas eniri – en la malpuraĵojn, kaj eble aliajn malagrablajn aferojn – kaj manĝi kune kun la familio, kaj laŭ la moroj de la domo; kaj ĉiuj egalece, krom se la viro estas el la sklava klaso; kaj fine, estos nek akvujo nek buŝtuko, ĉu li estas sklavo aŭ liberulo. Bonvolu iri denove, sinjoro.

Jen – estas pli bone – ja plej bone ĝis tiam, sed ne tute perfekte. La ŝultroj ne konis pli malnoblan pezon ol la fera ĉemizo, kaj ili ne volas sinki."

"Do donu al mi la sakon. Mi lernos la spiriton kiu iras kune kun pezoj kiuj ne havas honoron. Estas la spirito kiu sinkigas la ŝultrojn, mi kredas, kaj ne la pezo; ĉar armaĵo estas peza, sed tamen estas fieraj pezo, kaj oni staras rekte en ĝi... Ne, ne donu al mi seĝojn, ne venu por protesti. Mi havos ĝin. Ligu ĝin al mia dorso."

Li estis kompleta nun kun tiu dorsosako sur si; kaj li aspektis same malsimila al reĝo kiel iu alia viro kiun mi iam vidis. Sed liaj ŝultroj estis obstinaj; ili ŝajnis ne povi lerni la trukon kurbiĝi, kun ia speco de trompiga natureco. La ekzercado daŭris, dum mi instigis kaj korektis:

"Nun, ŝajnigu ke vi havas ŝuldojn, kaj ke senkompataj ŝuldantoj voras vin; vi ne havas laboron – do ĉevalŝuigon, ni diru – kaj ne povos havi; kaj via edzino estas malsana, viaj infanoj ploras ĉar ili estas malsataj..."

Kaj tiel plu, kaj tiel plu. Mi lernis lin reprezenti siavice ĉiujn specojn de homoj sen bonŝanco, suferantaj ĉiujn mizerojn. Sed ho ve, nur vortoj, vortoj, vortoj – ili signifis absolute nenion al li, mi povus same bone fajfi. Vortoj realigas nenion, vivigas nenion al vi, se vi ne proprapersono suferis tion kion la vortoj provas priskribi. Ekzistas saĝaj homoj, kiuj parolas tute

sciante kaj memkontente pri "la laborantaj klasoj", kaj kontentigas sin mem ke unu tago de streĉa intelekta laboro estas multe pli malfacila ol unu tago de streĉa manlaboro, kaj tial tute ĝuste multe pli bone pagata. Ho, ili kredas tion, sciu, ĉar ili scias ĉion prii unu, sed neniam provis la alian. Sed mi scias ĉion pri ambaŭ; kaj laŭ mia opinio, ne estas sufiĉe da mono en la universo por dungi min por svingi hakilon dum tridek tagoj, sed mi pretas fari la plej streĉan intelektan laboron por preskaŭ nenio, kiel vi povas kalkuli – kaj cetere, mi estos kontenta.

Intelekta "laboro" estas misnomita; ĝi estas plezuro, distro, kaj ĝi estas sia propra plej alta rekompenco. La plej malbone pagata arĥitekto, ingeniero, generalo, verkisto, skulptisto, pentristo, preleganto, advokato, leĝfaranto, aktoro, predikanto, kantisto estas iamaniere en paradizo dum li laboras; kaj se temas pri la muzikisto kun arĉo en mano, kiu sidas meze en granda orkestro dum dieca sono venas kaj foriras super li – nu, certe li laboras, se vi volas tiel nomi tion, sed dio, tamen estas sarkasmo. La laborleĝo ŝajnas tute maljusta – sed ĝi estas tie, kaj nenio povas ŝanĝi ĝin: ju pli la laboristo ĝuas sian laboron, des pli li devas ankaŭ esti pagata. Kaj tio estas ankaŭ la leĝo de tiuj travideblaj blufoj: heredebla nobeleco kaj reĝeco.

29. La variolo-kabano

Kiam ni venis al tiu kabano meze de la posttagmezo, ni vidis neniun vivon ĉirkaŭ ĝi. La kampo proksima al ĝi estis nudigata de siaj herboj antaŭ iom da tempo, kaj ŝajnis senhaŭtigita, tiel eŝike ĝi estis rikoltita kaj plukita. Bariloj, budoj, ĉio ŝajnis ruinigita, kaj elradiis malriĉecon. Neniu besto estis proksima, neniun vivantaĵon estis videbla. La silento estis terura, ĝi similis al la silento de la morto. La kabano estis unu-etaĝa, kun tegmento nigra pro aĝo, kaj fendhava pro mankanta riparado.

La pordo staris iomete malfermita. Ni kaŝe proksimiĝis – kun silentaj paŝoj kaj spiroj – ĉar tiel la sentoj ordonas onin agi, je tiaj okazoj. La reĝo frapis. Ni atendis. Neniu respondo. Frapis denove. Neniu respondo. Mi silente malfermis la pordon kaj enrigardis. Mi vidis kelkajn malklarajn formojn, kaj virino ekstaris el la planko kaj fiksrigardis min, kiel faras iu kiu estis vekita el sia dormo. Finfine ŝi trovis ŝian voĉon.

"Havu kompaton!" ŝi petis. "Ĉio estas prenita, nenio restas."

"Mi ne venis por preni ion, kompatinda virino."

"Ĉu vi ne estas pastro?"

"Ne."

"Nek venas el la sinjoro de la bieno?"

"Ne, mi estas fremdulo."

"Do, pro timo de Dio, kiu frapas per mizero kaj morto homojn senkulpajn, ne restu ĉi tie, sed fuĝu! Ĉi tiu loko estas malbenita de li – kaj de lia Eklezio."

"Lasu min eniri kaj helpi vin – vi estas malsana kaj havas problemojn."

Nun mi pli bone vidis en la malforta lumo. Mi povis vidi ŝiajn truajn okulojn fiksrigardi min. Mi povis vidi kiel magra ŝi estis.

"Mi diras ke la loko estas malbenita de la Eklezio. Savu vin – kaj foriru, antaŭ ol iu vaganto vidos vin ĉi tie, kaj raportos."

"Ne zorgu pri mi, mi ĉiuokaze ne zorgas pri la malbeno de la Eklezio. Lasu min helpi vin."

"Nun ĉiuj bonaj spiritoj – se estas tiaj – benu vin pro tiu vorto. Ho Dio, se mi havus iom da akvo! – sed haltu, haltu, forgesu ke mi diris tion, kaj fuĝu; ĉar ĉi tie estas tio, kion devas timi ankaŭ tiu kiu ne timas la Eklezion: la malsano, pro kiu ni mortas. Forlasu nin, vi kuraĝa, bona fremdulo, kaj prenu kun vi tian plenan kaj sinceran benon, kion povas doni malbenitaj."

Sed antaŭ tio, mi prenis lignan bovlon kaj kuris preter la reĝo survoje al la rivereto. Ĝi estis dek jardojn for. Kiam mi revenis kaj eniris, la reĝo estis ene, kaj malfermis la ŝutron kiu kovris la fenestrotruon, por enlasi aeron kaj lumon. La loko estis plena de vomiga odoraĉo. Mi metis la

bovlon al la lipoj de la virino, kaj kiam ŝi prenis ĝin per siaj fervoraj krifoj, la ŝutro malfermiĝis, kaj forta lumo montris ŝian vizaĝon. Variolo!

Mi saltis al la reĝo, kaj diris en lia orelo:

"Eliru tuj, sinjoro! la virino mortas el tiu malsano, kiu detruis la ĉirkaŭaĵon de Kameloto antaŭ du jaroj!"

Li ne lasis sin esti movata.

"Vere mi restos – kaj same helpos."

Denove mi flustris:

"Ho reĝo, ne povas esti tiel. Vi devas foriri."

"Vi havas bonan volon, kaj vi ne parolas malsaĝe. Sed estus hontige se reĝo timus, kaj hontige se armita kavaliro fortirus sian manon kiam iu bezonas helpon. Pacon, mi ne iros. Kiu devas iri estas vi. La Eklezio ne malbenis min, sed ŝi malpermesas vin esti ĉi tie, kaj ŝi punos vin per peza mano se ŝi scios pri via krimo."

Estis senesperiga loko por li, kaj eble ĝi kostos lian vivon, sed ne helpus argumenti kun li. Se li opiniis ke lia kavalira honoro estas riskata, tio estis la fino de la diskuto; li restos, kaj nenio povos malhelpi tion; mi estis konscia pri tio. Do mi lasis la temon. La virino parolis:

"Bona sinjoro, pro via ĝentileco, ĉu vi volas surgrimpigi la ŝtupetaron tie, kaj diri al mi kion vi trovas? Ne timu raportoj, ĉar povas veni tempoj kiam eĉ la koro de patrino ne povas rompiĝi – ĉar ĝi jam rompiĝis."

"Restu," diris la reĝo, "kaj donu al la virino ion por manĝi. Mi iros."

Kaj li metis sian dorsosakon surteren.

Mi turnis min por ekiri, sed la reĝo jam ekiris. Li haltis, kaj rigardis malsupren al viro kiu kuŝis en malforta lumo, kaj ĝis nun ne notis nin, aŭ parolis.

"Ĉu estas via edzo?" la reĝo demandis.

"Jes."

"Ĉu li dormas?"

"Dankon al Dio por tiu sola bona donaco, jes – dum ĉi tiuj tri horoj. Mi volas pagi plene por mia dankemo! Ĉar mia koro eksplodas per ĝi por la dormo kiun li nun dormas."

Mi diris:

"Ni estos singardaj. Ni ne vekos lin."

"Ne, tion vi ne faros, ĉar li estas morta."

"Morta?"

"Jes, kia triumfo estas scii tion! Neniu povas vundi lin, neniu insulti lin plu. Li estas en la ĉielo nun, kaj feliĉa; kaj se ne tie, li estas en la infero kaj kontenta; ĉar en tiu loko li trovos nek abaton nek episkopon. Ni estis knabo kaj knabino kune; ni estis viro kaj virino dum tiuj kvin kaj dudek jaroj, kaj neniam disiĝis ĝis hodiaŭ. Pripensu kiom longe tio estas ami kaj suferi kune! Ĉimatene li estis freneza, kaj imagis ke ni denove estas knabo kaj knabino, kaj vagadis sur la feliĉaj kampoj; kaj do en tiu senkulpa, gaja interparolo,

li vagadis pli kaj pli foren, ankoraŭ iom klaĉante, kaj eniris tiujn aliajn kampojn kiujn ni ne konas, kaj estis kaŝata por mortontaj okuloj. Do ne estis adiaŭo, ĉar en lia fantazio mi iris kun li; li ne sciis ion alian ol ke mi iris kun li, kun mia mano en lia – mia juna, mola mano, ne ĉi tiu velkinta krifo. Ho jes, iri, kaj ne scii; disiĝi kaj ne scii; ĉu eblus iri pli pace ol tiel? Estis lia rekompenco por kruela vivo pacience eltenata."

Venis malforta sono el la direkto de la malluma angulo kie staris la ŝtupetaro. Estis la reĝo kiu malsupreniris. Mi povis vidi ke li portis ion en unu brako, kaj apogis sin per la alia. Li venis en la lumon; sur lia brusto kuŝis maldika knabino dekkvinjara. Ŝi estis nur duone konscia; ŝi estis mortanta pro variolo. Jen heroismo plejeble alta kaj pura, la plej alta ebla kulmino; ĉi tie oni defiis la morton en la malferma kampo sen armiloj, kun ĉiuj riskoj kontraŭ la defianto, neniuj premio se li venkos, neniuj admiranta homamasoj en silko kaj orŝtofo kiu rigardas kaj aplaŭdas; kaj tamen la sinteno de la reĝo estis same trankvile kuraĝa kiel ĝi ĉiam estis en tiuj pli simplaj konkuroj, kie kavaliro renkontas kavaliron en egaleca batalo kaj vestitaj en protektanta ŝtalo. Li estis granda nun; sublime granda. La krudaj statuoj de liaj prapatroj en lia palaco devis havi aldonon – mi prizorgos tion; kaj ne estos raĝo en armaĵo mortiganta giganton aŭ drakon, kiel la

aliaj; estos reĝo vestita kiel ordinarulo, portanta morton en siaj brakoj, tiel ke kamparana patrino povos lastfoje rigardi sian infanon kaj esti konsolata.

Li kuŝigis la knabinon apud ŝia patrino, kiu elverŝis amvortojn kaj karesojn el inundanta koro, kaj oni povis videti flirtantan, malfortan lumon kiu reagis en la okuloj de la infano, sed tio estis ĉio. La patrino pendis super ŝi, kisis ŝin, karesis ŝin, kaj petegis ŝin paroli, sed ŝiaj lipoj nur moviĝis, ne venis iu sono. Mi tiris mian akvuĵon el mia dorsosako, sed la virino malpermesis min, kaj diris:

"Ne – ŝi ne suferas; estas pli bone tiel. Povus revenigi ŝin al la vivo. Neniu tiel bona kaj ĝentila kiel vi farus al ŝi ion tiel kruelan. Ĉar vidu – kio restas al ŝi por vivi? Ŝiaj fratoj estas for, ŝia patro estas for, ŝia patrino foriras, la Eklezio malbenas ŝin, kaj neniu rajtus protekti ŝin aŭ amikiĝi kun ŝi eĉ se ŝi kuŝus sur la vojo. Ŝi estas senespera. Mi ne demandis vin, bona koro, ĉu ŝia fratino ankoraŭ vivas, ĉi tie supre; mi ne bezonis; se tiel, vi reirus, kaj ne forlasus la kompatindan forlasita..."

"Ŝi kuŝas en paco," interrompis la reĝo, kun mallaŭta voĉo.

"Mi ne ŝanĝus tion. Kiel riĉa estas ĉi tiu tago en feliĉo! Ho, mia Annis, vi baldaŭ denove

renkontos vian fratinon – vi estas survoje, kaj ĉi tiuj estas kompatemaj amikoj kiuj ne malhelpos.

Kaj ŝi komencis denove karese murmuri super la knabino, kaj milde karesis ŝiajn vizaĝon kaj hararon, kaj kisis ŝin kaj donis al ŝi amplenajn nomojn; sed nun apenaŭ videblis reago en la vitrecaj okuloj. Mi vidis larmojn flui el la okuloj de la reĝo, kaj suben sur la vizaĝo. Ankaŭ la virino notis ilin, kaj diris:

"Ho, mi konas tiun signon: vi havas edzinon hejme, kompatinda animo, kaj vi kaj ŝi enlitiĝis malsataj, multajn fojojn, por ke la etuloj povu havi vian panon; vi scias kio estas malriĉeco, kaj la ĉiutagajn insultojn de viaj superuloj, kaj la pezan manon de la Eklezio kaj de la reĝo."

La reĝo grimacis je tiuj hazarde celtrafaj vortoj, sed li ne moviĝis; li lernis sian rolon; kaj li ankaŭ ludis ĝin bone, por sufiĉe stulta komencanto. Mi ofertis distraĵon. Mi ofertis al la virino manĝaĵon kaj drinkaĵon, sed ŝi rifuzis ambaŭ. Ŝi volis permesi al nenio veni inter ŝi kaj la liberigo de la morto. Do mi forŝteliĝis kaj prenis la mortan infanon el supre, kaj metis ĝin apud ŝi. Tio denove frakasis ŝin, kaj estis nova korfrakasanta sceno. Iom post iom mi denove distris ŝin, kaj sukcesis instigi ŝin skizi sian rakonton.

"Vi mem bone konas ĝin, ĉar vi suferis ĝin –

ĉar vere neniu de nia klaso en Britio eskapas ĝin. Estas la malnova, teda rakonto. Ni batalis kaj luktis kaj sukcesis; sukcesis tiel ke ni vivis kaj ne mortis; pli ol tio, oni ne povas postuli. Venis neniuj problemoj, kiujn ni ne povis travivi, ĝis ĉi tiu jaro portis ilin; poste ĉiuj venis samtempe, kiel oni povas diri, kaj superis nin. Antaŭ jaroj, la sinjoro de la bieno plantis certajn fruktarbojn en nia loko; kaj en ĝia plej bona parto – terura ofendo kaj honto..."

"Sed estis lia rajto," la reĝo interrompis.

"Neniu neas tion, vere; se la leĝo signifas ion ajn, kion la sinjoro posedas posedas li, kaj kion mi posedas same posedas li. Nian bienon ni luis, do ankaŭ ĝi estis lia, kaj li povis uzi ĝin kiel li volis. Antaŭ iom da tempo, tri el tiuj arboj estis trovataj dishakitaj. Niaj tri plenkreskintaj filoj kuris timigitaj por raporti la krimon. Nu, en la karcero de la sinjoro nun ili kuŝas, kaj oni diras ke tie ili kuŝos kaj putros ĝis ili konfesos. Ili havas nenion por konfesi, ĉar senkulpaj, do ili restos tie ĝis ili mortos. Tion vi scias tre bone, mi kredas. Pensu kiel tio lasis nin: viro, virino kaj du infanoj, por kolekti rikolton plantitan de tiom pli granda forto, jes, kaj protekti ĝin tage kaj nokte kontraŭ kolomboj kaj ŝtelirantaj bestoj, kiuj estas sanktaj kaj kiujn neniu el nia klaso rajtas lezi. Kiam la rikolto de mia sinjoro estis preskaŭ preta por preni, tia estis ankaŭ nia; kiam lia sonorilo

sonis por voki nin veni kaj rikolti al li senpage, li ne permesis ke mi kaj miaj du filinoj ludu la rolojn de niaj tri kaptitaj filoj, sed nur de du el ili; do, por la mankanta, ni devis ĉiutage punpagi. Dum tiu tuta tempo, nia propra rikolto forvelkis pro neklektado; kaj tial la pastro kaj la sinjoro devigis nin punpagi ĉar iliaj partoj de ĝi estis damaĝitaj. Finfine, la punpago voris nian rikolton – kaj ili prenis ĉion; ili prenis ĉion kaj devigis nin rikolti tion al ili, sen pago aŭ manĝaĵo, kaj ni malsatis. Poste venis la plej aĉa afero kiam mi, freneza pro malsato kaj la perdo de miaj filoj, kaj ĉagreno por vidi mian edzon kaj miajn etulinojn en ĉifonoj kaj mizero kaj senespero, eldiris profundan blasfemon – ho, mil blasfemojn! – kontraŭ la Eklezio kaj ĝiaj agoj. Tio estis antaŭ dek tagoj. Mi eksuferis pro ĉi tiu malsano, kaj al la pastro mi diris la vortojn, kaj li venis por akuzi min pro manko de deca humileco sub la punanta mano de Dio. Li parolis pri mia krimo al siaj superuloj; mi estis obstina; tial baldaŭ, sur mia kapo kaj sur la kapoj de ĉiuj karaj al mi, falis la malbeno de Romo.

Ekde tiu tago ni estas evitataj, kun granda timo. Neniu venis al ĉi tiu kabano por scii ĉu ni venas aŭ ne. La ceteraj el ni estis notitaj. Poste mi kolektis miajn fortojn kaj ekstaris, kiel faru edzino kaj patrino. Malmulte ili povus manĝi ĉiuokaze; malpli ol malmulte ili havis por manĝi.

Sed akvo estis tie, kaj tion mi donis al ili. Kiel ili deziris ĝin! kaj kiel ili benis ĝin! Sed la fino venis hieraŭ; miaj fortoj finiĝis. Hieraŭ por la lasta fojo mi vidis mian edzon kaj tiun plej junan infanon vivajn. Mi legis ĉi tie tiujn tutajn horojn – tiujn eraojn, oni povas diri – kaj aŭskultis, aŭskultis iun ajn sonon tie supre kiu..."

Ŝi akre kaj rapide rigardis sian plej aĝan filinon. Poste ŝi elkriis:

"Ho, karulino!"

Kaj malforte, ŝi premis la rigidigantan formon per siaj protektantaj brakoj. Ŝi rekonis la mortosonojn.

30. La tragedio de la ĉefa biendomo

Ĉe noktomezo ĉio finiĝis, kaj ni sidis en la ĉeesto de kvar kadavroj. Ni kovris ilin per tiaj ĉifonoj kiel ni povis trovi, ekforiris kaj ŝlasis la pordon post ni. Ilia hejmo devis estis la tombo de tiuj homoj, ĉar ili ne povis havi kristanan entombigon, aŭ esti metataj en benita tero. Ili estis kiel hundoj, sovaĝaj bestoj, lepruloj, kaj neniuj animoj, kiu zorgis pri sia espero de eterna vivo, forĵetus ĝin per ia ajn kunestado kun tiaj kondamnitaj forĵetaĵoj.

Ni ne moviĝis kvar paŝojn, kiam mi aŭdis sonon kiel de piedoj sur gruzo. Mia koro flugis al mia gorgo. Ni ne devas esti vidataj venantaj el tiu domo. Mi tiris la jakon de la reĝo, kaj ni retiriĝis kaj serĉis protekton malantaŭ la angulo de la kabano.

"Nun ni estas sekuraj," mi diris, "sed esti proksima pafo – por tiel diri. Se la nokto estus pli luma, eble li vidus nin, sendube, li ŝajnis esti tiel proksima."

"Eble estas nur besto, kaj tute ne homo."

"Vere. Sed ĉu homo ĉu besto, estos saĝe resti ĉi tie dum momento, kaj lasi ĝin pasi kaj forlasi la lokon."

"Aŭdu! Ĝi venas ĉi tien."

Denove vere. La paŝoj venis al ni – rekte al la kabano. Do devis esti besto, kaj ni ne havis

kaŭzon timi. Mi intencis eliri, sed la reĝo metis sian manon sur mia brako. Estis momento de silento. poste ni aŭdis malfortan frapon sur la pordo de la kabano. Pro tio mi ekstremis. Baldaŭ la frapo estis ripetata, kaj poste ni aŭdis ĉi tiujn vortojn diratajn de singarda voĉo:

"Patrino! Patro! Malfermu – ni liberiĝis, kaj ni venas kun novaĵoj kiuj paligos viajn vangojn sed ĝojigos viajn korojn, kaj ni ne devas prokrasti, sed tuj fuĝu! Kaj – sed ili ne respondas. Patrino! Patro!"

Mi tiris la reĝon al la alia fino de la kabano, kaj flustris:

"Venu – nun ni povas iri al la vojo."

La reĝo hezitis, volis protesti; sed ĝuste tiam ni aŭdis la porton malfermiĝi, kaj sciis ke tiuj suferantaj homoj estis en la ĉeesto de siaj mortintoj.

"Venu, sinjoro! Post momento ili lumigos, kaj poste sekvos tio kio frakasos vian koron se vi aŭdos tion."

Ĉifoje, li ne hezitis. Tuj kiam ni estis sur la vojo, mi kuris; kaj post momento, li forĵetis sian dignon kaj sekvis. Mi ne volis pensi pri kio okazis en la kabano – mi ne eltenus; mi volis forigi tion el mia menso; do mi atakis la unuan temon kiu kuŝis sub tio en mia menso:

"Mi havis la malsanon pro kiu tiuj homoj mortis, do mi ne havas kaŭzon timi; sed se vi ne same havis ĝin..."

Li interrompis min por diri ke li havis problemojn, kaj estis lia konsienco kiu maltrankviligis lin:

"Tiuj junuloj liberiĝis, ili diras – sed *kiel*? Ne verŝajne ilia sinjoro liberigis ilin."

"Ho ne, mi tute ne dubas ke ili eskapis."

"Tio estas mia problemo; mi timas ke estas tiel; kaj via suspekto konfirmas tion, ĉar vi havas la saman timon."

"Mi tamen ne nomus ĝin tiel. Mi ja suspektas ke ili eskapis, sed se ili faris tion, mi certe ne bedaŭras."

"Mi ne bedaŭras, mi *kredas*, sed..."

"Kio estas? Pro kio oni maltrankviliĝu?"

"Se ili fakte eskapis, do ni havas la devon meti manojn sur ili kaj revenigi ilin al ilia sinjoro, ĉar ne decas ke homo de lia rango suferu tiel impertinentan traktadon de homoj tiel malaltaj."

Jen tio denove. Li povis vidi nur unu flankon. Li naskiĝis tia, estis edukata tia, liaj vejnoj estos plenaj de prapatra sango putra de tia senkonscia brutaleco, heredita tra longa vico de koroj kiuj ĉiuj kontribuis al la venenigo de la fluo. Karcerigi tiujn homojn sen pruvoj, kaj malsatigi iliajn parencojn, tio ne estis io malbona, ĉar ili estis nur kamparanoj kaj devis obei la volon kaj

plezuron de sia sinjoro, senkonsidere kiun timigan formon ĝi havos; sed se tiuj homoj eskapas maljustan malliberecon, tio estis krimo kaj insulto, ne akceptata de iu leĝobeanta homo kiu konas sian devon al sia sankta kasto.

Mi strebis dum pli ol duona horo, antaŭ ol mi sukcesis devigi lin ŝanĝi la temon – kaj eĉ tiam, ekstera afero efektivigis tion. Tio estis io kiu kaptis niajn rigardojn, kiam ni pasis la pinton de monteto – ruĝa ardo, malproksima.

"Tio estas fajro," mi diris.

Fajroj tre interesis min, ĉar mi intencis fondi bonan asekuran kompanion, kaj cetere mi dresis kelkajn ĉevalojn kaj konstruis kelkajn vapormaŝinojn, planante post iom da tempo pagatan fajrobrigadon. La pastroj estis kontraŭ miaj fajro- kaj vivasekuroj, asertante ke estis senhonta provo bari la ordonojn de Dio; kaj se oni atentigis ke ili tute ne baris la ordonojn, nur modifis iliajn akrajn sekvojn se vi askultis ilin kaj estis bonŝanca, ili respondis ke tio signifis ludi kontraŭ la ordono de Dio, kaj tio estis same malbone. Do ili sukcesis pli-malpli detrui tiujn projektojn, sed mi venĝis min per mia akcidentasekuro. Ĝenerale, kavaliro estas krudulo, foje krudegulo, kaj do malferma al sufiĉe malbonaj argumentoj kiam ili gaje venas de superstiĉo-vendanto, sed eĉ *li* povis fojfoje vidi la praktikan flankon de io; do, lastatempe vi

ne povis fini turniron kaj kalkuli la rezultojn sen trovi miajn akcidentasekurajn paperojn en ĉiu helmo.

Ni staris tie dum momento, en la peza mallumo kaj silento, kaj rigardis al la ruĝa lumo malproksima, kaj provis kompreni la signifon de fora murmuro kiu kreskis kaj malkreskis kaprice en la nokto. Foje ĝi ŝvelis kaj dum momento ŝajnis malpli fora; sed kiam ni esperis ke ĝi malkaŝos siajn kaŭzon kaj naturon, ĝi denove malfortiĝis kaj sinkis, kaj kunportis sian misteron. Ni ekiris suben de la monteto direkte al ĝi; kaj la serpentanta vojo ĵetis nin tuj en preskaŭ solidan mallumon -- en mallumon premitan inter du altaj, arbaraj muroj. Ni palpis nian vojon dum duona mejlo, eble, kaj la murmuro iĝis pli kaj pli klara la tutan tempon, la venanta ŝtormo pli kaj pli minaca, kaj fojfoje malforta venteto, malluma fulmo, kaj surda, fora tondro. Mi iris unue. Mi koliziis kun io – mola, peza io, kiu iom cedis al mia pezo; kaj en la sama momento aperis fulmo, kaj malpli ol futon for de mia vizaĝo estis la grimacanta vizaĝo de viro kiu pendis el branĉo de arbo! Tio estas, ĝi ŝajnis grimaci, sed tion ĝi ne faris. Estis timiga vidaĵo. Tuj venis oreleksplodiga tondro, kaj la planko de la ĉielo falis; la pluvo venis en diluvo. Ne gravis, ni devis provi subentranĉi tiun homon, se hazarde estas ankoraŭ iom da vivo en li, ĉu ne? La fulmoj nun

venis rapide kaj akre, kaj la loko estis alterne tagmezo kaj noktomezo. Dum unu momento, la viro pendis antaŭ mi en intensa lumo, dum la venonta, la mallumo denove tute kaŝis lin. Mi diris al la reĝo ke ni devas subentranĉi lin. La reĝo tuj protestis.

"Se li pendumis sin mem, li estis preta perdi sin mem al sia sinjoro; do lasu lin esti. Se aliaj pendumis lin, verŝajne ili rajtis – do lasu lin pendi."

"Sed..."

"Ne donu al mi sedojn, nur lasu lin tia kia li estas. Kaj ankaŭ pro alia kialo. Kiam denove fulmos – rigardu tien!"

Du aliaj pendis, malpli ol kvindek jardojn for de ni!

"Ne estas ĝusta vetero por fari nenecesajn servojn al mortintoj. Ili ne plu povas danki vin. Venu – ni nenion gajnos per restado ĉi tie."

Lia rezonado estis defendebla, do ni pluiris. Dum la venonta mejlo, ni renkontis ses pliajn pendantajn formojn en la lumo de la fulmoj, kaj la tuta ekskurso estis terura. Tiu murmuro ne plu estis murmuro, estis bleko; bleko de viraj voĉoj. Viro nun venis fuĝante, malklare videbla en la mallumo, kaj aliaj viroj ĉasis lin. Ili malaperis. Baldaŭ okazis alia ĉaso samstila, kaj poste alia kaj alia. Poste, subita kurbiĝo de la vojo videbligis al ni tiun fajron – estis granda ĉefa

biendomo, kaj de ĝi restis malmulte aŭ nenio – kaj ĉie, viroj fuĝis kaj aliaj viroj furioze postsekvis ilin.

Mi avertis la reĝon ke ĉi tio ne estis sekura loko por fremduloj. Pli bone ke ni foriru de la lumo, ĝis la situacio pliboniĝos. Ni iom retroiris, kaj kaŝis nin en la arbarrondo. El tiu kaŝloko ni vidis kaj virojn kaj virinojn ĉasatajn de la homamaso. La timiga agado kontinuus ĝis preskaŭ matenkrepusko. Poste, kiam la fajro ne plu brulis kaj la ŝtormo ne plu blovis, la voĉoj kaj la fuĝantaj paŝoj baldaŭ silentiĝis, kaj mallumo kaj silento denove regis.

Ni kuraĝe eliris, kaj singarde rapidis for; kaj kvankam ni estis pro troa laboro lacegaj, ni pluiris ĝis ni havis tiun lokon kelkajn mejlojn malantaŭ ni. Poste, ni petis gastemon en la kabano de karbigisto, kaj ni ricevis tion kio haveblis. Virino estis ellitiĝinta, sed la viro ankoraŭ dormis, sur pajla matraco, sur la argila planko. La virino ŝajnis maltrankvila ĝis mi klerigis ke ni estas vojaĝantoj kaj perdis la vojon kaj erarvojis en la arbaro la tutan nokton. Tiam ŝi iĝis parolema, kaj demandis ĉu ni aŭdis pri la teruraj okazintaĵoj ĉe la ĉefa biendomo de Abblasoure. Jes, ni aŭdis pri ili, sed kion ni deziris nun estis ripozo kaj dormo. La reĝo interrompis:

"Vendu la domon al ni kaj iru aliloken, ĉar ni estas danĝeraj al homoj ĉirkaŭ ni, ĉar ni ĝuste venis el homoj kiuj mortis pro la Makula Morto."

Tio estis bone farite de li, sed ne necese. Unu el la plej oftaj dekoracioj de la nacio estis la vaflobakila vizaĝo. Mi frue notis ke kaj la virino kaj ŝia edzo havis ĝin. Ŝi tute bonvenigis nin, kaj nenion timis; kaj evidente, ŝin tre imponis la propono de la reĝo; ĉar kompreneble estis granda okazo en ŝia vivo renkonti homon aspektantan tiel modeste kiel la reĝo, kiu estis preta aĉeti ies domon por tie dormi unu nokton. Tio donis al ŝi grandan respekton al ni, kaj ŝi plejeble ekspluatis la modestajn havaĵojn de la kabano por komfortigi nin.

Ni dormis ĝis longe en la posttagmezon, kaj poste ellitiĝis sufiĉe malsataj por ke simpla manĝaĵo estu tute bongusta al la reĝo, des pli ĉar estis malmulte de ĝi. Kaj ĝi ne estis tre varia; ĝi konsistis nur el cepoj, salo kaj la nacia nigra pano – farita el porĉevala furaĝo. La virino rakontis al ni kio okazis la antaŭan vesperon. Je la deka aŭ dekunua nokte, kiam ĉiuj estis en siaj litoj, la ĉefa biendomo ekbrulis. La loĝantaro svarme venis por helpi, kaj la familio estis savata, krom unu membro: la sinjoro. Li ne aperis. Ĉiuj freneziĝis pro tiu perdo, kaj du kuraĝaj kamparanoj donis siajn vivojn traserĉante la brulantan domon kaj serĉante tiun valoran personon. Sed post iom da

tempo li estis trovata – kio restis de li – kio estis lia kadavro. Ĝi estis en arbareto tricent jardojn for, ligita, kun buŝo ŝtopita, pikita en pli ol dek lokoj.

Kiu faris tion? Oni eksuspektis modestan familion proksime, kiun lastatempe la barono traktis aparte akre; kaj el tie, la suspektoj facile disvastiĝis al iliaj parencoj kaj familianoj. Suspekto sufiĉis; la livre-vestitaj servistoj de la sinjoro tuj proklamis krucmiliton kontraŭ tiuj homoj, kaj senprokraste aliĝis la ĝenerala loĝantaro. La edzo de la virino estis aktiva kun la homamaso, kaj revenis hejmen nur proksime al la matenkrepusko. Nun li estis for por vidi la rezulton. Dum ni ankoraŭ interparolis, li revenis de sia serĉado. Lia raporto estis sufiĉe naŭza. Dek ok homoj pendumitaj aŭ distranĉitaj, kaj du kamparanoj kaj dek tri malliberuloj perditaj en la fajro.

"Kaj kiom da malliberuloj estis entute en la karceroj?"

"Dek tri."

"Do ĉiuj el ili estis perditaj?"

"Jes, ĉiuj."

"Sed la homoj venis ĝustatempe por savi la familion; kial ili povis savi neniujn el tiuj malliberuloj?"

La viro aspektis konfuzita, kaj diris:

"Ĉu oni malfermus la karcerojn dum tia tempo? Ja kelkaj forfuĝus!"

"Ĉu vi do volas diri ke *neniu* malfermis ilin?"

"Neniu iris proksimen al ili, ĉu por fermi ĉu por malfermi. Kompreneble estis ŝlosite; tial sufiĉis starigi gardiston, por ke, se iu rompos la ŝloson, li ne fuĝos, sed estos kaptita. Neniu estis kaptita."

"Tamen, tri fuĝis," diris la reĝo, "kaj vi agos bone se vi publikigos tion kaj lasos la justecon ĉasi ilin, ĉar ili murdis la baronon kaj bruligis la domon."

Mi nur atendis ke li diros ion tian. Dum momento, la viro kaj lia edzino montris fervoran intereson pri tiuj novaĵoj, kaj malpaciencon eliri kaj disvastigi ilin; poste, io alia subite montris sin en iliaj vizaĝoj, kaj ili komencis fari demandojn. Mi respondis mem al la demandoj, kaj akre rigardis la efikojn de miaj respondoj. Mi baldaŭ fidis ke la kono kiuj estis de tiuj tri malliberuloj iel ŝanĝis la etoson; ke la daŭra fervoro de niaj gastigantoj eliri kaj disvastigi la novaĵojn nun estis nur ŝajnigita kaj ne vera. La reĝo ne notis la ŝanĝon, kaj mi ĝojis pro tio. Mi direktis la interparolon al aliaj detaloj de la lastnoktaj okazintaĵoj, kaj notis ke tiuj homoj ŝajnis malŝarĝitaj pro tiu ŝanĝo de direkto.

La doloriga afero observebla ĉe ĉio tio estis la preteco de tiu subpremata komunumo turni siajn

kruelajn manojn kontraŭ sia propra klaso favore al komuna subpremanto. Ĉi tiuj viro kaj virino ŝajnis senti ke en kverelo inter membro de ilia propra klaso kaj lia sinjoro, estis nature kaj propre ke la tuta kasto de tiu kompatinda ulo metu sin al la flanko de la sinjoro kaj batalu por li, sen eĉ dum momento demandi sin kio estas ĝuste kaj malĝuste. Tiu viro eliris por helpi pendumi siajn najbarojn, kaj faris tion fervore, kaj tamen estis konscia ke nenio estis kontraŭ ili krom nura suspekto, apogata de neniu pruvo, tamen nek li nek lia edzino ŝajnis vidi ion timigitan en tio.

Tio estis deprimige – por homo kiu sonĝis pri respubliko. Memorigis min pri tempo dek tri jarcentojn for, kiam la "malriĉaj blankuloj" de niaj sudŝtatoj ĉiam estis malrespektataj kaj ofte insultataj de la sklavposedantoj ĉirkaŭ ili, kaj estis tiel mizeraĵoj nur pro la ĉeesto de sklavoj en ilia mezo, sed tamen estis timplene pretaj aliĝi al la sklavposedantoj en ĉiuj politikaj agoj por konservi kaj eternigi la sklavsistemon, kaj fine ankaŭ prenis siajn pafilojn kaj elverŝis siajn vivojn en provo antaŭmalhelpi la detruon de ĝuste tiu sistemo, kiu subigis ilin. Kaj estis nur unu kompensiga detalo ligita al tiu mizera peco de la historio; kaj tio estis, ke sekrete la "malriĉaj blankuloj" fakte malrespektis la sklavposedanton, kaj fakte sentis sian propran honton. Tiu sento ne venis al la surfaco, sed la fakto ke estis tie, kaj

povus esti malkaŝata, sub favoraj cirkonstancoj, estis io -- fakte sufiĉis; ĉar montris ke fundamente, homo tamen estas homo, eĉ se tio ne videblas sur la surfaco.

Nu, kiel montriĝis, tiu karbigisto estis fakte ĝemelo de tiu sudŝtata "malriĉa blankulo" el la malproksima estonteco. La reĝo baldaŭ montris senpaciencon, kaj diris:

"Dum vi babilos ĉi tie la tutan tagon, justeco fiaskos. Ĉu vi kredas ke la krimuloj restos en la domo de sia patro? Ili fuĝas, ili ne atendas. Vi devus aranĝi ke aro sur ĉevaloj postsekvos ilin."

La virino paliĝis iom, sed tute videble, kaj la viro aspektis konfuzita kaj nedecidema. Mi diris:

"Venu, amiko, mi iros iom de la vojo kun vi, kaj klarigos kiun direkton mi kredas ke ili elektos. Se ili estus nur impostrezistantoj aŭ io simile absurda, mi provus protekti ilin kontraŭ kapto; sed kiam homoj murdas altrangulon, kaj same bruligas lian domon, tio estas alia afero."

La lasta rimarko estis por la reĝo – por trankviligi lin. Sur la vojo, la viro kolektis sian decidemon, kaj komencis iri kun firmaj paŝoj, sed neniel fervoraj. Post iom da tempo, mi diris:

"Kiel tiuj homoj rilatis al vi – ĉu kuzoj?"

Li iĝis tiel blanka kiel lia kovro de karbo permesis, haltis kaj tremis.

"Ho Dio mia, kiel vi sciis tion?"

"Mi ne sciis; mi nur divenis."

"Kompatindaj knaboj, ili estas perditaj.. Kaj bonaj knaboj ili estis."

"Ĉu vi fakte iris tien por infomi pri ili?"

Li ne tute sciis kiel respondo al tio; sed li diris, heziteme:

"Je-s."

"Do mi kredas ke vi estas malbeninda fripono!"

Pro tio, li iĝis same ĝoja kiel se mi nomus lin anĝelo.

"Diru la bonajn vortojn denove, frato! ĉar certe vi volas diri ke vi ne perfidos min, se mi ne faros mian devon."

"Devo? Ne estas devo en ĉi tio, krom la devo esti senmova kaj lasi tiujn homojn foriri. Ili agis juste."

Li aspektis ĝoja; ĝoja, kaj samtempe timplena. Li rigardis laŭ la vojo ambaŭdirekten por certigi ke venas neniu, kaj poste diris singarde:

"El kiu lando vi venas, frato? Vi ja eldiras tiel danĝerajn vortojn, kaj ne ŝajnas timi."

"Tiuj vortoj ne estas danĝeraj, kiam mi diras ilin al iu el mia propra kasto, mi kredas. Vi ne dirus al iu ke mi elparolis ilin?"

"Mi? Unue mi lasus sovaĝajn ĉevalojn distiri min."

"Do lasu min diri kion mi volas. Mi ne timas ke vi ripetos miajn vortojn. Mi kredas ke diablaj agoj estis faritaj lastnokte al tiuj senkulpaj

kompatinduloj. Tiu maljuna barono ricevis nur kion li meritis. Se mi decidus, ĉiuj tiaj homoj fartus same."

Timo kaj deprimado malaperis el la manieroj de la viro, kaj dankemo kaj kuraĝa vivado anstataŭis ilin:

"Eĉ se vi estus spiono, kaj viaj vortoj kaptilo por detrui min, tamen ili tiel refreŝigas ke, por denove aŭdi ilin kaj aliajn similajn, mi kun ĝojo irus al la pendumilo, post almenaŭ unu festo en malsata vivo. Kaj mi diras nun kion mi volas diri, kaj vi povas raporti se vi tiel volas. Mi helpis pendumi miajn najbarojn ĉar estus danĝere al mia propra vivo montri mankantan fervoron por la kaŭzo de la sinjoro; la aliaj helpis pro neniu alia kialo. Ĉiuj ĝojas hodiaŭ ĉar li mortis, sed ĉiuj ŝajnigas ke ili funebras, kaj hipokrite ploras, ĉar tio donas sekurecon. Mi diris la vortojn, mi diris la vortojn! la solajn, kiuj iam gustis bone en mia buŝo, kaj tiu gusto estas sufiĉa rekompenco. Pluiru, se vi volas, eĉ se al la eŝafodo, ĉar mi estas preta."

Jen tio, vidu. Homo estas homo, funde. Tutaj eraoj de perfortaĵoj kaj subpremado ne povas frakasi tiun virecon el li. Kiu ajn kredas ke tio estas eraro, tiu mem eraras. Jes, estas sufiĉe da bona materialo por respubliko eĉ en la plej degenerinta popolo kiu iam ekzistis –

eĉ la rusoj; multe da vireco en ili – eĉ en la germanoj – se oni nur povus devigi ilin eliri el sia timida kaj suspektema privateco, por faligi kaj piedtreti ĉiun tronon iam starigitan, kaj ĉiun nobelaron kiu iam apogis ĝin. Ni ankoraŭ vidos certajn aferojn, tion ni esperu kaj kredu. Unue, modifita monarĥio, ĝis la fino de la tagoj de Arturo. Poste la trono detruita, la nobelaro forigita, ĉiu ĝia membro translokigita al iu valora profesio, ĝenerala voĉdonrajto fondita, kaj la tuta registaro metita en la manojn de la viroj kaj virinoj de la nacio, por resti tie. Jes, mi ne ankoraŭ havis kialon rezigni mian revon.

31. Marco

Nun ni piediris sufiĉe trankvile, kaj interparolis. Ni devis havi sufiĉe da tempo por iri al la eta vilaĝo Abblasoure kaj fari justecon al tiuj murdistoj, kaj denove iri hejmen. Kaj samtempe mi havis alian intereson kiu ne ankoraŭ paliĝis, neniam iĝis malpli noveca dum mi estis en la regno de Arturo: la konduto – naskita el bonaj kaj ekzaktaj kastlimoj – de homoj kiuj hazarde renkontiĝas. Al la razita monaĥo, kiu vagadis kun la kapuĉo malantaŭen, kaj la ŝvito fluanta laŭ la grasaj makzeloj, la karbigisto estis profunde respektama; al la nobelo, li estis fihumila; al la eta kamparano kaj manlaboristo, li estis varmkora kaj babilema; kaj kiam pasis sklavo, kun la vizaĝo respektame klinita, ĉi tiu ulo havis la nazon en la aero – li eĉ ne povis vidi lin. Nu, fojfoje oni volas pendumi la tutan homaron kaj fini la farson.

Baldaŭ ni renkontis okazon. Eta aro de duonnudaj knaboj kaj knabinoj venis kurante el la arbaro, timantaj kaj krientaj. La plej aĝaj de ili ne havis pli ol dek du aŭ dek kvar jarojn. Ili petis helpon, kaj ili estis tiel senesperaj, ke ni ne povis kompreni kio okazis. Tamen, ni urĝe eniris la arbaron, kun ili unue, kaj la problemo estis baldaŭ malkaŝita: oni pendumis etulon par ŝelsnuro, kaj li piedfrapis kaj luktis, dum li estis

mortanta. Ni liberigis lin, kaj forigis lin. Jen iom pli da homa naturo: la admirantaj infanoj kiuj imitis siajn pliaĝulojn; ili ludis homamason, kun sukceso kiu promesis esti multe pli serioza ol ili planis.

Ne estis teda ekskurso por mi. Mi sukcesis uzi la tempon tre bone. Mi konatiĝis kun pluraj homoj, kaj ĉar mi estis fremdulo, mi povis fari tiom da demandoj kiom mi volis. Io kio kompreneble interesis min, kiel ŝtatulo, estis la problemo pri salajroj. Mi kolektis kion mi povis pri tio dum tiu posttagmezo. Iu kiu ne havas multajn spertojn, kaj kiu ne pensas, emas mezuri la riĉecon aŭ malriĉecon de nacio per nur la grandeco de la mezaj salajroj; se la salajroj estas altaj, la nacio estas riĉa; se ne, ne. Kio estas eraro. Grava estas ne la sumo kiun vi ricevas, sed kion vi povas aĉeti por ĝi; kaj tio diras ĉu viaj salajroj estas altaj fakte, ĉu nur nome. Mi povis memori kiel estis dum nia propra enlanda milito dum la deknaŭa jarcento. En la nordo, ĉarpentisto ricevis tage tri dolarojn, orvaloraj; en la sudo, li ricevis kvindek – pagenda per konfederaciaj monbiletetoj, kiuj valoris unu dolaron por ĉiu buŝelo. En la nordo, kombineo kostis tri dolarojn – unutagan salajron. En la sudo, ĝi kostis sepdek kvin – salajron dutagan. Aliaj aferoj estis proporciaj. Do salajroj en la nordo estis duoble

altaj kompare al tiuj en la sudo, ĉar por unu salajro oni povis aĉeti duoble kompare al la alia.

Jes, mi konatiĝis al pluraj homoj en la vilaĝeto, kaj io kio tre plaĉis al mi estis vidi niajn novajn monerojn cirkuladi – multaj milrejsoj, multaj miloj, multaj pencoj, tre multaj nikeloj, kaj iom da arĝento; ĉio tio inter metiistoj kaj ordinaruloj ĝenerale; jes, kaj eĉ iom da oro – sed tio estis en la banko, do ĉe la oraĵisto. Mi vizitis lin dum Marco, filo de Marco, marĉandis kun vendejposedanto pri kvarona funto de salo, kaj petis ŝanĝmonon al ora monero de dudek dolaroj. Ili liveris ĝin – tio estas, mordinte la moneron, kaj batante ĝin al la vendotablo, kaj verŝis acidon al ĝi, kaj demandis al mi kie mi ricevis ĝin, kaj kiu mi estis, kaj de kie mi venis, kaj kien mi iros, kaj kiam mi kredas ke mi venos tien, kaj eble kelkcent demandojn pli; kaj kiam ili surteriĝis, mi daŭre donis libervole al ili multajn informojn; diris al ili ke mi havis hundon, kies nomo estis Watch, kaj mia unua edzino estis libera baptisto, kaj ŝia avo estis malpermesisto, kaj mi iam konis viron kiu havis du dikfingrojn sur ĉiu mano kaj verukon sur la interna flanko de la supera lipo, kaj mortis esperante gloran releviĝon, kaj tiel plu, kaj tiel plu, kaj tiel plu, ĝis eĉ tiu malsata vilaĝdemandanto komencis aspekti kontenta, kaj ankaŭ iom lacigita, sed li devis respekti homon kun mia financa forto, do li ne kontraŭdiris min,

sed mi notis ke li kompensis sin al siaj subuloj, kio estis tute natura reago. Jes, ili ŝanĝis mian dudekdolaron, sed mi juĝis ke tio iom streĉis la bankon, kion oni povis atendi, ĉar estis same kiel iri en malriĉan vilaĝan vendejon en la deknaŭa jarcento kaj peti ĝian estron tuj ŝanĝi monbileton de dumil dolaroj por vi. Eble li povis fari tion; sed samtempe li scivolis kiel povis okazi ke eta kamparano havis tiom da mono en sia poŝo; kaj ĝuste tiel verŝajne pensis la oraĵisto, dum li rigardis min kun respektama admiro.

Nia nova mono ne nur bele cirkuladis, sed ĝia lingvaĵo estis jam flue uzata; tio estas: la homoj ne plu uzis la nomojn de la antaŭaj valutoj, kaj nun diris ke io valoris tiom da dolaroj aŭ pencoj aŭ miloj aŭ milrejsoj. Estis tre ĝojige. Certe ni progresis.

Mi konatiĝis kun pluraj mastraj meĥanikistoj, sed eble la plej interesa persono inter ili estis la forĝisto, Dowley. Li estis vivplena homo kaj vigla parolanto, kaj li havis du submastrojn kaj tri metilernantojn kaj faris tre bonan profiton. Fakte li tre rapide riĉiĝis, kaj estis alte respektata. Marco estis tre fiera ke li estis amiko de tia homo. Li venigis min ĉi tien oficiale por lasi min vidi la grandan entreprenon kiu aĉetis tiom da lia karbo, sed vere por lasi min vidi kiel facile kaj preskaŭ familie li interrilatis kun tiu granda homo. Dowley kaj mi tuj interfratiĝis; mi havis ĝuste

tiajn selektitajn homojn, esterordinarajn homojn, sub mi en la Colt-fabriko de armiloj. Mi devis vidi pli de li, do mi invitis lin veni al la hejmo de Marco dimanĉe, kaj vespermanĝi kun ni. Marco ektimis, kaj ĉesis spiri; kaj kiam la granda homo akceptis, li estis tiel dankema ke li preskaŭ forgesis esti surprizita pro tiu ĝentileco.

La ĝojo de Marco superfluis – sed nur dum momento; poste li iĝis pensema, post tio malgaja; kaj kiam li aŭdis min diri al Dowley ke mi ricevos tie ankaŭ Dickon, la ĉefan masoniston, kaj Smug, la ĉefan veturilfaranton, la karbopolvo sur lia vizaĝo blankiĝis, kaj li perdis la tenon. Sed mi sciis pri kio temis kun li: estis la kostoj. Li vidis ruinon antaŭ si; li juĝis ke liaj financaj tagoj estis nombritaj. Sed kiam ni iris por inviti la aliajn, mi diris:

"Vi devas lasi min venigi tiujn amikojn; kaj vi ankaŭ devas lasi min pagi la kostojn."

Lia vizaĝo klariĝis, kaj li diris spirite:

"Sed ne ĉiujn, ne ĉiujn. Vi ne povas bone porti tian ŝarĝon sola."

Mi haltigis lin, kaj diris:

"Nun lasi nin tuj kompreni unu la alian, amiko. Mi estas nur inspektisto, vere; sed mi tamen ne estas malriĉa. Mi estis tre bonŝanca dum ĉi tiu jaro – vi surpriziĝus se vi sciis kiom. Mi diras al vi la honestan veron kiam mi diras ke mi povus malŝpari por dek du festenoj kiel ĉi tiu, kaj ne

tiom zorgi pri la kostoj!" kaj mi kraketigis la fingrojn.

Mi povis vidi min plialtiĝi po unu futon en la estimo de Marco, kaj kiam mi elparolis tiujn lastajn vortojn, mi iĝis vera turo de stilo kaj alteco.

"Do vi vidas, ke vi devas akcepti mian volon. Vi ne povas kontribui eĉ unu pencon al ĉi tiu orgio, tio estas _decidite_."

"Tio estas grandanime de vi..."

"Ne, ne estas. Vi malfermis vian domon al Jones kaj mi en la plejeble malavara maniero; Jones rimarkis pri tio hodiaŭ, tuj antaŭ ol vi revenis el la vilaĝo; ĉar kvankam li verŝajne ne dirus ion tian al vi – ĉar Jones ne estas babilanto, kaj li estas modesta inter homoj – li havas bonan koron kaj dankeman, kaj scias kiel aprezi kiam li estas bone traktata; vi kaj via edzino estis tre gastemaj al ni."

"Ho frato, estas nenio – *tia* gastemo!"

"Sed *estas* io; la plej bona kion iu havas, libere donita, ĉiam estas io, kaj estas tiel bona kiel princo povas fari, kaj kun bona margeno – ĉar eĉ princo ne povas fari pli ol la plej bonan. Do ni faru nian aĉetadon nun, kaj vi ne zorgu pri la kostoj. Mi estas unu el la plej aĉaj malŝparantoj iam naskitaj. Ho, sciu, foje dum unusola semajno mi elpagas – sed ne zorgu pri tio – vi ĉiuokaze neniam kredus tion."

Kaj tiel ni vagadis, kaj eniris tie kaj ĉi tie, notis la prezojn kaj klaĉis kun la vendejposedantoj pri la tumulto, kaj fojfoje ni vidis mizerajn restaĵojn de ĝi, en la personoj de malbonvenaj kaj larmplenaj kaj senhejmaj familianoj kies domoj estis forprenitaj de ili, kaj iliaj gepatroj tranĉitaj aŭ pendumitaj. La vestaĵoj de Marco kaj lia edzino estis el kruda tolo respektive lano, kaj similis al urbomapo, faritaj nur el paperetoj kunmetitaj, urbo al urbo, dum kvin aŭ ses jaroj, ĝis apenaŭ manlarĝa peco de la originaj vestaĵoj ankoraŭ videblis. Nun mi volis doni al tiuj homoj novajn vestaĵojn, pro tiu bonega kunestado, kaj mi ne sciis kiel fari tion diskrete, ĝis mi subite ekkomprenis ke ĉar mi jam malavare elpensis vortan dankemon al la reĝo, estus bone kombini tion kun io palpebla; do mi diris:

"Kaj Marco, estas io alia kion vi devas permesi – pro ĝentileco al Jones – ĉar vi ne volus ofendi lin. Li tre fervore volis iel montri sian dankemon, sed li estas tiel modesta ke li ne povus mem fari tion, do li petis min aĉeti kelkajn etaĵojn kaj doni ilin al vi kaj al Dame Phyllis kaj lasi lin pagi por ili sen iam lasi vin scii ke la pago venas de li – vi scias kiel sentema persono reagas pri tiaj aferoj – kaj do mi diris ke mi faros tion, kaj ni silentos. Nu, lia ideo estis novaj vestaĵoj por vi ambaŭ..."

"Ho, tio estas malŝparo! Ne povas estis tiel, frato, ne povas esti tiel. Pripensu la grandecon de la sumo..."

"Mi fajfas pri la grandeco de la sumo! Provu esti trankvila dum momento, kaj vidu kiel aspektus; neniu povus englitigi vorton, vi parolas tiel multe. Vi devus kuraci tion, Marco; ne estas bona maniero, sciu, kaj ĝi kreskos en vi, se vi ne haltigos ĝin. Jes, nun ni eniros kaj taksos la valoron de la aĵoj de tiu ulo – kaj ne forgesu memori ne malkaŝi al Jones ke vi scias ke vi havas ion por fari kun ĝi. Vi ne povas imagi kiel strange sentema kaj scivolema li estas. Li estas kamparano – sufiĉe bonhava kamparano – kaj mi estas lia inspektisto; *sed* – la imagkapablo de tiu homo! Ho, foje kiam li forgesas sin mem kaj permesas al si eksplodi, vi povus kredi ke li estas unu el la ondoj de la tero; kaj vi povus aŭskulti lin dum cent jaroj, kaj neniam kredi ke li estas kamparano – precipe se li parolus pri terkultivado. Li *kredas* ke li estas diabla kamparano; sed inter ni private, li ne scias tiom pri terkultivado kiel pri la arto regi regnon – tamen, pri kio ajn li parolas, vi volas faligi vian suban makzelon kaj aŭskulti, same kiel se vi neniam aŭdus tiel nekredeblan saĝecon dum via tuta antaŭa vivo, kaj timus ke vi mortos antaŭ ol vi aŭdos sufiĉe. Tio plaĉos al Jones."

Tiklis Marcon ĝismedole aŭdi pri tia stranga karaktero, sed ankaŭ preparis lin al okazontaĵoj; kaj laŭ miaj spertoj, kiam vi vojaĝas kun reĝo kiu ŝajnigas esti io alia, kaj ne povas memori tion pli ol duonon de la tempo, vi ne povas antaŭprepari vin pli ol sufiĉe.

Ĉi tio estis la plej bona vendejo kiun ni ĝis nun trovis; en ĝi estis ĉio, malgrandkvante, de amboj kaj sekaĵoj eĉ ĝis fiŝaĵoj kaj imititaj juveloj. Mi decidis ke mi aĉetu ĉion tie ĉi, kaj ne plu rondiru por kompari prezojn. Do mi liberiĝis de Marco, forsendante lin por inviti la masoniston kaj la veturilfaranton, kaj tio donis al mi liberajn manojn. Ĉar mi neniam volas fari ion en trankvila maniero; devas esti teatreske, aŭ mi ne interesiĝas. Mi montris sufiĉe da mono, senzorge, por vekti la respekton de la vendejestro, kaj poste mi skribis liston de aferoj kiujn mi deziris, kaj donis al li por vidi ĉu li povis legi ĝin. Li povis, kaj estis fiera montri ke li povis. Li diris ke li estis edukata de pastro, kaj povis kaj legi kaj skribi. Li tralegis la liston, kaj notis kontente ke kostos sufiĉe multe. Jes, tiel estis, por tiel malgranda entrepreno. Mi ne nur donos bonan vespermanĝon, sed ankaŭ kelkajn aldoniĵojn. Mi petis ke la aferoj estu sendataj al la loĝejo de Marco, filo de Marco, sabate vespere, kaj la fakturo al mi dimanĉe tagmeze. Li diris ke mi povas fidi lian akuratecon, tio estis regulo de la

domo. Li ankaŭ diris ke li aldonos kelkajn ludpafilojn senpage por la familio de Marco – ke ĉiuj uzis ilin nuntempe. Li havis altan opinion pri tiu aparato. Mi diris:

"Kaj bonvolu plenigi ilin ĝis la mezo, kaj aldoni tion al la fakturo."

Tion li faros, kun plezuro. Li plenigis ilin, kaj mi kunportis ilin. Mi ne kuraĝis informi lin ke tiu pafilo estis eta elpensaĵo mia, kaj ke mi persone ordonis ke ĉiu vendejisto en la regno havu ilin en stoko kaj vendu ili je ŝtata prezo – kiu estis tre malgranda, kaj la vendejisto ricevos ĝin, ne la ŝtato. Ni liveris ilin por nenio.

La reĝo apenaŭ havis tempon sopiri nin, ĝis ni revenis je vesperiĝo. Li frue denove sinkis en sia revo pri granda invado al Gaŭlio, apogata de la tuta forto de sia regno, kaj la posttagmezo pasis sen ke li rekonsciiĝis.

32. La humiligo de Dowley

Nu, kiam tiu pakaĵo venis je sunsubeniro, sabate posttagmeze, mi estis plene okupata malhelpante ke la familio Marco svenu. Ili estis certaj ke Jones kaj mi estis nesaveble ruinigitaj, kaj ili mallaŭdis sin mem kiel kunkulpaj al tiu bankroto. Vi sciuj, aldone al vesperaj manĝaĵoj, kiuj kostis sufiĉe multe, mi aĉetis multajn aldonajn por la estonta komforto de la familio; ekzemple multege da tritiko, bongustaĵo same malofta sur la tabloj de ilia klaso kiel glaciaĵo sur tiu de ermito; ankaŭ grandan manĝotablon; ankaŭ du tutajn funtojn da salo, alia luksaĵo por tiuj homoj; kaj ujojn, seĝojn, la vestaĵojn, malgrandan barilon de biero, kaj tiel plu. Mi diris al la familio Marco ke ili silentu pri tiu lukso, por doni al mi eblecon surprizi iliajn gastojn kaj iomete paradi. Kiam temis pri la novaj vestaĵoj, la simpla paro similis al infanoj; ili iradis tien kaj reen, la tutan nokton, por vidi ĉu ne baldaŭ estos taglumo, por ke ili povu surmeti ilin, kaj tion oni faris almenaŭ unu horon antaŭ la matenkrepusko. Tiam, ilia plaĉo – por ne diri deliro – estis tiel freŝa kaj nova kaj inspiriga, ke la vidaĵo bone kompensis min por la rompoj de mia dormo. La reĝo dormis tute kiel kutime – kiel mortinta. La gesinjoj Marco ne povis danki lin pro iliaj vestaĵoj, ĉar tio estis malpermesite; sed ili provis, per ĉiuj manieroj

kiujn ili povis elpensi, lasi lin vidi kiel dankemaj ili estis. Tute vane; li ne notis iun ŝanĝon.

Montriĝis esti unu el tiuj riĉaj kaj maloftaj aŭtunaj tagoj kiuj estas nur junia tago iom malvarmigita ĝis estas paradizo esti eksterdome. Je tagmezo la gastoj venis, kaj ni kolektiĝis sub granda arbo kaj baldaŭ kunestis kiel malnovaj konatuloj. Eĉ la reĝo iĝis iom malpli singarda, kvankam li unue havis certajn problemojn memori ke lia nomo estis Jones. Mi petis lin provi ne forgesi ke li estis kamparano; sed mi ankaŭ kredis ke estis saĝe peti lin ne fari pli ol tio, kaj ne aldoni ion. Ĉar li estis ĝuste tia persono, pri kiu vi povis fidi ke li detruos tian etaĵon, se vi ne avertis lin; lia lango estis tiel vigla, kaj lia spirito tiel volanta, kaj liaj informoj tiel malcertaj.

Dowley estis bonhumora, kaj mi frue ekmovis lin, kaj poste sperte kondukis lin al lia propra historio kiel teksto kaj li mem kiel heroo, kaj poste estis bone sidi tie kaj aŭdi lin susuri. Memfarita homo, vi scias. Ili scias kiel paroli. Ili ja meritas pli da honoro ol iuj aliaj homoj, jes, tio estas vere; kaj ili ankaŭ estas inter la unuaj kiuj komprenas tion. Li rakontis kiel li komencis sian vivon sen gepatroj kaj sen amikoj kiuj povus helpi lin; kiel li vivis kiel vivas la sklavoj de la plej aĉa mastro; kiel liaj labortagoj estis inter dek ses kaj dek ok horojn longaj, kaj donis al li nur

sufiĉe da nigra pano por teni lin duonviva; kiel lia fidela strebado finfine vekis la atenton de bona forĝisto, kiu preskaŭ mortbatis lin per ĝentileco ofertante al li, kiam li estis tute nepreparita, fari lin sia ligita lernanto dum naŭ jaroj kaj doni al li loĝejon kaj vestaĵojn kaj instrui al li la profesion – aŭ "misteron", kiel Dowley nomis ĝin. Tio estis lia unua granda altiĝo, lia unua mirakla bonŝanco; kaj vi vidis ke li ne ankoraŭ povis paroli pri tio sen ia elokventa miro kaj ĝojo ke tia ora promocio venas al ordinara homo. Li ne ricevis novajn vestaĵojn dum siaj jaroj kiel lernanto, sed dum la lasta tago de tiuj, lia mastro vestis lin en tute novaj tolaĵoj kaj faris lin senti sin neesprimeble riĉa kaj bona.

"Ho, mi memoras tiun tagon!" la veturilfaranto elkantis, entuziasme.

"Same mi!" kriis la masonisto. "Mi ne kredus ke ili estus viaj propraj, fakte mi ne povus."

"Nek alia!" blekis Dowley, kun lumantaj okuloj. "Mi preskaŭ perdis mian karakteron, ĉar la najbaroj kredis ke mi eble ŝtelis. Estis granda tago, granda tago; oni ne forgesas tiajn tagojn."

Jes, kaj lia mastro estis bona homo, kaj riĉa, kaj ĉiam havis grandan feston de viando dufoje jare, kaj kun ĝi blanka pano, vera tritika pano; li fakte vivis kiel sinjoro, por tiel diri. Kaj ĝustatempe, Dowley transprenis la entreprenon kaj edziĝis al la filino.

"Kaj nun pripensu kio okazis," li diris, impone. "Dufoje ĉiumonate, estas freŝa viando sur mia tablo."

Tie la faris paŭzon, por substreki tiun fakton. Poste li aldonis;

"Kaj okfoje sala viando."

"Tio estas vere," diris la veturilfaranto, apenaŭ spirante.

"Mi scias tion pro propra sperto," diris la masonisto, same respektme.

"Sur mia tablo aperas blanka pano ĉiun dimanĉon dum la tuta jaro," aldonis la majstroforĝisto, solene. "Viaj konsciencoj diru, amikoj, ĉu ne ankaŭ tio estas vere?"

"Je mia kapo, jes," kriis la masonisto.

"Mi povas atesti tion – kaj tiel mi faras," diris la veturilfaranto.

"Kaj se temas pri mebloj, vi mem diru kiaj estas miaj."

Li faris manmovon por doni plenan kaj senbaran esprimliberecon, kaj aldonis:

"Diru kion vi volas; parolu kvazaŭ mi ne estus ĉi tie."

"Vi havas kvin seĝojn, kaj tre bone faritajn, kvankam via familio estas nur tripersona," diris la veturilfaranto, kun profunda respekto.

"Kaj ses lignajn pokalojn, kaj ses pladoj de ligno kaj du de stano por manĝi kaj trinki," diris la masonisto, impone. "Kaj mi diras tion, sciante

ke Dio estas mia juĝisto, kaj ni ne ĉiam restos ĉi tie, sed devos respondi dum la lasta tago pri la aferoj kiujn ni diris en la korpo, ĉu ili estas veraj ĉu mensogaj."

"Nun vi scias kia homo mi estas, frato Jones," diris la forĝisto, protektafable, "kaj sendube vi kredas ke mi estas ulo ĵaluze atendantanta mian respekton, sed ne multe donanta ĝin al fremduloj ĝis iliaj rangoj kaj meritoj estas certaj, sed ne zorgu pri tio; sciu ke vi trovas en mi viron kiu ne pensas pri tiaj aferoj, sed estas preta akcepti kiel egalulon tiu kiu havas en sia korpo bonan koron, kiel ajn modesta estas lia surtera rango. Kaj por substreki tion, jen mia mano; kaj mi diras per mia propra buŝo ke ni estas egaluloj – egaluloj –", kaj li ridetis al la kunvenintoj, kontenta kiel dio kiu faras ion belan kaj gracian, kaj kiu estas tre konscia pri tio.

La reĝo prenis lian manon kun malbone kaŝata kontraŭvolo, kaj lasis ĝin same volonte kiel sinjorino lasas fiŝon; kaj ĉio tio havis bonan efikon, ĉar misinterpretata kiel natura ĝeno ĉe iu bananta sin en grandeco.

La sinjorino nun eligis la tablon, kaj metis ĝin sub la arbo. Tio videble surprizis ĉiujn, ĉar ĝi estis tute nova kaj tre valora. Sed la surprizo kreskis eĉ pli kiam la sinjorino, kun korpo kiu ĉien radiis senĝenan indiferecon, sed kies okuloj malkaŝis ĉion ĉar tute brulantaj pro

vanteco, malrapide malvolvis tute puran tablotukon kaj disetendis ĝin. Tio estis nivelo eĉ super la hejma grandeco de la forĝisto, kaj ĝi batis lin forte; oni povis vidi tion. Sed Marco estis en Paradizo; ankaŭ tion oni povis vidi. Poste, la sinjorino metis tien du seĝojn – ho! tio estis sensacio; tion oni povis vidi en la okuloj de ĉiu gasto. Poste, ŝi metis tien du pliajn – tiel trankvile kiel ŝi povis. Sensacio denove – kun imponataj murmuroj. Denove, ŝi metis tien du – irante sur aero, ŝi estis tiel fieraj. La gastoj estis ŝtonigitaj, kaj la masonisto murmuris:

"Estas io pri tera lukso, kio ĉiam instigas respekton."

Kiam la sinjorino forturnis sin, Marco ne povis ne liveri la klimakson dum ĉio estis varma; do li diris, kun io intencata esti malforta kolektiĝo sed estis malbona imito de tio:

"Ĉi tiuj sufiĉas; lasu la aliajn esti."

Do estis ankoraŭ pliaj! Estis bona efiko. Mi ne povus ludi la manon pli bone mem.

Ekde tiam, la sinjorino amasigis la ruinojn kun rapideco, kiu altigegis la temperaturon de la ĝenerala surprizaro, kaj samtempe senmovigis ĝiajn esprimojn al sufokitaj "Ho'j kaj "Ha"j, kaj mutaj levoj de manoj kaj okuloj. Ŝi venis kun pladoj – novaj, kaj multaj; kun novaj lignaj pokaloj kaj aliaj aĵoj por la tablo; kaj biero, fiŝoj, ansero, ovoj, rostbefo, rostita ŝafaĵo, ŝinko,

rostita porketo, kaj amaso de vera, blanka, tritika pano. La tutaĵo de tio ombrigis ĉion, kion tiu aro iam antaŭe vidis. Kaj dum ili sidis tie, tutsimple mutigitaj pro miro kaj respekto, mi iel svingis la manon kvazaŭ hazarde, kaj la filo de la vendejestro aperis kaj diris ke li venis por kolekti.

"Tio estas bone," mi diris indiferente. "Kio estas la sumo? Donu al mi la detalojn."

Do li laŭtlegis la fakturon, dum la tri mirigitaj viroj aŭskultis, kaj trankvilaj ondoj de kontenteco iris super mia animo, kaj malaj ondoj de timo kaj admiro iris super tiuj de Marco:

2 funtoj da salo	200
96 kruĉoj da biero, en ligno.....	800
3 buŝeloj da tritiko.....	2700
2 funtoj da fiŝo.....	100
3 kokinoj.....	400
1 ansero.....	400
36 ovojn.....	150
1 rostbefo.....	450
1 rostita ŝafo.....	400
1 ŝinko.....	800
1 porketo.....	500
2 tablopladaroj.....	6000
2 vestaĵaroj kaj subvestaĵoj de viroj.....	2800

1	ŝtofo	kaj	1	lana	robo	kaj	
	subvestaĵo.....						1000
8	lignaj pokaloj.....						800
Pluraj		aĵoj		por		la	
	tablo.....						10000
1	ligna tablo.....						3000
8	seĝoj.....						4000
2	ludpafiloj, ŝargitaj.....						3000

Li finiĝis. Estis pala kaj terura silento. Nek brako nek kruro moviĝis. Neniu naztruo montris ke pasis aero.

"Ĉu tio estas ĉio?" mi demandis, kun voĉo perfekte trankvila.

"Ĉio, bona sinjoro, krom ke kelkaj malgrandaj eroj estas menciataj kune. Se vi deziras, mi povas div..."

"Tio ne necesas," mi diris kaj per manmovado esprimis la plej profundan indiferentecon. "Bonvolu diri al mi la finan sumon."

La ulo klinis sin al la arbo por apogi sin, kaj diris:

"Trideknaŭmil cent kvindek milrejsoj!"

La veturilfaranto falis el sia seĝo, la aliaj prenis la tablon por savi sin, kaj estis profunda kaj ĝenerala elkrio de:

"Dio estu kun ni en la tago de katastrofo!"

La ulo rapidis diri:

"Mia patro petas min diri ke li ne povas honore postuli ke vi pagu ĉion nun, kaj tial nur petas vin..."

Mi ne atentis tion pli ol se estus la milda vento, sed kun mieno indiferenta, preskaŭ laca, mi elprenis mian monon kaj ĵetis kvar dolarojn sur la tablon. Ho, vi devus vidi ilin fiksrigardi!

La ulo estis surprisita kaj ĉarmita. Li petis min restigi ĉe mi unu el la dolaroj kiel sekureco, ĝis li povis iri al la urbo kaj... mi interrompis:

"Kion, kaj reveni kun naŭ pecoj? Sensencaĵo! Prenu ĉion. La ŝanĝmono restu ĉe vi."

"Vere, ĉi tiu ulo estas *farita* el mono! Li forĵetas ĝin kvazaŭ ĝi estus malpuraĵo."

La forĝisto estis frakasita homo.

La ulo prenis sian monon kaj forŝanceliĝis, ebria pro bonŝanco. Mi diris al Marco kaj lia edzino:

"Ho bonuloj, jen bagatelaĵo por vi" – kaj donis al ili la ludpafilojn, kvazaŭ tiuj tute ne gravis, kvankam ĉiu el ili enhavis dek kvin pecojn kontante; kaj dum la kompatinduloj dispeciĝis pro surprizo kaj dankemo, mi turnis min al la aliaj kaj diris, same trankvile kiel se mi demandus kiu horo estas:

"Nu, se ni ĉiuj estas pretaj, mi supozas ke ankaŭ la vespermanĝo estas. Venu, ek!"

Ho jes, ĝi estis vasta; ĝi estis mirakla. Mi ne scias ĉu mi iam aranĝis ion pli bone, aŭ ricevis pli

feliĉajn specialajn efikojn el la havebla materialo. La forĝisto – nu, li estis simple frakasita – mi absolute ne volus senti tion, kion sentis tiu homo, por iu ajn pago! Jen li fanfaronis pri sia granda viandofesto dufoje jare, kaj pri sia freŝa viando dufoje monate, kaj pri sia sala viando dufoje semajne, kaj pri sia tritika pano ĉiun dimanĉon dum la tuta jaro – ĉio por tripersona familio; la kosto por la tuta jaro ne pli ol 69.2.6. (sesdek naŭ pencoj, du miloj kaj ses milrejsoj), kaj subite venas homo kiu uzas preskaŭ kvar dolarojn por nur unu afero; kaj ne nur tio, li ankaŭ agas kvazaŭ lacigus lin pritrakti tiel malgrandajn sumojn. Jes, Dowley estis sufiĉe velkinta, kaj malkreskis kaj disfalis; li aspektis kiel balono tretita de bovino,

33. Politika ekonomio de la sesa jarcento

Tamen, mi vikle prilaboris lin, kaj antaŭ la fino de la unua triono de la vespermanĝo, li denove estis feliĉa. Estis facile farite – en lando de rangoj kaj kastoĵ. Vi vidu, en lando kie oni havas rangojn kaj kastoĵn, homo neniam estas homo, nur homero, neniam plenkreskinta. Vi pruvas ke vi estas supera al li en profesio, aŭ en rango, aŭ en kapitalo, kaj tio estas ĉio – li tutsimple falas. Vi ne povas insulti lin post tio. Ne, mi ne volas diri ekzakte tion; kompreneble, vi *povas* insulti lin, mi nur volas diri ke estas malfacile; do, se vi ne havas amason da neuzebla tempo, ne valoras la penon provi. Nun mi havis la respekton de la forĝisto, ĉar mi estis evidente treege riĉa; mi povus havi lian admiron se mi havus etan titolon nobelan. Kaj ne nur lian, sed ankaŭ tiun de ĉiu ordinarulo en la lando, eĉ se li estus la plej produktanta de ĉiuj eraoj, kaj supera al ĉiuj pri intelekto, valoro kaj karaktero, kaj mi bankrota pri ĉiuj tri. Tio restos tiel, tiel longe kiel Anglio ekzistos surtere. Kun la spirito de profeteco sur mi, mi povis rigardi en la estontecon kaj vidi ĝiajn rektajn statuojn kaj monumentojn al siaj nemencieblaj Georgoj kaj aliaj reĝaj kaj nobelaj vestaĵsnoboj, kaj lasi nehonorigitaj la kreantoj de ĉi tiu mondo – post Dio – Gutenberg, Watt, Arkwright, Whitney, Morse, Stephenson, Bell.

La reĝo enigis sian ŝarĝon, kaj poste, kiam la interparolo ne temis pri batalado, konkerado aŭ fervestitaj dueloj, li iom laciĝis kaj apartiĝis por dormeti. Sinjorino Marco nudigis la tablon, faris la bierbarilon atingebla, kaj foriris por humile manĝi mem la restaĵon, kaj ni ceteraj baldaŭ moviĝis al taskoj proksimaj kaj karaj al la koroj de homoj kiel ni – negocoj kaj salajroj, kompreneble. Je la unua rigardo, la situacio ŝajnis esti eksterordinare bona en ĉi tiu eta, dependa regno – kies sinjoro estis la reĝo Bagedmagus – kompare al la stato en mia propra regiono. Oni havis la "protektan" sistemon ĉi tie plene funkcia, dum ni iradis al libera negocado, paŝon post paŝo, kaj nun estis ie duonvoje. Baldaŭ, nur Dowley kaj mi parolis, dum la aliaj malsate aŭskultis. Dowley iom post iom varmiĝis, flaris avantaĝon en la aero, kaj komencis fari al mi demandojn kiujn li konsideris sufiĉe ĝenajn, kaj li fakte iel aspektis tiel:

"En via lando, frato, kio estas la salajro de ĉefa inspektisto, de ĉefa bienservisto, de veturigisto, de ŝafpaŝtisto, de porkopaŝtisto?"

"Dudek kvin milrejsoj tage; tio estas, kvarona penco."

La vizaĝo de la forĝisto radiis pro ĝojo. Li diris:

"Ĉe ni ili ricevas la duoblan sumon! Kaj kiom eble ricevos meĥanikisto – lignaĵisto, kolorŝmiristo, masonisto, pentristo, forĝisto, veturilfaranto, kaj simile?"

"Meze kvindek milrejsoj; duonan pencon tage."

"Hoho! Ĉe ni, ili ricevos cent! Ĉe ni, ĉiu bona meĥanikisto ricevos plenan pencon tage! Mi eksterlasas la tajloron, sed ne la aliajn – ili ĉiuj ricevas unu pencon tage, kaj se urĝas, ili ricevas pli – jes, ĝis cent dek kaj eĉ dek kvih milrejsojn tage. Mi mem pagis cent dek kvin, ene de unu semajno. Hu ra por protektado – libera negocado al la infero!"

Kaj lia vizaĝo brilis al la kunvenintoj kiel la suno mem. Sed mi tute ne timis. Mi aranĝis mian ramon, kaj atendis dek kvin minutojn por bati lin en la teron – *tute* en la teron – ĝis eĉ ne la verto de lia kapo videblos supertere. Jen kiel mi komencis. Mi demandis:

"Kiom vi pagas por funto de salo?"

"Cent milrejsojn."

"Ni pagas kvardek. Kiom vi pagas por bov-kaj ŝafviando – kiam vi aĉetas ĝin?"

Tio estis bona pafo; ĝi venigis la koloron.

"Varias iom, sed ne multe; oni povas diri sepdek milrejsojn por unu funto."

"Ni pagas tridek tri. Kiom vi pagas por ovo?"

"Kvindek milrejsojn por dek unu."

"Ni pagas dudek. Kiom vi pagas por biero?"

"Ĝi kostas al ni ok kaj duona milrejsoj por unu kruĉo."

"Ni ricevas unu kruĉon por kvar; dudek kvin botelojn por unu penco. Kiom vi pagas por tritiko?"

"Ĉirkaŭ naŭcent milrejsojn por unu buŝelo."

"Ni pagas kvarcent. Kiom vi pagas por tola vestaĵo por viro?"

"Dek tri pencojn."

"Ni pagas ses. Kiom vi pagas por ŝtofa robo por edzino de laboristo aŭ meĥanikisto?"

"Ni pagas ok pencojn, kvar milojn."

"Nu, vidu la diferencon: vi pagas ok pencojn kaj kvar milojn, ni pagas nur kvar pencojn."

Mi nun preparis la finan baton. Mi diris:

"Jen vidu, bona amiko, *kien iris viaj altaj salajroj, pri kiuj vi tiom fanfaronis antaŭ kelkaj minutoj?*

Kaj mi rigardis la ĉeestantojn memkontente, ĉar mi ŝteliris al li paŝon post paŝo kaj ligis lin mane kaj piede, vidu, kaj li eĉ ne rimarkis ke li estis ligata.

"Kien iris tiuj viaj noblaj altaj salajroj? – Ŝajnas al mi ke mi tute malplenigis ilin."

Sed se vi volas kredi min, li nur aspektis surprizita, jen ĉio! Li tute ne komprenis la situacion, ne sciis ke li iris en kaptilon, ne trovis ke li estis *en* kaptilo. Mi povus pafi lin, nur pro

irito. Kun nubaj okuloj kaj luktanta intelekto, li diris:

"He, mi ŝajnas ne kompreni. Estas *pruvite* ke niaj salajroj estas duoble grandaj kompare al viaj; kiel do povas esti ke vi tute malplenigis ilin?"

Nu, mi estis knokaŭtita; parte pro tiu neatendita stulteco lia, kaj parte ĉar liaj kunuloj tiel evidente samopiniis kun li – se vi povas diri "opinii". Mia pozicio estis sufiĉe simpla, sufiĉe klara; kiel eblus simpligi ĝin eĉ pli? Tamen, mi devis provi:

"Nu, vidu, frato Dowley, ĉu vi ne komprenas? Viaj salajroj estas pli altaj ol niaj nur *nome*, ne *fakte*."

"Aŭdu lin! Ili estas *duoblaj* – vi mem konfesis tion."

"Jes jes, mi tute ne neas tion. Sed tio ne ŝanĝas la aferon; la *sumo* de la salajroj en simplaj moneroj, kun sensignifaj nomoj ligitaj al ili por ke oni rekonu ilin, havas nenion por fari kun tio. La grava afero estas, kiom vi povas *aĉeti* per viaj salajroj? – jen la ideo. Kvankam estas vere ke ĉe vi, bona meĥanikisto ricevas ĉirkaŭ tri kaj duona dolarojn jare, kaj ĉe ni nur ĉirkaŭ unu dolaron kaj sepdek kvin..."

"Vidu – vi denove konfesas tion, vi denove konfesas tion!"

"Diable, mi neniam neis tion, mi diras! Kion mi diras estas ĉi tio. Ĉe ni, oni povas por *duona*

dolaro aĉeti pli ol por *plena* dolaro ĉe vi -- kaj *tial* estas evidenta fakto, ke niaj salajroj estas *pli altaj* ol viaj."

Li aspektis narkotita, kaj diris senespere:

"Vere, mi ne povas kompreni. Vi ĵus *_diris_* ke niaj estas pli altaj, kaj samspire vi poste diras la malon."

"Ho Dio, ĉu ne eblas enigi ion tiel simplan en vian kapon? Nun vidu – lasu min ilustrati. Ni pagas kvar pencojn por ŝtofa robo de virino, vi pagas ok pencojn kvar milojn, kio estas kvar miloj pli ol al la *duoblo*. Kiom vi donas al laboristino en bieno?"

"Du milojn tage."

"Tre bone; ni donas nur duonon, ni pagas al ŝi nur dekonon de penco; kaj..."

"Denove vi konf..."

"Atendu! Nun, vi vidu, la afero estas tre simpla; ĉifoje vi komprenos. Ekzemple, via virino bezonas kvardek du tagojn por gajni sian robon, je du miloj tage – sep semajnojn da laboro; sed mia gajnas sian en kvardek tagoj – du tagoj *malpli* ol sep semajnoj. Via virino havas robon, kaj restas al ŝi dutaga salajro, por aĉeti ion alian. Nu – ĉu vi *nun* komprenas?"

Li aspektis – nu, li tutsimple aspektis dubanta, pli ol tio mi ne povas diri; same faris la aliaj. Mi atendis – por lasi la aferon efiki. Dowley parolis finfine – kaj malkaŝis la fakton ke li fakte ne

ankoraŭ liberiĝis de siaj hereditaj superstiĉoj. Li diris, iom hezitante:

"Sed... sed... vi ne povas ne agnoski ke du miloj tage estas pli bone ol unu."

Diable! Nu, kompreneble, mi ne volis rezignacii. Do mi provis alian manieron:

"Ni supozu situacion. Supozu ke unu el viaj submastroj eliras kaj aĉetas ĉi tiujn aĵojn:

- 1 funton de salo,
- 12 ovojn,
- 12 kruĉojn de biero,
- 1 buŝelo de tritiko,
- 1 lana vestaĵo,
- 5 funtojn de bovviando,
- 5 funtojn de ŝafviando

Ĉio tio kostas al li tridek du pensojn. Li bezonas tridek du labortagojn por gajni la monon – kvin semajnojn kaj du tagojn. Lasu lin veni al ni kaj labori tridek du tagojn por la *duona* salajro; li povos aĉeti ĉiujn tiujn aferojn por iom malpli ol dek kvar kaj duona pencoj; ili kostos al li iom malpli ol dudek naŭ tagojn de laboro, kaj post tio, li daŭre havos salajron por duona semajno. Kalkulu tion por la tuta jaro: li savos preskaŭ semajna salajro ĉiun duan monaton, *via* ulo nenion; nia ulo do ŝparas salajron de kvin aŭ ses semajnoj jare, *via* ulo eĉ ne unu pencon. *Nun* mi

kredas ke vi komprenas ke "altaj salajroj" kaj "malaltaj salajroj" estas frazoj kiuj signifas nenion en la mondo, ĝis vi trovas kio el ili plej multe _aĉetas_."

Tio estis frakasanta argumento.

Sed, ho ve! ĝi nenion frakasis. Ne, mi devis kapitulaci. Kion tiuj homoj valoris estis *altaj salajroj*; Ne ŝajnis gravi al ili ĉu la altaj salajroj povus aĉeti ion aŭ ne. Ili deziris "protekton", kaj ĵuris je ĝi, kio estis sufiĉe komprenebla afero, ĉar interesataj partioj igis ilin kredi ke ja protekto kreis iliajn altajn salajrojn. Mi pruvis al ili ke dum kvarona jarcento iliaj salajroj altiĝis per nur tridek procentoj, dum la vivkostoj altiĝis per cent; kaj ke ĉe ni, dum malpli longa tempo, la salajroj altiĝis per kvardek procentoj, dum la vivkostoj daŭre malaltiĝis. Sed ne funkciis. Nenio povis detrui iliajn strangajn kredojn.

Nu, doloris al mi la sento de malvenko. Nemeritata malvenko, sed kion pri tio? Tio ne mildigis la doloron. Kaj pensi pri la cirkonstancoj! La unua ŝtatulo de la erao, la plej kapabla homo, la plej bone informita homo en la tuta mondo, la plej alta nekronita kapo kiu dum jarcentoj moviĝis tra la nuboj de iu politika firmamento, sidis ĉi tie kaj ŝajnis venkita per argumentoj de needukita kampara forĝisto! Kaj mi povis vidi ke tiuj aliaj kompatis min! – pro kio mi ruĝiĝis ĝis mi povis senti miajn vangobarbojn bruli. Metu

vin en mian lokon; sentu vin tiel malica kiel mi faris, hontu kiel mi hontis – ĉu ne vi batus sub la zono por venĝi vin? Jes, vi farus tion; tio estas simple la homa naturo. Nu, ĝuste tion mi faris. Mi ne provas defendi tion; mi nur diras ke mi estis furioza, kaj *iu ajn* farus tion.

Nu, kiam mi decidas bati iun, mi ne planas fari tion karese; ne, tio ne estas mia maniero; dum mi entute intencas bati lin, mi intencas fari tion forte. Kaj mi ne saltas al li tute subite, kaj riskas sukcesi nur duone; ne, mi starigas min flanke, por ke li neniam suspektu ke mi batos lin entute; kaj post iom da tempo, fulmrapide, li kuŝas surdorse, kaj li havas neniun eblecon diri kiel tio okazis. Tiel mi atakis fraton Dowley. Mi komence parolis malvigle, kvazaŭ nur por pasigi la tempon; kaj la plej maljuna homo en la mondo ne povus noti mian elirpunkto kaj diveni kie mi finiĝos:

"Knaboj, estas multaj strangaj aferoj pri leĝoj, kaj kutimoj, kaj ĉiuj tiaj aferoj, kiam vi hazarde rigardas ilin; jes, kaj ankaŭ pri la ŝanĝoj de homaj opinioj. Estas skribitaj leĝoj – ili pereas; sed estas ankaŭ leĝoj neskribitaj – *ili* estas eternaj. Prenu la neskribitan leĝon pri salajroj; ĝi diras ke ili devas altiĝi, iom post iom, tra ĉiuj jarcentoj. Kaj notu kiel tio funkcias. Ni scias kio salajroj estas nun, jen kaj tie kaj ĉi tie. Mi prenas iun mezvaloron, kaj diras ke tio estas la salajroj de hodiaŭ. Ni scias kiom estis la salajroj antaŭ cent jaroj, kaj

kiom ili estis antaŭ ducent jaroj; nur tiel longe malantaŭen ni povas iri, sed sufiĉas por doni al ni la leĝon pri progreso, la mezuro kaj rapideco de perioda pligrandiĝo; kaj tiel, sen dokumento por helpi nin, ni povas sufiĉe ekzakte kalkuli kiom estis la salajroj antaŭ tricent, kvarcent kaj kvincent jaroj. Bone, tiel longe. Ĉu ni haltu tie? Ne, Ni ne plu rigardu malantaŭen; ni turnu nin kaj apliku la leĝon al la estonteco. Amikoj, mi povas diri al vi kiom estos la salajroj de homoj je iu ajn dato en la estonteco kion vi solas scii, dum centoj kaj centoj da jaroj."

"Kion, bona homo, kion!"

"Jes. Post sepcent jaroj, la salajroj estos sesfoje la nunaj, ĉi tie en via regiono, kaj kamparanaj laboristoj estos pagataj tri pencojn tage, kaj meĥanikisto ses."

"Ho, se mi mortus nun kaj vivus tiam!" interrompis Smug, la veturilfaranto, kun klara, avara lumo en siaj okuloj.

"Kaj tio ne estas ĉio. Ili ankaŭ ricevos manĝon kaj loĝon – tiaj kiel ili estos; ili ne grasigos ilin. Ducent kvindek jarojn poste – atentu nun – la salajro de meĥanikisto estos – atentu, jen leĝo, ne diveno; la salajro de meĥanikisto estos *dudek* pencojn tage!"

Ĉiuj enspiris pro komuna surprizo. Dickon la masonisto murmuris, kun levitaj okuloj kaj manoj:

"Pli ol trisemajna pago por unutaga laboro!"

"Riĉaĵoj – jes, vere, riĉaĵoj!" murmuris Marco, spirante rapide kaj mallonge, pro ekscito.

"Salajroj daŭre altiĝos, iom post iom, iom post iom, same fiksrapiĉe kiel arbo kreskas, kaj post tricent kaj kvardek jaroj pli estos almenaŭ unu lando kie la meza salajro de meĥanikisto estos *ducent pencoj* tage!"

Tio tute mutigis ilin! Eĉ ne unu el ili povis spiri dum preskaŭ du minutoj. Poste diris la karbigisto, preĝeme:

"Ho, se mi vivus por vidi tion!"

"Estas la enspezo de jarlo!" diris Smug.

"De jarlo, vi diras?" diris Dowley. "Vi povus diri pli ol tio, kaj ne mensogi; ne estas jarlo en la regno de Bagdemagus kiu havas tian enspezon. Enspezo de jarlo – hrm! Estas la enspezo de anĝelo!"

"Nu, tio do estas kio okazos kiam temas pri salajroj. En tiu malproksima tago, tiu homo gajnos, per *unusemajna* laboro, la sumon kiun vi nun devas labori pli ol _kvindek_ semajnojn por gajni. Okazos ankaŭ kelkaj aliaj sufiĉe surprizaj aferoj. Frato Dowley, kiu decidas, ĉiun printempon, kiom estos la aparta salajro de ĉiuspeca meĥanikisto, laboristo kaj servisto dum tiu jaro?"

"Foje la kortumoj, foje la urba konsilio, sed plej ofte la urba administranto. Vi povas diri,

ĝenerale, ke estas la urba administranto kiu decidas pri la salajroj."

"Ne petas iujn de tiuj mizeraj diabloj *helpi* lin decidi iliajn salajrojn por ili, ĉu?"

"Hm! Tio *estus* ideo! La mastro kiu pagos lin estas tiu kiu havas propran intereson pri la afero, vi notu."

"Jes – sed mi pensis ke ankaŭ la alia ulo povus havi certan intereson pri ĝi; kaj eĉ liaj edzino kaj infanoj, la kompatindaj. La mastroj estas ĉi tiuj: nobeloj, riĉuloj, la bonhavaj ĝenerale. Tiuj malmultaj, kiuj tute ne laboras, decidas kiom da pago havu la multaj kiuj *ja* laboras. Ĉu vi komprenas? Ili estas "kombino" – aŭ sindikato, por krei novan terminon – kiuj kunlaboras por devigi sian malaltan fraton preni tion, kion ili elektas doni. Post mil tricent jaroj – tiel diras la neskribita leĝo – la "kombino" agos inverse, kaj tiam – kiel la sekvantoj de tiuj belaj homoj koleros kaj grincigos la dentojn pro la impertinenta tiraneco de la sindikatoj! Jes, fakte! La urba administranto trankvile decidis pri la salajroj ekde nun, kaj la tutan vojon al la deknaŭa jarcento; kaj poste, tute subite, la salajro-gajnanto opinios ke sufiĉas kelkmil jaroj de tia unuflankeco; kaj li ekstaros kaj komencos mem decidi pri siaj salajroj. Ho, li devos esti pagata por longa kaj amara listo de maljustajcoj kaj humiligoj."

"Ĉu vi kredas..."

"Ke li fakte sukcesos decidi pri siaj propraj salajroj? Jes, certe. Kaj tiam li estos forta kaj kapabla."

"Bonaj tempoj, bonaj tempoj, vere!" mokis la bonhava forĝisto.

"Jes – kaj estas alia detalo. En tiu tempo, mastro rajtas dungi homon por nur po unu tago, aŭ unu semajno, aŭ unu monato, se li volas."

"Kion?"

"Vere. Cetere, urba administranto ne povos devigi iun labori por la sama mastro dum tuta jaro senpaŭze, ĉu tiu ulo volos tion ĉu ne."

"Ĉu estos *neniu* leĝo aŭ ordo tiutempe?"

"Sufiĉe da ambaŭ, Dowley. En tiu tago, homo estos sia propra propraĵo, ne la propraĵo de urba administranto kaj mastro. Kaj li povos forlasi la urbon kiam ajn li volos, se li ne ŝatos la salajrojn! – kaj oni ne povos ligi lin al la pilorio pro tio."

"Al la infero kun tia erao!" kriis Dowley, tre indignita. "Erao de hundoj, erao sen respekto por superuloj kaj por aŭtoritato! La pilorio..."

"Ho, atendu, frato; ne diru iun bonan pri tiu aĵo. *Mi* kredas ke la pilorio devus esti abolata."

"Tre stranga ideo. Kial?"

"Nu, mi diros kial. Ĉu iu iam estas ligita al la pilorio por krimo puninda per morto?"

"Ne."

"Ĉu estas juste kondamni iun al milda puno por malgranda krimo, kaj poste mortigi lin?"

Neniu respondo. Mi gajnis mian unuan poenton! Por la unua fojo, la forĝisto ne estis preta rebati. La aliaj notis tion. Bona efiko.

"Vi ne respondas, frato. Vi ĵus estis preta glorigi la pilorion, kaj iom kompatis estontan eraon kiu ne uzos ĝin. *Mi* kredas ke la pilorio devus esti abolata. Kio kutime okazas, kiam malriĉulo estas ligata al la pilorio por krimeto kiu tute ne gravas en la mondo? La popolaĉo provas iel amuziĝi per li, ĉu ne?"

"Jes."

"Komence, oni ĵetas teron sur li, kaj ili krevas pro rido kiam ili vidas kiel li provas eviti unu ĵetaĵon, kaj estas trafata de alia?"

"Jes."

"Poste ili ĵetas mortajn katojn al li, ĉu ne?"

"Jes."

"Nu, do supozu ke li havas kelkajn personajn malamikojn en tiu popolaĉo – kaj kelkloke viron aŭ virinon kiu sekrete malamas lin – kaj supozu precipe ke li estas malpopulara en la socio, ĉar fiero, aŭ ĉar bonhavo, aŭ pro tio aŭ ĉi tio – baldaŭ venos ŝtonoj anstataŭ tero kaj katoj, ĉu ne?"

"Tute sendube."

"Ĝenerale li estas kripligita por la vivo, ĉu ne? – makzeloj rompitaĵ, dentoj elbatitaĵ? – aŭ kruroj

detruitaj, gangrenitaj, finfine forhakitaj? – aŭ okulo eligita, eble ambaŭ okuloj?"

"Estas vere. Dio scias tion."

"Kaj se li estas malpopulara, li povas fidi ke li *mortos*, ĝuste tie en la pilorio, ĉu ne?"

"Li certe povas! Oni ne povas nei tion."

"Mi supozas ke neniu el vi estas malpopulara – pro fiero aŭ impertinenteco, aŭ videbla bonhavo, aŭ iu ajn el la aferoj kiuj provokas envion kaj malicon ĉe la simplaj kanajloj de vilaĝo? Vi ne kredus ke estus granda risko esti ligata al pilorio?"

Dowley grimacis, videble. Mi juĝis ke li estis trafata. Sed li ne montris tion per iu parolata vorto. La aliaj, aliflanke, parolis klare, kaj kun fortaj sentoj. Ili diris ke ili vidis sufiĉe de la pilorioj por scii, kiaj ŝancojn oni havas ĉe ili, kaj ili neniam konsentus esti ligitaj al ili se ili povus anstataŭe rapide morti per pendumo.

"Nu, por ŝanĝi la temon – ĉar mi kredas ke mi pruvis mian opinion ke la pilorioj devus esti abolataj – mi kredas ke kelkaj el niaj leĝoj estas sufiĉe maljustaj. Ekzemple, se mi faras ion kio devus venigi min al la pilorio, kaj vi scias ke mi faris tion kaj tamen vi silentas kaj ne raportas min, tiam vi estos ligata al la pilorio se iu raportos vin."

"Ho, sed tio estas juste," Dowley diris, "ĉar oni *devas* raportti. Tiel diras la leĝo."

La aliaj samopiniis.

"Nu, bone, lasu tion, ĉar viaj voĉoj venkas super mia. Sed estas unu afero, kiu certe ne estas justa. La urba administranto decidas ke meĥanikisto gajnu unu pencon tage, ekzemple. La leĝo diras ke, se iu mastro kuraĝos, eĉ dum ekstrema ekonomio premo, pagi al iu *pli* ol tiun ĉiutagan pencon, eĉ dum unusola tago, li kaj pagu punmonon kaj estu ligata al la pilorio; kaj kiuj ajn scias ke li faris tion, kaj ne informos, ankaŭ tiuj pagu punmonon kaj esti ligataj al la pilorio. Nu, tio ŝajnas al mi maljuste, Dowley, kaj mortiga danĝero al ni ĉiuj, ke ĉar vi senpripense konfesis, antaŭ nelonge, ke dum la lasta semajno vi pagis unu pencon kaj dek kvin milojn..."

Nu, *tio* certe frakasis! Vi devus vidi ilin dispeciĝi, la tuta aro. Mi ĵus ŝteliris al la kompatinda, ridetanta kaj ĝentila Dowley tiel milde kaj silente, ke li neniam suspektis ke okazos io, ĝis venis la bato kaj tute faligis lin.

Bona efiko. Fakte, same bona kiel ĉiuj kiujn mi iam faris, kun tiom malmulte da tempo por fari ĝin.

Sed mi tuj vidis ke mi iomete troigis. Mi kredis ke mi timigos ilin, sed mi ne kredis ke mi timigos ilin ĝismorte. Sed ili estis tre proksime al tio. Vi sciuj, dum siaj tutaj vivoj ili lernis aprezi la pilorion; kaj nun, kiam ĝi minacis ilin ĉiujn, kaj kiam ĉiu el ili estis klare je mia bonvolo,

fremdulo, se mi elektus raporti ilin – nu, estis terure, kaj ili ne ŝajnis povi restariĝi post la bato, ili ne ŝajnis povi kolekti siajn pensojn. Palaj, tremantaj, mutaj, kompatindaj? Ili ja ne estis pli bonaj ol same multaj mortintoj. Estis tre maltrankvilige. Kompreneble, mi kredis ke ili petos min silenti, kaj poste ni manpremos, kaj ĉiuj drinkos, kaj ekridos, kaj fino. Sed ne; vi sciu, mi estis iu nekonata, en kruele subpremata kaj suspektema popolo, popolo ĉiam kutima esti uzata pro sia senhelpeco, kaj neniam atendanta justan aŭ ĝentilan traktadon de iu ajn krom la propra familio kaj la plej proksimaj amikoj. Peti *min* esti ĝentila, esti ĝusta, esti donema? Kompreneble ili volis, sed ili ne kuraĝis.

34. La jankio kaj la reĝo vendataj kiel sklavoj

Nu, kion mi prefere faru? Nenion urĝe, certe. Mi devis elpensi distraĵon, ion ajn kio povis laborigi min dum mi povis pensi, kaj dum ĉi tiuj kompatinduloj havis ŝancon denove ekvivi. Tie sidis Marco, ŝtonigita dum li provis ekkompreni sian ludpafilon – iĝis ŝtono, en la sama pozicio kiel kiam mia ramo falis, la ludilo ankoraŭ prenata de liaj senkonsciaj fingroj. Do mi prenis ĝin de li kaj provis klarigi ĝian misteron. Mistero! Simpla afereto kiel tiu; kaj tamen ĝi estis sufiĉe mistera, por tiu popolo kaj tiu erao.

Mi neniam vidis tiel mallertajn homojn, kun maŝinoj; vi vidu, ili neniam kutimiĝis al ili. La ludpafilo estis eta duobla tubo de hardita vitro, kun eta risorto kiu, kiam premata, liberigis pafaĵon. Sed la pafaĵo ne lezus iun, ĝi nur falus en vian manon. En la pafilo estis du grandecoj – la sinapgrajna grandeco, kaj alia plurfoje pli granda. Ili estis mono. La sinapgrajnoj reprezentis milrejsojn, la pli grandaj milojn. Do la pafilo estis monujo; kaj tre praktika; oni povis pagi en mallumo per ĝi, tute akurate; kaj vi povis porti ĝin en via buŝo, aŭ en via veŝtopoŝo, se vi havis tian. Mi faris ilin en pluraj grandecoj – unu tiel granda ke ĝi valorus dolaron. Uzi pafaĵojn kiel monon estis bona afero por la registaro; la metalo kostis nenion, kaj la mono ne povis esti falsata,

ĉar mi estis la sola persono en la regno kiu sciis kiel funkciigi kugloturon. "Pagi la pafon" baldaŭ estis kurima esprimo. Jes, kaj mi sciis ke oni diros tion ankoraŭ en la deknaŭa jarcento, sed neniuj havos ideon kiel kaj kiam la esprimo originis.

La reĝo aliĝis al ni, ĉirkaŭ tiam, tre refreŝigita post sia dormeto, kaj sentis sin bone. Io ajn povus nervozigi min nun, mi estis tiel maltrankvila – ĉar niaj vivoj estis en danĝero; do maltrankviligis min vidi ion ĝentilan en la okulo de la reĝo, kio ŝajnis indiki ke li ŝargis sin por ia aŭ alia spektaklo; diable, kial li devis elekti momenton kiel ĉi tiu?

Mi pravis. Li tuj komencis, en la plej senkulpa, trasidebla kaj sensperta maniero, ekparoli pri terkultivado. Mi ekhavis malvarman ŝviton. Mi volis flustri en lia orelo:

"Atentu, ni estas en terura danĝero! Ĉiu momento valoras princlandon, ĝis ni rehavos la fidon de ĉi tiuj homoj, *ne* malŝparu ion de ĉi tiu ora tempo!"

Sed kompreneble, mi ne povis fari tion. Flustri al li? Aspektus kvazaŭ ni konspirus. Do mi devis sidi tie kaj aspekti trankvila, dum la reĝo staris super la dinamitminejo kaj babilaĉis pri siaj diablaj cepoj kaj aferoj. Unue la bruoj de miaj propraj pensoj, vokataj per la danĝerosignalo kaj kurantaj por helpi el ĉiuj anguloj mian kapon, tiel

kriis kaj konfuzigis kaj fajfis kaj tamburis, ke mi ne povis aŭdi eĉ unu vorton; sed baldaŭ, kiam mia amaso de kunirantaj planoj komencis kristaliĝi kaj formi linion por atako, ia ordo kaj trankvilo sekvis kaj mi aŭdis la tondradon de la baterioj de la reĝo, kiel el tre malproksime:

"... ne estus la plej bona maniero, mi kredas, kvankam oni ne povas nei ke aŭtoritatoj malsamopinias pri tio; kelkaj diras ke la cepo estas nur malsaniga bero kiam plukita frue el la arbo..."

La aŭskultantoj montris vivsignojn, kaj sercis la rigardojn unuj de la aliaj, surprizitaj kaj maltrankvilaj.

"... dum aliaj male diras, kun bonaj kialoj, ke ne nepre estas tiel, menciante ke prunoj kaj aliaj grajnoj ĉiam estas elfosataj dum nematuraj..."

La aŭskultantaro montriĝis klare maltrankvila; jes, kaj ankaŭ timplena.

"... tamen ili estas klare sanigaj, des pli precipe kiam oni mildigas ilian akran guston kiam oni enmiksas la trankviligan sukron de la kaprica brasiko..."

La sovaĝa lumo de timo komencis brili en la okuloj de tiuj homoj, kaj unu el ili murmuris:

"Tiuj estas eraroj, ĉiu el ili... Dio certe detruis la animon de tiu kamparano."

Mi terure timis; mi sidis sur dornoj.

"... kaj cetere, ni povas mencii la konatan veron ke en la kazo de bestoj, la junaj, kiuj povas esti nomataj la verda frukto de la estaĵo, estas pli bonaj, se oni konfesas ke kiam kapro estas matura, lia haŭto estas varma kaj vundoj kovras lian karnon, kio difektas, se oni rigardas tion kune kun liaj fiodorantaj kutimoj kaj abomenaj apetitoj, kaj sendiaj sintenoj, kaj naŭza moralo.."

Ili ekstaris kaj atakis lin! Kun sovaĝa krio: "Unu perfidus nin, la alia estas freneza! Mortigu ilin, mortigu ilin!" ili ĵetis sin al ni. Kia ĝojo ekbrulis en la okuloj de la reĝo! Eble li sciis malmulton pre terkultivado, sed ĉi tiaj aferoj estis lia specialaĵo. Li longe fastis, li malsatis pri batalo. Li donis al la forĝisto baton sub la makzelo, kiu levis lin super liaj piedoj kaj kuŝigis lin surdorse.

"Sankta Georgo por Britio!", kaj li faligis la veturilfaranton.

La masonisto estis granda, sed mi faligis lin tre facile. La tri kuniĝis kaj denove atakis; denove falis; denove venis; kaj daŭre ripetadis tion, kun denaska brita kuraĝo, ĝis la batoj faris el ili ĵeleon, ŝanceliĝantaj pro laceco, kaj tiel blindaj ke ili ne povis distingi nin; kaj tamen ili daŭriĝis, kaj marteladis per la fortoj restantaj en ili. Martelis unu la alian – ĉar ni iris flanken kaj rigardis, dum ili rulis, kaj luktis, kaj premis, kaj batis, kaj mordis, kun la strikta kaj senvorta

atento de buldogoj. Ni rigardis ilin sentime, ĉar ili delonge ne plu povis trovi helpon kontraŭ ni, kaj la areno estis sufiĉe malproksima de la granda ŝoseo por ke neniu povu sin altrudi.

Nu, dum ili iom post iom malplenigis siajn fortojn, mi subite havis la ideon scivoli kio okazis al Marco. Mi ĉirkaŭrigardis; li nenie estis videbla. Ho, ĉi tio estis malbonaŭgura! Mi tiris la manikon de la reĝo, kaj ni forŝteliĝis kaj kuris al la kabano. Neniu Marco tie, neniu Phyllis tie! Ili certe iris al la ŝoseo por trovi helpon. Mi diris al la reĝo ke li donu flugilojn al siaj kalkanoj, kaj mi klarigos poste. Ni iris rapide tra la malfermita tero, kaj kiam ni ĵetis nin en la protekton de la arbaro, mi rigardis malantaŭen kaj vidis aron de ekscititaj kamparanoj amase aperi, kun Marco kaj lia edzino je la pinto. Ili multe bruis, sed tio ne povus lezi iun; la arbaro estis densa, kaj tuj kiam ni estis profunde en ĝi, ni grimpos sur arbon kaj lasos ilin kii. Ho, sed tiam venis alia sono -- hundoj! Jes, tio estis tute alia afero. Tio pligrandigis nian kontrakton – ni devis trovi fluantan akvon.

Ni daŭre iris kun bona rapideco, kaj baldaŭ lasis la sonojn malproksime malantaŭe kaj malkreskintaj al murmuro. Ni venis al rivereto kaj ĵetis nin en ĝin. Ni vadis rapide laŭ ĝi, en la malklara arbara lumo, dum almenaŭ tricent jardoj, kaj poste ni venis al kverko kun granda branĉo,

kiu streĉis sin super la akvo. Ni grimpis sur tiun branĉon, kaj komencis moviĝi sur ĝi al la trunko; nun ni komencis aŭdi tiujn sonojn pli klare; do la homamaso trovis nian spuron. Dum iom da tempo, la sonoj proksimiĝis sufiĉe rapide. Kaj poste, dum certa tempo, ne. Sendube, la hundoj trovis la lokon, kie ni eniris la fluon, kaj nun ili dancis tien kaj reen laŭ la riverbordoj kaj provis denove kapti la flarspuron.

Kiam ni komforte sidis sur la arbo kaj estis bone kaŝataj per la foliaro, la reĝo estis kontenta, sed mi estis suspektema. Mi kredis ke ni povus rampi laŭ unu branĉo kaj veni al alia arbo, kaj mi pensis ke valoris la penon provi. Ni provis, kaj ni sukcesis, kvankam la reĝo glitis, venante al la alia arbo, kaj preskaŭ ne povis transiri. Ni komforte ekloĝis kaj kontentige kaŝis nin inter la folioj, kaj poste ni povis fari nenion krom aŭskulti la ĉason.

Baldaŭ ni aŭdis ke ili venis – kaj venis rapide; jes, kaj laŭ ambaŭ flankoj de la fluo. Pli laŭte... pli laŭte... post minuto, rapide kreskis al bruego de krioj, bojoj kaj tretoj, kaj pasis kiel ciklono.

"Mi timis ke la pendanta branĉo dirus ion al ili," mi diris, "sed mi ne malĝojas ĉar tio ne okazis. Venu, sinjoro, preferinde ni bone uzu nian tempon. Ni flankenpasis ilin. Mallumo baldaŭ venos. Se ni povas transiri la fluon kaj bone komenciĝi, kaj pruntepreni kelkajn

ĉevalojn el ies paŝtejo por uzi dum kelkaj horoj, ni estos sufiĉe sekujraj."

Ni komencis subeniri, kaj venis preskaŭ al la plej malsupra branĉo, kiam ŝajnis ke ni aŭdis la ĉason reveni. Ni haltis kaj aŭskultis.

"Jes," mi diris, "ili estas konfuzitaj, ili rezignis, nun ili iras hejmen. Ni denove suprengrimpu kaj lasu ilin pasi."

Do ni regrimpis. La reĝo aŭskultis dum momento, kaj diris:

"Ili ankoraŭ serĉas – mi vidas la signon. Ni preferinde restu."

Li pravis. Li sciis pli pri ĉasado ol mi. La bruoj proksimiĝis iom post iom, ne subite. La reĝo diris:

"Ili pensas ke ni ne komenciĝis tre longe antaŭ ili, kaj ĉar ni piediras, ni ankaŭ nun ne estas tre malproksime de la loko kie ni prenis la akvon."

"Jes, sinjoro, tiel estas, mi timas, kvankam mi esperis pri io pli bona."

La bruoj venis pli kaj pli proksime, kaj baldaŭ, la veturilo pasis sub ni, je ambaŭ flankoj de la akvo. Voĉo el la mala bordo ordonis halti, kaj diris:

"Se ili volus, ili povus iri al tiu arbo per ĉi tiu pendanta branĉo, kaj tamen ne tuŝi la teron. Vi farus bone se vi lasus iun supreniri."

"Jes, tiel ni faru!"

Mi devis admiri mian propran inteligenton kiam mi antaŭvidis ĝuste ĉi tion, kaj ŝanĝis arbon por solvi la problemon. Sed, vi ja scias, kelkaj aferoj tamen pli pezas ol inteligento kaj antaŭvidado! Mallerto kaj stulteco, ekzemple. La plej bona glavuzanto en la mondo ne devas timi la due plej bonan glavuzanton en la mondo; ne, kion li devas timi estas iu nenionscianta kontraŭulo kiu neniam antaŭe havis glavon en sia mano; li ne faras tion kion li devus fari, kaj do la eksperto ne estas preparita; li faras tion kion li ne devus fari, kaj ofte tio surprizas la eksperton kaj finas lin surloke. Nu, kiel povus mi, kun ĉiuj miaj talentoj, fari iun valoran antaŭpreparon al miopa, straba, stulta klaŭno kiu provis trafi la malĝustan arbon, kaj tamen trafis la ĝustan? Kaj ĝuste tion li faris. Li iris al la malĝusta arbo, kiu estis, kompreneble, la ĝusta pro eraro, kaj komencis grimpi.

Nun la situacio estis serioza. Ni restis senmovaj, kaj atendis kio okazos. La kamparano per granda fortostreĉo grimpis. La reĝo ekstaris; li pretigis kruron, kaj kiam la kapo de la venanto estis sufiĉe proksima li frapis, kaj la ulo falis baraktante al la tero. Desube venis granda krio de kolero, kaj la homamaso venis kurante el ĉiuj direktoj, kaj tie ni sidis, malliberuloj. Alia ulo komencis grimpi; la pontobranĉo estis trovata, kaj libervolulo komencis grimpi la arbon kiu

portis la ponton. La reĝo ordonis al mi ludi Horacion kaj defendi la ponton. Dum certa tempo la malamiko venis multnombro kaj rapide; sed ne gravis, la unua ulo en ĉiu procesio ĉiam ricevis frapon kiu faligis lin, tuj kiam li estis atingebla. La animo de la reĝo vigliĝis, lia ĝojo estis senlima. Li diris ke se okazos nenio kio malbeligos la vidaĵon, ni havos belan nokton, ĉar per ĉi tiu taktiko, ni povos defendi la arbon kontraŭ la tuta kamparo.

Tamen, la homamaso baldaŭ faris la saman konkludon; do ĝi nuligis la atakon, kaj komencis diskuti aliajn planojn. Ili ne havis armilojn; sed estis tie sufiĉe da ŝtonoj, kaj ŝtonoj povus respondi. Ni ne kontraŭis. Ŝtono eble povus atingi nin fojfoje, sed plej verŝajne ne; ni estis bone protektataj de branĉoj kaj folioj, kaj ni ne estis videblaj el iu bona pafloko. Se ili malŝparos duonan horon ĵetante ŝtonojn, la mallumo venos al nia helpo. Ni sentis nin tre kontentaj. Ni povis rideti; preskaŭ ridi.

Sed tion ni ne faris; kaj same bone, ĉar ni estus interrompataj. Antaŭ ol la ŝtonoj flugis tra la folioj, kaj resaltis el la branĉoj, dum dek kvin minutoj, ni komencis noti odoron. Post nur kelkaj flaroj, ni trovis la kialon: estis fumo! Ni finfine perdis la ludon. Ni komprenis tion. Kiam fumo invitas vin, vi devas veni. Ili pligrandigis sian stakon de sekaj branĉoj kaj malsekaj herboj, kaj

denove prigrandigis ĝin, kaj kiam ili vidis la pezan nubon eklevi sin kaj sufoki la arbon, ili ekkriis pro ĝojo. Mi povis spiri sufiĉe por diri:

"Pluiru, sinjoro; mi ĝentile venos poste."

La reĝo anhelis:

"Sekvu min suben, kaj poste apogu vin al unu flanko de la trunko, kaj lasu la alian al mi. Poste ni batalos. Kaj ĉiu stakigu la kadavrojn laŭ sia propra gusto."

Poste li subeniris, bojante kaj tusante, kaj mi sekvis lin. Mi alteriĝis momenton post li; ni saltis al niaj elektitaj lokoj, kaj komencis doni kaj ricevi tutforte. La batalbruo estis enorma; estis ŝtormo de konfuzo kaj batalo kaj dense trafantaj blovoj. Subite, kelkaj rajdantoj venis en la mezon de la homamaso, kaj voĉo kriis:

"Haltu – aŭ vi estas mortaj!"

Kiel bone sonis! La posedanto de tiu voĉo tute ŝajnis ĝentilhomo: pitoreskaj kaj multekostaj vestaĵoj, aspekto de ordonanto, malmola mieno, markita de ĝuado. La homamaso foriris, kiel aro de hundetoj. La ĝentilhomo inspektis nin kritike. Poste li diris akre al la kamparanoj:

"Kion vi faras al ĉi tiuj homoj?"

"Ili estas frenezuloj, respektinda sinjoro, kiuj venis vagante de ni ne scias kie, kaj..."

"Vi ne scias de kie? Ĉu vi asertas ke vi ne konas ilin?"

"Tre respektinda sinjoro, ni nur diras la veron. Ili estas fremduloj kaj nekonataj al ĉiuj en ĉi tiu regiono; kaj ili estas la plej perfortemaj kaj sangsoifantaj frenezuloj kiuj iam..."

"Pacon! Vi ne scias kion vi diras. Ili ne estas frenezaj. Kiuj vi estas? Kaj de kie vi venas? Klarigu."

"Ni estas nur pacemaj fremduloj, sinjoro," mi diris, "kaj vojaĝas pro propraj interesoj. Ni venas el malproksima lando, kaj ni ne estas konataj ĉi tie. Ni ne intencas ion malbonan; kaj tamen, se vi ne venus kaj protektus nin, ĉi tiuj homoj mortigus nin. Kiel vi divenis, sinjoro, ni ne estas frenezaj; nek perfortemaj kaj sangsoifaj."

La ĝentilhomo turnis sin al siaj sekvantoj kaj diris trankvile:

"Forĉasu tiujn bestojn al iliaj hundoj!"

La homamaso tuj malaperis; kaj post ili kuris la rajdantoj, vipante ĉirkaŭ si kaj senkompate lasante siajn ĉevalojn treti tiujn, kiuj senpripense sekvis la ŝoseon anstataŭ salti en la arbustojn. La kriojn kaj petojn iom post iom formortis malproksime, kaj baldaŭ la rajdantoj komencis reveni. Dumtempe, la ĝentilhomo demandis nin pli detale, sed ne trovis apartaĵojn en ni. Ni malavare agnoskis la servon kiun li donis al ni, sed ni malkaŝis nur ke ni estis senamikaj fremduloj el malproksima lando. Kiam la tuta

eskorto revenis, la ĝentilhomo diris al unu el siaj servistoj:

"Venigu la manĉevalojn kaj sidigu ĉi tiujn homojn."

"Jes, sinjoro."

Ni estis lokigitaj malantaŭe, kun la servistoj. Ni vojaĝis sufiĉe rapide, kaj finfine haltis iom post la mallumiĝo ĉe apudvoja gastigejo ĉirkaŭ dek aŭ dek du mejlojn for de la loko de niaj problemoj. Mia sinjoro tuj iris al sia ĉambro, mendinte sian vespermanĝon, kaj ni ne vidis pli de li. Je la matenkrepusko ni matenmanĝis, kaj pretigis nian foriron.

La ĉefservanto de mia sinjoro tiam venis, kun senzorga gracio, kaj diris:

"Vi diris ke vi pluiros laŭ ĉi tiu vojo, kiu estas ankaŭ nia direkto; tial mia sinjoro, Jarlo Grip, ordonis ke vi daŭre havos la ĉevalon kaj rajdos, kaj ke kelkaj el ni rajdos kun vi dudek mejlojn al bela urbo, kiu nomiĝas Kambeneto, kie vi estos ekster danĝero."

Ni povis nur danki kaj akcepti la oferton. Ni daŭre iris, ses en la aro, modere kaj komforte rapide, kaj interparolante, ni eksciis ke mia sinjoro Grip estis tre granda homo en sia propra regiono, kiu situis unutagan vojaĝon aliflanke de Kambeneto. Ni prokrastis tiom, ke estis proksime al la mezo de la antaŭtagmezo, kiam ni eniris la vendoplacon de la urbo. Ni elĉevaliĝis, kaj

denove dankis mian sinjoron, kaj post tio, ni proksimiĝis al homamaso kiu kuniĝis je la centro de la placo, por vidi kio povus esti la objekto de la intereso. Estis la restaĵo de tiu malnova, vaganta aro de sklavoj! Do ili trenis siajn ĉenojn, dum tiu tuta, laca tempo. Tiu kompantinda edzo malaperis, kaj same multaj aliaj; kaj kelkaj novaĉetitoj aliĝis al la aro. La reĝo ne interesiĝis, kaj volis pluiri, sed mi estis absorbita, kaj plena de kompato. Mi ne povis ne plu rigardi tiujn eluzitajn kaj forĵetitajn restaĵojn de homeco. Tie ili sidis, arigitaj sur la tero, silente, senplende, kun klinitaj kapoj, patosa vidaĵo. Kaj kiel timiga kontrasto, granda oratoro turnis sin al alia aro malpli ol tridek paŝojn for, laŭte laŭdante "niajn glorajn britajn liberecojn"!

Mi bolis, mi forgesis ke mi estis plebano. Mi memoris ke mi estis homo. Kiom ajn kostos, mi supreniros al tiu podio kaj...

Klak! La reĝo kaj mi estis kune mankatentitaj! Niaj kunvojaĝantoj, tiuj servistoj, faris tion; mia sinjoro Grip rigardis. La reĝo furioze ekblekis, kaj diris:

"Kion signifas ĉi tiu malbonorda ŝerco?"

Mia sinjoro nur diris al sia ĉeffripono, trankvile:

"Aranĝu la sklavojn kaj vendu ilin!"

Sklavoj! La vorto havis novan sonon – kaj kiel neeldireble teruran! La reĝo levis siajn katenojn

kaj batis ilin suben kun timiga forto; sed mia sinjoro ne estis en la loko kien ili venis. Dekduo de la servistoj de la fripono alkuris, kaj post momento ni estis senhelpaj, kun niaj manoj ligitaj surdorse. Ni tiel laŭte kaj sincere proklamis nin liberuloj, ke ni ricevis la interesplenan atenton de tiu liberecparolanta oratoro kaj lia patriota aŭskultantaro, kaj ili kuniris ĉirkaŭ ni kun tre decidema sinteno. La oratoro diris:

"Se fakte vi estas liberuloj, vi devas timi nenion – la de Dio donitaj liberecoj de Britio estas por vi, via ŝildo kaj protekto! [Aplaŭdo.] Vi baldaŭ vidos. Prezentu viajn pruvojn..."

"Kiujn pruvojn?"

"Pruvojn ke vi estas liberuloj."

Ho – mi memoris! Mi vekiĝis; mi diris nenion. Sed la reĝo daŭre bruis:

"Vi ja estas freneza. Estus pli racie, kaj pli saĝe, ke ĉi tiu ŝtelisto kaj fripono ĉi tie pruvu ke ni *ne* estas liberuloj."

Vi sciu, li konis siajn proprajn leĝojn same kiel aliaj tiel ofte konas la leĝojn: laŭ vortoj, ne laŭ efikoj. Ili prenas *efikon*, kaj iĝas tre energiaj, kiam ili volas apliki ilin al si mem.

Ĉiuj uloj skuis la kapojn kaj aspektis seniluziigitaj; kelkaj forturnis sin, sen plia intereso. La oratoro diris – kaj nun li sonis afereca, ne sentema:

"Se vi ne konas la leĝojn de via lando, urĝas ke vi lernas ilin. Vi estas fremduloj al ni; vi ne povas nei tion. Eble vi estas liberuloj, ni ne neas tion; sed eble, aliflanke, vi estas sklavoj. La leĝo estas klara: ne la postulanto devas pruvi ke vi estas sklavoj, ja vi devas pruvi ke vi *ne* estas."

Mi diris:

"Kara sinjoro, nur donu al ni tempon sendi mesaĝon al Astolato, aŭ donu al ni nur tempon sendi mesaĝon al la Valo de Sankteco..."

"Pacon, mia bona homo, tio estas eksterordinaraj petoj, kaj vi ne povas esperi ke oni plenumos ilin. Postulus multe da tempo, kaj nedefendeble ĝenus vian mastron..."

"*Mastron*, idioto!" kriis la reĝo. "Mi ne havas mastron; mi mem estas m..."

"Silenton, diable!"

Mi eldiris la vorton ĝustatempe por silentigi la reĝon. Ni jam havis sufiĉe da problemoj; ne helpus nin se tiuj homoj ekkredus ke ni estis frenezaj.

Ne helpas priskribi ĉiujn detalojn. La jarlo starigis nin kaj vendis nin aŭkcie. La sama infera leĝo ekzistis en la Sudo en mia propra tempo, pli ol mil tricent jarojn poste, kaj sub ĝi, centoj da liberuloj, kiuj ne povis pruvi ke ili estis liberuloj, estis vendataj al dumviva sklaveco, kaj mi ne aparte pensis pri tio; sed en la sama minuto, kiam la leĝo kaj la aŭkciejo eniris mian propran

sperton, kio antaŭe estis nur maldeca, tio subite iĝis infera. Nu, tiaj ni estas.

Jes, ni estis vendataj aŭkcie, kiel porkoj. En granda urbo kaj aktiva merkato, ni devus porti bonan prezon; sed ĉi tiu loko estis tute senviva, kaj do oni vendis nin por sumo pro kiu mi hontas, ĉiun fojon kiam mi pensas pri ĝi. La reĝo de Anglio enkasigis sep dolarojn, kaj lia ĉefministro naŭ; dum la reĝo fakte valoris pli ol dek du dolarojn, kaj mi dek kvin. Sed tiel ĉiam estas; se vi puŝas vendon al laca merkato, kaj mi ne zorgas pri kiu varo temas, vi ricevos malbonan prezon, kaj vi povas decidi kiel agi. Se la jarlo estis sufiĉe ruza por...

Tamen, mi ne havas kialon simpatii kun li. Lasu lin iri, provizore; mi notis lian numeron, por tiel diri.

La sklavkomercanto aĉetis nin ambaŭ, kaj ligis nin al sia longa ĉeno, kaj ni estis la plej malantaŭa parto de lia procesio. Li ekmarŝis, kaj forlasis Kambeneton je tagmezo; kaj ŝajnis al mi neklarigeble strange, ke la reĝo de Anglio kaj lia ĉefministro, marŝante katenitaj en sklavaro, povis iri inter ĉiuspecaj nenionfarantaj viroj kaj virinoj, kaj sub fenestroj kie sidis la belaj kaj la ĉarmaj, kaj tamen neniam logi scivoleman rigardon, neniam provoki eĉ unu rimarkon. Ho jes, tio nur montras ke reĝo neniel estas pli dia ol vagabondo, tamen. Li estas nur io malmultekosta

kaj senenhava, kiam vi ne scias ke li estas reĝo.
Sed malkaŝu lian kvaliton, kaj ho! vi tuj perdas la
spiron, kiam vi rigardas lin. Mi supozas ke ni ĉiuj
estas frenezaj. Naskitaj tiel, verŝajne.

35. Bedaŭrinda okazo

Estas mondo de surprizoj. La reĝo cerbumis; tio estis nature. Pri kio li cerbumis? vi povas demandi. Nu, pri sia enorma falo, kompreneble – el la plej alta loko en la mondo al la plej malalta; el la plej glora nivelo en la mondo al la plej malalta; el la plej glora nivelo en la mondo al la plej malluma; el la plej alta voko inter homoj al la plej malalta? Ne, mi ĵuras ke kio plej konfuzis lin, komence, tio estis ne tio, sed la prezo kion oni pagis por li! Li ŝajnis ne povi akcepti ke li valoras nur sep dolarojn. Nu, surprizis min tiom, kiam mi unue eksciis pri tio, ke mi ne povis kredi pri tio; ne ŝajnis nature. Sed tuj, kiam mia mensa rigardo klariĝis, kaj mi vidis pli bone, mi komprenis ke mi eraris; *ja* estis nature. Pro ĉi tiu kialo: reĝo estas io tute artefarita, do la sentoj de reĝo, kiel la impulsoj de aŭtomata pupo, estas same artefaritaj; sed kiel homo, li estas reala, kaj liaj sentoj, kiel homo, estas realaj, ne fantomaj. Estas honto por ordinara homo, se oni taksas lin malpli alte ol faras li mem; kaj la reĝo certe ne estis pli ol ordinara homo, se eĉ tio.

La diablo prenu lin, li lacigis min pri argumentoj ke en io simila al justa merkato oni pagus por li dudek kvin dolarojn, certe – evidente sensencaĵo, kaj esprimo de tre alta tromemfido; mi mem ne valorus tiom. Sed estis tikla tereno

por miaj argumentoj. Fakte, mi devis tutsimple fajfi pri argumentoj kaj anstataŭe paroli diplomate. Mi devis flankenmeti la konsciencon, kaj mensoge agnoski ke oni devus pagi por li dudek kvin dolarojn, dum mi estis tute konscia ke dum ĉiuj eraoj, la mondo neniam vidis reĝon kiu valoris la duonon de tiu sumo, kaj dum la venontaj dek tri jarcentoj, ĝi ne vidus iun kiu valoros la kvaronon. Jes, li iacigis min. Se li komencus paroli pri la rikoltoj, aŭ pri la ĵusa vetero, aŭ pri la politika situacio, aŭ pri hundoj, aŭ katoj, aŭ moralo, aŭ teologio – jes, pri io ajn – mi suspiris, ĉar mi sciis kio venos: li eltiros el tio ripeteton de tiu laciga vendo por sep dolaroj. Kie ajn ni haltis, se estis tie homamaso, li donis al mi rigardon, kiu diris klare:

"Se tiu afero povus esti ripetata nun, kun tiaj homoj, vi vidus alian rezulton."

Nu, kiam li unuafoje estis vendata, sekrete ekscitis min vidi lin iri por sep dolaroj; sed antaŭ ol li finis sian maltrankvilecon kaj ŝvitadon, mi deziris ke oni pagu cent. La afero neniam havis eblecon formorti, ĉar ĉiutage, en iu aŭ alia loko, eblaj aĉetantoj ekzamenis nin, kaj same ofte kiel io alia, ili komentis la reĝon pli-malpli ĉi tiel:

"Jen ulo por du kaj duona dolaroj, kun stilo por tridek. Bedaŭrinde, stilo ne estas vendebla."

Finfine, tiaj rimarkoj havis malbonan rezulton. Nia posedanto estis praktikema homo, kaj li

komprenis ke tiu manko devis esti riparata se iu volos aĉeti la reĝon. Do li eklaboris por forigi la stilon el lia sankta moŝto. Mi povus doni al li kelkajn valorajn konsilojn, sed mi ne faris tion; oni ne libervole donu konsilojn al sklavposedanto, se oni ne volas malhelpi la aferon por kiu oni laboras. Mi trovis ke estis sufiĉe malfacile limigi la stilon de la reĝo al stilo de kamparano, eĉ kiam li estis bonvola kaj fervora lernanto; do, nun limigi la stilon de la reĝo al stilo de sklavo – kaj devige! Nu, tio estis granda tasko. Ne gravas la detaloj – mi povas malpli strebi, se vi nur imagas ilin. Mi nur rimarkos, ke post unu semajno estis sufiĉe da pruvoj ke vipo, klabo kaj pugno bone faris sian laboron; la korpo de la reĝo estis vidaĵo – kaj plorindaĵo; sed lia animo? Ho, ĝi eĉ ne estis vundita. Eĉ tiu stulta idoto de sklavisto povis vidi, ke povas ekzisti io tia kiel sklavo kiu restas viro ĝis li mortas, kies bonoj vi povas frakasi, sed kies vireco ne. Ĉi tiu homo trovis, ke ekde lia unua provo ĝis lia lasta li ne povis igi atingebla de la reĝo, sed la reĝo estis preta salti por li, kaj faris. Do li lasis la reĝon teni sian stila sen malhelpo. La fakto estis ke la reĝo estis multa pri ol reĝo, li estis viro; kaj kiam viro estas viro, vi ne povas forbatu tion el li.

Ni havis malfacilan tempon dum monato, iris tien kaj reen sur la tero, kaj suferis. Kaj kiu anglo

estis plej interesita en la sklavecproblemo tiutempe? Lia moŝto la reĝo! Jes, el la plej indeferentaj, li iĝis la plej interesita. Li iĝis la plej amara malamanto de la institucio, kiun mi iam aŭdis paroli. Kaj tiel mi denove kuragis fari demandon, kaj al kiu mi ricevis tiel akran respondon ke mi ne trovis sage zorgi pli pri la afero. Ĉu li abolos sklavecon?

Lia respondo estis same akra kiel antaŭe, sed estis muziko ĉifoje. Mi neniam aŭdis pli agrablan, kvankam la blasfemado ne estis bona, estinte malbone elpensita, kaj kun la plej fia vorto preskaŭ en la mezo anstataŭ ĉe la fino, kie kompreneble ĝi devus esti.

Mi estis preta kaj volonta iĝi libera; mi ne volis liberiĝi pli frue. Ne, mi ne povas diri tion. Mi volis, sed mi ne estos sufiĉe senespera por fari ekstremajn riskojn, kaj mi ĉiam konsolis la reĝon ne zorgi pri ili. Sed ne – ah – estis alia atmosfero! Libereco valoris iun ajn prezon kiu povus nun esti prenita sur ĝi. Mi faris planon, kaj estis tuj ĉarmita de ĝi. Ĝi postulus tempon, jes, kaj ankaŭ paciencon, multe da ambaŭ. Oni povus intenci pli rapidajn manierojn, kaj same certajn; sed neniun same pitoreska kiel ĉi tiu; neniun kiun povus aspekti tiel drameca. Kaj tiel mi ne intencis rezigni pri ĉi tiu. Povus prokrasti nin dum monatoj, sed ne gravas. Mi faros ion, aŭ frakazos ion.

Fojfoje ni havis aventuron. Unu nokton atingis nin neĝoŝtormo unu mejlon antaŭ la vilaĝo al kiu ni iris. Preskaŭ tuj, ni estis enŝlositaj kvazaŭ en nebulo, ĉar la drivanta neĝo estis tiel dika. Vi ne povis vidi ion ajn, kaj ni baldaŭ estis perditaj. La sklavisto vipis nin senespere, ĉar li vidis ruinon antaŭ si, sed lia vipo nur malbonigis la aferojn, ĉar ili metis nin pli malproksime de la vojo, de verecverŝajno al helpo. Do ni devis halti finfine, kaj sinki en la neĝon kie ni estis. La ŝtormo daŭris ĝis noktomezo, poste ĉesis. Je tiu tempo du el niaj pli malfortaj viroj, kaj tri el niaj virinoj, estis mortaj, kaj aliaj ne povis movi sin kaj estis minacataj de morto. Nia mastro estis preskaŭ ekster si. Li instigis la vivantojn, kaj lasis nin stari, salti, bati nin, por rehavi nian cirkuladon, kaj li helpis kiel li povis kun sia vipo.

Nun venis distro. Ni aŭdis kriojn, kaj baldaŭ virino venis kuranta kaj krianta; kaj kiam ŝi vidis nian grupon, ŝi ĵetis sin en nian mezon kaj petis pri protekto. Homamaso venis post ŝi, kelkaj kun torĉoj, kaj ili diris ke ŝi estis sorcistino kiu igis multajn bovinojn morti pro stranga malsano, kaj ke ŝi praktikis sian arton kun la helpo de diablo en la formo de nigra kato. Tio mizera virino estis ŝtonigita ĝis ŝi apenaŭ aspektis homa, ŝi estis tiel batita kaj sangoplena. La homamaso volis bruligi ŝin.

Nu, kion vi do supozas ke nia mastro faris? Kiam ni kolektiĝis ĉirkaŭ la kompatinda estaĵo por protekti ŝin, li vidis sian ŝancon. Li diris: Bruligu ŝin ĉi tie, aŭ ili tute ne havu ŝin. Imagination! Ili estis volantaj. Ili ligis ŝin al paliso; ili portis lignon kaj stakis ĝin ĉirkaŭ ŝin; ili metis la torĉon al ŝi dum ŝi kriis kaj petis kaj premis siajn du junajn filinojn al ŝiaj brustoj; kaj nia bruto, kun koro nur por negocoj, vipis nin en pozicion ĉirkaŭ la paliso kaj varmigis nin en vivon kaj komercan valoron per la sama fajro kiu prenis la senkulpan vivon de tiu kompatinda, neniun minacanta patrino. Tio estas la speco de mastro kiun ni havis. Mi notis *lian* numeron. Tiu neĝoŝtormo kostis al li naŭ el sia aro; kaj li estis pli brutala al ni ol iam, por multaj tagoj kune; li estis tiel freneza pri lia perdo.

Ni havis aventurojn dum la tuta vojo. Unu tagon, ni koliziis kun procesio. Kaj kia procesio! Ŝajnis ke la tuta popolaĉo de la regno estis inkluzivita, kaj ĉiuj drinkemuloj. En la pinto estis malfermita ĉaro kun ĉerko en ĝi, kaj sur la ĉerko sidis juna, bela knabino, ĉirkaŭ dek ok-jara, donante lakton al fileto, kiun ŝi premis al sia brusto en pasia amo de tempo al tempo, kaj de tempo al tempo ŝi forviŝis de ĝia vizaĝo la larmojn kiuj venis al ŝiaj okuloj; kaj ĉiam la eta frenezulo ridetis al ŝi, feliĉa kaj kontenta,

premanta sian bruston per sia grasa mano, kiun ŝi ĉiam frapetis super sia eksplodanta koro.

Viroj kaj virinoj, knaboj kaj knabinoj, tretis apud aŭ post la ĉerko, kaj kriis profanajn rimarkojn, kantis partojn el malbela kanto, ĵetis sin, dancis – vera celebros de kanajloj, vomiga vidaĵo. Ni venis al antaŭurbo de Londono, ekster la muroj, kaj tio estas parto de iu londona societo. Nia mastro sekuris bonan lokon al ni proksime al la pendumilo. Pastro atendis, kaj li helpis la knabinon elgrimpi, kaj diris komfortantajn vortojn al ŝi, kaj faris la vicŝerifon doni al ŝi seĝon. Poste li staris tie apud ŝi ĉe la pendumilo, kaj por momento li rigardis suben al la amaso de vizaĝoj turnitaj supren ĉe liaj piedoj, poste al la solida pavimento de kapoj kiuj streĉis sin al ĉiuj flankoj, okupantaj malplenajn lokojn malproksime kaj proksime, kaj poste komencis diri la rakonton pri la kazo. Kaj estis kompato en lia voĉo – kiel malofte oni aŭdis tiun sonon en tiu nescianta kaj sovaĝa lando! Mi memoras ĉiun detalon kion li diris, krom la vortoj per kiuj li diris tion; tial mi ŝanĝas tion al miaj propraj vortoj.

"La leĝo estas tie por fari la justicon. Foje, ĝi malsukcesas. Tio ne estas helpebla. Ni povas nur funebri, kaj rezigni, kaj deziri ke liaj kunuloj estu malmultaj. Leĝo sendas ĉi tiun mizeran junulinon al la morto – kaj estas juste. Sed alia

loko metis ŝin tie, kie ŝi devis fari sian krimon aŭ malsati kun sia knabino – kaj al Dio, tiu leĝo estas respondeca kaj al ŝia krimo, kaj por ŝia senhonora morto!

Antaŭ iom da tempo ĉi tiu junulino, ĉi tiu dek ok-jara infano, estis same feliĉa edzino kaj patrino kiel iu ajn en Anglio; kaj siaj lipoj estis ĝojaj pro kanto, kio estas la denaska lingvo de gajaj kaj senkulpaj koroj. Ŝia ĝoja edzo estis same feliĉa kiel ŝi; ĉar li faris sian plenan devon, li laboris malfrue kaj frue ĉe sia manlaboro, lia pano esti honesta pano kaj bone gajnita, li prosperis, li donis loĝejon kaj mangon al sia familio, li donis sian obolon al la riĉeco de la nacio. Per konsento de perfida leĝo, tuja detruo falis sur lia sankta domo kaj forviŝis ĉion. Tiu juna edzo estis kidnapita, kaj sendita al la maro. La edzino sciis nenion pri tio. Ŝi serĉis lin ĉie, ŝi movis la plej malmolajn korojn per la petoj de ŝiaj larmoj, la rompita retoriko de ŝia senespero. Semajnoj malrapide pasis, dum ŝi rigardis, atendis, esperis, dum ŝia animo malrapide frakasiĝis sub la pezo de ŝia mizero. Iom post iom, ŝia tuta havaĵo iris al manĝo. Kiam ŝi ne plu povis pagi sian renton, ili ĵetis sin el la pordo. Ŝi almozpetis, dum ŝi havis fortojn; dum ŝi malsatis finfine, kaj ŝia lakto ekmankis, ŝi ŝtelis pecon de tola ŝtofo je la valoro de kvarona penco, pensante ke ŝi vendos ĝin kaj savos sian bebon. Sed ŝi estis

vidata de la posedanto de la ŝtofo. Ŝi estis enkarcerigita, kaj metita antaŭ juĝistoj. La viro atestis pri la faktoj. Peto estis farita por ŝi, kaj ŝia mizera historio estis rakontata por ŝi. Ankaŭ ŝi parolis, permesite, kaj diris ke ŝi ja ŝtelis la ŝtofon, sed ke ŝia animo estis tiel perturbata lastatempe de problemoj kaj ĉiam supersŭtata de malsato ke ĉiuj agoj, krimaj kaj aliaj, naĝis sensignifaj tra ŝia cerbo kaj ŝi fakte sciis nenion, krom ke ŝi estis *tiel* malsata! Dum momento ĉiuj estis tuŝitaj, kaj estis sinteno trakti ŝin ĝentile, ĉar ŝi estis tiel juna kaj senamika, kaj ŝia kazo tiel kompatinda, kaj la leĝo kiu prirabis ŝian manĝon unue kulpebla, ĉar ĝi estis la unua kaj nura kialo de ŝia ŝtelo; sed la prokuroro respondis ke kvankam ĉiuj tiuj aferoj estis veraj, jes kaj kompatvekaj, tamen estis multe da malmultŝtelado tiutage, kaj mislokita graco ĉi tie estis danĝero al posedo – ho mia Dio, ĉu ne estas posedo en detruitaj hejmoj, kaj sengepatraj beboj, kaj rompitaĵoj koroj, sanktaj laŭ britaj leĝoj! – kaj tial li devas postuli sentencon.

Kiam juĝisto surmetis sian nigran ĉapon, la posedanto de la ŝtelita tolo leviĝis tremante, kun la lipoj malfermaj, lia vizaĝo griza kiel cindro; kaj kiam venis la teruraj vortoj, li ekriis: 'Ho kompatinda infano, kompatinda infano, mi ne sciis ke temis pri morto!' Kaj li falis kiel falas arbo. Kiam oni levis lin, lia rezonado estis for; antaŭ la sunsubeniro, li prenis sian vivon. Ĝentila

homo; homo kies koro estis prava, fine; aldoni lian murdon al la ĉi tie plenumota; kaj metu la kulpon de ambaŭ kie ili estas hejme – ĉe la regantoj kaj la amaraj leĝoj de Britio. Estas tempo, mia infano; lasu min preĝi super vi -- ne por vi, kara misuzita kara koro kaj senkulpa, sed por tiuj kiuj estas kulpaj al viaj ruino kaj morto, kiuj bezonas ĝin pli."

Post lia preĝo, ili metis la ŝnuron ĉirkaŭ la kolon de la juna knabino, kaj ili havis grandajn problemojn aranĝi la nodon sub ŝia orelo, ĉar ŝi voris la bebon la tutan tempon, sovaĝe kisis ĝin, kaj premis ĝin al siaj vizaĝo kaj brusto, kaj dronis ĝin per larmoj, kaj duone plendis, duone kriis la tutan tempon, kaj la bebo balbutis, kaj ridis, kaj ĝoje piedfrapis pro kio ĝi interpretis kiel ludado. Eĉ la ekzekutisto ne eltenis tion, sed forturnis sin. Kiam ĉio estis preta, la pastro ĝentile tiris kaj devigis la infanon forlasi la brakojn de sia patrino, kaj iris rapide kien ŝi ne povis atingi lin; sed ŝi interligis siajn manojn, kaj faris sovaĝan salton al li, kun krio, sed la ŝnurego – kaj la vicŝerifo – retenis ŝin. Tiam ŝi iris surgenu kaj elstrecis siajn manojn kaj kriis:

"Unu plia kiso – ho mia Dio, unu plia, unu plia -- estas la mortanta kiu petegas tion!"

Ŝi ricevis tion; ŝi preskaŭ sufokis la etulon. Kaj kiam ili forigis ĝin denove, ŝi elkriis:

"Ho, mia infano, mia amato, ĝi mortos! Ĝi ne havas hejmon, ĝi ne havas patron, ne amikon, ne patrinon..."

"Ĝi havas ĉiujn!" diris la bona pastro. "Mi estos ĉiuj tri ĝis mi mortos."

Vi devis vidi ŝian vizaĝon tiam! Dankemon? Kion vi volas per vortoj por esprimi tion? Vortoj estas nur pentrita fajro; la rigardo estas la fajro mem. Ŝi donis tiun rigardon, kaj portis ĝin al la trezorejo de la ĉielo, kie ĉiuj aferoj diaj estas hejme.

36. Renkonto en la mallumo

Londono – por sklavo – estis loko sufiĉe interesa. Ĝi estis nur granda vilaĝo; kaj ĉefe argilo kaj pajlo. La stratoj estis ŝlimaj, kurbaj, maltegitaj. La popolaĉo estis ĉiam svarmantaj ĉifonoj, kaj pompo, kaj salutantaj plumoj kaj brilanta armaĵo. La reĝo havis palacon tie; li vidis ĝian eksterajon. Li sospiris por tio; jes, kaj blasfemis iom, en malbona, juneca maniero de la sesa jarcento. Ni vidis kavalirojn kaj grandulojn kiun ni konis, sed ili ne konis nin en niaj ĉifonoj kaj malpuron kaj freŝaj vundoj, kaj ne rekonis nin se ni salutis ilin, nek haltus por respondi, ĉar estis kontraŭleĝe paroli kun sklavoj en ĉenoj. Alisande pasis malpli ol dek jardojn de mi sur mulo – ĉasante min, mi imagis. Sed kio vere frakasis mian koron estis io kio okazis antaŭ nia malnova barako en kvarangula placo, dum ni vidis viron estante boligita ĝismorte en oleo por false fari pensojn. Estis la vido de novaĵulo – kaj mi ne povis atingi lin! Tamen, mi havis unu komforton: jen pruvo ke Clarence ankoraŭ estis viva kaj aktiva. Mi intencis esti kun li antaŭ nelonge; la penso estis plena de ĝojo.

Mi havis unu etan videton de alia afero, unu tagon, kiu estis por mi granda levo. Estis fadeno de unu doma tegmento al alia. Telegrafo aŭ telefono, certe. Mi tre deziris ke mi havis etan

parton de ĝi. Estis ĝuste kion mi necesis, por realigi mian eskapoprojekton. Mia ideo estis iĝi loza iun vesperon, kune kun la reĝo, poste ligi kaj buŝfermi nian majstron, ŝanĝu vestaĵon kun li, bati lin ĝis li aspektas kiel fremdulo, ligi lin al la sklav-ĉeno, preni posedon de la posedaĵo, marŝi al Kameloto, kaj...

Sed vi kaptas mian ideon; vi vidas kiun dramon surprizon mi faros en la palaco. Ĉio estis fareble, se nur mi povus havigi al mi etan pecon de fero, per kiu mi povus malfermi ŝloson. Mi poste povis malfermi la pendŝlosojn de niaj ĉenoj, kiam ajn mi elektis. Sed mi neniam havis bonŝancon; neniu tia afero iam falis en mian vojon. Tamen, mia ŝanco iam venis. Ĝentilhomo, kiu venis du fojojn por negoci pri mi, sen sukceso, aŭ vere io simila al sukceso, venis denove. Mi vere ne atendis iam aparteni al li, ĉar la prezo demandita por mi ekde mia unua sklaviĝo estis enorma, kaj ĉiam provokis aŭ koleron aŭ mokon, tamen mia majstro insistis pri ĝi – dudek du dolaroj. Li ne subeniris eĉ unu pencon. La reĝo estis tre admirata, pro lia bona fiziko, sed lia reĝa stilo estis kontraŭ li, kaj li ne estis vendebla; neniu volis tian sklavon. Mi konsideris min certa ne devi parti de li, pro mia enorma prezo. Mi ne pensis ke mi iam apartenos al tiu ĝentilhomo, pri kiu ni parolis, sed mi havis ion kion mi suspektis iam apartenos al mi, se li nur vizitos nin sufiĉe

ofte. Ĝi estis el ŝtalo kun longa stangeto ligita al ĝi, kun kiu lia longa ŝtofo ekster la vestajhoj estis ligita fronte. Estis tri el ili. Li seniluziigis min dufoje, ĉar li ne venis sufiĉe proksime al mi por igi mian projekton tute sekura; sed ĉifoje mi sukcesis: mi kaptis la plej malaltan el la tri, kaj kiam li malhavis ĝin, li kredis ke li perdis ĝin survoje.

Mi havis la ŝancon esti gaja dum ĉirkaŭ minuto, poste mi denove havis rektan ŝancon esti ĉagrena. Ĉar kiam la aĉeto preskaŭ fiaskis, kiel ĉiam, la majstro subite ekparolis kaj diris kion estus formulata tiel – en la moderna angla:

"Mi diros al vi kion mi faros. Mi estas laca vivteni tiujn du por nenio bona. Donu al mi dudek du dolarojn por ĉi tiu, kaj vi ricevos ankaŭ la alian."

La reĝo ne povis spiri, li tiom furiozis. Li komencis paroli sufokite, kaj dumtempe la mastro kaj la ĝentilhomo foriris diskutante.

"Se vi prenas la oferton malfermita..."

"Ĝi estas malfermita ĝis morgaŭ je ĉi tiu horo."

"Tiam mi repondos al vi tiam," diris la ĝentilhomo, kaj malaperis, la mastro sekvante lin.

Mi bezonis tempon por malvarmigi la reĝon, sed mi sukcesis. Mi flustris en lian oreilon, je tiu efiko:

"Via moŝto *ja* iras por nenio, sed laŭ alia maniero. Kaj mi same. Ĉivespere, ni ambaŭ estos liberaj."

"Ho! Kiel okazos?"

"Kun tiu afero kiun mi ŝtelis, mi malŝlosos tiujn ŝlosojn, kaj forigos ĉi tiujn ĉenojn ĉinokte. Kiam li venos ĉirkaŭ la naŭa kaj tridek por inspekti nin por la nokto, ni kaptos lin, fermos lian buŝon, batos lin, kaj frue matene ni marŝos el la urbo, posedantoj de ĉi tiu procesio de sklavoĵ."

Nur tiom mi iris, sed la reĝo estis ĉarmita kaj kontenta. Ĉi tiun vesperon ni atendis pacience ke niaj kunsklavoĵ ekdormu, kaj montru tion per la kutima signo, ĉar vi ne devas fari multajn ŝancojn je tiuj kompatindaj uloj, se vi povas eviti tion. Estas plej bone havi viajn proprajn sekretojn. Sendube ili baraktis nur kiel kutime, sed ne ŝajnis tiel al mi. Al mi ŝajnis ke ili por ĉiam luktis por ilia kutima ronkado. Kiam la tempo iris, mi iĝis serioze timanta ke ni ne ankoraŭ havis sufiĉe da ĝi por niaj propraj bezonoj; do mi faris plurajn tro fruajn provojn, kaj nur prokrastis aferojn per ili; ĉar mi ne ŝajnis povi tuŝi pendlokon, tie en la mallumo, sen eksoni ĝin kaj interrompi ies dormon kaj devigi lin ŝanĝi sian dormpozicion kaj vekigi ion plian en la gango.

Sed finfine mi forigis mian feron, kaj mi estis denove libera. Mi elspiris profunde kaj liberigita, kaj streĉis por la feroj de la reĝo. Tro malfrue!

Enen venas la mastro, kun lumo en unu mano kaj sia peza irstango en la alia. Mi kaŝiris pli proksime al la valo de ronkantoj, por kaŝi tiel bone kiel mi povis ke mi estis nuda de feroj; kaj mi havis bonan rigardon kaj preparis min ĵeti min al la viro en la sama momento, kiam li klinis sin super mi.

Sed li ne venis proksimen. Li haltis, rigardis malĉeestante al nia malklara amaso dum momento, evidente pensante pri io alia; poste malsuprenigis sian lumon, iris pensante al la pordo, kaj antaŭ ol iu povis imagi kion li faros, li estis ekster la pordo kaj ferminta ĝin malantaŭ si.

"Rapide!" diris la reĝo. "Revenigu lin!"

Kompreneble estis la farinda ago, kaj mi estis supre kaj ekstere en momento. Sed mia kara, ne estis lampoj tiutage, kaj estis nigra nokto. Sed mi videtis malklaran figuron kelkajn paŝojn for. Mi kuris al ĝi, ĵetis min super ĝi, kaj poste estis batalo kaj viva! Ni luktis kaj batalis, kaj dum nula tempo kolektis rigardantaron. Ili prenis grandan intereson en la batalo kaj kuraĝigis nin tiom kiel ili povis, kaj fakte ili ne povis esti pli afablaj kaj karaj se estus ilia propra batalo. Poste enorma bruo eksonis malantaŭ ni, kaj eble duono de nia aŭskultantaro forlasis nin, kurege, por investi iun simpation en tio. Lanternoj komencis svingi ĉiudirekten; estis la gardo kuniĝante de malproksime kaj proksime. Baldaŭ halebardo

falis trans mia dorso, kiel memoraĵo, kaj mi sciis kion signifis. Mi estis arestita. Same estis mia oponento. Ni estis marŝita al malliberejo, unu je ĉiu flanko de la gardisto. Jen katastrofo, jen fajna plano irinta al subita detruo! Mi provis imagi kio okazos kiam la mastro trovos ke estis mi kiu batalis kontraŭ li; kaj kio okazos se ili malliberigos nin kune en la ĝenerala ujo por bruistoj kaj malgrandaj leĝorompantoj, kiel estis la kutimo, kaj kio povus...

Ĝuste tiam, mia antagonisto turnis sian vizaĝon en mian direkton, la punktita lumo de la gardisto falis sur ĝi, kaj por Georgo! Estis la malĝusta homo!

37. Terura situacio

Dormo? Estis neeble. Estus nature neeble en tiu brua malliberejo, kun tiel malpura aro de ebriaj, kverelemaj kaj kantantaj mizeruloj. Sed kio eĉ pli faris dormon ion ne prisonĝindan estis mia senpacienco veni ekster ĉi tiu loko kaj trovi la tutan grandecon de kio eble okazis tie en la sklavejo sekve de mia netolerebla mispaŝo.

Estis longa nokto, sed finfine estis mateno. Mi faris plenan kaj honestan klarigon al la kortumo. Mi diris ke mi estis sklavo, posedaĵo de la granda Jarlo Grip, kiu venis ĝuste post la sunsubeniro al Tabard Inn en la vilaĝo ĉe la alia flanko de la akvo, kaj restis tie dumnokte, devige, ĉar li estis mortige malsana, strange kaj subite. Mi ricevis ordonon haste iri al la urbo, kaj preni la plej bonan kuraciston; mi faris mian plej bonan; nature mi kuris tiel rapide kiel mi povis; la nokto estis nigra, mi kure koliziis kun tiu ordinara homo ĉi tie, kiu prenis min ĉe la kolo kaj komencis bati min, kvankam mi diris al li mian taskon, kaj petis al li, pro la mortiga danĝero de mia mastro, la granda jarlo...

La ordinara homo interrompis kaj diris ke tio estis mensogo; kaj intencis klarigi kiel mi kuris al li kaj atakis lin sen vorto...

"Silenton, mi petas!" venis de la kortumo. "Prenu lin de ĉi tie, kaj donu al li kelkajn batojn

por lerni al li treti la servanton de nobla homo alimaniere je alia okozo. Venu!"

Poste la kortumo demandis de mi pardonon, kaj esperis ke mi ne diros al mia mastro ke estis neniel la kulpo de la kortumo ke okazis tiu surpriza ago. Mi diris ke mi aranĝos ĉion, kaj tiel mi adiaŭis. Kaj faris tion ekzakte ĝustatempe; li komencis demandi al mi kial mi ne kontrolis la faktojn en la momento kiam mi estis arestita. Mi diris ke mi farus tion se mi pensus pri ĝi – kio estis vere – sed ke mi estis tiel batita de tiu homo ke ĉiu inteligento estis forbatita de mi – kaj tiel plu kaj tiel plu, kaj foriris, ankoraŭ murmuranta.

Mi ne atendis matenmanĝon. Neniu herbo kreskis sub miaj piedoj. Mi estis baldaŭ en la sklavujo. Malplena – ĉiuj for! Tio estis, ĉiuj krom unu – la sklavisto. Li kuŝis tie tute disbatita; kaj ĉirkaŭ li estis la signoj de terura batalo. Estis ĉerko de krudaj tabeloj en vagono proksime al la pordo, kaj laboristoj, asistitaj de la polico, estis malfermintaj vojon tra la maldensanta homamaso por ke oni povu enigi ĝin.

Mi vidis homon, sufiĉe modestan por ke li malsuprenigi sufiĉe por paroli kun viro tiel malpura kiel mi, kaj ricevis lian rakonton pri kio okazis.

"Estis dek ses sklavoj ĉi tie. Ili atakis sian mastron nokte, kaj vi vidas kiel finis."

"Jes. Kiel komencis?"

"Estis neniuj atestantoj krom la sklavoj. Ili diris ke la plej valora sklavo iĝis libera de siaj bondoj, kaj eskapis per iu stranga maniero – per magia arto, oni kredis, ĉar li ne havis ŝlosilon, kaj la ŝlosoj estis nek rompitaĵoj nek alimaniere detruitaj. Kiam la mastro vidis sian perdon, li estis freneza de senespero, kaj ĵetis sin kun sia dika stango super la homoj, kiuj rezistis kaj rompis lian dorson kaj en aliaj kaj malsamaj manieroj donis al li vundojn, kiuj rapide portis lin al la fino."

"Estas terure. Estos gravaj aferoj al la sklavoj, sendube, ĉe la proceso."

"La proceso estas finita."

"Finita!"

"Ĉiu okazis dum semajno, vi kredas – kaj la afero tiel simpla? Ili ne pasigis okonan horon je ĝi."

"Sed mi ne komprenas kiel ili povus decidi kiu parto estis kulpa en tiel mallonga tempo."

"*Kiuj?* Fakte, ili ne konsideris tiajn detalojn. Ili kondamnis ilin kolektive. Ĉu vi ne konas la leĝon? – kion viroj diras ke la romianoj lasis post si kiam ili foriris – ke, se iu sklavo mortigas sian mastron, ĉiuj sklavoj de tiu homo devas morti pro tio."

"Vere. Mi forgesis. Kaj kiam ili mortos?"

"Verŝajne antaŭ dudek kvar horojn, kvankam kelkaj diras ke ili atendas ankoraŭ kelkajn tagojn, se hazarde ili trovas dumtempe la mankanton."

La mankanton! Pro tio mi sentis min malkomforta.

"Ĉu verŝajne ili trovos ilin?"

"Antaŭ la fino de la tago – jes. Ili serĉas lin ĉie. Ili staras ĉe la pordoj de la urbo, kun kelkaj el la sklavoj kiuj trovos lin se li venos, kaj neniu povas pasi sen esti unue ekzamenita."

"Ĉu oni povas vidi la lokon kie la ceteraj estas senliberigitaj?"

"Ĝian eksterajon – jes. Ĝian internajon – sed vi ne volas vidi tion."

Mi prenis la adreson de tiu malliberejo por posta uzo, kaj iris for. Ĉe la unua vendejo de duarangaj vestaĵoj, al kiu mi venis, ĉe malĉefa strato, mi aĉetis malfajnan velkostumon – eble por ordinara maristo, kiu iros al malvarma vojaĝo, kaj libere bandaĝis mian vizaĝon, dirante ke mi havis dentodoloron. Tio kaŝis miajn plej videblajn vundojn. Estis transformo. Mi ne plu similis al mia antaŭa mio. Poste mi iris al tiu fadeno, trovis ĝin kaj sekvis ĝin al ĝia hejmo. Estis malgranda ĉambro super vendejo de buĉisto – kio signifis ke la aferado ne estis tre vigla en la telegrafiado. La respondeca junulo duondormis ĉe sia tablo. Mi fermis la pordon kaj metis la

vastan ŝlosilon ĉe mia brusto. Tio vekis la junulon, kaj li estis faronta bruon, sed mi diris:

"Savu vian spiron! Se vi malfermas vian buŝon, vi estas certe mortinta. Ataku vian instrumenton. Vive, nun! Voku Kameloton."

"Tio surprizas min! Kiel iu, kiel vi, povas scii ion pri aferoj kiel..."

"Voku Kameloton! Mi estas senespera homo. Voku Kameloton, aŭ foriru de la instrumento kaj mi mem faros tion."

"Kion – vi?"

"Jes – certe. Ĉesu babili. Voku la palacon."

Li faris la vokon.

"Kaj nun voku Clarence."

"Clarence *kiu*?"

"Ne gravas Clarence kiu. Diru ke vi deziras Clarence; vi ricevos respondon."

Li faris tiel. Li atentis dum kvin nervstreĉantaj minutoj – dum dek minutoj – kiel longe ŝajnis! – kaj poste venis klako, kiu estis tiel konata al mi kiel homa voĉo; ĉar Clarence estis mia propra lernanto.

"Nun, knabo, foriru! Ili konis mian tuŝon, eble, kaj tial via voko estis plej sekura; sed nun mi estas kiel mi devas."

Li foriris de la loko kaj vigle aŭskultis – sed ne venkis. Mi uzis ĉifron. Mi ne misuzis mian tempon al sociaĵoj kun Clarence, sed iris strikte al aferaĵoj, tiel:

"La reĝo estas ĉi tie kaj en danĝero. Ni estis kaptitaj kaj metitaj ĉi tie kiel sklavoj. Ni ne devus esti eblaj pruvi nian identecon – kaj fakto estas ke mi ne estas en pozicio pruvi. Sendu telegramon el la palaco ĉi tien, kaj lasu ĝin enhavi juĝon."

Lia respondo venis rekte reen:

"Ili scias nenion pri la telegrafo; ili ne ankoraŭ havis sperton, la linio al Londono estas tiel nova. Pli bone ne kuraĝu tion. Eble ili pendumos vin. Pripensu ion alian."

Eble ili pendumos nin! Malmulte li sciis kiel proksima li estis al la faktoj. Mi ne povis pripensi ion momente. Tiam ideo batis min, kaj mi komencis labori laŭ ĝi:

"Sendu kvincent armitajn kavalirojn, kun Lanceloto pinte; kaj sendu ilin tuj. Lasu ilin eniri tra la sudokcidenta pordo, kaj estu singarda pri la homo kun blanka ŝtofo ĉirkaŭ la dekstra brako."

La respondo estis tuja.

"Ili komencos post duona horo."

"Bone, Clarence; nun diru al la ulo ĉi tie ke mi estas amiko via kaj stultulo, kaj li devas esti diskreta kaj diri nenion pri mia vizito."

La instrumento komencis paroli al la junulo, kaj mi forrapidis. Mi komencis ĉifri. Post duona horo, estos la naŭa. Kavaliroj kaj ĉevaloj en peza armaĵo ne povis iri tre rapide. Tiuj iros tiel rapide kiel ili povos, kaj nun kiam la tero estis en bona kondiĉo, kaj neniu neĝo kaj ŝlimo, ili versajne

iros sep mejlojn hore; ili devos ŝanĝi ĉevalojn iom da fojoj; ili venos ĉirkaŭ la sesa, aŭ iom poste; ankoraŭ estos sufiĉe luma, ili vidos la blankan ŝtofon kiun mi fiksis ĉirkaŭ mia dekstra brako, kaj mi prenos la komandon. Ni ĉirkaŭstaros tiun malliberejon kaj eligos la reĝon en nula tempo. Estos sufiĉe teatreske kaj pitoreske, kiam oni pripensos ĉion, kvankam mi preferus la tagmezo, ĉar la tuta afero tiam estus pli teatreska.

Nun, tiam, por plibonigi la kordojn al mia pafilo, mi pensis ke mi serĉos kelkajn el la homoj kiujn mi antaŭe konis, kaj faros min konata. Tio helpas nin el nia malfacila situacio, sen la kavaliroj. Sed mi devas agi singarde, ĉar estis riska afero. Mi devas vestiĝi pompe, kaj ne taŭgus fari tion haste. Ne, mi devis fari tion iom post iom, aĉetante la vestaĵojn iom post iom, en vendejoj tre malproksimaj, kaj ricevante iom pli bonajn artikolojn kun ĉiu ŝanĝo, ĝis mi fine atingos silkon kaj veluron, kaj estu preta por mia projekto. Do mi komencis.

Sed la plano tute fiaskis! Kiam mi unuafoje ĉirkaŭiris angulon, mi iris rekte al unu el niaj sklavoj, kiu ĉirkaŭiris kun gardisto. Mi ektusis, kaj li donis al mi subitan rigardon, kiu mordis min ĝis la medolo. Mi juĝis ke li kredis ke li aŭdis tiun tuson antaŭe. Mi tuj eniris vendejon kaj iris laŭ la magazena tablo, notis la prezojn kaj

vidis tra la okulangulo. Tiuj homoj haltis, kaj parolis unu kun la alia kaj rigardis en la pordon. Mi decidis eliri malantaŭe, se estis iu malantaŭo, kaj mi demandis la vendistinon ĉu mi povus eliri tie kaj serĉi la fuĝintan sklavon, kiun oni kredis kaŝis sin ie tie malantaŭe, kaj diris ke mi estas oficiro kaŝita, kaj ke mia partnero estis tie ĉe la pordo kun iu el la murdistoj, kaj ĉu ŝi volis estis tiel bonvola ke ŝi iru tien kaj diri al li ke li ne devas atendi, sed pli bone iru tuj al la alia fino de la strateto kaj estu preta forigi lin kiam mi ordonis.

Ŝi brilis pro fervoreco vidi unun el tiuj jam famaj murdistoj, kaj ŝi tuj komencis sian taskon. Mi ŝteliris maltantaŭen, ŝlosis la pordon malantaŭ mi, metis la ŝlosilon en mian poŝon kaj ekmarŝis, ridante al mi mem kaj komforta.

Nu, mi detruis ĉion denove, faris alian eraron. Fakte duoblan. Estis multaj manieroj forigi tiun oficiron laŭ iu simpla kaj kredinda aranĝo, sed ne, mi devis elekti iun pitoreskan; tio estas la krianta defekto de mia karaktero. Kaj poste, mi ordonis mian manieron fari kion la oficiro, ĉar li estis homo, *nature* farus; sed kiam vi malplej suspektis tion, iu fojon post fojo faros ĝuste tion kio *ne* estis natura. La natura afero por la oficiro fari, en tiu okazo, estus sekvi tuj post niaj kalkanoj; li trovus stabilan kverkan pordon, sekure ŝlosita, inter si kaj mi; antaŭ ol li povus

forrompi sin, mi estus for kaj engaĝita en eniri en serio da konfuzigaj ŝajnvestaĵoj kiuj baldaŭ iĝus min en ian vestaĵon, kiu estis pli bona protekto kontraŭ leĝhundoj en Britio ol iu kvanto de nur senkulpo kaj pura karaktero. Sed anstataŭ fari la naturan aferon, la oficiro kredis mian vorton, kaj sekvis miajn instrukciojn. Kaj tiel, kiam mi venis el tiu sakstrato, plena de kontento pri mia propra inventemo, li venis trans la angulo kaj mi iris rekte en liajn mankatenojn. Se mi sciis ke estis sakstrato – tamen, nenio ekskuzas eraron kiel tian, lasu ĝin. Estas problemo de profito kaj perdo.

Kompreneble, mi estis indignita, kaj ĵuris ke mi ĵus venis al tero el longa vojaĝo, kaj ĉiuj tiaj aferoj – nur por vidi, vi komprenas, se trompus tiun sklavon. Sed ĝi ne faris. Li konis min. Tiam mi mallaŭdis lin por perfidi min. Li estis pli surprizita ol vundita. Li streĉis lian rigardon, kaj diris:

"Kion, ĉu vi lasus min lasi vin, el ĉiuj homoj, eskapi kaj ne pendi kun ni, kiam vi estas la *kaŭzo* de nia pendo? Mi povus rideti!"

Nu, estis iu bastarda justeco en lia maniero vidi la aferon, kaj tial mi lasis la aferon. Kiam vi ne povas kuraci katastrofon per argumentoj, kiaj argumenti? Ne estas mia metodo. Do mi nur diris:

"Vi ne estos pendumita. Nenio el ni estos."

Ambaŭ viroj ridis, kaj la sklavo diris:

"Vi ne havis la rangon de idioto – antaŭe. Eble vi pli bone defendu vian reputacion, vidante ke la streĉo ne restos longe."

"Mi supozas ke ĝi eltenos. Antaŭ morgaŭ ni estos ekster la malliberejo, kaj cetera liberaj iri kien ni volas."

La rapidpensa oficiro levis sian maldekstran orelon per sia dikfingro, faris gratantan sonon en la gorĝo, kaj diris:

"Ekster la malliberejo – jes – vi parolas la veron. Kaj samtempe liberaj iri kien vi volas, por ke vi ne forlasu la tristan regnon de lia moŝto la Diablo."

Mi konservis mian humoron, kaj diris, indifere:

"Nun mi supozas ke vi vere kredas ke ni pendos post tago aŭ du."

"Mi kredis antaŭ ne tiom da minutoj, ĉar tiel oni decidis kaj proklamis."

"Ho, do vi ŝanĝis vin, ĉu estas tiel?"

"Eĉ se mi farus, mi nur *pensis* tjam. Nun mi _scias_."

Mi sentis min sarkasma, do mi diris:

"Ho, scianta servisto de la leĝo, malsupreniru kaj diru al ni kion vi *scias*."

"Ke vi ĉiuj pendos *nun*, meze de la posttagmezo! Oho, tiu pafotrafis! Klinu vin al mi."

La fakto estis ke mi devis klini min al iu. Miaj kavaliroj ne povis veni ĝustatempe. Ili eble eĉ aperis tri horojn tro malfrue. Nenio en la mondo savus la reĝon de Anglio; eĉ ne mi, kiu estis pli grava. Pli grave, ne nur al mi, sed al la nacio – la sola nacio surtere preta flori al civilizacio. Mi fartis malbone. Mi ne diris pli, ne estis pli por diri. Mi sciis kion volis diri la viro: se la mankanta sklavo estis trovita, la prokrasto estis nuligita, kaj la ekzekuto okazis hodiaŭ. Nu, la mankanta sklavo estis trovita.

38. Sir Lanceloto kaj kavaliroj al helpo

Preskaŭ la kvara posttagmeze. La sceno estis tuj ekster la muroj de Londono. Malvarma, komforta, supera tago, kun brila suno; la speco de tago por ke oni volu vivi, ne morti. La granda nombro estis multa kaj atingis foren; kaj tamen ni dek kvin mizeraj diabloj ne havis tie amikon. Estis ia dolora en tiu penso, kiel ajn vi rigardis ĝin. Tie ni sidis, ĉe nia alta eŝafodo, la bazo de ĉiu malamo kaj moko de ĉiuj tiuj malamikoj. Ni iĝis feria spektaklo. Ili faris specon de alta estrado por la nobelaro kaj nobeletaro, kiuj estis tie plennombraj, kun siaj sinjorinoj. Ni rekonis multajn el ili.

La homamaso ricevis mallongan kaj neatenditan distron el la reĝo. En la momento kiam li estis libera de siaj katenoj li eksaltis, en siaj fantaziaj ĉifonoj, kun vizaĝo nekonebla probatoj, kaj proklamis sin Arturo, reĝo de Britio, kaj la teruran punon por perfido al ĉiuj tie ĉeestantaj, se haro de lia sankta kapo estis tuŝata. Surprizis lin aŭdi ilin ekridegi. Vundis lian dignon, kaj li ŝlois sin en silenton; poste, kvankam la homamaso petis lin daŭre paroli, kaj provis provoki lin per krioj, kiel:

"Lasu lin paroli! La reĝo! La reĝo! Liaj humilaj subuloj malsatas kaj soifas la vortojn de

saĝeco, el la buŝo de lia mastro, la Plej Alta kaj Sankta Ĉifona Moŝto!"

Sed servis al nenio. Li surprenis ĉiun sian moŝton, kaj sidis sub tiun pluvon de malrespekto kaj insulto senmova. Li certe estis granda, siamaniere. Neĉeestante, mi forprenis mian blankan ŝtofon kaj ligis ĝin ĉirkaŭ mia rekta brako. Kiam la homamaso notis tion, ĝi komencis alvoki min. Ili diris:

"Sendube, tiu maristo estas lia ministro – observu lian multekostan oficosignon!"

Mi lasis ilin daŭriĝi ĝis ili estis lacaj, kaj poste mi diris:

"Jes, mi estas lia ministro, la Estro, kaj morgaŭ vi aŭdos tion el la Kameloto, kiu..."

Mi ne venis pli longe. Ili dronigis min en ĝoja moko. Sed baldaŭ estis silento; ĉar la ŝerifoj el Londono, en siaj oficialaj vestaĵoj, kun siaj subuloj, komencis brui en maniero kiu indikis ke la aferoj baldaŭ komencos. En la silento kio sekvis, nia krimo estis recitata, la mortokondamno legata, poste ĉiuj malkovris sin dum pastro legis preĝon.

Post tio, sklavo estis blindigita; la ekzekutisto malstreĉis sian kordon. Tie la blanka vojo estis sub ni, ni ĉe unu flanko de ĝi, la benkita homamaso ĉe la muro de la alia flanko de ĝi – bona, klara vojo, kaj ĉiam senhoma danke al la polico – kiel bone estus vidi miajn kvin cent

ĉevalistojn veni laŭ ĝi! Sed ne, tio ne estis eble. Mi sekvis la malproksimiĝantan fadenon en la foron – ne ĉevalisto sur ĝi, aŭ signo de iu.

Estis tiro, kaj la sklavo pendolis; pendolis kaj malbene svingis, ĉar liaj kruroj ne estis ligitaj.

Alia ŝnuro estis ĵetita, post momento alia sklavo pendolis.

Minuton poste, tria sklavo baraktis en la aero. Estis terure. Mi forturnis mian kapon dum momento, kaj kiam mi denove turnis min reen mi ne vidis la reĝon! Ili blindigis lin! Mi estis paralizita; mi ne povis moviĝi, mi estis sufokata, mia lango estis ŝtonigita. Ili finblindigis lin, ili gvidis lin sub la ŝnuro. Mi ne povis forskui tiun obstinan nepovon. Sed kiam mi vidis ilin meti la ŝnuron ĉirkaŭ lia kolo, tiam ĉio forlasis sian lokon en mi kaj mi faris salton por helpi – kaj dum mi faris ĝin, mi denove rigardis ĉirkaŭ mi – je Georgo, tie ili venis, skuante sin – kvincent kavaliroj en beltoj kaj armaĵoj, sur bicikloj!

La plej grandeca vidaĵo iam vidita. Sinjoro, kiel la plumoj fluis, kiel la suno brilis kaj fulmis el la senfina procesio de teksaĵkovritaj radoj!

Mi svingis mian dekstran manon kiam Lanceloto venis – li konis mian ĉifonon – mi fortiris ŝnuron kaj bandaĝon, kaj kriis:

"Surgenue, ĉiu fripono, kaj salutu la reĝon! Kiu tion ne faras, tiu vespermanĝos en la infero ĉinokte!"

Mi ĉiam uzas tiun altan stilon, kiam mi klimaksas efikon. Nu, estis noble vidi Lanceloton kaj la knabojn svarmi en tiun eŝafodon, kaj ĵeti ŝerifojn kaj similajn transborde. Kaj estis bone vidi tiun surprizitan homamason surgenuiĝi kaj peti siajn vivojn de la reĝo, kiun ili ĵus mokis kaj insultis. Kaj kiam li staris apude tie, kaj ricevis tiun honoron en ĉifonoj, mi pensis al mi mem, nu, vere ja *estas* io aparte granda ĉe la maniero iri kaj meti sin de reĝo, fakte.

Mi estas tre kontenta. Se oni rigardis la tutan situacion, estis unu el la plej grandaj efikoj kiujn mi iam kreis.

Kaj nun sin montras Clarence, proprapersono, kaj palpebrumas, kaj diras, tre moderne:

"Bona surprizo, ĉu ne? Mi sciis ke vi ŝatos tion. Mi lasis la knabojn praktiki tion longe, private; kaj nur malsataj pri ŝanco montru sin."

39. La batalo de la jankio al la kavaliroj

Hejme denove, al Kameloto. Matenon aŭ du poste mi trovis la gazeton, malseka el la premilo, ĉe mia plado de la matenmanĝo. Mi turnis min al la anoncaj kolonoj, ĉar mi sciis ke mi trovos ion persone interesan por mi. Estis tio:

DE PAR LE ROI

Sciu ke la granda sinjoro kaj fama kavaliro, SIR SAGRAMOR LA DEZIREMA, akceptis renkonti la ministron de la reĝo, Hank Morgan, ankaŭ nomata La Estro, por kompensi ofendon antaŭe faritan; tio estos en la kuirejo de Kameloto ĉirkaŭ la kvara horo matene la dek sesan tagon la venontan monaton. La batalo iros al la fino, ĉar la dirita ofendo estis mortiga, kaj ne permesas kompromison.

DE PAR LE ROI

La editora komentario de Clarence al tiu afero estis tia:

Estas observate, per okulo ĵetuta je niaj anoncaj kolonoj, ke la komunumo estos favorata per eksterordinare interesa spektaklo en la turnira linio. La nomoj de la artistoj garantias bonan

distron. La bileta oficejo estos malfermata je tagmezo la 13a; aliro 3 pencoj, rezervitaj seĝoj 5; la eniro iras al la malsanula fonduso. La reĝa paro kaj la tuta kortumo ĉeestos. Kun tiuj esceptoj, kaj la gazetaro kaj la pastraro, la kuirejo estas strikte libera. Partioj estas per ĉi tio avertitaj ne aĉeti biletojn de spekulantoj; ili ne estos bonaj ĉe la pordo. Ĉiuj konas kaj ŝatas La Estron, ĉiuj konas kaj ŝatas Sir Sag.; venu, lasu nin doni al la knaboj bonan saluton. Memoru, la enirinta mono iras al granda kaj libera fonduso, kaj iu kies larĝa bonvolo streĉas sian helpeman manon, varma de la sango de amanta koro, al ĉiuj kiuj suferas, senkonsidere la raso, kredo, kondiĉo kaj koloro – la sola ideala organizo ĝis nun fondita en la mondo kiu ne faras politikajn aŭ religiajn kondiĉojn al sia kompato, sed diras Jen la rivero fluas, lasu *ĉiujn* veni kaj trinki! Venu, ĉiuj manoj! Prenu viajn bonbonojn kaj havu bonan tempon. Pasteĉo havebla tie, kaj ŝtonoj per kiuj frakasi ĝin; ankaŭ cirkolimonado – tri gutoj da citronsuko al barelo da akvo.

N. B. Ĉi tiu estas la unua turniro sub la nova leĝo, kiu permesas al ĉiu batalanto iun ajn armilon kiun li preferas. Vi volas fari noton pri tio.

Ĝis la elektita tago, neniuj en Britio parolis pri alia afero ol la planita batalo. Ĉiuj aliaj temoj

sinkis en sensignifon, kaj forpasis el la pensoj kaj interesoj de homoj. Ne estis ĉar turniro estis grava afero; ne estis ĉar Sir Sagramor trovis la sanktan gralon ĉar li ne faris, sed fiaskis; ne estis ĉar la dua (oficiala) persono en la ragno estis unu el la duelantoj; ne, ĉiuj tiuj detaloj estis ĉiutagaĵoj. Tamen estis abunda kialo por la eksterordinara intereso, kion la venonta batalo kreis. Ĝi estis kreita el la fakto ke la tuta nacio sciis ke tio ne estos duelo inter simplaj homoj, por tiel diri, sed duelo inter du grandaj magiistoj; duelo ne inter muskoloj sed inter animoj, ne pri homa povo sed pri superhoma arto; fina lukto pri supereco inter la du majstromagiistoj de la erao. Oni komprenis ke la plej famaj agoj de la plej konataj kavaliroj ne estus kompareblaj al ĉi tia spektaklo; ili povus esti nur infanludoj, kompare al ĉi tiu mistika kaj timiga batalo de la dioj. Jes, ĉiuj sciis ke vere estos nur duelo inter Merlino kaj mi, mezuro de liaj magiaj fortoj kontraŭ miaj. Estis konate ke Merlino estis okupata tutajn tagojn kaj noktojn, donante al la armiloj kaj armaĵo de Sir Sagramor superaj potenco de ofendo kaj defendo, kaj ke li donis al li el la spiritoj de la aero ian vualon kiu faris lin nevidebla al sia kontraŭulo, dum ankoraŭ videbla al aliaj homoj. Kontraŭ Sir Sagramor, tiel armita kaj protektita, mil kavaliroj povis fari nenion; kontraŭ li, neniuj konataj magiaĵoj povis regi. Tiuj faktoj estis sekuraj; rigardi ilin estis

neniu dubo, neniŭ kialo dubi. Estis nur unu demando: ĉu povis esti ankoraŭ pli da magiaĵoj, *nekonataj* al Merlino, kiu farus la vualon de Sir Sagramor travidebla al mi, kaj farus lian magiitan armaĵon vundebla al miaj armiloj? Tio estis la unu afero decidita en la strioj. Ĝis tiam, la mondo devis resti en suspenso.

Do la mondo kredis ke multo estis ĉi tie ludota, kaj la mondo estis ĝusta, sed ne pri tio ili pensis. Ne, io multe pli vasta estis malfermata kiam ĉi tiu ludkubo estis ĵetita: *la vivo de vaganta kavaliro*. Mi estis ĉampiono, vere, sed ne la ĉampiono de la frivolaj nigraj artoj, mi estis la ĉampiono de malmola, nesentimentala ordinara saĝo. Mi eniris la padon por aŭ detrui la vivon de vaganta kavaliro, aŭ iĝi ĝia viktimo.

Grandaj la arenoj estis, sed ne estis malplenaj lokoj en ili ekster la padoj, je la deka antaŭtagmeze la 16an. La mamuta areno estis vestita en flagoj kaj riĉaj ribonoj, kaj pakita de pluraj akreoj de malgrandaj tributregoj, iliaj sekvantoj, kaj la brita nobelaro; kun nia propra reĝa gango en la ĉefa loko, kaj ĉiu individuo fulmanta prismo de pompa silko kaj veluro – nu, mi neniam vidis ion similan, krom la batalo inter sunsubeniro ĉe la Supera Misisipo kaj la norda lumo. La vasta tendaro de flagbeligataj kaj bele koloritaj tendoj ĉe unu fino de la padoj, kun rigidkrura rigardisto je ĉiu pordo kaj lumanta

ŝildo pendanta apud li por defii, estis alia bela vidaĵo. Vi komprenas, ĉiu kavaliro estis tie kiu havis ian ambicion aŭ kastosenton; ĉar mia sento al ĉi tiu ordo ne estis tre sekreta, do jen ilia ŝanco. Se mi venkis mian batalon kontraŭ Sir Sagramor, aliaj havus la rajton voki min dum mi volis respondi.

Sube ĉe nia fino estis nur du tendoj; unu por mi, kaj alia por miaj servistoj. Je la decida horo, la reĝo faris signon, kaj la heroldoj aperis en siaj kapotoj kaj proklamis la batalantojn kaj la kaŭzojn de la kverelo. Estis silento, poste eĥanta kornosignalo, kiu estis la signalo ke ni montru vin. La tuta homamaso tenis la spiron, kaj fervora scivolemo speguliĝis en ĉiu vizaĝo.

El sia tendo rajdis la granda Sir Sagramor, impona turo de fero, pompa kaj rigida, la granda lanco starante en sia poŝo kaj prenita de lia forta mano, la faco kaj brusto de la granda ĉevalo vestita en fero, lia korpo en riĉaj vestoj kiuj preskaŭ tuŝis la teron – ho, tre nobla bildo. Granda krio eliris, de bonveno kaj admiro.

Kaj poste mi eliris. Sed mi ne ricevis krion. Estis dum momento scivolema kaj bone eldirata silento, poste granda ondo de riro komencis pasi laŭ tiu homa maro, sed avertanta kornosignalo rompis tion. Mi surhavis la plej simplan kaj komfortan gimnastikan vestaĵon – karnokoloraj kaj striktaj de kolo al kalkanoj, kun bluaj silkaj

vezikoj ĉe miaj koksoj, kaj kun nuda kapo. Mia ĉevalo ne estis pli ol mezgranda, sed li estis alerta, maldiklimba, muskola kun gvatkrevoj, kaj preskaŭ hundo. Li estis bela, glata kiel silko, kaj nuda kiel kiam li estis naskita, krom la brido kaj la selo.

La ferturo kaj la granda litokovrilo venis, mallerte sed gracie, laŭ la padoj, kaj ni tretis leĝere por renkonti ilin. Ni haltis; la turo salutis, mi respondis; poste ni rajdis, kaj ni rajdis flankon al flanko al la granda areno kun la vizaĝo al niaj reĝo kaj reĝino, kiujn ni salutis. La reĝino elkriis:

"Ho, Sir Estro luktos nude, kaj sen lanco aŭ glavo aŭ..."

Sed la reĝo silentigis ŝin, kaj faris ŝin kompreni, per ĝentila frazo aŭ du, ke tio ne estis ŝia afero. La kornoj sonis denove; kaj ni separis nin kaj rajdis al la finoj de la padoj, kaj elektis niajn poziciojn. Nun maljuna Merlino ekaperis kaj ĵetis sur Sir Sagramor fadenojn, kiuj aliigis lin en la fantomon de Hamleto; la reĝo faris signon, la kornoj sonis, Sir Sagramor restigis sian lancon, kaj venontmomente li venis laŭ la irejo kun la vualo flugante post li, kaj mi fajfis tra la aero por renkonti lin – dum mi pintigis mian orelon, kvazaŭ mi notis la pozicion kaj progreson de la nevidebla kavaliro per aŭdo, ne per vido. Koruso de engaĝiĝintaj krioj ekaŭdiĝis pro li, kaj

unu brava voĉo elĵetis korvarmigan vorton por mi – diris:

"Iru, maldika Jim!"

Estis defendebla veto ke Clarence gajnis tiun favoron por mi – kaj formulis la lingvaĵon, ankaŭ. Kiam tiu impona lancopinto estis malpli ol unu kaj duona jardoj de mia brusto, mi turnis mian ĉevalon flanken sen strebi, kaj la granda kavaliro iris transe, por nul poentoj. Mi ricevis multajn aplaŭdojn ĉifoje. Ni turnis nin, preparis nin kaj denove renkontiĝis. Alia nulo por la kavaliro, krianta aplaŭdo por mi. La sama afero ripetiĝis ankoraŭ unu fojon; kaj ĝi kaŭzis tian aplaŭdon, ke Sir Sagramor perdis sian kapon, kaj tuj ŝanĝis sian taktikon kaj komencis ĉasi min. Nu, neniu en la mondo apogis lin en tio; ĉio apogis min; mi facile forlasis lian padon kiam ajn mi volis, kaj iam mi batis lian dorson kiam mi venis malantaŭen. Fine, mi prenis la ĉason en miaj propraj manoj; kaj post tio, kiel ajn li portos sin, li ne povos denove veni malantaŭ mi; li trovis sin ĉiam en la pinto kiam li finis sian manovron. Do li rezignis tiun aferon, kaj retiris sin al sia pinto de la vojo. Lia memrego estis klare finita nun, kaj li forgesis sin kaj al mi ĵetis insulton pli fortan ol mian. Mi forigis mian lazon el la korno de mia selo, kaj metis la maŝon en mian dekstran manon. Ĉifoje vi devis vid lin veni! – estis afereca vojaĝo, certe; laŭ lia irmaniero estis sango en lia okulo.

Mi sidigis mian ĉevalon senzorge, kaj svingis la grandan maŝon de mia lazo en grandaj cirkloj super mia kapo; dum li estis survoje, mi startis por li, kiam la spaco inter ni ŝrinkis al kvardek futoj, mi lasis serpentaĵojn de la ŝnuro fendi la aeron, poste mi iris rapide flanken kaj turnis min kaj haltigis mian trejnitan beston, kun ĉiuj kvar piedoj pretaj sub li. La venontan minuton, la ŝnuro streĉiĝis, kaj tiris Sir Sagramor ekster lia selo! Granda Skoto, tio estis sensacio!

Sendemande, la plej populara afero en ĉi tiu mondo estas novaĵo. Ĉi tiuj homoj neniam antaŭe vidis ion pri la vakeraĵoj, kaj evidente, ili metis ilin for de la piedoj pro ĝojego. De ĉie venis la krio:

"Denove! Denove!"

Mi scivolis kie ili trovis la vorton, sed ne estis tempo cerbumi pri filologaj problemoj, ĉar la tuta mondo de vagantaj kavaliroj estis zumanta nun, kaj miaj komercaj valoroj neniam estis pli bonaj. En la momento kiam mia lazo estis liberigita, kaj Sir Sagramor estis sendita al sia tendo, mi enmetis la nestreĉitan parton, prenis mian stacion kaj komencis denove svingi la lupon ĉirkaŭ mia kapo. Mi estis sekura trovi uzon de ĝi, tuj kiam oni trovis sukcesanton de Sir Sagramor; kaj tio ne povis postuli multan tempon, ĉar la malsataj kandidatoj estis multaj. Fakte, ili tuj elektis unun – Sir Hervis de Revel.

Bzz! Jen li venis, kiel brulanta domo; mi evitis lin; li pasis kiel fulmo, kun miaj ĉevalharaj slingoj trankviligantaj sin ĉirkaŭ lia kolo; ĉirkaŭ unu sekundon poste, *fst!*, lia selo estis malplena.

Mi ricevis alian ripeton; kaj alian, kaj alian, kaj ankoraŭ alian. Kiam mi elserpentigis kvin homojn, aferoj komencis aspekti seriozaj por la fere vestitaj, kaj ili haltis sin kaj konsultis unu la alian. Rezulte, ili decidis ke estis tempo rezigni pri etikedo kaj sendi siajn plej grandajn kaj bonajn al mi. Al la surprizo de tiu eta mondo, mi lazis Sir Gamorak de Galis, kaj post li Sir Galahad. Do vi komprenas ke nun estis nenio por fari, krom ludi iliajn plej bonajn – la superan inter superuloj, la plej potencon inter potenculoj, la granda Sir Lanceloto mem!

Fiera momento por mi? Mi kredus tion. Tie estis Arturo, reĝo de Britio; jen estis Ginevra; jes, kaj tutaj triboj de malgrandegaj reĝetoj; kaj en la tendaro tie konataj kavaliroj el multaj landoj; kaj same la plej elektata aro konata al la Kavaliraro, la Kavaliroj de la Ronda Tablo, la plej famaj en la Kristanaro; kaj la plej grava fakto de ĉiuj, la vera suno de ilia brila sistemo, estis tie, kaŝanta sian lancon, la fokusa punkto de kvardek mil adorantaj okuloj, kaj jen sola mi kuŝis por li. Trans mia animo fulmis la kara imago de certa ha lo-knabino de West Hartford, kaj mi deziris ke ŝi povis vidi min nun. En tiu momento, suben venis

la Nevenkeblo, forta kiel kirlanta vento – la korteca mondo ekstaris kaj klinis sin antaŭen – la fatplenaj maŝoj venis tra la aero, kaj antaŭ ol vi povis palpebrumi, mi tiris Sir Lanceloton trans la kampo sur sia dorso, kaj kisante mian manon al la ŝtormo de salutantaj naztukoj, kaj la tondrantaj aplaŭdoj kiuj salutis min!

Diris mi al mi mem, dum mi kolektis mian lazon kaj pendigis ĝin al mia selo, kaj sidis tie, ebria pro famo:

"La venko estas perfekta – neniuj aliaj kuraĝos ataki min – la vivo de vagantaj kavaliroj estas morta."

Nun imagi mian surprizon – kaj tiun de ĉiuj aliaj – kiam ni aŭdis la apartan kornosignalon, kiu anoncas ke alia kompetisto intencas eniri la vojojn! Jen mistero; mi ne povis klarigi ĉi tion. Poste, mi notis ke Merlino forglitis de mi; kaj poste mi notis ke mia lazo estis for! La maljuna iluzieksperto forŝtelis ĝin, certe, kaj metis ĝin sub lia robo.

La korno sonis denove. Mi rigardis, kaj suben venis denove Sagramor rajdante, kun sia polvo forigita kaj sia vualo bele rearanĝita. Mi trotis por renkonti lin, kaj pretendis trovi lin per la sono de la piedoj de lia ĉevalo. Li diris:

"Vi havas rapidan orelon, sed ĝi ne savas vin de ĉi tio!"

Kaj li tuŝis la tenilon de sia granda glavo.

"Kaj vi ne povas vidi ĝin, pro la influo de la vualo; sciu ke ne estas lokrompanta lanco, sed glavo – kaj mi kredas ke vi ne povas eviti ĝin."

Lia viziero estis levita; estis morto en lia rideto. Mi neniam povos eviti lian glavon, tio estis klare. Iu devis morti ĉifoje. Se li sukcesus, mi povus nomi la kadavron. Ni rajdis antaŭen kune, kaj salutis la gereĝojn. Ĉifoje, la reĝo estis ĝenata. Li diris:

"Kie estas via stranga armilo?"

"Estas ŝtelita, sinjoro."

"Ĉu vi havas alian ĉemane?"

"Ne, sinjoro, mi portis nur unun."

Tiam, Merlino enmiksi sin:

"Li portis nur unun, ĉar nur estis unu portebla. Ne ekzistas alia kiel tia. Ĝi apartenas al la reĝo de la Demonoj de la Maro. Ĉi tiu homo estas pretendanto, kaj ignoranto; se ne, li scius ke tiu armilo estas uzebla nur ok fojojn, kaj poste ĝi malaperas al sia hejmo sub la maro."

"Do li estas senarmila," diris la reĝo. "Sir Sagramor, vi lasu lin havi tempon por pruntepreni."

"Kaj mi pruntedonos!" diris Sir Lanceloto kaj venis limpante. "Li estas tiel brava kavaliro kiel iu vivanta, kaj li havos mian."

Li metis sian manon al sia glavo por tiri ĝin, sed Sir Sagramor diris:

"Haltu, ne estu! Li luktu per siaj propraj armiloj; estis lia privilegio elekti ilin kaj porti ilin. Se li eraris, li pagu per sia kapo."

"Kavaliro!" diris la reĝo. "Vi havas tro fortan pasion; ĝi kreas disordon en via menso. Ĉu vi mortigus nudan homon?"

"Se li faras tiel, li respondos al mi," diris Sir Lanceloto.

"Mi respondos al ĉiu kiu ŝatas tion!" respondis Sir Sagramor malvarme.

Merlino enrompis, frotis siajn manojn kaj ridetis sian plej malaltan rideton de malica kontentigo:

"Estas bone dirite, vere bone dirite! Kaj estas sufiĉe da interparolado, lasu mian sinjoron la reĝon doni la batalsignalon."

La reĝo devis rezigni. La korno proklamis, kaj ni turnis nin for unu de la alia kaj rajdis al niaj stacioj. Tie ni staris, cent jardojn unu de la alia, kun la vizaĝo unu al la alia, rigidaj kaj senmovaj, kiel ĉevalstatuoj. Kaj tiel ni restis, en sensona silento, dum tuta minuto, dum ĉiuj fiksrigardis, kaj neniu movis sin. Ŝaknis ke la reĝo ne povis kolekti siajn fortojn kaj doni la signalon. Sed finfine li levis sian manon, la klara tono de korno sekvis, la longa glavo de Sir Sagramor faris fulman movon en la aero, kaj estis supere vidi lin veni. Mi sidis senmova. Li venis. Mi ne movis min. Homoj iĝis tiom ekscititaj, ke ili kriis al mi:

"Fuĝu, fuĝu! Savu vin! Ĉi tio estas murdo!"

Mi neniam foriris eĉ unu colon, ĝis tiu tondranta aperaĵo venis malpli ol dek kvin pacojn de mi; tiam mi tiris kaŝitan revolveron el mia ingo, estis fulmo kaj krio, kaj la revolvero estis ree en la ingo antaŭ ol iu sciis kio okazis.

Jen transkuris senhoma ĉevalo, kaj tie legis Sir Sagramor, ŝtone morta.

La homoj kiuj kuris al li estis mutigitaj, trovante ke la vivo fakte forlasis la homon, kaj neniu kialo estis videbla, neniu vundo sur lia korpo, nenio simila. Estis truo tra lia armaĵaro, sed ili do donis iun gravecon al tia malgrandaĵo; kaj ĉar kuglovundo produktas malmulte da sango, nenio tia estis videbla pro la ŝtofo sub la armaĵo. La korpo estis tirita por lasi la reĝon kaj la altuloj rigardi ĝin. Kompreneble, ili estis mutigitaj pro surprizo. Mi estis petata veni kaj klarigi la miraklon. Sed mi restis en miaj spuroj, kiel statuo, kaj diris:

"Se estas ordono, mi venos, sed mia sinjoro la reĝo scias, ke mi estas kie la leĝoj de batalo diras ke mi estu, dum iu volas iri kontraŭ mi."

Mi atendis. Neniu elvokis min. Do mi diris:

"Se iu pridubas ke ĉi tiu kampo estas bone kaj ĝuste gajnita, mi ne atendas ilian elvokon, mi elvokas ilin."

"Estas galanta ero," diris la reĝo, "kaj ĝi bone servas vin. Kiun vi nomos unue?"

"Mi nomos neniun, mi elvokas ĉiujn! Jen mi staras, preta ke la kavaliraro de Britio venos al mi – ne kiel individuoj, sed amase!"

"Kion!" kriis dudeko da kavaliroj.

"Vi aŭdis la elvokon. Akceptu ĝin, aŭ mi proklamas vin ĉiujn apostatojn kaj venkitajn, ĉiujn!"

Estis "blufo", vi scias. En tia tempo, estas bona juĝado montri sentiman vizaĝon kaj ludi vian manon je centfoje ĝian valoron; kvardek naŭ fojojn el kvindek neniuj kuraĝas "voki", kaj vi kolektas la markojn. Sed nun – nu, la situacio aspektis sentrankvila! En neniuj tempo, kvincent kavaliroj sidiĝis en siajn selojn, kaj antaŭ ol vi havis tempon palpebrumi, ili ĉiuj rajdis al mi. Mi prenis ambaŭ revolverojn el la ingoj, kaj komencis mezuri distancojn kaj kalkuli ŝancojn.

Paf! Unu selo malplena. Paf! Alia. Paf, paf! kaj mi faligis du. Nu, ni du estis egalaj, kaj mi sciis tion. Se mi uzis la dekunuan pafon sen konvinki ilin, certe la dekdua homo mortigos min. Do, mi neniam sentis min pli feliĉa, ol kiam mia naŭa faligis sian homon, kaj mi vidis la malcertecon en la popolamaso, kun ĝia signo de paniko. Subita perdo nun povus kosti al mi mian lastan ŝancon. Sed mi ne perdis ĝin. Mi levis miajn revolverojn kaj celis – kaj la haltigata homamaso staris kie ĝi staris dum unu solida

momento. Poste ili rompis sian formacion kaj fuĝis.

La tago estis mia. La vivo de vaganta kavaliro estis institucio kondamnita. La marŝo de la civilizacio komenciĝis. Kiel mi sentis min? Ho, vi neniam povus imagi.

Kaj frato Merlino? Liaj akcioj estis denove malaltaj. Iumaniere, ĉiam kiam la sensencaĵomagio provis kompromisi kun la magio de scienco, la sensencaĵoj perdis.

40. Tri jarojn poste

Kiam mi tiufoje rompis la dorson de la vaganta kavaliro, mi ne plu sentis ke mi devas agi sekrete. Do la venonta tagon mi malkaŝis miajn kaŝitajn lernejojn, miajn minojn kaj mian vastan sistemon de sekretaj industrioj kaj fabrikoj al surprizita mondo. Tio diras ke mi malkaŝis la deknaŭan jarcenton al inspekto de la sesa.

Nu, estas ĉiam bona politiko tuj ekspluati avantaĝon. La kavaliroj estis portempe malsupre, sed se mi volis havi ilin tie, mi tutsimple devis paralizi ilin – nenio malpli grava taŭgus. Mi la lastan fojon "blufis" en la kampo; estus nature por ili tiri tiun konkludon, se mi donus al ili la ŝancon. Tial, mi ne devus doni al ili tempon; kaj tion mi ne faris.

Mi renovigis mian elvokon, skribis ĝin sur latuno, metis ĝin kie ajn iu pastro povis laŭtlegi ĝin por ili, kaj cetere havis fiksan lokon por ĝi en la anonctabuloj de la gazeto.

Mi ne nur renovigis ĝin sed aldonis ĝiajn proporciojn. Mi diris: Nomi la dion, kaj mi prenos kvindek asistentojn kaj staros *kontraŭ ĉiu kavaliraro de la tuta mondo kaj detruos ĝin*.

Ĉifoje mi ne blufis. Mi diris kion mi volis; mi povis fari kion mi promesis. Ne estis maniero miskompreni la lingvaĵon de tiu elvoko. Eĉ la plej stultaj kavaliroj komprenis ke jen klara kazo

de "ludu aŭ silentu". Ili estis tre saĝaj, kaj faris la lastan. Dum tri plenaj jaroj, ili donis al mi neniujn problemojn menciindajn.

Imagu ke la tri jaroj pasis. Nun ĉirkaŭrigardu en Britio. Feliĉa kaj riĉa lando, kaj strange ŝanĝita. Lernejoj ĉie, pluraj altaj; pluraj sufiĉe bonaj gazetoj. Eĉ aŭtoreco komenciĝis; Sir Dinadan la Humoristo estis unua en la kampo, kun volumo de grizaj ŝercoj, kiujn mi konis dum dek tri jarcentoj. Se li forlasus la kadukan pri la prelegisto, mi nenion dirus; sed mi ne povus elteni tiun. Mi subpremis la libron kaj pendumis la aŭtoron.

La sklavismo estis morta kaj for; ĉiuj homoj estis egalaj antaŭ la leĝo; taksoj estis egalaj. La telegrafo, la telefono, la gramofono, la tajpilo, la kudrilo, kaj ĉiuj mil volantaj kaj lertaj servistoj de vapo kaj elektro laboris por gajni favoron. Ni havis vaporŝipon aŭ du sur la Tamizo, ni havis vapormilitŝipojn, kaj la komencon de vaporkomercmarinon; mi pretigis min al la elsendado de ekspedicio por malkovri Amerikon.

Ni fondis plurajn trenliniojn, kaj nia linio de Kameloto al Londono jam estis finita kaj funkciis. Mi estis sufiĉe ruza por fari ĉiujn oficojn ligataj al la pasaĝeraj servoj alte lokitaj. Mi volis logi la kavalirojn kaj nobelojn, fari ilin uzeblaj kaj teni ilin for de misfaroj. La plano funkciis bonege, la konkuron pri la lokoj estis varmega. La

konduktoro de la ekspresa trajno estis duko; ne estis pasaĝera konduktoro sub li kun malpli alta rango ol tiu de jarlo. Estis bonaj homoj, ĉiuj, sed ili havis du difektojn kiujn mi ne kapablis kuraci, kaj tiel mi devis palpebrumi al tiuj: ili ne flankenmetis sian armaĵon, kaj ili "forigus" la pagon – do rabis la kompanion.

Apenaŭ estis kavaliro en la tuta lando, kiu ne estis utile dungita. Ili iris de fino al fino de la lando kiel ĉiuspecaj misiistoj; ilia ŝato vagadi, kaj ilia sperto pri ĝi, faris el ili la plej efikajn disvastigantojn de civilacio kiujn ni havis. Ili iris vestitaj en ŝtalo kaj ekipitaj de glavo kaj lanco kaj batalhakilo, kaj se ili ne povis persvadi iun provi kudrilon en la instalplanon, aŭ metodikonon, aŭ pikdratbarilon, aŭ tutmalpermesan gazeton, aŭ iu el la aliaj mil kaj unu artikoloj pri kiuj ili reklamis, ili forigis lin kaj iris plu.

Mi estis tre feliĉa. La aferoj iris firme al sekrete sopirata punkto. Vi komprenas, mi havis en la kapo du planojn, kiuj estis la plej vastaj el ĉiuj miaj projektoj. Unu estis faligi la katolikan ekezion kaj konstrui la protestantan fidon sur ĝiaj ruinoj – ne kiel establitan eklezion, sed iun kiun vi povas mem elekti; kaj la alia projekto estis iom-post-ioma dekreto, kiu komandis ke post la morto de Arturo, estu enkondukita ĝenerala voĉdonrajton sen limoj, kaj donita kaj al viroj kaj al virinoj – almenaŭ al ĉiuj viroj, ĉu saĝaj ĉu ne,

kaj al ĉiuj patrinoj, kiuj mezaĝaj estis trovataj scii preskaŭ same multe kiel iliaj filoj dudek unu-jaraj. Arturo povus bone vivi ankoraŭ tridek jarojn, ĉar li estis pli-malpli same aĝa kiel mi – tio estis kvardek jarojn, kaj mi kredis ke post tiu tempo, mi povus facile havi la aktivan parton de la popolo de tiu tempo preta kaj fervora pri evento, kiu povus esti la unua de sia speco en la historio de la mondo – rondigita kaj kompleta registara revolucio, sen sangoelverŝo. La rezulto estus respubliko. Nu, mi same bone konfesu, kvankam mi hontas kiam mi pensas pri tio: mi komencis havi bazan sopiron mem iĝi ĝia unua prezidanto. Jes, estis pli-malpli homa naturo en mi; mi trovis tion.

Clarence estis kun mi pri la revolucio, sed en modifita maniero. Lia ideo estis respubliko, sen privilegiata klaso, sed kun hereda reĝa familio je la pinto anstataŭ elektataj ĉefoj. Li kredis ke neniu nacio, kiu iam konis la ĝojon adori reĝan familion, povis iam esti robata de tio kaj ne paliĝi kaj morti pro melankolio. Mi diris ke reĝoj estas danĝeraj. Li diris: do havu katojn. Li estis certa, ke reĝa familio de katoj plenumus ĉiujn dezirojn. Ĝi estus same uzebla kiel ĉiu alia reĝa familio, ĝi scius same multe, ĝi havus la samajn virtojn kaj la samajn perfidojn, la saman disponon kvereli kun aliaj reĝaj katoj, estus rideble vana kaj absurda kaj neniam scius tion, ĝi kostus nenion,

fine ĝi havus same profunde dian rajton kiel ĉiu alia reĝa familio, kaj "Tom 7a, aŭ Tom 11a, aŭ Tom 14a, reĝo per la graco de Dio" sonus same bone kiel kiam aplikata al la ordinara maskla kato kun malvasta pantalono. "Kaj ĝenerale," li diris, en sia bela moderna angla, "la karaktero de tiuj katoj estus konsiderinde pli alta ol tiu de la averaĝa reĝo, kaj tio estus grava morala avantaĝo al la nacio, ĉar nacio ĉiam modelas sian moralon laŭ tiu de la monarĥo. Ĉar la adorado de reĝoj estas fondata sur nerezonado, tiuj graciaj kaj senharmaj katoj facile iĝus same sanktaj kiel ĉiuj aliaj reĝaĵoj, fakte pli, ĉar oni baldaŭ notis ke ili pendumis nenion, senkapigis nenion, malliberigis nenion, praktikis neniujn kruelaĵojn aŭ nejustaĵojn, kaj tial meritis pli profundan amon kaj respekton ol ordinara homa reĝo, kaj certe ricevos ilin. La okuloj de la tuta malbenita mondo baldaŭ estos fiksitaj sur tiu homeca kaj subtila sistemo, kaj reĝaj buĉistoj baldaŭ malaperos; iliaj subuloj anstataŭos ilin per katidoj el nia propra reĝa familio; ni iĝos fabriko; ni liveros al la tronoj de la mondo; ene de kvardek jaroj, la tuta Eŭropo estos regata de katoj, kaj la katoj venos el ni. La regno de ĉiama paco komencos tiam, kaj ĝi neniam denove finiĝos... *Mjjj-aŭ-aŭ-aŭ -- fst! -- ŭaŭ!"*

Pendumu lin, mi supozis ke li estis serioza, kaj iom post iom estis persvadata de li, ĝis li

eksplodigis tiun kathaŭlon, kaj preskaŭ timigis min el miaj vestaĵoj. Sed li neniam povis paroli serioze. Li ne sciis kion tio signifas. Li bildigis al si klaran kaj perfekte racian kaj fareblan plibonigon de konstitucia monarĥio, sed li estis tro malpezkapa por kompreni tion, aŭ por eĉ zorgi pri tio. Mi volis draŝi lin, sed Alisande venis flugante je tiu momemto, sovaĝa pro timo, kaj tiel sufokata de singultoj ke dum minuto ŝi ne povis trovi sian voĉon. Mi kuris kaj prenis ŝin en miajn brakojn, karesis ŝin abunde kaj diris, petante:

"Parolu, kara, parolu! Kio estas?"

Ŝia kapo falis senforta sur mian bruston, kaj ŝi anhelis, preskaŭ neaŭdeble:

"Ha lo Centraloj!"

"Rapide!" mi kriis al Clarence. "Telefonu ke venu la reĝa homeopato!"

Post du minutoj mi kuŝis surgenu eĉ la liteto de la bebo, kaj Alisande dissendis servistojn tien, ĉi tien kaj ĉien, en la tuta palaco. Mi komprenis la situacion preskaŭ unurigarde – diable! Mi kliniĝis kaj flustris:

"Vekiĝu, kara! Ha lo Centraloj!"

Ŝi malfermis siajn molajn okulojn malrapide, kaj komencis diri:

"Paĉjo!"

Tio estis komforto. Ankoraŭ, ŝi tute ne estis morta. Mi sendis por ricevo preparaĵojn de

sulfuro, mi mem prenis la ujon; ĉar mi ne sidas kaj atendas doktorojn, kiam Alisande aŭ la bebo estas malsana. Mi sciis kiel prizorgi iun el ili, kaj havis spertojn. Ĉi tiu etulo vivis en miaj brakoj grandan parton de sia eta vivo, kaj ofte mi povis forigi ĝiajn problemojn kaj fari ĝin ridi tra la larmoj de ĝiaj okulharoj, kiam eĉ ĝia patrino ne povis.

Sir Lanceloto, en sia plej riĉa armaĵo, nun venis tra la granda halo survoje al la akcipoŝedantanaro. Li estis prezidanto de la akcipoŝedantanaro, kaj enhavis la Danĝeran Seĝon, kiun li aĉetis de Sir Galahad; ĉar la akcipoŝedantanaro konsistis el la kavaliroj de la ronda tablo, kaj ili nun uzis la rondan tablon por negocaj celoj. Seĝoj tie valoris – nu, vi neniam kredis la ciferon, do ne gravas mencii ĝin. Sir Lanceloto estis urso, kaj li aranĝis angulon en unu el la novaj linioj, kaj ĵus pretis sin premi la mallongan pantalonon hodiaŭ; sed kion pri tio? Li estis la sama malnova Lanceloto, kaj kiam li enrigardis paŝante la pordon kaj trovis sian karesbeston malsana, tio sufiĉis por li; bovoj kaj ursoj povis lukti inter si laŭ sia propra volo laŭ li, li venus rekte ĉi tien kaj staris apud eta Ha lo Centraloj laŭ sia tuta valoro. Kaj tion li faris. Li ĵetis sian helmon en la angulon, kaj post duona minuto li havis novan meĉon en la alkohola lampo, kaj metis fajron sub la ujo. Je tiu tempo,

Alisande konstruis feltan tegmenton super la liteto, kaj ĉio estis preta.

Sir Lanceloto kaj mi efikigis la vaporon, li kaj mi plenigis la ujon per neestingita limeto kaj karbola acido, kun iomete da laktacido aldonita, poste plenumis la ujon per akvo kaj metis la vaporŝprucilon sub la felta tegmento. Nun ĉio estis en la plej bona kondiĉo, kaj ni sidiĝis je ambaŭ flankoj de la liteto por gardi. Alisande estis tiel dankema kaj komforta, ke ŝi donis al paro de preĝejaj kortoj salikŝelon kaj subakotabako al ni, kaj diris al ni ke ni fumu kiom ni volas, ne eblis fari tion sub la tegmento, kaj ŝi kutimiĝis al fumado, estante la unua damo en la lando kiu iam vidis fuman nubon. Nu, ne povis esti pli kontenta aŭ komforta vidaĵo ol Sir Lanceloto en sia nobla armaĵo sidanta en gracia silento je la fino de jardo de neĝa preĝeja korto. Li estis bela viro, aminda viro, kaj la intenco pri li estis fari edzinon kaj infanojn feliĉaj. Sed kompreneble Ginevra – tamen, ne gravas plori pri la farita, ne plu nefarebla.

Nu, li gardis kune kun mi, tre klare, dum tri tagnoktoj, ĝis la infano estis ekster danĝero; tiam, li prenis ŝin en siaj grandaj brakoj, kaj kisis ŝin, kun siaj plumoj falantaj ĉirkaŭ ŝia ora kapo, poste mole metis ŝin denove sur la genuoj de Alisande, kaj pompe iris laŭ la granda halo, inter la admirantaj armituloj kaj malgranduloj, kaj tiel

malaperis. Kaj neniŭ instinkto avertis min ke mi neniam denove vidos lin en ĉi tiu mondo! Dio, kia korfrakasanta mondo estas.

La doktoroj diris ke ni devas forigi la infanon, se ni volos denove vidi ŝin sana kaj forta. Kaj ŝi devas havi maraeron. Do ni prenis militŝipon, kaj aron de ducent sesdek personoj, kaj komencis krozadi, kaj post du semajnoj de tio, ni surbordiĝis en Francio, kaj la doktoroj kredis ke estus bona ideo iel resti tie. La eta reĝo de tiu regiono ofertis al ni siajn gastigojn, kaj ni ĝoje akceptis. Se li havus tiom da konvenaĵoj kiel li mankis, ni estus sufiĉe komfortaj; kvankam estis kiel estis, ni povis vivi tre bone, en lia stranga kasteleto, helpe de komfortoj kaj luksaĵoj el la ŝipo.

Post unu monato mi sendis la ŝipon hejmen por freŝaj manĝaĵoj, kaj por novaĵoj. Ni atendis ŝin reen post tri aŭ kvar tagoj. Ŝi portus al mi, kune kun aliaj novaĵoj, la rezulton de certa eksperimento kiun mi komencis. Estis projekto mia por anstataŭi la turniron per io, per kio povus eskapi la ekstra vaporo de la kavaliroj, konservi la tipojn distritaj kaj ekster malbono, kaj samtempe konservi la plej bonajn en ili, kio estis ilia forta spirito venki. Mi havis elektitan aron de ili en privata trajnado dum certa tempo, kaj la dato nun proksimiĝis de ilia unua publika strebo.

Tiu eksperimento estis basbalo. Por fari la aferon populara ekde la komenco, kaj lokigi ĝin ekster kritikismo, mi kolektis miajn naŭ laŭ rango, ne kapacito. Ne estis kavaliro en iu teamo, kiu ne estis szeptrohava monarĥo. Kiam temis pri tia materialo, estis ĉiam multe da ĝi ĉirkaŭ Arturo. Vi ne povis ĵeti brikon en iun direkton sen vundi reĝon. Kompreneble, mi ne povis igi tiujn homojn forigi siajn armaĵojn; tion ili ne faris eĉ kiam ili banis sin. Ili akceptis diferencigi la armaĵon, por ke oni povu distingi unu teamon disde la alia, sed pli ol tio ili ne faris. Do unu el la teamoj portis armaĵan ulstron, kaj la alia portis platarmaĵon faritan el mia nova Bessemer-ŝtalo. Ilia praktikado en la kampo estis la plej fantazia afero, kiun mi iam vidis. Ĉar ili estis sekuraj kontraŭ kugloj, ili neniam saltis ekster la vojon, sed restis senmovaj kaj akceptis la rezulton; kiam iu Bessemer kontrolis la batlignon, kaj pilko trafis lin, foje ĝi resaltis cent kvindek fojojn. Kaj kiam iu kuris, kaj ĵetis sin al la stomako por gliti al sia bazo, estis kvazaŭ fere kovrita ŝipo venis al la haveno. Unue mi uzis homojn sen rango kiel juĝistojn, sed mi devis ĉesi tion. Tiuj homoj ne estis pli facile agrabligeblaj ol aliaj naŭoj. La unua decido de la juĝisto kutime estis lia lasta; ili duigis lin per bato, kaj liaj amikoj portis lin hejmen sur tabulo. Kiam estis trovata ke neniuj juĝistoj iam travivis ludon, iĝis malpopulara iĝi

juĝisto. Do mi devis nomumi iun, kies rangon kaj alta pozicio sub la registaro protektus lin.

Jen la nomoj de la naŭoj:

BESSEMER

ULSTER

Reĝo Arturo

Imperatoŝo Lucio

Reĝo Lot de Lotiano

Reĝo Logris

Reĝo de Nordkalis

Reĝo Marhalt de Irlando

Reĝo Marsil

Reĝo Morganore

Reĝo de Eta Britio

Reĝo Mark de Kornvalo

Reĝo Laboro

Reĝo Nentres de Garloto

Reĝo Pellam de

Reĝo Meliodes de

Listengese

Melias

Reĝo Bagdemagus

Reĝo de la Lago

Reĝo Tollemes la

La Saŭdano de Sirio

Feintes

Juĝisto – Clarence

La unua publika ludo certe logos kvindek mil homojn; kaj la distro valorus ĉirkaŭiri la mondon por vidi. Ĉio estus favora; estis varma kaj bela printempa vetero nun, kaj la Naturo estis tute vestita en siaj novaj vestaĵoj.

41. Interdikto

Tamen, mia atento estis rapide tirata el tiaj aferoj; nia bebo denove komencis perdi grundon, kaj ni devis sidi kun ŝi, ŝia situacio iĝis tiom serioza. Ni ne povis akcepti ke iu helpis kun tiu servo, do ni du gardadis, tagon post tago. Ho Alisande, kiel bonan koron ŝi havis, tiel simplan, kaj veran, kaj bona ŝi estis! Ŝi estis senmakula edzino kaj patrino; kaj tamen mi edzinigis ŝin por neniuj alia aparta kialo, krom per la leĝoj de la kavalireco, ŝi estis mia posedaĵo ĝis iu kavaliro venkus ŝin el mi en la kampo. Ŝi ĉasis min en tuta Britio; trovis min pendanta ekster Londono, kaj tuj denove ekhavis sian malnovan lokon je mia flanko, tre trankvile kaj pro rajto. Mi venis el Nov-Anglio, kaj laŭ mia opinio, tia partnereco frue aŭ malfrue kompromitus ŝin. Ŝi ne povus vidi kiel, sed mi rompis la argumentadon, kaj ni havis geedzan ceremonion.

Nun mi ne sciis ke mi ricevis premion, sed tion mi faris. Post malpli ol dek du monatoj mi adoris ŝin; kaj nia kamaradeco estis la plej kara kaj perfekta iam. Homoj parolas pri belaj amikecoj inter du personoj de la sama sekso. Kio estas la plej bona de tiu speco, kompare kun la amikeco inter edzo kaj edzino, kie la plej bonaj impulsoj kaj plej altaj idealoj de ambaŭ estas la

samaj? Ne estas loko por komparo inter la du amikecoj; unu estas tera, la alia dia.

En miaj sonĝoj, unue kune, mi ankoraŭ vagadis tridek jarcentojn for, kaj mia nekontenta spirito kriis kaj aŭdis la nerespondantajn malplenojn de malaperinta mondo. Ofte, Alisande aŭdis la petantan krion el miaj lipos dumdorme. Kun granda grandanimeco, ŝi metis mian krion al nia bebo; ŝi kredis ke estis la nomo de iu perdita amo mia. Tio movis min al larmoj, kaj preskaŭ for de la piedoj, kiam ŝi ridetis al mia vizaĝo por meritata premio, kaj ludis al mi sian strangan kaj belan surprizon:

"La nomo de iu, kiu estis kara al vi, estas ĉi tie protektata, ĉi tie sanktigata, kaj ĝia muziko ĉiam restos en niaj oreloj. Nun vi kisos min, ĉar vi scias kiun nomon mi donis al la infano."

Sed mi tamen ne sciis tion. Mi havis neniun ideon pri tio; sed estus kruele konfesi tion kaj detrui ŝian belan nomon; do mi neniam faris tion, sed diris:

"Jes, mi scias, kara – kiel kare kaj bone estas de vi, ankaŭ! Sed mi volas aŭdi viajn lipojn, kiuj estas ankaŭ miaj, unue esprimi ĝin – tiam, ĝia muziko estas perfekta."

Ĝoja ĝis la medolo, ŝi murmuris:

"Ha lo Centraloj!"

Mi ne ridis – mi ĉiam estos dankema pro tio – sed la peno rompis ĉiun kartilagon en mi, kaj

dum semajnoj poste, mi povis aŭdi miajn ostojn klaki kiam mi iris. Ŝi neniam trovis sian eraron. La unuan fojon ŝi aŭdis tiun saluton en la telefono, ŝi estis surprizita, kaj ne gaja; sed mi diris al ŝi ke mi ordonis tion; ke ekde nun kaj por ĉiam, la telefono devos ĉiam esti elvokata per tiu respektinda formalajo, en ĉiama honoro kaj memoro de mia perdita amikino, kaj de ŝia eta samnomulino. Tio ne estis vere. Sed respondis.

Nu, dum du kaj duona semajnoj, ni gardis apud la liteto, kaj en nia profunda maltrankvilo, ni estis senkonsciaj pri iu mondo ekster tiu malsanulĉambro. Tiam venis nia rekompenco: la centro de la universo iris tra la angulo, kaj komencis resaniĝi. Dankemaj? Tio ne estas la termino. Ne *ekzistas* termino por tio. Vi scias tion mem, se vi vidis vian infanon tra la Valo de la Ombro kaj vidis ĝin reveni al la vivo kaj meti nokton for de la mondo kun unu ĉion ilumiganta rideto, kiun vi povus kovri per la mano.

Nu, ni estis ree en ĉi tiu mondo en momento! Poste ni sammomente vidis la saman surprizitan penson en la okuloj de la alia; pasis pli ol du semajnoj, kaj la ŝipo ne ankoraŭ revenis!

Post plia minuto, mi aperis ĉe miaj kunuloj. Ili estis profunde en maltrankvilaj pensoj dum tiu tuta tempo – iliaj vizaĝoj montris tion. Mi vokis eskorton, kaj ni galopadis kvin mejlojn ĝis montetpinto kun vido al la maro. Kie estis mia

granda komerco, kiu lastatempe faris tiujn blankajn terojn plenaj de homoj, kaj belaj kun siaj blankflugilaj aroj? Malaperis, ĉiuj! Neniu velo, de horizonto al horizonto, neniu fumo – nur morta kaj malplena soleco, anstataŭ tiu plena vivo.

Mi rapide reiris, kaj ne diris vorton al iu. Mi informis Alisanden pri tiuj malagrablaj novaĵoj. Ni ne povis elpensi iun klarigon, kiu komencis klarigi. Ĉu estis invado? tertremo? pesto? Ĉu la nacio forlasis la ekziston? Sed divenado servis al nenio. Mi devis iri – tuj. Mi prunteprenis la mararmeon de la reĝo – "ŝipo" ne pli granda ol unuopa vaporŝipo – kaj baldaŭ estis preta.

La dispartiĝo – ho jes, tio estis malfacila. Dum mi voris la infanon per lastaj kisoj, ĝi viviĝis kaj elŝputis sian vortaron! – la unuan fojon dum pli ol du semajnoj, kaj ni pro ĝojo iĝis idiotoj. La karaj prononceraroj de infanaĝo! – ho kara, ne ekzistas muziko kiu povas tuŝi ĝin; kaj kiom oni funebras kiam ĝi forvelkas en korektecon, sciante ke ĝi neniam denove vizitos tiun priŝtelitan orelon. Ho, kiel bone estis povi porti tiun gracian memoron kun mi!

Mi proksimiĝis al Anglio la venontan matenon, kun la granda salakva ŝoseo tute al mi, Estis ŝipoj en la haveno, en Dovro, sed ili estis nudaj pri veloj, kaj ne videblis vivo ĉirkaŭ ili. Estis dimanĉo; sed en Canterbury, la stratoj estis

malplenaj; pli strange ol ĉio, ne videblis eĉ unu pastro, kaj mian orelon trafis eĉ ne unu sonorilsignalo. Ĉie oni funebriis kvazaŭ pro morto. Mi ne povis kompreni tion. Fine, en la ekstremo de tiu urbo mi vidis malgrandan funebran procesion – nur unu familion kaj kelkaj amikoj post ĉerko – neniun pastro; funebraĵo sen sonorilo, libro aŭ kandelo; estis preĝejo proksima, sed ili pasis ĝin larmante, kaj ne eniris; mi vidis la lumturon, kaj tie pendis la sonorilo, vestita en nigro, kaj kun la lango ligita. Nun mi sciis! Nun mi komprenis la teruran katastrofon kiu trafis Anglion. Invado? Invado estas kompare triviale. Estis la INTERDIKTO.

Mi ne faris demandojn; mi ne devis fari. La Eklezio batis; kion mi devis fari estis alivestiĝi min, kaj iri singarde. Unu el miaj servistoj donis al mi vestaĵaron, kaj kiam ni estis sekuraj ekster la urbo mi surmetis ĝin, kaj ekde tiam mi vojaĝis sola; mi ne povis riski la embarason de kunaroj.

Mizera vojaĝo. Malplena silento ĉie. Eĉ en Londono. La trafiko ĉesis; homoj nek iras nek ridas, nek iras grupe, nek eĉ pare; ili iradis sencele, iu por si, kun la kapo klinita, kun veo kaj timo en sia koro. La Turo montris freŝajn militovundojn. Fakte, multe okazis.

Kompreneble, mi intencis preni la trajnon al Kameloto. Trajno! Nu, la stacio estis vaka kiel kavo. Mi iris plu. La vojaĝo al Kameloto estis

ripeto de tio, kiun mi jam vidis. La lundo kaj la mardo estis neniel malsamaj al la dimanĉo. Mi venis en malfrua nokto. El la plej bona elektre lumigata urbo en la regno, kaj la plej simila al ripozanta suno kiun vi iam vidis, ĝi iĝis simple makulo – makulo sur mallumo – tio estas, ĝi estis pli malluma kaj solida ol la cetera mallumo, kaj tial vi povis vidi ĝin iom pli bone; igis min senti kvazaŭ ĝi estis simbola – ia signo ke la Eklezio nun *ja* konservos la superan manon, kaj tutsimple forigos mian tutan belan civilizacion. Mi trovis neniun moviĝantan vivon en la malgajaj stratoj. Mi serĉis la vojon kun peza koro. La granda kastelo estis nigra sur la montetpinto, nenio videblis tie. La levponto estis malsupre, la granda porto malferma, mi eniris sen voko, nur miajn proprajn kalkanumojn mi aŭdis – kaj ili sonis sufiĉe tombaj, en tiuj vastaj, vakantaj kortoj.

42. Milito!

Mi trovis Clarence sola en sia oficejo, dronita en melankolio; kaj anstataŭ la elektra lumo, li reaktivigis la malnovan ĉifonlampon, kaj sidis tie en timiga krepusko, kun ĉiuj kurtenoj fermitaj. Li fervore ekstaris, kuris al mi kaj diris:

"Ho, valoras miliardon da milrejsoj denove vidi vivantan personon!"

Li konis min same facile kiel se mi tute ne estis maskita. Kio timigis min; oni povas facile kredi tion.

"Nun rapide, diru al mi la signifon de ĉi tiu terura katastrofo," mi diris. "Kiel okazis?"

"Nu, se ne estus iu reĝino Ginevra, ne okazus tiel frue; sed certe, tamen okazus. Ĝi okazus pro vi mem, iom post iom; feliĉe, okazis pro la reĝino."

"Kaj Sir Lanceloto?"

"Ĝuste."

"Donu al mi la detalojn."

"Mi kredas ke vi scias ke dum kelkaj jaroj estis nur unu paro de okuloj en ĉi tiuj regnoj kiu ne fervore forrigardis ĉe la demando ĉu la reĝino kaj Sir Lanceloto..."

"Jes, tiu de la reĝo Arturo."

"... kaj nur unu koro kiu nenion suspektis..."

"Jes, tiu de la reĝo; koro kiu ne povas pensi ion malbonan pri amiko."

"Nu, la reĝo povus daŭre vivi, ĉiam feliĉa kaj nenion suspektanta, ĝis la fino de siaj tagoj, se ne estus unu el viaj modernaj plibonigoj – la akcipoŝedantaro. Kiam vi foriris, tri mejloj de Londono, Canterbury kaj Dovro estis pretaj por la reloj, kaj same pretaj kaj maturaj por manipulado en la akcia merkato. Estis spekulado, kaj ĉiuj sciis tion. La akcioj estis vendeblaj je sia propra valoro. Kion faras Sir Lanceloto, krom..."

"Jes, mi scias; li trankvile kolektis preskaŭ ĉion por kanto; poste li aĉetis preskaŭ la duoblon, por liveri kiam vokata; kaj li intencis voki kiam mi foriris."

"Tre bone, li ja vokis. La knaboj ne povis liveri. Ho, li havis ilin – kaj li nur plifortigis sian prenon, kaj premis. Ili kaŝe ludis ĉar ili estis sufiĉe ruzaj por vendi al li akciojn pro dek kvin kaj dek ses, ion kio ne valoris dek. Nu, kiam ili ridis sufiĉe per tiu flanko de siaj buŝoj, ili trankviligis tiun flankon kaj komencis ridi per la alia. Tiam ili kompromitis kun la Nevenkebla por ducent kaj okdek tri!"

"Ho Dio!"

"Li senhaŭtigis ilin vivaj, kaj ili meritis tion – ĉiuokaze, la tuta regno ĝojis. Nu, inter la senhaŭtigatoj estis Sir Agravaine kaj Sir Mordred, nevoj de la reĝo. Fino de la unua akto. Akto dua, sceno unua, ĉambraro en la palaco de Carlisle, kien la korto iris por kelkaj tagoj de ĉasado.

Ĉeestantaj personoj, la tuta tribo de la nevoj de la reĝo. Mordred kaj Agravaine proponas vekti la atenton de la senkulpa reĝo Arturo al Ginevra kaj Sir Lanceloto. Sir Gawaine, Sir Gareth kaj Sir Gaheris havos nenion por fari kun tio. Okazas disputo, laŭta; meze de tiu, eniras la reĝo. Mordred kaj Agavaine donas al li sian detruan rakonton. *Tabulo*. Kaptilo estas farata por Lanceloto, laŭ ordono de la reĝo, kaj Sir Lanceloto iras en ĝin. Li sufiĉe malkomfortigis la kaŝitajn atestantojn – nome Mordred, Agavaine, kaj dek du kavalirojn de pli malalta rango, ĉar li mortigis ĉiujn krom Mordred; sed kompreneble, tio ne povis plibonigi la aferojn inter Lanceloto kaj la reĝo, kaj ne faris."

"Ho kara, nur povis esti unu rezulto – tion mi komprenas. Milito, kaj la kavaliroj de la aero dividitaj en reĝan partion kaj partion de Lanceloto."

"Jes – tiel okazis. La reĝo sendis la reĝinon al la paliso, proponante ke oni purigu ŝin per fajro. Lanceloto kaj liaj kavaliroj savis ŝin, kaj tion farante, ili mortigis kelkajn el viaj kaj miaj bonaj malnovaj amikoj – fakte kelkajn el la plej bonaj, kiujn ni iam havis, nome: Sir Belias la Orgojla, Sir Segwarides, Sir Griflet Filo de Dio, Sir Brandiles, Sir Aglovale..."

"Ho, vi tiras la kordojn de mia koro."

"... atentu, mi ne ankoraŭ estas preta – Sir Tor, Sir Gauter, Sir Gillimer..."

"La plej bona homo en mia suba naŭo. Kiel sperta dekstrulo li estis!"

"... la tri fratoj de Sir Reynold, Sir Damus, Sir Priamus, Sir Kay la Fremdulo..."

"Mia senvalorebla haltigilo! Mi vidis lin kapti surteran pilkon inter la dentoj. Mi ne eltenos!"

"... Sir Driant, Sir Lambegus, Sir Herminde, Sir Pertolope, Sir Perimones, kaj – kion vi pensas?"

"Ŝŝ! Parolu daŭre."

"Sir Gaheris, kaj Sir Gareth – ambaŭ!"

"Ho, nekredeble! Ilia amo al Lanceloto estis nedetruibla."

"Nu, estis hazarda okazo. Ili nur estis rigardantoj; ili estis senarmaj, kaj ili estis tie nur por vidi la punon de la reĝino. Sir Lanceloto mortigis iun ajn kiu baris lian blindan koleron, kaj li faris tion sen rimarki kiuj ili estis. Jen tuja fotografio, kiun unu el niaj knaboj faris de la batalo; ĝi estis aĉetebla ĉie kie oni vendas gazetojn. Jen – la figuroj plej proksimaj al la reĝino estas Sir Lanceloto kun sia glavo nuda, kaj Sir Gareth farinta sian lastan spiron. Vi povas vidi la angoron en la vizaĝo de la reĝino tra la serpentanta fumo. Estas skuenta batalbildo."

"Ja vere. Vi devas tre zorgi pri ĝi; ĝia historia valoro estas nekalkulebla. Daŭru!"

"Nu, la cetero de la rakonto estas nur milito, tutsimple. Lanceloto retiriĝis al sia urbo kaj al sia kastelo Ĝoja Gardo, kaj kolektis tie grandan aron de kavaliroj. La reĝo, kun granda aro, iris tien, kaj estis senespera batalado dum pluraj tagoj, kaj, rezulte, la tuta tero tute aparte estis kovrata de kadavroj kaj feron. Poste, la Eklezio kunflikis pacon inter Arturo kaj Lanceloto kaj la reĝino kaj ĉiujn – ĉiujn krom Sir Gawaine. Li estis amara pro la mortigo de liaj fratoj, Gareth kaj Gaheris, kaj ne lasis sin esti pacigita. Li diris al Lanceloto ke li baldaŭ foriru, kaj rapide prepariĝu, kaj atendu esti baldaŭ atakata. Do Lanceloto vojaĝis al sia duklando Guienne kun siaj sekventoj, kaj Gawaine baldaŭ sekvis kun armeo, kaj li trompis reĝon Arturon veni kun li. Arturo lasis la regnon en la manoj de Sir Mordred ĝis via reveno..."

"Aha – la kutima saĝeco de reĝo!"

"Jes, Sir Mordred tuj eklaboris por fari sian regnon ĉiama. Li estis edziĝonta al Ginevra, kiel unua movo; sed ŝi fuĝis kaj fermis sin en la Turo de Londono. Mordred atakis; la Episkopo de Canterbury respondis per la Interdikto. La reĝo revenis; Mordred batalis kontraŭ li en Dovro, en Canterbury, kaj denove en Barham Down. Poste, oni parolis pri paco kaj verkis dokumenton. Laŭ la terminoj, Mordred havos Kornvalon kaj Kent dum Arturo vivos, kaj la tutan regnon poste."

"Nu, je mia animo! Mia sonĝo pri respubliko *daŭre* estos sonĝo."

"Jes. La du armeoj estas proksimaj al Salisbury. Gawaine – la kapo de Gawaine estas en la kastelo de Dovro, li falis en la batalo tie – Gawaine aperis al Arturo en sonĝo, almenaŭ lia fantomo faris tion, kaj avertis lin ne konflikti dum unu monato, la atendo kostu kion ĝi volas. Sed la batalo komenciĝis pro hazardo. Arturo ordonis ke, se glavo estis levata dum la konsultado pri la proponata interkonsento kun Mordred, sonigu la trumpeton kaj ataku! Ĉar li havis neniun fidon en Mordred. Mordred faris similan ordonon al *siaj* homoj. Nu, post iom da tempo, serpento mordis la kalkanon de kavaliro; la kavaliro forgesis ĉion pri la ordono, kaj atakis la serpenton per sia glavo. En malpli ol duona minuto, tiuj du timigaj armeoj interkraŝis! Ili buĉis unu la alian dum la tuta tago. Poste, la reĝo – ho, ni komencis ion novan post via foriro – nia gazeto faris."

"Ho? Kion?"

"Milita korespondado!"

"Nu, tio estas bone."

"Jes, la gazeto havis bonan tempon, ĉar la Interdikto ne faris impreson, havis neniun tenon, dum la milito daŭris. Mi havis militkorespondantojn en ambaŭ armeoj. Mi finos

tiun batalon, legante al vi kion skribis unu el tiuj knaboj:

Poste la reĝo ĉirkaŭrigardis, kaj poste li konsciiĝis pri ĉiuj siaj sekvantoj, kaj el ĉiuj liaj bonaj kavaliroj restis vivaj nur du, tio estas Sir Lucan de Butlere, kaj lia frato Sir Bedivere; kaj ili estis serioze vunditaj. Graco de Jesuo, diris la reĝo, kien iris ĉiuj miaj noblaj kavaliroj? Ho, ke mi iam vidis ĉi tiun dolorigan tagon. Ĉar nun, li diris, mi venis al mia fino. Sed Dio permesu ke mi scius kie estas la perfidulo Sir Mordred, kiu kaŭzis ĉion ĉi tion. Poste, la reĝo Arturo konsciiĝis kie Sir Mordred apogis sin al sia glavo inter multaj kadavroj. Nun donu al mi mian lancon, diris Arturo al Sir Lucan, ĉar tie mi vidas la perfidanton kiu faris ĉiun ĉi tiun malbonon. Sinjoro, lasu lin esti, diris Sir Lucan, ĉar li estas malfeliĉa; kaj se vi travivos ĉi tiun malfeliĉan tagon, vi havos bonan venĝon super li. Bona lordo, memoru la sonĝon de la lasta nokto, kaj kion la fantomo de Sir Gawaine diris al vi lastnokte, tamen Dio pro sia granda boneco konservis vin sana ĝis nun. Tial, pro Dio, via moŝto, mi petas vin rezigni. Ĉar benita estu Dio, vi venkis en ĉi tiu kampo; ĉar ĉi tie vivas ankoraŭ tri, kaj sub Sir Mordred vivas neniu. Kaj se vi rezignas nun, ĉi tiu malbona tago de fato estos pasinta. Donu al mi morton, ja donu al mi vivon,

diris la reĝo, nun mi vidas lin tie sola, li neniam fuĝos el miaj manoj, ĉar pli bonan ŝancon mi neniam havos. Dio donu al vi rapidon, diris Sir Bedivere. Tiam, la reĝo tenis la lancon en ambaŭ manoj, kaj kuris al Sir Mordred, kriante Perfidulo, nun venas via mortiga tago. Kaj kiam Sir Mordred aŭdis Sir Arturon, li kuris al tiu kun glavo en mano. Kaj tiam Sir Arturo batis Sir Mordred sub la ŝildo, metante la lancon tra la korpo pli ol klafton. Kaj kiam Sir Mordred sentis ke li ricevis sian mortovundon, li ĵetis sin, kun la forto kiun li havis, ĝis la tenilo de la lanco de Arturo. Kaj samtempe, li batis sian patron Arturon per la glavo en ambaŭ manoj, ĉe la flanko de la kapo, tiel ke la glavo trairis la helmon, kaj la cerbujon, kaj per tio Sir Mordred falis al la tero, tute morta. Kaj la nobla Arturo svenis kaj falis al la tero, kaj tie li ofte svenadis."

"Tio estas bona peco de militkorespondado, Clarence; vi estas unuaklasa gazetisto. Nu – ĉu la reĝo fartas bone? Ĉu li saniĝis?"

"La povra animo, ne. Li mortis."

Mi estis tute senscia; ne ŝajnis al mi ke iu vundo povis estis mortiga al li.

"Kaj la reĝino, Clarence?"

"Ŝi estas monaĥino, en Almesbury."

"Kiaj ŝanĝoj! Kaj en tiel mallonga tempo. Estas nekomprenebla. Kio poste, mi scivolas?"

"Mi povas diri kio poste."

"Nu?"

"Vetu niajn vivojn, kaj staru apud ili!"

"Kaj kion vi volas diri per tio?"

"La Eklezio estas majstro nun. La Interdikto inkluzivis vin kun Mordred; ĝi ne forigeblas dum vi restas viva. La klanoj kunvenas. La Eklezio kunigis ĉiujn kavalirojn kiuj ankoraŭ vivas, kaj tuj kiam oni trovos vin, ni estos aferecaj."

"Ho! Kun nia mortiga scienca militmaterialo, kun niaj aroj de trejnitaj..."

"Savu vian spiron – ni eĉ ne plu havas sesdek fidelulojn!"

"Kion vi diras? Niaj lernejoj, niaj universitatoj, niaj grandaj verkejoj, niaj..."

"Kiam tiuj kavaliroj venas, tiuj institucioj malpleniĝos kaj transiros al la malamiko. Ĉu vi kredis ke vi eledukis la superstiĉon el tiuj homoj?"

"Mi certe kredis tion."

"Do vi povas malpensi tion. Ili facile kontraŭstaris ĉiun streĉon – ĝis la interdikto. Ekde tiam, ili nur montris bravan eksteron – iliaj koroj tremas. Decidu vin pri tio – kiam venos la armeoj, la masko falos."

"Estas malfacilaj novaĵoj. Ni estas perditaj. Ili metos nian propran sciencon kontraŭ ni."

"Ne, tion ili ne faros."

"Kial?"

"Ĉar mi, kaj malpleno de fideluloj, blokis tiun ludon. Mi diros al vi kion mi faris, kaj kio igis min fari tion. Ruza vi estas, sed la Eklezio estas pli ruza. Estis la Eklezio kiu sendis vin iranta – tra siaj servistoj, la doktoroj."

"Clarence!"

"Estas la vero. Mi scias tion. Ĉiu oficiro en via ŝipo estis elektita servisto de la Eklezio, same kiel ĉiu homo en la maristaro."

"Ĉu mi kredu tion?"

"Estas ĝuste kiel mi diras. Mi ne trovis tiujn aferojn tuj, sed finfine mi trovis ilin. Ĉu vi sendis al mi verbajn informojn, tra la komandanto de la ŝipo, ke kiam li revenos al vi, kun manĝaĵoj, vi forlasos Kadizon..."

"Kadizon! Mi neniam estis en Kadizo!"

"... forlasos Kadizon kaj iros en malproksimaj akvoj senfine, pro la sano de via familio? Ĉu vi skribis tion al mi?"

"Kompreneble ne. Mi skribus, ĉu ne?"

"Kompreneble. Mi estis maltrankvila kaj suspektoplena. Kiam la komandanto denove iris, mi sukcesis venigi spionon kun li. Ekde tiam mi neniam aŭdis pri la ŝipo, nek pri la spiono. Mi donis al mi du semajnojn por aŭdi ion el vi. Poste mi decidis sendi ŝipon al Kadizo. Mi havis kialon ne fari tion."

"Kion?"

"Nia mararmeo subite kaj mistike malaperis! Samtempe, same subite kaj mistike, la fervojo, la telegrafo kaj la telefono ĉesis funkcii, ĉiuj homoj malaperis, palisoj estis forhakitaj, kaj la Eklezio malbenis la elektran lumon! Mi devis esti tre aktiva – kaj for ĝi estis. Via vivo estis sekura – neniu en ĉi tiuj regnoj, krom Merlino, kuraĝus tuŝi tian magiiston kiel vi sen dekmil homoj malantaŭ la dorson – mi devis pensi pri nenio, krom kiel plej bone prepari vian venon. Mi sentis min mem sekura – neniu volus tuŝi vian karesulon. Do mi faris ĉi tion. El niaj pluraj verkoj, mi elektis ĉiujn virojn – knabojn, mi volas diri – sur kies fidelecon sub ĉiuj premoj mi ĵurus, kaj mi kunigis ilin sekrete kaj donis al ili iliajn instrukciojn. Ili estas kvindek du; unu pli juna ol dek kvar, kaj neniu pli ol dek sep jarojn aĝa."

"Kial vi elektis knabojn?"

"Ĉar ĉiuj aliaj naskiĝis en afmosfero de superstiĉo, kaj kreskis en ĝi. Estas en ilia sango kaj ostoj. Ni kredis ke ni edukis tion el ili; ankaŭ ili kredis tion; la Interdikto vekis ilin kiel tondro! Ĝi montris ilin al ili mem, kaj same al mi. Kun knaboj estis malsame. Tiuj kiuj estis sub nia trejnado, el sep- ĝis dekjara, ne konis la teroron de la Eklezio, kaj inter ili mi trovis miajn kvindek du. Kiel venonta movo, mi faris privatan viziton

al la privata kavo de Merlino – ne la malgranda – la granda..."

"Jes, tiu kie ni sekrete fondis nian unuan grandan elektran fabrikon, kiam mi planis miraklon."

"Ĝuste. Kaj ĉar tiu miraklo ne ankoraŭ estis necesa, mi kredis ke estis bona ideo uzi la fabrikon nun, Mi plenigis la kavon por sieĝo..."

"Bona ideo, unuaklasa ideo."

"Mi kredas tion. Mi lokigis kvar el miaj knaboj kiel gardo – ene, kaj ne videblaj. Neniu estos vundita – ekstere; sed ĉiu provo eniri – nu, ni diris: nur lasu iun provi! Poste, mi eniris al la montetoj, kaj malkaŝis kaj tranĉis la sekretajn fadenojn, el via litoĉambro al la fadenoj kiuj iras al la dinamitaj kaŝejoj sub ĉiuj niaj vastaj fabrikoj, verkejoj, magazenoj kaj tiel plu, kaj ĉirkaŭ meznokto mi kaj miaj knaboj eliris kaj kunigis tiun fadenon al la kavo, kaj neniu krom vi kaj mi havas ideon kien iras la alia fino. Ni metis ĝin sub la tero, kompreneble, kaj ĉio estis finigita post kelkaj horoj. Nun ni devas forlasi nian fortikaĵon, kiam ni volas eksplodigi nian civilizacion."

"Tio estis la ĝusta movo – kaj la natura; milita necesajo, en la ŝanĝita situacio. Nu, kiuj ŝanĝoj *ja* venis! Ni kredis ke oni sieĝos nin en la palaco je iu aŭ alia momento, sed – nu, daŭrigu!"

"Poste, ni faris fadenan barilon."

"Fadenan barilon?"

"Jes. Vi mem indikis tion, antaŭ du aŭ tri jaroj."

"Ho, mi memoras – la tempo kiam la Eklezio unuafoje provis sian forton kontraŭ ni, kaj baldaŭ trovis saĝe atendi pli esperplenan sezonon. Nu, kiel vi aranĝis la barilon?"

"Mi komencas per dek du tre fortaj fadenoj – nudaj, ne izolitaj – el granda dinamo en la kavo – dinamo sen brosiloj, krom pozitiva kaj negativa..."

"Jes, tio estas korekte."

"La fadenoj iras el la kavo kaj barilo en cerklon de ebena tero, cent jardojn de diametro; ili faras dek du sendependajn barilojn, dek futojn unu de la alia – tio diras, dek du cerkloj ene de cerkloj – kaj iliaj finoj denove iras en la kavon."

"Bone; daŭrigu."

"La bariloj estas ligitaj al pezaj kverkaj palisoj nur tri futojn unu de la alia, kaj tiuj palisoj estas sinkigitaj kvin futojn en la tero."

"Tio estas bone kaj forte."

"Jes. La fadenoj ne havas ligan al la tero ekster la kavo. Ili iras el la pozitiva broso de la dinamo; estas terligo tra la negativa broso; la aliaj finoj de la fadenoj reiras al la kavo, kaj ĉiu estas teren ligita sendepende."

"Ne-ne, tio ne taŭgas."

"Kial?"

"Estas tro multekoste – uzas forton por nenio. Vi ne deziras teran ligo, krom tio tra la negativa broso. La alia fino de ĉiu fadenon devas esti reportata al la kavo, kaj ligita sendepende, kaj *sen* iu ligo al la tero. Nun observu la ekonomion. Kavalerio ĵetas sin al la barilo; vi uzas neniun potencon, vi elpagas neniun monon, ĉar estas nur unu ligo al la tero ĝis tiuj ĉevaloj iras al la barilo; en la momento, kiam ili tuŝas ĝin, ili faras ligo kun la negativa broso *tra la tero*, kaj tuj mortas. Ĉu vi ne komprenas? – vi ne uzas energion ĝis necesa; via fulmo estas tie, kaj preta, kiel la kuglo en la pafilo; sed ĝi kostas al vi nenion ĝis vi pafas. Ho jes, la sola teroligo..."

"Kompreneble! Mi ne scias kial mi ne komprenis tion. Estas ne nur pli malmultekosta, sed ankaŭ pli efika ol la mala maniero, ĉar se fadenoj estas rompitaĵoj aŭ noditaĵoj, ne okazis malbono."

"Ne, precipe se ni havas rompanton en la kavo, kaj forigas la rompitan fadenon. Nu, daŭrigu. La Gatlingoj?"

"Jes – tio estas aranĝita. En la centro de la interna cerklo, sur granda estrado ses futojn alta, mi starigis baterion de dek tri Gatling-pafiloj, kun multe da municio."

"Jen. Ili kontrolas ĉiun aliron, kaj kiam venas la kavaliroj de la Eklezio, estos muziko. La dorso de la krutegaĵo super la kavo..."

"Mi havas fadenan barilon tie, kaj Gatlingon. Ili ne faligos ŝtonojn al ni."

"Nu, kaj la vitrocilindraj dinamito-torpedoj?"

"Tio estas pripensata. Estas la plej bela ĝardeno iam plantita. Estas zono kvardek futojn larĝa, kaj ĝi ĉirkaŭiras la eksteran barilon – la distanco inter ĝi kaj la barilo estas cent jardoj – tiu spaco estas ia neŭtrala tero. Ne estas unuopa kvadrata jardo de tiu tuta zono, ne armita per torpedo. Ni metis ilin sur la surfaco de la tero, kaj ŝutis sablon super ili. Estas laŭŝajne senkulpa ĝardeno, sed vi foje enlasas homon por haki, kaj vi vidos."

"Ĉu vi testis la torpedojn?"

"Nu, mi intencis, sed..."

"Sed kion? Nu, estas terura malvido ne uzi..."

"Teston? Jes, mi scias; sed tiuj estas ĝustaj; mi legis kelkajn en la publika vojo je la alia flanko de nia linio, kaj ili estis testataj."

"Nu, tio ŝanĝas la aferon. Kio faris tion?"

"Komitato de la Eklezio."

"Kiel ĝentile!"

"Jes. Ili venis por ordoni nin rezigni. Vi vidu, ili ne vere venis por testi la torpedojn; tio nur estis hazardo."

"Ĉu la komitato skribis raporton?"

"Ho jes. Vi povus aŭdi ĝin tutan mejlon."

"Sen protestoj?"

"Tio estis ĝia naturo. Post tio mi metis kelkajn signojn, por protekti venontajn komitatojn, kaj ekde tiam ni ne havis entrudantojn."

"Clarence, vi faris grandan laboron, kaj vi faris ĝin perfekte."

"Ni havis sufiĉe da tempo por tio; ne estos kialo rapidi."

Ni sidis silentaj dum momento, kaj pensis. Poste mi decidis min, kaj diris:

"Jes, ĉio estas preta; ĉio estas en ŝipa kondiĉo, neniuj detaloj mankas. Mi scias kion fari nun."

"Ankaŭ mi scias kion fari; sidi kaj atendi."

Ho _ne! Ekstaru kaj *batu!*"

"Ĉu vi volas diri tion?"

"Jes, klare! La *defendo* ne estas mia linio, la *ofendo* estas! Tio estas, kiam mi havas justan manon – du trionon same bona kiel la mano de la malamiko. Ho jes, ni ekstaros kaj batos; tio estas nia ludo."

"Cent kontraŭ unu ke vi pravas. Kiam komenciĝas la spektaklo?"

"*Nun!* Ni proklamas la Respublikon."

"Nu, tio jes ja rapidigos la aferojn, tutcerte!"

"Tio faros ilin interparoli, mi diras al vi! Anglio estos vespejo antaŭ tagmezo morgaŭ, se la mano de la Eklezio ne perdis sian ruzon – kaj ni scias ke ĝi ne faris tion. Nun vi skribu, kaj mi diktos ĉi tion:

PROKLAMO

ESTU KONATA AL ĈIUJ. Ĉar la reĝo mortis sen postlasi heredanton, estos mia devo kontinui la plenuman aŭtoritaton donitan al mi, ĝis registaro estis kreita kaj moviĝanta. La monarĥio ĉesis, ĝi ne plu ekzistas. Do ĉiu politika potenco revenis al sia origina fonto, la popolo de la nacio. Kun la monarĥio mortis ankaŭ ĝiaj pluraj helpantoj; do ne plu estas nobelaro, nek privilegiita klaso, nek Establita Eklezio; ĉiuj homoj estas nun ekzakte egalaj; ili ĉiuj staras sur la sama nivelo, kaj la religio estas libera. *Respubliko estas nun proklamata*, ĉar ĝi estas la natura stato kiam aliaj aŭtoritatoj ĉesis. Estas la devo de la brita popolo tuj kuniĝi, kaj per siaj voĉoj elekti reprezentantojn kaj meti la registaron en iliajn manojn."

Mi subskribis "La Estro" kaj datis ĝin el la kavo de Merlino. Clarence diris:

"Nu, tio diras kie ni estas, kaj invitas ilin tuj voki."

"Tio estas la ideo. Ni *batos* – per la Proklamo – poste estos ilia vico. Nun certigu ke la afero estu tuj presigita kaj poŝtita; tio estas: fari la ordonon; poste, se vi havas kelkajn biciklojn pretajn je la piedo de la monteto, ek al la kavo de Merlino!"

"Mi estos preta post dek minutoj. Kia ciklono estos morgaŭ, kiam ĉi tiu papero ekagos! ... Ĉi tio estas agrabla, malnova palaco; mi scivolas ĉu ni iam denove – sed ne zorgu pri tio."

43. La batalo ĉe la Sablobelto

En la kavo de Merlino – Clarence kaj mi kaj kvindek du freŝaj, klaraj, bone edukitaj, puranimaj junaj brituloj. Matene, mi sendis ordonon al la fabrikoj kaj al ĉiuj niaj grandaj verkejoj malkontinui la aktivaĵojn kaj translokigi ĉiun vivon al sekura distanco , ĉar ĉion eksplodigas sekretaj bomboj, "*kaj neniuj scias en kiu momento -- do vakuigu tuj.*" Tiuj homoj konis min, kaj fidis mian vorton. Ili foriros sen permesi al si la tempon por kombigi sin, kaj mi mem povis tuttrankvile decidi pri la tempo de la eksplodo. Vi ne povis dungi unun el ili por retroiri tra la jarcento, se la eksplodo ankoraŭ atendus.

Ni atendis dum unu semajno. Ne estis teda por mi, ĉar mi skribadis la tutan tempon. Dum la tri unuaj tagoj, mi fine ŝanĝis mian taglibron en ĉi tiun rakontan formon; nur necesis unu capitulo aŭ du por ĝisdatigi ĝin. Dum la cetero de la semajno, mi skribis leterojn al mia edzino. Estis ĉiam mia kutimo skribi al Alisande ĉiutage, ĉiam kiam ni estis disigitaj, kaj nun mi tenis la kutimon viva pro amo, al la kutimo kaj al ŝi, kvankam mi povis nenion fari per la leteroj, kompreneble, skribinte ilin. Sed pasigis la tempon, komprenu, kaj estis preskaŭ kiel babilado; estis preskaŭ kiel se mi dirus "Alisande, se vi kaj Ha lo Centraloj estus ĉi

tie en la kavo, krom nur viaj fotografioj, kiel bone estus por ni!" Kaj poste, sciu, mi povus imagi la bebon eldirante ion responde, kun la pugnoj en la buŝo kaj mem streĉanta sin sur la dorso sur la genuoj de sia patrino, kaj ŝi ridanta kaj miranta kaj adoranta, kaj fojon post fojo tiklanta la mentonon de la bebo por ridigi ĝin, kaj eble fojon post fojo enĵetanta mem respondantan vorton al mi – kaj tiel plu kaj tiel plu – nu, vi sciu, mi povus sidi tie en la kavo kun mia krajono, kaj meti ĝin aktiva, tiel, kun ili horon post horo. Estis preskaŭ kiel teni nin ĉiujn kune denove.

Mi havis spionojn ekstere ĉiunokte, kompreneble, por havi novaĵojn. Pro kiu raporto, la aferoj aspektis pli kaj pli imponaj. La aroj kuniĝis, kuniĝis; laŭ ĉiuj vojoj kaj padoj de Anglio rajdis la kavaliroj, kaj pastroj rajdis kun ili, por doni kuraĝon al tiuj originaj kruckavaliroj, ĉar estis milito de la Eklezio. Ĉiuj nobeloj, grandaj kaj malgrandaj, estis survoje, kaj ĉiuj pli modestaj gravuloj. Ĉio tio estis atendata. Ni devus maldensigi tiajn homojn tial, ke la popolo povus fari nenion, krom iri al la fronto kun sia respubliko, kaj...

Ho, kia azeno mi estis! Je la fino de la semajno, mi komencis enkapigi ĉi tiun grandan kaj malmagian fakton: ke la granda parto de la nacio svingis siajn ĉapojn kaj krie postulis respublikon dum unu tago, kaj fino! La Eklezio,

la nobelaro kaj la granduloj tiam faris al ili grandan, malakceptantan mienon, kaj aliigis ilin en ŝafojn! Ekde tiu momento, la ŝafoj komencis reveni al sia ejo – tio estas la kampadejoj – kaj oferis siajn senvalorajn vivojn kaj sian valoran lanon al "ĝustaj aferoj". Ho, eĉ la homoj antaŭnelonge sklavoj laboris por la "ĝustaj aferoj", kaj laŭdis ilin, preĝis por ili, sentimentale salivumis sur ili, same kiel ĉiuj aliaj komunuloj. Imagu tian homan malpuraĵon; imagu tian malsaĝecon!

Jes, nun estis "Morton al la Respubliko!" ĉie – eĉ ne unu malsamopinianta voĉo. La tuta Anglio marŝis kontraŭ ni! Vere, tio estis pli ol mi atendis.

Mi bone rigardis miajn kvindek du knabojn; rigardis iliajn vizaĝojn, ilian iradon, iliajn senkonsciajn sintenojn; ĉar ĉiuj tiuj estas lingvo – lingvo donita al ni por ke ĝi povu trompi nin kiam ni bezonas ĝin, kiam ni havas sekretojn kiujn ni volas protekti. Mi sciis ke tiu penso estus elparolata ĉiam kaj ĉiam denove, en iliaj animoj kaj koroj: *La tuta Anglio marŝas kontraŭ ni!*, kaj pli kaj pli postulis atenton ĉiufoje, ĉiam pli klara al ilia imago, ĝis eĉ en la dormo ili ne plu trovos ripozon de ĝi, sed aŭdos la malklarajn kaj flirtantajn estaĵojn de la sonĝoj diri: *La tuta Anglio_ -- LA TUTA ANGLIO! -- _marŝas kontraŭ vi!* Mi sciis ke ĉio tio okazos; mi sciis, ke

finfine la premo iĝos tiel granda, ke oni devas esprimi ĝin; do mi devas tiam esti preta kun respondo – respondo bone elektita kaj trankviligita.

Mi estis prava. La tempo venis. Ili *devis* paroli. Kompatindaj knaboj, estis terure vidi kiel palaj ili estis, kiel uzitaj, kiel maltrankvilaj. Unue, ilia parolanto apenaŭ povis trovi voĉon aŭ vortojn; sed baldaŭ, li havis ambaŭ. Ĉi tion li diris – kaj li diris tion en la bela, moderna angla, kiun li lernis en miaj lernejoj:

"Ni provis forgesi kio ni estas – anglaj knaboj! Ni provis meti racion antaŭ sentoj, devo antaŭ amo; niaj animoj laŭdas nin, sed niaj koroj faras la malon. Dum ŝajne restis nur la nobelaro, la granduloj, nur la dudek kvin mil aŭ tridek mil kavaliroj ankoraŭ vivaj el la lastatempaj militoj, ni estis unuanimaj, kaj nin ne maltrankviligis ia ajn dubo; ĉiu el tiuj kvindek du knaboj, kiuj staras ĉi tie antaŭ vi, diris: 'Ili elektis – estas ilia afero.' Sed pensu! – la afero ŝanĝiĝis – _la tuta Anglio marŝas kontraŭ ni!_ Do pripensu bone! Tiuj homoj estas niaj homoj, ili estas ostoj el niaj ostoj, karno de nia karno, ni amas ilin – ne petu nin detrui nian nacion!"

Nu, tio montras la valoron rigardi antaŭen, kaj esti preta al io kiam ĝi okazas. Se mi ne antaŭvidis tiun aferon kaj fiksis ĝin, tiu knabo

venkus min! – Mi ne povus diri eĉ unu vorton. Sed mi *ja* fiksis tion. Mi diris:

"Miaj knaboj, viaj koroj estas en la ĝusta loko, vi pensis digne, vi faris la dignan aferon. Vi estas anglaj knaboj, vi restas anglaj knaboj, kaj vi lasos tiun nomon ne malpurigitan. Ne plu maltrankviliĝu, estu trankvilaj! Pripensu: dum la tuta Anglio *ja* marŝas kontraŭ ni, kiu rajdas? Kiu, laŭ la kutimaj leĝoj de la milito, marŝas unue? Respondu al mi."

"La rajdanta aro de armitaj kavaliroj."

"Vere. Ilia forto estas tridek mil. Ili marŝos akreoj dike. Nun rigardu: neniu krom *ili* iam atingos la sablobelton! Tiam okazos io! Tuj poste, la civila aro malantaŭe foriros, por fari aferojn aliloke. Nur nobluloj kaj granduloj estas kavaliroj, kaj *nur ili* restos poste por danci al nia muziko. Estas absolute vere ke ni devis lukti nur kontraŭ tiuj tridek mil kavaliroj. Nun parolu, kaj estos kiel vi diros. Ĉu ni evitu la batalon, retiriĝu de la kampo?"

"NE!"

La krio estis unuanima kaj kora.

"Ĉu vi... ĉu vi... nu, ĉu vi timas tiujn tridek mil kavalirojn?"

Pro tiu ŝerco oni tutkore ridis, la problemoj de la knaboj malaperis, kaj ili gaje iris al siaj postenoj. Ho, kiaj karaj kvindek du! Ankaŭ same belaj kiel knabinoj.

Nun mi estis preta por la malamiko. Lasu la proksimiĝantan tagon veni – ili trovos nin sur la ferdeko.

La granda tago venis ĝustatempe. Je tagkrepusko, la gardanto en la ujo venis en la kavon kaj raportis moviĝantan nigran mason sub la horizonto, kaj mallaŭtan sonon kion li kredis estis milita muziko. La tagmanĝo estis ĵus preta; ni sidiĝis kaj manĝis.

Post tio, mi faris malgrandan parolon al la knaboj, kaj poste sendis detalojn al la baterio, kun Clarence en komando.

La suno baldaŭ leviĝis kaj sendis sian nemalhelpatan lumon super la lando, kaj ni vidis grandan aron moviĝantan malrapide al ni, same grave kaj kun la sama unuiĝanta fronto kiel ondo de la maro. Pli kaj pli proksime ĝi venis, kaj pli kaj pli sublime impona ĝi aspektis; jes, la tuta Anglio ŝajnis esti tie. Baldaŭ ni povis vidi la multegajn flagojn flirtantajn, kaj poste la suno trafis la armaĵojn kaj bruligis ilin. Jes, estis bela vidaĵo; mi neniam vidis ion similan.

Finfine, ni povis vidi detalojn. Ĉiuj plej antaŭe, neniuj sciis kiom la akreoj malantaŭe, rajdis surĉevale – kavaliroj en plumoj kaj armaĵoj. Subite, ni aŭdis trumpetojn; la malrapida irado transiris al kurado, kaj poste – nu, estis mirakle vidi! Malsupren venis la granda ĉevalŝuforma ondo – ĝi proksimiĝis al la sablobelto – mia spiro

ne moviĝis; pli proksime, pli proksime – la strio de verda torfo aliflanke de la flava zono iĝis maldika – eĉ pli maldika – iĝis nur strieto antaŭ la ĉevaloj – poste malaperis sub iliaj piedoj. Granda Skoto! Nu, la tuta antaŭo de tiu aro leviĝis al la ĉielo kun granda tondro, kaj iĝis granda ŝtormo de ĉifonoj kaj fragmentoj; kaj laŭ la tero kuŝis dika muro de fumo kiu kaŝis la ceteron de la homamaso por ni.

Tempo por la dua paŝo en la kampanjoplano! Mi tuŝis bufonon, kaj skuis la ostojn de Anglio for de ĝia dorso!

En tiu eksplodo, ĉiuj niaj noblaj civilizaci-fabrikoj iris en la aeron kaj malaperis el la tero. Tio estis malbone, sed necese. Ni ne povis permesi al ni ke la malamiko turnu siajn armilojn al ni.

Nun sekvis unu el la plej enuigaj horkvaronoj, kiujn ni iam eltenis. Ni atendis en silenta soleco enŝlositaj en niaj cercloj de fadenoj, kaj en cerclo de peza fumo ekster tiuj. Ni ne povis rigardi super la fumcerclo, kaj ni ne povis rigardi tra ĝi. Sed finfine ĝi komencis malrapide malaperi, kaj post alia horkvarono la tereno estis klara, kaj nia scivolemo povis kontentigi sin. Neniu vivanta estaĵo videblis! Ni nun vidis ke aldonoj estis faritaj al niaj defendoj. La dinamito faris fosaĵon pli ol cent futojn larĝan, ĉirkaŭ ni, kaj suprenĵetis muron ĉirkaŭ dudek kvin futojn altajn je ambaŭ

flankoj. Pri detruo de vivo, ĝi estis mirinda. Cetere, ĝi ne estis mezurebla. Kompreneble, ni ne povis *kalkuli* la mortintojn, ĉar ili ne ekzistis kiel individuoj, sed nur kiel homogena protoplasmo, kun fer-alojoj kaj butonoj.

Neniu vivo videblis, sed necese estis kelkaj vunditoj malantaŭe, portitaj el la kampo sub la protekto de la fum-muro; estus malsaneco inter la aliaj – ĉiam estas, post tia okazo. Sed venos neniuj fortigoj; jen la lasta pozicio de la kavalerio de Anglio, jen la tuta restanta ordo, post la ĵusaj detruantaj militoj. Do mi sentis min tute sekura en la kredo ke la plej granda forto, kiu povus estonte esti uzata kontraŭ ni, estus tute malgranda; tio estas, se temas pri kavaliroj. Mi do skribis gratulan saluton al mia armeo per ĉi tiuj vortoj:

SOLDATOJ, DEFENDANTOJ DE HOMAJ LIBERECO KAJ EGALECO: Via generalo gratulas vin! En la fiero de sia forto kaj la vanteco de sia famo, aroganta malamiko venis kontraŭ vi. Vi estis pretaj. La konflikto estis mallonga; je via flanko glora. Tiu granda venko, kiun ni havis tute sen perdoj, ne havas paralelojn en la historio. Tiel longe, kiel la planedoj moviĝos en siaj orbitoj, la **BATALO DE LA SABLOBELTO** ne malaperos el la memoroj de homoj.

La Estro

Mi bone legis ĝin, kaj la aplaŭdon kiun mi ricevis tre kontentigis min. Poste, mi finis per ĉi tiuj rimarkoj:

"La milito kontraŭ la angla nacio, kiel nacio, nun finiĝis. La nacio retiriĝis de la kampo kaj de la milito. Antaŭ ol ĝi povas esti persvadata reveni, la milito finiĝis. Ĉi tiu kampanjo estos la sola luktota. Ĝi estos mallonga – la plej mallonga en la historio. Ankaŭ la plej detrua pri vivoj, se oni rigardas la proporciojn de vunditoj kaj mortigitoj kun la nombron de batalantoj. Ni havis sufiĉe de la nacio; ekde nun, ni traktos nur la kavalirojn. Anglaj kavaliroj povas esti mortigataj, sed ne venkataj. Ni scias kio estas antaŭ ni. Dum unu el tiuj viroj ankoraŭ vivas, nia tasko ne estas finigita, la milito ankoraŭ daŭras. Ni mortigos ilin ĉiujn." [Laŭtan kaj longan aplaŭdon.]

Mi elektis la grandajn murojn, ĵetitajn ĉirkaŭ niaj linioj per la dinamita eksplodo — nur vidloko, kie kelkaj knaboj povos mencii la malamikon, kiam li denove aperos.

Poste mi sendis inĝenieron kaj kvardek homojn al punkto ĝuste trans niaj linioj sude, por konkeri montaran rivereton tie, kaj meti ĝin ene de niaj linioj kaj sub nia komando, aranĝante ĝin tiel ke mi povos tuj uzi ĝin, se tio necesos. La kvardek homoj estis dividitaj en du grupojn de po

dudek, kiuj venis unuj post la aliaj ĉiujn du horojn. Post dek horoj, la laboro estis finigita.

Nun venis la nokto, kaj mi retiris miajn soldatojn. Tiu kiu rigardis norden raportis ke li vidis kampadejon, sed videblan nur per lorno. Li raportis ankaŭ ke kelkaj kavaliroj palpis sin al ni, kaj puŝis kelkajn bovinojn trans niaj linioj, sed ke la kavaliroj mem ne venis tre proksimen. Ja tion mi atendis. Ili sentis nin, sciu; ili volis scii ĉu ni ludu al ili denove la ruĝan teroron. Ili estos pli kuraĝaj dum la nokto, eble. Mi kredas ke mi sciis kiun projekton ili provu, ĉar evidente mi mem provus la saman se mi estus en ilia loko, kaj same nescianta kiel ili. Mi menciis tion al Clarence.

"Mi kredas ke vi pravas," li diris. "Estas la evidenta afero por ili provi tion."

"Nu bone," mi diris, "se ili faros tion, ili estas juĝitaj."

"Certe."

"Ili povos nenion montri en la mondo."

"Kompreneble ne."

"Estas terure, Clarence. Ŝajnas esti tre lamentinda."

La afero maltrankvilis min tiom, ke mi ne povis havi animan pacon, ĉar mi pensis pri ĝi kaj maltrankviligis pri ĝi. Do finfine, por trankviligi mian konsciencon, mi formulis ĉu tiun mesaĝon al la kavaliroj:

AL LA HONORIGA KOMANDANTO DE LA RIBELEMA KAVALERIO DE ANGLIO: Vi luktas vane. Ni konas vian forton – se oni tiel rajtas nomi ĝin. Ni scias ke vi neniel povas meti kontraŭ ni pli ol dudek kvin mil kavalirojn. Do vi havas nenium ŝancon – absolute nenium. Pripensu: ni estas bone ekipitaj, tre fortaj, ni estas 54. Kvindek kvar kio? Homoj? Ne, *animoj* – la plej kapablaj en la mondo; forto, kontraŭ kiu nur besta potenco ne povas pli esperi regi, ol la maldiligentaj ondoj de la maro esperas venki la granitajn murojn de Anglio. Akceptu la konsilojn. Ni estas pretaj doni al vi viajn vivojn; por la bono de viaj familioj, ne rifuzu la donon. Ni ofertas al vi ĉi tiun ŝancon, kaj estas la lasta: ĵetu suben viajn armilojn; senkondiĉe kapitulaci al la respubliko, kaj ĉio estos pardonata.

(Signita) La Estro

Mi laŭtlegis tion al Clarence, kaj diris ke mi proponis sendi tion sub paca flago. Li ridis la sarkasman ridon, kun kio li estis naskita, kaj diris:

"Iel ŝajnas maleble al vi iam tute kompreni kio estas nobeloj. Nun lasu nin ŝpari iom da tempo kaj peno. Pensu ke mi komandas la homojn tie. Nu, nun vi estas la paca flago; venu kaj donu al mi vian mesaĝon, kaj mi respondos."

Mi akceptis la ideon. Mi venis sub imagita gardo de la soldatoj de la malamiko, donis mian paperon, kaj tralegis ĝin. Responde, Clarence tiris la paperon el mia mano, montris mikan mienon, kaj diris malrespekteme:

"Distiru al mi ĉi tiun beston, kaj revenigu lin en korbo al la malaltnaskito kiu sendis lin; alian respondon mi ne havas!"

Kiel malplena estas teorio en la ĉeesto de faktoj! Kaj jen nur faktoj, kaj nenio pli. Ĝuste tio okazus, tion oni ne povus nei. Mi distiris la paperon kaj donis ĉiaman ripozon al miaj tempe malbone planitaj sentimentalecoj.

Poste al la aferoj. Mi testis la signalojn el la Gatling-estrado al la kavo, kaj kontrolis ke estis bonaj; mi testis kaj retestis tiujn kiuj kontrolis la barojn – tio estis signalojn, per kiuj mi povis rompi kaj renovigi la elektran kurenton en ĉiu barilo sendepende de la alia, laŭvole. Mi metis la koneksojn sub gardo kaj aŭtoritato de tri el miaj plej bonaj knaboj, kiuj gardis unu post la alia ĉiun duan horon dum la tuta nokto kaj tuj obeis mian signalon, se mi havos okazon doni ĝin – tri revolverpafoj, unu rapide post la alia. Oni ne plu gardos dumnokte, kaj la ujo estis lasita malplena de vivo; mi ordonis kvieton en la kavo, kaj la elektraj lumoj nur briletis.

Tuj kiam estis bone kaj mallume, mi rompis la elektron al ĉiuj baroj kaj palpis min al la bordo

laŭ mia flanko de la granda dinamita fosaĵo. Mi rampis ĝis ĝia pinto kaj kuŝis tie sur la deklivo por rigardi. Sed estis tro mallume por vidi ion. Kiam temas pri sonoj, ne estis iuj. La silento estis mortosimila. Vere, estis la ordinaraj noktaj sonoj de la kamparo – flirtantaj noktaj birdoj, zumantaj insektoj, bojantaj malproksimaj hundoj, blekantaj bovinoj ie – sed tiuj ne ŝajnis rompi la kvieton, ili nur intensigis ĝin, kaj samtempe aldonis teruran melankolion al ĝi.

Mi baldaŭ ĉesis rigardi, la nokto ja estis tiel nigra, sed mi streĉis miajn orelojn por kapti ĉiujn suspektindajn sonojn, ĉar mi kredis ke mi nur devas atendi, kaj mi ne estos seniluziigita. Tamen mi devis longe atendi. Finfine, mi kaptis kion vi povas nomi malklarajn sonojn – metalajn. Mi do malfermegis miajn orelojn, kaj tenis mian spiron, ĉar ĝuste tion mi atendis. Ĉi tiu sono dikiĝis, kaj proksimiĝis – el la norda direkto. Baldaŭ, mi aŭdis ĝin je mia propra nivelo – la pinto de la mala deklivo, cent futojn aŭ pli malproksime. Poste mi ŝajnis vidi vicon de nigraj punktoj aperi laŭ tiu dorso – homaj kapoj? Mi ne povis diri; eble estis nenio ajn; vi ne povas dependi de viaj okuloj, kiam via imago ne funkcias. Tamen, la demando estis baldaŭ respondata. Mi aŭdis la metalan sonon malsupreniĝi al la granda fosaĵo. Ĝi kreskis rapide, ĝi distansiĝis, kaj ĝi neerareble donis al mi ĉi tiun fakton: armita aro ekloĝis en la

fosaĵo. Jes, tiuj homoj preparis etan surprizon por ni. Ni povis atendi distron ĉe matenkrepusko, eble pli frue.

Nun mi palpis min reen al la ujo; mi vidis sufiĉe. Mi iris al la estrado kaj donis la signalon doni elektron al la du internaj baroj. Poste mi venis en la kavon, kaj trovis ĉion kontentiga tie – neniue estis maldorma, krom la laboranta gardo. Mi vekis Clarence kaj diris al li ke la granda fosaĵo pleniĝis de homoj, kaj ke mi kredis ke ĉiuj kavaliroj venos kune al ni. Mi kredis ke tuj, kiam venos la matenkrepusko, ni povos atendi ke la kaŝataj amasoj de la fosaĵo svarmos super la deklivo kaj atakos, tuj sekvataj de la cetera armeo.

Clarence diris:

"Ili volos sendi unu spionon aŭ du en la mallumon, por fari unuavicaĵajn observojn. Kial ne mallumigi la eksterajn barojn, kaj doni al ili ŝancon?"

"Mi jam faris tion, Clarence. Ĉu vi iam konis min kiel negastigema?"

"Ne, vi havas bonan koron. Mi volas iri kaj..."

"Esti bonveniga komitato? Ankaŭ mi iros."

Ni iris tra la ujon kaj kuŝiĝis kune inter la du internaj baroj. Eĉ la malklara lumo de la kavo iel mildigis nian vidkapablon, sed la fokuso tuj komencis reguligi sin, kaj baldaŭ ĝi estis konforma al la nunaj cirkonstancoj. Antaŭe ni

devis senti nian vojon, sed nun ni devis vidi la barilajn palisojn. Ni komencis frustratan interparolon, sed subite Clarence ĉesis tion kaj diris:

"Kio estas tio?"

"Kio estas kio?"

"Tiu afero tie."

"Kiu afero – kie?"

"Tie, je ia distanco de vi – io malluma – ia malklara formo – al la dua barilo."

Mi rigardis kaj li rigardis. Mi diris:

"Ĉu povas esti homo, Clarence?"

"Ne, mi ne kredas tion. Se vi rigardas, aspektas i – ho, ja estas homo! – kiu apogas sin al la barilo."

"Mi fakte kredas ke estas; ni iru kaj rigardu."

Ni rampis sur la manoj kaj genuoj ĝis ni estis sufiĉe proksimaj, kaj tiam ni rigardis supren. Jes, estis homo – malklara, alta formo en armaĵo, staranta rekte, kun ambaŭ manoj sur la supra fadeno – kaj, kompreneble, estis laodoro de brulanta karno. La kompatindulo, morta kiel najlo, neniam sciis kio trafis lin. Li staris tie kiel statuo – neniun movo ĉirkaŭ li, krom ke liaj plumoj iom sonis en la nokta vento. Ni stariĝis kaj iom enrigardis inter la stangoj de lia viziero, sed ni ne povis vidi ĉu ni konis lin aŭ ne – la faco estis tro malklara kaj ombrita.

Ni aŭdis mallaŭtajn sonojn proksimiĝi, kaj ni mallevis nin al la tero kie ni estis. Ni malklare vidis alian kavaliron; li venis tre silente, kaj palpis la vojon. Nun li estis tiel proksima ke ni povis vidi lin elstreĉi manon, trovi superan fadenon, poste klini sin kaj rampo sub ĝi kaj super la suba. Nun li venis al la unua kavaliro – kaj iom ektemis kiam li ekvidis lin. Li staris dum momento – sendube scivolanta kial la alia ne moviĝis; poste li diris, kun malforta voĉo:

"Kial vi sonĝas tie, respektata Sir Mar..."

Poste li metis la manon sur la ŝultro de la kadavro – kaj nur mallaŭte ĝemis, kaj falis morta. Mortigita de mortinto, sciu. Estis io terura pri ĝi.

Tiuj fruaj birdoj venis unu post la alia, ĉirkaŭ ĉiu dudekkvina minuto proksime al ni, dum duona horo. Ili ne portis aliajn ofensivajn armilojn ol siaj glavoj; kutime, ili portis siajn glavojn pretaj en la manoj, streĉis ilin kaj tiel trovis la fadenojn. Ni iom post iom vidis bluan sparkon, kiam la kavaliro kiu kaŭzis ĝin estis tiel malproksima ke li estis nevidebla al ni; sed ni tamen sciis kio okazis; la kompatindulo, li tuŝis la elektron per sia glavo, kaj estis elektita. Ni havis mallongan paŭzojn de amara silento, rompataj kun amara reguleco de la laŭta falo de iu fere vestita; kaj tio ĉiam okazis, kaj estis tre timiga tie en la mallumo kaj soleco.

Ni decidis rondiri inter la internaj bariloj. Pro komforto, ni elektis iradi rekte; ni diris ke se oni vidos nin, oni kredos ke ni estas amikoj kaj ne malamikoj, kaj ĉiuokaze la glavoj ne atingos nin, kaj tiuj granduloj ne ŝajnis kunporti iujn lancojn. Nu, estis stranga vojaĝo. Ĉie, mortaj homoj kuŝis ekster la dua barilo – ne klare videblaj, sed tamen videblaj; kaj ni kalkulis ĝis dek kvin de tiuj patosaj statuoj – mortaj kavaliroj starantaj kun siaj manoj sur la supera fadeno.

Unu afero ŝajnis esti sufiĉe klara: nia torento estis tiel fortega ke ĝi mortigis antaŭ ol la viktimo povis krei. Sufiĉe frue ni trovis mallaŭtan kaj pezan sonon, kaj en la posta momento ni komprenis kio estis. Surprizatako venis! Mi flustris al Clarence iri kaj veki la armeon, kaj diru al ĝi ke ĝi atendu silente novajn ordonojn en la kavo. Li baldaŭ revenis, kaj ni staris ĉe la interna barilo kaj vidis la silentajn fulmojn fari sian teruran agon al la svarmantaj aroj. Oni vidis nur malmultajn detalojn; sed li povis noti ke nigra maso kuniĝis aliflanke de la dua barilo. Tiu ĉiam pli granda maso estis mortaj homoj! Nia kampo situis ene de solida muro de mortintoj – muro de kadavroj, oni povis diri. Io terura pri tio estis la malĉeesto de homaj voĉoj; ne estis huraoj, ne militkrioj; pensante pri surprizo, tiuj homoj moviĝis tiel sensone kiel eblis; kaj ĉiam, kiam ilia unua vico estis sufiĉe proksima al ilia celo

por ke ili ĝuste povu pensi pri krio, kompreneble ili renkontis la fatalan linion kaj falis sen atesti.

Nun mi sendis kurenton tra la tria barilo; kaj preskaŭ tuj tra la kvara kaj kvina, tiel rapide pleniĝis la malplenoj. Mi kredis ke nun estis tempo por mia klimakso; mi kredis ke tiu tuta armeo estis en nia kaptilo. Ĉiuokaze, estis bona tempo trovi. Do mi tuŝis butenon kaj lumigis kvindek elektraĵn sunojn je la supro de nia deklivo.

Ho, kia vido! Ĉirkaŭ ni estis tri muroj de mortintaj homoj! Ĉiuj aliaj bariloj estis preskaŭ plenaj de la vivantaj, kiuj kaŝiradis antaŭen inter la fadenoj. La subita lumo paralizis tiun aron, ŝtonigis ĝin, oni povas diri, per surprizo; mi nur havis unu momenton por uzi ilian senmovon, kaj mi ne malkaptis la okazon. Vi sciu, post alia momento ili denove estos konsciaj, poste ili komencos hurai kaj kuregi, kaj miaj fadenoj falos antaŭ ili; sed pro tiu perdita momento, ili perdos la okazon por ĉiam; dum kiam eĉ parteto de tempo estis ne uzita, mi pavis la kurenton tra ĉiuj bariloj kaj tuj mortigis la tutan aron! _Tiu_ lamenton vi povis *aŭdi*! Estis la lasta krio de dekunumil homoj. Ĝi kreskis en la nokto terure patosa.

Rigardo montris ke la cetera malamiko -- eble dek mil de ili -- estis inter ni kaj la ĉirkaŭanta fosaĵo, kaj premis sin al atako. Do ni havis

ĉiujn, kaj ili ne plu estis helpeblaj. Tempo por la lasta akto de la tragedio. Mi pafis la tri deciditaj revolverpafoj -- kio signifis:

"Ekfluu la akvo!"

Rigardo montris ke la cetera malamiko – eble dek mil de ili – estis inter ni kaj la ĉirkaŭanta fosaĵo, kaj premis sin al atako. Do ni havis *ĉiujn*, kaj ili ne plu estis helpeblaj. Tempo por la lasta akto de la tragedio. Mi pafis la tri deciditajn revolverpafojn – kio signifis:

"Ekfluu la akvo!"

Subite oni aŭdis laŭtan sonon, kaj post minuto la montara rivereto fluis tra la grandega fosaĵo, kaj kreis riveron cent futojn larĝa kaj dudek kvin profunda.

"Staru ĉe viaj pafiloj, homoj! Ekpafu!"

La dek tri Gatlingoj komencis vomi morton al la juĝitaj dekmil. Ili haltis, ili staris dum momento kontraŭ tiu mortiganta fajrofluo, poste ili rompis la poziciojn, turnis sin kaj kuris al la fosaĵo kiel polvo antaŭ vento. Tuta kvarono de ili neniam atingis la pinton de la alta deklivo; la tri kvaronoj ja atingis ĝin, saltis – kaj mortis per dronado.

Malpli ol dek minutoj post nia unua fajro, la armita rezisto estis tute neniigita, la kampanjo estis finigita, ni kvindek kvar estis mastroj de Anglio! Dudek kvin mil homoj kuŝis mortaj ĉirkaŭ ni.

Sed kiel perfida estas la estonteco! Tre baldaŭ
– ni diru post unu horo – okazis io, pro mia
propra kulpo, kio – sed mi ne havas koron skribi
tion. Ĉi tie la dokumento finiĝu.

44. Postskribo de Clarence

Mi, Clarence, devas skribi ĉi tion por li. Li proponis ke ni du eliru kaj vidu ĉu iu helpo estis donebla al la vunditoj. Mi estis tre kontraŭ tio. Mi diris ke se estis multaj, ni povis fari malmulton por ili, kaj ne estus saĝe se ni fidus ilin, ĉiuokaze. Sed li estis malofte fortunita el celo kiu li jam decidis; do ni malŝaltis la elektran kurenton, kunportis eskorton, rampis sur la ĉirkaŭantajn murojn de mortaj kavaliroj, kaj iris al la kampo. La unua vundita homo, kiu petis helpon, sidis kun la dorso al morta kamarado. Kiam la Estro klinis sin super li kaj parolis al li, la ulo ekkonis lin kaj pikis lin. Tiu kavaliro estis Sir Meliagraunce, kiel mi trovis kiam mi fortiris lian helmon. Li neniam plu petos helpon.

Ni portis la Estron al la kavo kaj donis al lia vundo, kiu ne estis tre serioza, la plej bonan zorgon kiun ni povis. En tiu servo ni havis la servon de Merlino, kvankam ni ne sciis tion. Li estis maskita kiel virino, kaj ŝajnis esti simpla maljuna kamparana patrino. En tiu masko, kun bruna vizaĝo kaj tute razita, li aperis kelkajn tagojn post la vundo de la Estro, kaj ofertis prepari nian manĝon, dirante ke ŝi foriris ĉar ŝiaj parencoj foriris al certaj novaj kampoj de la malamiko, kaj ke ŝi malsatis. La Estro fartis tre bone, kaj amuzis sin ĝisdatigante sian taglibron.

Ni ĝojis havi tiun virinon, ĉar ni ne estis multaj. Ni estis en kaptilo, sciu – kaj ni mem faris ĝin. Se ni restus kie ni estis, niaj mortigitoj mortigus nin; se ni lasus niajn defendojn, ni ne plu estus nevenkeblaj. Ni venkis, nun ni mem estis venkataj. La Estro komprenis tion; ni ĉiuj komprenis tion. Se ni povus iri al iu el tiuj novaj kampoj, kaj fari ian konkordon kun la malamiko – jes, sed la Estro ne povis iri, nek mi, ĉar mi estis unu el la unuaj kiuj malsaniĝis pro la malsana aero el la mortaj miloj. Aliaj estis venigitaj suben, kaj ankoraŭ aliaj. Morgaŭ...

Morgaŭ. Estas ĉi tie. Kaj kun ĝi la fino. Ĉirkakŭ noktomezo mi vekigis, kaj vidis tiun maljunulinaĉon faranta strangajn movojn en la aero ĉirkaŭ la kapo kaj vizaĝo de la Estro, kaj scivolis kion tio signifis. Ĉiuj krom la dinamo-gardo profunde dormis; ne aŭdigis sono. La virino ĉesis fari siajn mistikajn stultaĵojn, kaj komencis iri surpiedfingre al la pordo. Mi kriis:

"Haltu! Kion vi faris?"

Ŝi haltis, kaj diris kun sono de malica kontenteco:

"Vi estis venkantoj; vi estas venkitaj! Tiuj aliaj pereas – ankaŭ vi. Vi ĉiuj mortos ĉi tie – vi ĉiuj – krom *li*. Li dormas nun – kaj li dormos dum dek tri jarcentoj. Mi estas Merlino!"

Poste li tiel delire ridegis ke li iris malstabile kiel drinkinto, kaj fine li apogis sin al unu el niaj

fadenoj. Lia buŝo ankoraŭ estas malfermita; ŝajnas ke li ankoraŭ ridas. Mi supozas ke la vizaĝo havos tiun petrigitan ridon ĝis la kadavro iĝos polvo.

La Estro neniam moviĝis – dormas kiel ŝtono. Se li ne vekiĝos hodiaŭ, ni komprenos kia dormo estas, kaj lia korpo tiam estos portata al loko en unu el la malproksimaj partoj de la kavo, kie neniuj povos trovi ĝin kaj povos profani ĝin. Se temas pri ni aliaj – nu, ni interkonsentis ke, se iu el ni iam fuĝos vivanta el ĉi tiu loko, li skribos la fakton ĉi tie, kaj lojale kaŝos sian manuskripton ĉe la Estro, nia kara bona ĉefo, kies posedaĵo ĝi estas, ĉu li vivas ĉu estas morta.

La fino de la manuskripto

Fina PS de MT

La matenkrepusko venis, kiam mi metis la manuskripton flanken. La pluvo preskaŭ ĉesis, la mondo estis griza kaj malgaja, la finigita ŝtormo sospiris kaj singultis al ripozo. Mi venis al la ĉambro de la fremdulo, kaj aŭskultis ĉe lia pordo, kiu estis iom malfermita. Mi povis aŭdi lian voĉon, do mi frapetis. Ne estis respondo, sed mi ankoraŭ aŭdis lian voĉon. Mi enrigardis. La viro kuŝis surdorse en la lito, parolis rompite sed spirite, kaj interpunkciis kun la brakoj, kiujn li movis senripoze, kiel faras malsanuloj en deliro. Mi silente enŝteliĝis kaj klinis min super li. Lia murmurado kaj kriado kontinuus. Mi parolis – nur unu vorton, por kapti lian atenton. Liaj vitraj okuloj kaj cindra vizaĝo lumiĝis dum momento, kun plezuro, dankemo, ĝojo, bonveno:

"Ho Alisande, vi finfine venis – kiom mi sopiris vin! Sidu ĉe mi – ne lasu min – neniam lasu min denove. Alisande, neniam denove. Kie estas via mano? – donu ĝin al mi, kara, lasu min teni ĝin – tie – nun ĉio estas bona, ĉio estas paco, kaj mi denove estas feliĉa – *ni* denove estas feliĉaj, ĉu ne estas tiel, Alisande? Vi estas tiel malklara, vi estas nur nebulo, nur nubo, sed vi estas *ĉi tie*, kaj tio estas sufiĉe benigna; kaj mi havas vian manon; ne forprenu ĝin – ĝi estas por nur mallonga momento, mi ne longe postulos

ĝin... Ĉu tio estis la infano? Ha Lo Centraloj! ...
Ŝi ne respondas. Eble dormas? Metu ŝin kiam ŝi
vekiĝas, kaj lasu min tuŝu ŝiajn manojn, ŝian
vizaĝon, ŝiajn harojn, kaj diru adiaŭ al ŝi...
Alisande! ... Jes, vi estas tie. Mi perdis min mem
dum momento, kaj mi kredis ke vi estis for... Ĉu
mi estis longe malsana? Devas esti tiel; ŝajnas al
mi monatoj. Kaj tiaj sonĝoj! Tiaj strangaj kaj
teruraj sonĝoj, Alisande! Sonĝoj same veraj kiel
la vero – deliraj, kompreneble, sed tiel veraj! Ho,
mi kredis ke la reĝo estas morta, mi kredis ke vi
estis en Gaŭlio kaj ne povis veni hejmen, mi
kredis ke estis revolucio; en la fantazia frenezeco
de tiuj sonĝoj, mi kredis ke Clarence kaj mi kaj
malpleno de miaj kadetoj kontraŭbatis kaj
ekstermis la tutan kavalerion de Anglio! Sed eĉ
tio ne estis la plej stranga. Mi ŝajnis esti kreaĵo el
malproksima, ne ankoraŭ naskita erao, post
jarcentoj, kaj eĉ *tio* estis same vera kiel la cetero!
Jes, mi ŝajnis esti fluginta el tiu erao retroen al
nia propra, kaj poste denove al ĝi, kaj metita tie,
fremdulo stranga al tiu fremda Anglio, kun
abismo de dek tri jarcentoj inter mi kaj vi! inter
mi kaj mia hejmo kaj miaj amikoj! inter mi kaj
ĉio kio estas kara al mi, ĉio kio farus la vivon
vivindan! Estis terure – pli terure ol vi povus eĉ
imagi, Alisande. Ho, maldormu super mi,
Alisande – restu ĉe mi dum ĉiu momento – *ne* lasi
mian animon denove; la morto estas nenio, lasu

ĝin veni, sed ne kun tiuj sonĝoj, ne kun la torturo de tiuj teruraj sonĝoj – mi ne povas elteni tion denove... Alisande? ..."

Li kuŝis senkohere murmurante dum certa tempo; poste dum tempo li kuŝis silenta, kaj ŝajne li sinkis al la morto. Baldaŭ liaj fingroj komencis pluki rapide la kovrilon, kaj per tiu signo mi sciis ke lia fino estis proksima. Kun la unua sono de la morto en lia gorĝo, li iom rektiĝis, kaj ŝajnis aŭskulti; poste li diris:

"Korno? ... Estas la reĝo! La faldponto, jen! Homoj al la postenoj – aktiviĝu la..."

Li komencis sian lastan "efikon", sed li neniam finis ĝin.

La fino